

Kúnos Ignác

IMPERIO DE FEINO HELLAS

NOVGREKAJ POPOLFABELOJ

– Traduko –

ISBN 978-615-02-1807-6

2024

IMPERIO DE FEINO HELLAS

Laŭ la pridiroj de RHOUSOPOULOS RH. verkis: KÚNOS IGNÁC Dr.

NOVGREKAJ POPOLFABELOJ

Esperantigitaj de Adrienne, Lászlóné Pásztor

Lingve kontrolis: Rob Moerbeek kaj Pavol Petrik

– Traduko –

La verkistonomo laŭ la eldiro: D-ro Ignacio Kunoŝ

La originala titolo de la popolfabelo-libro: HELLÁSZ TÜNDÉR BIRODALMA

La originala popolfabelo-libro estas eldonita

de la

BÉTA IRODALMI RÉSZVÉNYTÁRSASÁG en septembro 1924.

La elektronika varianto estis pretigita en Budapest, de la Magyar Elektronikus Könyvtárért Egyesület, 2017.

Pretigis per subteno de la Internet Szolgáltatók Tanácsa.

Pretigita ĉe Országos Széchényi Könyvtár E-könyvtári Szolgáltatások Osztálya.

ISBN 978-615-5572-25-8 (online)

MEK-16609

La aperejo de la hungarlingva teksto ĉe MEK:

<https://mek.oszk.hu/16600/16609/>

La aperejo de la esperantlingva teksto ĉe MEK:

<https://mek.oszk.hu/25800/25890/>

Esperantigita de Adrienne, Lászlóné Pásztor, en Miskolc, 2024,

Eldonrajto ĉe: Pásztor Lászlóné

ENHAVO

1. Antaŭparolo	5
2. La malriĉa riĉulo	7
3. Toleranta ŝtono, tranĉilo, toleranta kandelo	8
4. La tri konsiloj	11
5. Niketas, la taglaboristido.....	13
6. Korakolingve.....	19
7. Malsaĝa sinjorino, kaj ŝia malsaĝa filino.....	22
8. Eĉ ne unu vorton parolanta reĝidineto	24
9. La dek du monato-fratoj	27
10. Akva nimfo Nereida.....	29
11. Patrino de Maro, Filino de Maro	32
12. La majstro-ŝtelisto	36
13. La magia spegulo	41
14. Reĝfilo Fjorentinos	44
15. La tri cervoj	48
16. La bronza ringo	51
17. La ses fratoj	57
18. La ora vergo.....	60
19. La kvinoble bela.....	63
20. Vulpo Manjo jurisdikcias.....	68
21. La malica vicpatrino.....	70
22. La bovogastra-kapa reĝidsinjoreto.....	76
23. Kie menso estas, tie ankaŭ mono estas.....	81
24. Mastro Lazaro, la heroa botisto	84
25. Vasilopulo	87
26. La fantomeca reĝidino.....	91
27. La kismet-o	96
28. En la klostro de blindaj derviŝoj	98
29. Komercisto de Ateno	101
30. La hirundo kaj la serpento	106
31. La tri miraklo-vestoj.....	108
32. Trompa fabelo, mensoga fabelo	114

Imperio de Feino Hellas¹



Grekujo kaj insulo Kreto

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=62288>

¹ Laŭ la hungara- kaj anglalingva vikipediaj artikoloj pri Grekujo:

<https://hu.wikipedia.org/wiki/G%C3%B6r%C3%B6rorsz%C3%A1g>

https://en.wikipedia.org/wiki/Greek_mythology

la landonomo de Grekujo estis laŭ la lingvo greka: Ελλάδα (Elláda), Internacia Fonetika ABC: [el'aða] aŭ Ἑλλάς Internacia Fonetika ABC: [el'as]; malnovgreke Ἑλλάς (eldire Hellas).

En senco de la supra klarigo, la nova titolo de ĉi tiu libro de popolfabeloj iĝis: Imperio de Feino Hellas.

Antaŭparolo

Mi rakontas fabelon, veran, pravan fabelon. Vojaĝante mi vojiris en la mondo de Oriento, irante laŭ la granda Blanka-mar², ĉe bordoj de Sirio, ĉe ruinoj de Palestino, en Smirno de Malgranda-Azio, en la patrujo de la turkmenaj triboj. Iutage apud Sira haltis nia ŝipo antaŭ greka insuleto en la Egea-Mar³. Tio ne nun okazis, sed tridek naŭ jarojn, antaŭ la nuna, dum rozkolora aŭroro³ de iu septembra tago. De la direkto egiptuja, de la lando de la faraonoj, naĝis ankaŭ nia kaduka ŝipeto, profundmergiĝa. En Egiptio mi pasigis plurajn monatojn. Kiam mi volis reveturi al la maro de feino Stambul⁴, pro la malkvietiga novaĵo pri pandemio, nek eniro, nek eliro de la lando de egiptoj estis permesata. Dum la kvarantena malpermeso nur unu ŝipeto kuraĝis almariĝi, kaj tio estis la kaduka malgranda K e d i v i j e. Tutplene pleniĝis la akva domaĉo per homoj kaj mi povis rekoni mian favoron esti privilegion havanta sur la ferdeko en kaŝangulo. La vetero iĝis pluvoriĉa, ŝtorma. Fulmotondra pluvego kaj vento frapetadis la ŝipriparon, nia kadukaĵeto ekdancis terure knare, krake, kvazaŭ ĝi ĝemetadus foje dekstren, foje maldekstren kliniĝadante foje antaŭen stumbladante. Repensante al mia tiam vojaĝo post multegaj forpasintaj jaroj, ŝajnas al mi, kiel songbildojn mi vidas palajn vizaĝojn de plenaĝuloj, frostotremajn ŝrikadojn de la virinoj, la nebulajn bildojn de la ondoĝiboj, la bildojn de la ŝtormobatitaj sensongaj noktoj. Knare, krake baraktante naĝis al la celo nia tirŝirita K e d i v i j e, kvar tagojn estis ĝi survoje, kiam fajro aperis en la kuirejo, kaj la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj neniigis. Tiam estis alte aprecata mia teokuira lerteco, scio. Tomato kruda estis la pago de unu taso da teo de mi, pro kio mi estis pagita per multe da tomatoj, ke mi iĝis tedata de ĉi tomatoabunda vivo. Feliĉe ni atingis Sira-n. La ŝtormo ĉesis pro la kvietiĝo de la vento, la ondoj trankviliĝis kaj antaŭ ni brilis la greka insuleto, la juvelŝtona eta ŝaumo-kresto de la senfina oceano. Faligis ankron nia K e d i v i j e, pro la meto en kvarantenon kvintagan. Post la ankriĝo, de la direkto de la insulo rapide glitantaj boatetoj svarmis antaŭen plenplenaj nutraĵoj, bongustaj, bonodoraj fruktoj, frititaj fiŝoj, ruĝkoloraj oranĝoj. Kiel okazis, neniuj sciis, sed aperis surŝipe ia sinjorino kun siaj tri etinfanoj. Tamen estis tiel, ke okazis, kvankam malpermesataj estis kaj la surŝipiĝo kaj la deŝipiĝo. Ŝi vendadis dolĉajn kukojn, facile maĉeblajn, kaj kiam ŝi volis eniĝi en sian boateton, kolere alkriaĉis ŝin la malpermesanta vorto. Surŝipe devis resti la sinjorino kune kun siaj infanoj por la tempo de forpaso de la kvin tagoj. – Ne gravas, – ŝi diris bonhumore, – manĝaĵojn, trinkaĵojn ni certe ekhavas. Senzorgan vivon ekhavis ĉiuj surŝipe vojaĝantoj. Vespere, ĉe sunsubiro, kiam formortis la bruo, la muĝado, la agado-farado, la svarma viglado, kaj la ĉielo ŝajnis orkolora, la akvosurfaco brilis kiel arĝento, la greka sinjorino sidigis antaŭ sin siajn infanetojn, kaj dorlotadante, patrinume rakontis fabelojn, grekajn paramitiojn⁵ al la etuloj. Ĉu estis, ĉu ne, vivis iam ie Vasiljas nomata reĝo kaj reĝedzino Vasilisa. Iia unusola filo estis Vasilopulos. Li vojiris tra kampoj, arbaroj por lukti kun malamiko, defendi la malgrandan reĝidion. Daŭris la rakonto de fabelo ĝis ĉirkaŭ noktomezo, foje ĝis sunleviĝo. Ni sidantaj ronde cirkle atentis ŝiajn vortojn, pri imperio de fabellando. Ĝin-spiritoj en momento de suprenflugo, miraklofara vorto de derviŝo, koleraj voĉoj de sorĉistinoj, naŭ kapoj de drakoj, grandegaj

² La Blanka-mar² estas interna maro de la Arkta-Oceano, en nordorienta direkto al Rusujo. De Okcidento Karelio, de Oriento ĉirkaŭzonata estas de la duoninsulo – Kola.

³ La frumatena ĉielo estas grizblanka, sed tiu koloro montras traĝon al la ruĝete rozkolora pro montriĝo de rozkoloraj strioj.

⁴ Stamboul aŭ Stambul estas la praaj nomoj de la historia malnova urbokvartalo de la urbo Istambulo, kiu siatempe estis la unusola konsistiga parto, ĉar aliaj urbopartoj ne ekzistis.

⁵ Instruanta poeta rakonto estas la paramitio, ĝia temo prentas el la greka mito, ofte el di-legendo.

fortoj de grandeguloj, ĉiuj tie zumis, murmuris sur bunte ornamitaj nimfaj flugiloj volantaj preterflugi tiam de sur la ornamaj oraj floroj de niaj fantaziadoj.

Antaŭ niaj okuloj ekbrilis fabel-revaĵoj, imagaĵoj, halucinoj, fantasmagorioj de Oriento. El la direkto de la bordoj de Bosporo, kvazaŭ bonaj feinoj flugis supren, kaj el la serajlo de la padiŝaho, kvazaŭ suspiroj de filinoj de la sultano flugis. La pra-aeron de Helaso novaj facilaj zefiroj miksas. Turka fabelmondo alvenas al greka tero kaj ĝi iome alivestanta sin asimiliĝas al sia nova hejmo. Ekzemple: ili surmetas sur sin anstataŭ kaftano robon. En veprejo de H e l i k o n o⁶, rozujo de Ŝ i r a z', en la valo de F a l e r o n sonas la kanto de najtingalo. Kaj nur kelkloke se ekbrilas la erco de malnovaj legendoj, la bildo estas paliĝinta, senkoloriĝinta de mitaj legendoj. Por ke pri ĉi tiu mondo, pri ĉi tiu nova fabellando ekflirtu la kovraĵo, ni transdonas nun la fabelojn de ĉi tiu fabellando. Mi diris fabelon, pravan fabelon.

Budapeŝto, septembro 1924-a.

Kúnos Ignác

⁶ Helikono estas monto en Grekujo, la hejmo de muzoj.

La malriĉa riĉulo

Larĝe konata estis la iama geedzoparo. Dio benis ilin per multaj infanoj, sed per pli multe da bonhumoro; pro kio ili neniam plendis. Ili apenaŭ havis sian ĉiutagan manĝaĵon, foje malmultan, foje pli multan ol nenio. Plie ili havigetis iom ol io superflua. Ĝi gutetis-fluetis. La gepatroj lace atingis hejmen el siaj taglaboroj, sed kiam ili forkonsumis siajn panetojn kaj la senenhavajn supojn, gajeco travidiĝis sur ilia vizaĝo. La patro per sia liuto ekmuzikis, la patrino ekkantis, la infanoj dancis arde. En ĉiu tago, de semajno al semajno, ili havis ĉiam bonhumoron. Riĉulo estis ilia najbaro, kiu enviis ilian bonhumorhavan sorton, folan, drolan vivon.

– Mi la riĉa – plendis li grumblante – enlitiĝas kun premsento pro la materiaj zorgoj, kaj matene la sama zorgo vekas min. Male ili, la almozulidoj amuziĝadas, dancadas, kantadas ĉiuvespere. Pensadis la riĉulo kion fari kaj dum bela mateno de iu bela tago faris mallongan viziton al la najbara malriĉulo kun tiuj ĉi vortoj:

– Vi estas homoj honestaj, mi bedaŭras vian oftan malsatadon. Donos mi monon. Mil groŝojn, kaj arĝentecajn, kaj orumitajn por komerci, vivi el ĝi, kaj se vi profitos, vi redonos, sed se vi ne povus, eĉ tio ne estu damaĝo via.

La malriĉa homo avide kaptis la okazon por iĝi monriĉa, ja li neniam vidis kune tiom da mono. Zorgopremate li sidiĝis por pripensadi, kio estu la sorto de lia mono? Ĉu li igu butikon? Ĉu li komercu? Ĉu li aĉetu agron por terkulturi? Sed, se ne estos sufiĉanombraj aĉetantoj, aŭ ne kreskos vinberoj sur la agro? Aŭ ĉu li pruntedonu la monon por profiti abundan interezon? La groŝo povus pereji, kiam li havos nek monon nek iun ajn havaĵon! Tutan tagon li pripensadas, vespere li mortlace atingis la hejmon. Li ne alprenis la liuton por komenci muziki, la edzino la kantistino ne kantis, se ŝi kantis, se la infanaro ekdancus, ili ĝenus la edzon. Tamen li kolere alkriis ilin, eksulkiĝis lia frunto. Tra tuta nokto li pensadis, Di-sinjoro ne faligis dormon al liaj okuloj. Alitage vekigante tute lace ne dorminte, elĉerpote li ne iris labori: ja li bezonis tempon por solvi sian grandan zorgon.

– Kara, edzo-sinjoro mia! Kio malbona? – demandis lin la edzino. Li vortatakis per grumblaj vortoj: Silentu! Lasu min pace!

Dume la riĉulo vulpe ruzis por ekscii kiel kondukas la najbaro havanta tiom da mono. Kiam la vespero jam iĝis dense malluma, kiam envilaĝe ĉiuj lumoj estingiĝis, li promenis for antaŭ la domaĉo de la malriĉuloj. Preskaŭ li dronis pro surpriziĝo. Liuto ne sonis, kantovoĉo ne aŭdiĝis, silento plenigis la tutan domon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Alitage li denove kaŝrigardadis, streĉis li la orelojn. Ankaŭ la trian vesperon tie ĉe la fenestro li haltadis, atentadis, al ĉiu brueto li alatentis; sed li vane provis ion ekaŭdi: nek liuto ektintis, nek ia ajn voĉo eksonis. Alitage la riĉulo hejme restadis kaj pensadis pri la sorto de lia najbaro, kiam neatendite malfermiĝis la pordo kaj la malriĉulo aperis antaŭ li. – Kion bonan vi portis, kara najbaro? – demandis li la alveninton. – Diablo eniru en viajn ormonerojn, arĝentmonerojn! – kriis la malriĉulo – post kiam mi portas ilian ŝarĝon, mi ne toleras ilian pezan zorgon!

– Mi fajfas pri via groŝo kaŭzinta zorgon! Ĝi ne interesas min!

Li reĵetis la monon de la riĉulo kaj li rapidis tre feliĉa al sia familio. Poste la patro alprenis liuton por muziki, la patrino komencis la kantadojn, la infanoj ekdancis. Tago post tago, de semajno al semajno nun jam pleniĝis per bonhumoro ĉe ili.

Toleranta ŝtono, tranĉilo, toleranta kandelo

Multan bonaĵon, grandan riĉaĵon havis iu homo kaj belegan filinjon. Foje la filinjo sidis apudfenestre teksanta teksaĵon per oraj fadenoj; kiam ŝi ĵus tiradis fadenon, ia birdo flugis al la fenestro kaj alparolis ŝin:

– Por kiu vi brodas, pro kio vi teksas per orfadenoj vian tuketon tirante por streĉi la fadenojn? Via leĝa parulo ja estos mortinto, ĉar vi havos edzon mortintan. Saltleviĝinte de sia sido la fraŭlino kuris al la patro, kaj plorete lamentis pri la aŭguro de la birdo. Trankviligis ŝin la patro:

– Nur pepis la birdspecio, ne havis tiu pravdiron!

Sed sekvatage refoje aperis la birdo antaŭ la knabino. Ankaŭ triatage ĝi pepis:

– Al kiu vi brodas, pro kio vi teksas vian tuketon tirante por streĉi la orajn fadenojn? Via leĝa parulo ja estos mortinta, ĉar vi havos mortintan edzon.

La knabineto denove eklarmis. Ŝin denove trankviligis ŝia amega patro. Alitage en la ĝardeno ĝuste ludadis la knabinjo per petola vigleco saltadante, kuradante kun siaj kunludantinoj, kiam neatendite ekgutis la pluvo. La knabinoj kuris sub la tegmentrandon de iu proksima domo, kie ili staris, haltis iom da tempo, kiam malfermiĝis antaŭ ili iu pordo. Ekscivolemis la filino de la riĉa homo, ĉu estos io interesa malantaŭ la pordo? Kio povas esti tie? Ŝi enpaŝis, sed apenaŭ ŝi metis la piedojn enen, la pordo fermiĝis de si mem. La knabino staris en ĉambro, el kiu malfermiĝis nova pordo. La knabineto malfermis ankaŭ tiun pordon. Nu, tie estis alia ĉambro kaj de tie same malfermiĝis pordo, nun jam al la tria ĉambro. Ŝi enpaŝis ankaŭ en tiun, la trian ĉambron. Enpaŝinte kaj ĉirkaŭrigardante ŝi rimarkis iun mortintan homon kuŝantan antaŭ ŝi. Li havis belan vizaĝon, vestaĵon teksitan per oraj fadenoj. Laŭaspekte li povis esti eĉ reĝido. Ia skribaĵo troveblis ĉe lia mandorso. Sur ĝi estis skribite: – „Kiu alvenas al mi erarinte pri vojo, kaj tra tri tagoj tage-nokte tiu gardos min, atentu, ĉar mi vekigis dum la kvara tago, mi reviviĝos por nova vivo. Se tiam fraŭlino staros apud mi, mi geedziĝos kun ŝi.” La knabineto ne pensadis longe. Ŝi sidiĝis apud la mortinto por gardi lin kiel la pupilojn de siaj okuloj. Pasis unu tago kaj nokto, pasis du tagoj kaj noktoj, kaj komencis jam pasi ankaŭ la tria. Preskaŭ gluiĝis ŝiaj okuloj pro la granda laceco. Ŝi rigardis eksteren nur momenton al la korto, kiam ŝi rimarkis iun ciganinon ĝuste gaprigardantan al la fenestro. Ŝi envenigis la ciganinon en la ĉambron kaj diris:

– Mi klinos la kapon por dormeti, nur iomete ripozi, sed dum mi dormos, vi estu ĉi tie por gardi, sed post paso de du horoj veku min!

La tro laca knabineto tuj endormiĝis. Ne havante por aranĝi alian aferon, la ciganino rigardadis foje la skribaĵon, foje la dormantan knabinon, foje la mortintan reĝidon. Dume pasis unu horo, poste ankaŭ la sekva, sed ŝi ne vekis la knabinon. Poste, subite la reĝido ekvekiĝis, li komencis reviviĝi al nova vivo. Tute reviviĝinte apud si trovinte la ciganinon, li trakaresis, li ekkisis ŝin dirante:

– Vi plenumis gardservon apud mi, vi estos mia edzino.

Dume vekigis ankaŭ la alia knabino, sed kiam ŝi ĉirkaŭrigardis heziteme, ŝi ekaŭdis la koleran krion de la ciganino:

– Ej, rapidu aranĝi viajn aferojn, inter aliaj gardi la anserojn de la reĝido! La filino de la riĉa homo senvorte kaŝiris el la ĉambro, nur la larmoj degutadis de ŝia vizaĝo. Nur kelkajn tagojn vivis la ciganino apud la reĝido, la knabino inter la anseroj, kiam venis urĝa mesaĝo pri eksplodo de milito, kien iri oni atendas la reĝidon. Nu, li devos foriri. Li vokis la edzinon kaj demandis:

– Kian donacon mi portu al vi? La ciganino volis oran vestaĵon. Post ŝi li vokis la paŝtisto-knabinon por same demandi. La knabineto respondis:

– Portu al mi tolerantan ŝtonon, tranĉilon kaj kandelon, por ke ili aŭskultu mian malgajon. Ne revenu sen: toleranta tranĉilo, ŝtono, kandelo!

Ekvojiris la reĝido alitage, kaj dum la pasanta tempo li plensukcese venkis la malamikon. Poste li aĉetis la oran vestaĵon, sed pri la pliaj dezirplenumoj forgesis. Havante la donacon li surĉevaliĝis por ekiri hejmen, sed lia ĉevalo obstiniĝis, ĝi cedis al si fari eĉ ne unu paŝon de sia loko. Ĝi tute malvolis iri antaŭen, vane li provis persvadi ĝin. La reĝido ekzamenante observadis sian ĉevalon provante eltrovi la kialon de ĝia konduto, kaj post nelonga tempo li rememoris sian promeson faritan al la peto de la petantaj vortoj de la paŝtista-knabineto. Li reiris al la urbo kaj eniris en bazaron por teni sin al sia promeso. De iu vendisto li petis: tolerantan tranĉilon, kaj ŝtonon kaj al ili konvenan kandelon.

– Por kio bezonatas tiuj? – demandis la komercisto.

– Ni havas hejme servistinon, tian anserpaŝtistospecian, ŝi bezonas tiujn ĉi aĵojn – respondis la reĝido.

La komercisto glatigis al si la barbon, transdonis al li la aĵojn kaj atentigis la reĝidon:

– Priatentu tiun knabineton, kion ŝi faros pri la ricevitaj donacoj. Post la adiaŭo la reĝido surĉevaliĝis kaj forgalopis. Li ne haltis ĝis sia hejmo. Lia edzino rigardis eksteren ĝuste en tempo de lia alveno kaj rimarkinte la edzon, sen saluto sonis ŝiaj unuaj vortoj:

– Ĉu vi portis oran robon?

– Jes, mi portis. – respondis la edzo nevolonte kaj senvorte transdonis sian donacon.

Por transdoni siajn donacaĵojn al la knabineto, la reĝido trovis ŝin en la korto. Obeante la atentigajn vortojn de la komercisto, li atenteme rigardis la knabineton kaj ĉiujn ŝiajn movojn. Li vidis, ke ŝi tuj iras en la kuirejon kaj fermas pordon. La reĝido rapidirante sekvis ŝin. Tra la ŝlosilingo li enrigardis volante sciiĝi pri la sekreto de la knabineto. Dume ŝi elprenis siajn tri donacojn. La ŝtonon ŝi metis sur la plankon, sur ĝin ŝi lokis la tranĉilon, apud la ŝtonon metinte la bruligitan kandelon. – Ĉu iu scias, kian intencon povas havi tiu ĉi knabineto? – cerbumis en si mem la reĝido. La knabineto tien kaŭris al la tranĉilo, ŝiaj du okuloj eklarmiĝis, ŝiaj vortoj ekbariĝis foj-foje, dum eksplodis el ŝi la amareco:

– Al kio vi atendas, vi mortiga tranĉilo? – kriis al ĝi la knabino – kial vi ne distranĉas mian gorĝon? La mortiga tranĉilo leviĝis, kaj kiam ĝi flugis al la knabino, la dura ŝtono komencis ŝuŝi kaj retiregis la akran tranĉilon. La brulanta kandelo estingiĝis. Tion vidinte la knabineto komencis plendi:

– Mi estis filino de riĉa homo, la unusola de mia patro. Iu birdeto flugis iufoje al mia fenestro, kaj tiel alparolis min:

– Por kiu vi brodas, pro kio vi teksas vian tuketon tirante por streĉi la orajn fadenojn? Via leĝa parulo ja estos mortinta, ĉar vi havos mortintan edzon!

– Mi ne kredis ĝiajn vortojn kaj jen mi falis en ĉi tiun situacion. Al kio vi atendas, vi mortiga tranĉilo? Kial vi ne tranĉas mian gorĝon al du partoj?

Denove ekflugis la mortiga tranĉilo, denove ekŝuŝis la dura ŝtono, kaj ĝi retiregis denove la akran tranĉilon. La brulanta kandelo koaguliĝante estingiĝis.

– Iumatene mi ludadis kun miaj kunludantinoj – daŭrigis la knabineto la plendadon – kiam abrupte ekfluis la pluvo kaj ni tien fuĝis sub la gutrandon de iu proksima domo. Ni staris jam sub la gutrando, kiam subite malfermiĝis iu pordo antaŭ mi. Mi enpaŝis. Nu, mi vidis antaŭ mi iun ĉambron, el kiu pordo malfermiĝis antaŭ mi ien. Mi enpaŝis, kaj ekvidis novan ĉambron. Ankaŭ tie estis videbla nova pordo malfermiĝanta ĝuste tiam. Ankaŭ tra tiu pordo mi enpaŝis. Nu, tie estis denove alia ĉambro, nun jam la tria ĉambro. Mi enpaŝis ankaŭ en tiun. Enpaŝinte kaj ĉirkaŭrigardante mi rimarkis iun mortintan homon kuŝantabn antaŭ mi. Li havis belan vizaĝon, veston teksitan per oraj fadenoj. Ia skribo troveblis ĉe lia mandorso. Sur ĝi estis skribite: „Kiu venos vojerarinte al mi, kaj tra tri tagoj tage-nokte gardos min, atentu, ĉar mi

vekiĝos dum la kvara tago, mi reviviĝos por nova vivo. Se tiam fraŭlino staros apud mi, mi geedziĝos kun ŝi.”

La knabineto plorante daŭrigis la plendadon pri sia sorto. Ŝia ploranta parolo ekbariĝis, tamen ŝi diris plu:

– Mi sidiĝis apud la mortinto kaj gardis lin kiel la pupilojn de miaj okuloj. Pasis unu tago kaj nokto, pasis du tagoj kaj noktoj, kaj komencis jam pasi ankaŭ la tria. Preskaŭ gluiĝis miaj okuloj pro la granda laceco. Mi rigardis eksteren nur momenton al la korto, kiam mi ekvidis ciganinon ĝuste tiam gaprigardantan al la fenestro. Mi envenigis la ciganinon en la ĉambron kaj diris: „Mi klinos la kapon por dormeti, nur iomete ripozi dum mi dormos, vi estu ĉi tie por gardi, sed post paso de du horoj vi povas vekigi min!” Mi estis tro laca, nu mi tuj endormiĝis, la ciganino ne vekis min kaj vidu la nunon de mia sorto. Mortiganta tranĉilo, pro kio vi ne murdas min? Dura ŝtono, pro kio vi ne lasas tion? Brulanta kandelo, pro kio vi ne koaguliĝas vidante mian grandan damaĝon, senindulgan malgajon?

Alten leviĝis la granda tranĉilo, tiom alten, ke la granda ŝtono ne atingis ĝin. Nur ŝuŝis en si mem la granda ŝtono, sed kvazaŭ iu estus forblovinta la kandelon, ĝi estingiĝis. Ĉiun voĉon aŭdis la reĝido de ekstero. Li plenforte per sia tuta pezo alfrontis la kuirejan pordon por elmovi ĝin de ĝia loko. Li rompis la pordon. Feliĉe ĝuste tiam li sukcesis al si kapti la tranĉilon, kiam ĝi tuj volis fali sur la knabineton. Li prenis la manojn de la knabineto, kiun ĝuste tiam kaptis sveno. Poste li akompanis ŝin al ŝia patro al la gepatra domo. Ili baldaŭ geedziĝis.

– Ej do, kio okazu pri la ciganino? – demandis la reĝido la edzinon. Ekde nun, tiu gardu la anserojn! – diris la ĝoja junedzino. – La ciganino vivu tiel de nun, kiun sorton ŝi dediĉis al mi.

– Estu ŝi paŝtisto de anseroj por tiel meriti sian salajron.

La novaj geedzoj vivis feliĉaj ĝismorte.

La tri konsiloj

Iama geedza paro vivis malriĉe. Ili havis la portagajn proviantojn ne ĉiutage. La edzo sciigis sian planon al la edzino iutage: – Mi iros en la urbon serĉi ian laboron, por ke mi perlaboru mian ĉiutagan salajron, ke ankaŭ vi ne havu zorgojn. Samtage li ekiris kaj iris, marŝadis, ĝis atingo de la urbo. Li ne estis sperta pri metio, do li enposteniĝis ĉe iu grandsinjoro kaj ekservis. Li kapablis fini la multegan laboron, ne estis starigita plendo kontraŭ li. Sed lia mastro estis tre avara kaj li apenaŭ donis pagon al la malriĉa homo. Li vane atendis la tempon por ekscii de la mastro la sumon de lia vera salajro, kiun li ricevos. Li atendis tra unu jaro, tra du jaroj, tra kvin jaroj, el la kvin iĝis dek jaroj, poste dudek jaroj, sed li ricevis nek monon nek alion. Pro la elĉerpiĝo li iris al la mastro kaj alparolis lin:

– Sinjoro Mastro! Bonvolu kunkalkuli mian salajron, ĉar mi tre havas jam emon por hejmeniro.

La mastro elprenis monujon kaj tricent piaŝtroj ne multas, tiom li enmanigis al la homo. Li transprenis senvorte la monon, nur tri larmogutojn faligis sur ĝin. Nu, li kolektis siajn uzobjektojn kaj jam preskaŭ foriris, kiam la mastro adresis kelkajn vortojn al li:

– Donu ĉi tien cent piaŝtrojn! Anstataŭ ili mi donos bonan konsilon!

Li iĝis frapita pro la konduto de la mastro, li perpleksiĝante gratis al si la kapon, ja, tio ne povas esti, ke li ricevas preskaŭ neniom pro sia laboro. Li hezitis plenumi la alvokon, tamen li transdonis la cent piaŝtrojn.

– Ne intermiksiĝu en farenadaĵon, kiam tiu ne vin koncernas! – konsilis la mastro.

La malriĉulo dankis kaj estis ŝatante denove ekiri, kiam la mastro refoje haltigas lin:

– Donu novajn cent piaŝtrojn, bonan konsilon vi povos ricevi pro ĝi!

– Mi ne bedaŭras – pensis en si la malriĉulo kaj reĵetis la cent piaŝtrojn al la mastro.

– Vian kutiman kursvojon ne forlasu, al malkutima ne ŝanĝu! – sonis la dua konsilo de la mastro.

Ankaŭ ĉi tiun enmemorigis por si la homo kaj jam volus ekiri, kiam denove, jam triafoje alparolis lin lia mastro:

– Kial vi rapidas? Prefere, donu ĉi viajn cent piaŝtrojn, bona konsilo estos via.

Prenis la homo la restintan monon kaj ĵetis tien al la mastro, por ke estu tiu sukcesa, estu tiu ĝoja per tiuj.

– Vian samtagan koleron sekvamatenne trapensu! – aŭdiĝis la akceptinda konsilo de lia mastro.

La malriĉa homo havis jam eĉ ne unu heleron. Malgaje li marŝadis hejmdirekte. Li ekiris malriĉe, li venis same malriĉe. Kiam li lasis la urbon post si kaj proksimiĝis al la arbaro, pro miro liaj okuloj haltis ĉe granda elsekiĝinta arbo kaj apud ĝi staranta saraceno. La saraceno elprenadis orojn el sia sako kaj alĝustigadis ilin al lokoj de la arbfolioj. La malriĉulo mire rigardis la saracenon kaj volis halti apud li, kiam aperis en la kapo la memoro pri la unua konsilo, ke li ne intermetu sin en aferon, ne lin koncernantan; nu li tamen ne haltis, sed li preteriris senvorte la saracenon. Sed la nigrulo postkriis la preterpasanton:

– Haltu, amiĉjo, por unu vorto!

– Por kio? – demandis la malriĉulo.

– Ekde ducent jaroj mi staras ĉi tie – komencis la nigrulo – kaj ekde tiam mi atendis la okazon, ĉu estos iu homo ne demandanta min pri la afero de la oro kaj la arbo. Kiam iu preterlasante min plene ignoras tiujn spektaklojn ne demandante pri la afero de la oro kaj la arbo, tiu homo estos la havanto de la tuta stoko da miaj oraĵoj. Sed se la preterpasanto demandon direktas al mi, ties kapon mi forigas. Vian kapon mi kalkulis la sekva, la lasta. Jen, jam turo kreskis el la detranĉitaj kapoj. Nur via kapo mankis al la tutpretiĝo. Sed Dio destinis

alie, kaj ĉar la turo ne povos tutprepariĝi sen via kapo, tiel ĉi tiuj multe da oraĵoj estos viaj. Kolektu ĝin kaj iru en la inferon kaj forportu la oraĵojn!

La malriĉulo ensakigis la oraĵojn kaj ekiradis hejmen. Dumvoje li renkontis karavanon. Kvardek dromedaroj estis en la karavano kaj ĉiuj estis surpakitaj per oraĵoj.

– Bonan tagon homoj! – li salutis la brutopelistojn – kien vi klopodas?

– Jen, rigardu! En tiu ĉi direkte! – respondis la pelistoj, – ni portas la dekonaĵon al la reganto. – Tiuokaze, iom da tempo ni iros sur la sama vojo – diris la malriĉulo kaj ili kune iris plu.

Ili iris kune dum iom da tempo kaj baldaŭ atingis vojkruciĝon apude al drinkejo.

– Eniru por drinki kelkajn gutojn – proponis la pelistoj – poste ni transiros al malsupra alia vojo. Sed, la malriĉulo rememoris pri la dua konsilo de sia mastro:

– Vian kutiman kursvojon ne forlasu, al malkutima irvojo ne ŝanĝu!

Nu, li diris al la pelistoj, ke por eviti la tempoperdon, li volas pluiri. Soifegon havis la pelistoj, pro kio ili petis lin, la serviston, por gardi la dromedarojn ĝis ilia reveno. La malriĉulo konsentis pri tio. Li restis tie apud la dromedaroj, la brutpelistoj eniris al la drinkejo. Kiam la homo tie staradis apud la bestoj, neatendite li ekvidis, ke rabistoj rompŝtelas en la drinkejo. Ili rabis, murdis, el tiuj, kiuj estis en la drinkejo neniu restis vivanta, ja la rabistoj murdis ĉiun. Ankaŭ la brutpelistoj mortis. La malriĉulo spertinta la okazintan teruraĵon, prenis la karavanon kune kun la dromedaroj kaj oraĵoj kaj li klopodis atingi sian vilaĝon post kiel eble plej nelonge. Jam vesperiĝis ĉe lia alveno antaŭ lia dometo. Li frapis sur la pordo. Lia edzino malfermis la pordon. Ŝi ne rekonis lin kaj iom konsterniĝis de la fremda homo:

– Kion vi faras ĉi tie, bona homo? – demandis ŝi sian edzon.

– Mi estas fremda ĉi tie, travojaĝanto – respondis la homo – en via domo mi ŝatus tranokti.

– Ne estas hejme mia edzo, nu mi ne povas enlasi vin en mian domon. Sed, se vi akceptos nur la stalon, vi povos tie tranokti.

La homo bonkore akceptis la promesitan tranoktejon kaj ekiris al la stalo. Li pelis al tiu direkto ankaŭ la dromedarojn, por ke tiuj estu antaŭ liaj okuloj. Poste, li sidiĝis antaŭ la stalo, elprenis antaŭ sin la provianton havantan sakon por manĝi, kiam li ekvidis iun fraŭlon malfermi la pordon de la dometo. Suspekto vekiginta en li ekkaptis la tranĉilon por enrompi la muron al la sinjorino kaj mortigi la fraŭlon, sed li rememoris pri la tria konsilo:

– Vian samtagan koleron sekvan tagon matene trapensu!

Li remetis la tranĉilon al sia zono, kaj klinis la kapon por ripozi, sed li ne povis dormi, ĉar la tutan nokton li meditis pri tiu fraŭleto. Li tre atendis la matenan krepuskon. Tuj, kiam li ekiris al sia dometo, malfermiĝis tie la pordo kaj elpaŝis la hieraŭvespera fraŭlo. Tiu rerigardis al la dometo kaj diris tien:

– Karega mia patrinjo, mi iros al la kampo por kolekti fazeolojn por kuiri el ĝi tagmanĝon.

La malriĉulo dumane kaptis la kapon, ekpaliĝis, ekstremetis memorante pri tio, kian eraron li povus fari en sia antaŭa vespera kolero, se tiam li ne estus obeinta akcepti la trian konsilon. Li estus murdinta sian propran idon. Li alrapidis al siaj edzino kaj filo. Foje sian edzinon, foje sian filon li brakumis kaj kisis, poste li inverse faris. Unue sian filon li brakumis kaj kisis, poste sian edzinon. Granda iĝis iliaj feliĉo kaj havaĵoj, nur la feliĉo estis ilia sol-sola zorgo. La dekonaĵon li alvenigis al la reĝo, kiu donacis ĝian duonon al la malriĉulo. Ili havis ĉion bezonatan dum lia plua vivo kaj en riĉeco ili vivis ĝis lia vivofino.

Niketas, la taglaboristido

Malriĉe vivis la taglaboristo en sia malgranda domo kun sia edzino kaj sia filo N i k e t a s. La edzo laboris sur la kampo, la edzino gvidis la hejmajn aferojn, la filo portis la proviantojn al sia patro. Okazis iutage, ke la patrino vekis la filon pli frue ol alifoje.

– Kial vi jam vekis min? – demandis la filo sian patrinon.

– Tial, ke vi estu tie per la provianto pli frue – respondis la patrino.

– Sed, mi ne portos ĝin – diris la filo.

– Kial ne? – demandis lia patrino.

– Tial, – respondis N i k e t a s – ĉar, vi vekis min el la granda parto de mia sonĝo kaj mi devos atendi ĝian finon.

– Kion vi sonĝis?

– La rakonton do vi povas atendi, ĉar pri tio mi ne povas paroli.

Vane demandis lin lia patrino, vane ŝi instigis lin, la filo ne konfesis sian sekreton. La sinjorino fine perdinte la paciencon ekkoleris, kaj tradraŝis lin. Kuris la fileto al la kampo, al sia patro, kun dense falantaj larmogutoj.

– Ej, do kio okazis pri vi? – demandis lia patro.

– Forte batis min mia patrinjo – plendis la knabo, ĉar mi ne priparolis al ŝi mian sonĝon.

– Nu, kaj? Pri kio vi sonĝis?

– Kion vi pensas pri mi! Tion mi povas rakonti eĉ ne al vi!

Ankaŭ lia patro koleriĝis pro tio, nun li tradraŝetis pro tio. En la proksimeco situis iu arbaro, do tien kuris la kompatinda N i k e t a s. Li iris-venis plorante en ĝi kaj nur tion rimarkis, ke vesperiĝis. Li timis la lupojn, nu li surgrimpis arbosupron, kie li ligis sin al iu branĉo por ne fali malsupren dum sia dormo. Li ekdormis tie malsate-soife. Sekvatage ĝuste en tiu regiono ĉasadis la reĝo. Li pelis ĉasbeston. Kiam ĉasbirdon (falkon) li flugigis, ĝi tuj suprenflugis en la direkto de iu arbopinto rekte flugonte sur ŝultron de Niketas.

– Homoj, rigardu, kion kaptis mia falko – ordonis la reĝo. Se homon, aŭ beston, tiu estos mia, sed se ĝi trovis ian trezoraĵon, tio estos via.

La ĉashelpantoj kuris post la falko, kaptis la knabon kaj portis lin antaŭ la reĝon.

– Ĉu vi estas ĝino? – demandis lin la reĝo.

– Mi estas ne ĝino, mi estas homido, do mi estas homo, – respondis N i k e t a s.

– Kion vi faris sur tiu arbo?

– Mi forkuris de mia hejmo, ĉar miaj geapartenantoj tre malbele kondukis pri mi. Ili forte batis min.

– Kial vi estas tradraŝita?

– Tial, ĉar mi ne rakontis pri mia sonĝo.

– Nu, kaj? Kion vi sonĝis?

– Mi povas diri tion eĉ ne al vi, sed ja ne!

Forte koleriĝis la reĝo kaj enkarcerigis la knabon. En malhela malliberejo vivaĉis la kompatinda. Lia tuttaga provianto estis seka pano, lia trinkaĵo estis putragusta akvo. Dum sep jaroj li sidis en la karcero, tra sep jaroj vegetis la kompatinda N i k e t a s. Liaj vestoj iĝis ĉifonaj, putroodoraj, nur lia klara menso kaj lia forto restis sendifektaj. En la karcero troviĝis unu ferstango. Ĝin li levis ĉiutage, li pasigis sian tempon per tio. Iutage li denove prenis tiun ferstangon, kiu estis farita el peza fero, kaj li tiel puŝjetis tiun al la muro, ke tiu kunfalis pro la bato, kaj jen, situis antaŭ li la mondo, brilis lumo de la Suno. Li forrapidis el la malliberejo. Ekstere li ekvidis belan ĝardenon, kaj tie iun palacon. Li trapaŝis ĝian pordegon, tra iu pordo al la alia, de unu ĉambro al la alia, kiam la lasta de si mem malfermiĝis kaj antaŭ li aperis

knabino. Ŝia beleco similis al la lumo de la duonluno. Surpriziĝis la knabino kaj streĉis la okulojn al la fraŭlo.

– Kiu vi estas fremda junulo? De kie venis vi?

Li rakontis ĉion, pripentris sian mizeron. Larmogutoj brilis en la okuloj de la fraŭlineto, kaj preninte la manojn de la fraŭlo, ŝi kondukis lin en kaŝitan ĉambron, por ke aliulo ne vidu lin, neniŭ sciŭ pri li. Dum sep tagoj ŝi zorgis pi li, ŝi nutris, trinkigis, kun koraj vortoj flegadis. Reĝidino estis tiu ĉi fraŭlineto, la palaco estis la posedaĵo de ŝia reĝpatro. La reĝo de la najbarlando estis malicanima. Foje ĉi tiu malboneganima reĝo songis pri tio, ke alilande vivas fraŭlo kaj de ties bonvolo dependas lia vivo. Tiome forta estas la fraŭlo, ke li povas trapafi per sia fersago eĉ ferŝildon. La fireĝo profunde pripensis sian songon. La sekvan tagon li pretigis fersagon kaj ferŝildon kaj transsenditan ilin al la najbara reĝo mesaĝis:

– Se en via lando vivas iu, kiu kapablas trapafi la ferŝildon per la fersago, restos sankta amikeco inter niaj landoj, sed se neniŭ povos trapafi la ferŝildon, mi neniigos vian landon ĉiumaniere, per ĉiu imagebla ilo.

Ŝokiĝis la patro de la reĝidino. Li vokis siajn bravulojn kaj ĝisfine li elprovis ilian forton. Ili ĉiuj elpafis la sagon, sed ĉiu sago resaltis de la ŝildo sen kaŭzi difekton en ĝi. Li ekploris pro sia granda senespera amariĝo ĝuste tiam, kiam venis al li lia filino por viziti la patron:

– Kian malbonon havas mia patrosinjoro? – demandis lin lia filino.

Rakontis la reĝo pri la mesaĝo de la najbara reĝo, pri la sago kaj la ŝildo, plendante, ke ĝis tiam neniŭ sukcesis plenumi la taskon.

– Mi trovos la manieron, nur donu al mi tiujn du feraĵojn. – Espero ennestiĝis en la koro de la reĝo. Li transdonis la du ilojn por provoki la ŝancon, provi la fortunon per tiuj. La fraŭlineto rapidis kun tiuj al la fraŭlo, al la fortikulo N i k e t a s'. Dum sep tagoj li ne faris alion, ol provadi la sagpafadon. Dum la sepa tago okazis, ke la fraŭlo tiom streĉis sian forton, ke li trapafis la ŝildon. Kuris la fraŭlino al sia patro, por ke ŝi montru la trapafitan ferŝildon.

– Kiun donacaĵon ricevos tiu, kiu trapafis la ŝildon? – demandis ŝi sian patron.

– Se tion fraŭlo faris, mi akceptos lin mia bofilo, se fraŭlino faris tion, ŝi havos lokon apud mi sur la trono.

La fraŭlino veniĝis fraŭlon N i k e t a s – antaŭ la okulojn de sia patro. – Via estos mia filino kaj la duono de mia reĝlando – promesis la reĝo, – eĉ hodiaŭ ni povos komenci la geedziĝan festenon!

– Antaŭ ĉio, bonvolu resendi ĉi tiujn du ferobjektojn! – konsilis N i k e t a s – la farenaĵojn ni povos aranĝi poste.

Nu, la heroldo ekiris portante la sagon kaj la trapafitan ŝildon por transdoni ilin al la alilanda reĝo. La trian tagon revenis la heroldo kun iu homo el la alia reĝlando. Tiu estis la heroldo de la alia reĝo.

– La reĝo mesaĝis, – diris la mesaĝportanto, – li volas vidi tiun fraŭlon. Tiu aŭ aperos en lia reĝkortego, aŭ ekmilitados.

Nu ja, ekis granda malgajeco.

– Neniŭ malgaju – ekvoĉis N i k e t a s – mi iros tien kaj ankaŭ revenos de tie.

Ankoraŭ samtage li ekiris kaj kunportis ses rajdĉevalojn. Marŝadante li rimarkis homforman ulon kuŝi survoje. Pri tiu ŝajnis, ke li perorele aŭskultadas ion el la tero, kion poste li forte priridis. Li aspektis tiel, kvazaŭ ne estus normala lia konduto.

– Pri kio vi ridas Diodonita? – demandis lin la fraŭlo.

– Strangaĵojn oni parolas en S t a m b u l o⁷. Mi ridas pri tiuj – respondis la homo demandita. – Ho, granda estas via scio! – gapis N i k e t a s al li, – ke vi povas aŭdi eĉ ankaŭ tiujn parolojn, kiujn oni parolas en la fora Stambulo.

– Jes, vere granda estas mia kapablo, sed la afero de N i k e t a s estas pli granda, ĉar li kapablis trabori la ferŝildon per sia fersago!

– Mi estas tiu N i k e t a s. Prenu unu el inter miaj ĉevaloj al vi kaj venu kun mi.

– Ho, mi ne bedaŭras la vojŝanĝon, – respondis – „M a l p r o k s i m e n a ŭ d a n t o”, – mi iros kun vi ien ajn!

Ili duope ekiris. Irante kune, foje ili rimarkis iun homon kaj antaŭ tiu kvardek kaldronojn kun kuiriĝanta en ĉiu rizo, kaj kiam la rizo estis jam kuirita, la homo ekmanĝis ilin, unu post la alia malplenigante la profundajn ujojn.

– Granda afero estas tio, ekkriis N i k e t a s, ke en via stomako trovas lokon ĉi tiuj kvardek kaldronoj da manĝaĵoj!

– Jes, tio estas granda afero, – respondis la homo, sed tio de N i k e t a s estas pli granda, ja li traboris la ferŝildon!

– Mi estas tiu N i k e t a s, prenu unu el miaj ĉevaloj kaj venu kun mi.

– Bone, volonte! – respondis V o r a ĉ e a n t o. Kun vi mi volonte iros ien ajn.

Nu ili ekiris nun jam triope. Dum ilia irado ili ekvidis, ke vojon finireblan dum ses horoj iu homo trasaltis samtempe, kontraŭ tio, ke sur ambaŭ liaj piedoj estis unu muelŝtono.

– Granda afero estas – miris N i k e t a s, – kiel vi povas paŝi tiom grandan distancon, dum vi havas sur la du piedoj du muelŝtonojn!

– Ja, tio estas vere sufiĉe granda afero, sed la ago de N i k e t a s estas pli granda, ja li sukcesis trabori la ferŝildon per fersago!

– Mi estas tiu N i k e t a s! Bonvolu akcepti mian ĉevalon kaj veni kun mi.

– Bone, mi ne kontraŭas – respondis la F u l m e k u r e g a n t o – kun vi mi iros volonte ien ajn!

Kvarope ili paŝis plu. Dum ilia irado okazis, ke ili ekvidis iun homon, kiu ĵetis lazon al iu monto kaj penportis ĝin al alia loko.

– Granda afero estas via ago, ke vi povas porti kun vi tutan monton – konstatis kriante N i k e t a s.

– Ho, tio estas vere granda kapablo, sed la afero de N i k e t a s estas tamen pli granda, ja li scipovis trabori eĉ la feran ŝildon! – diris la homo.

– Mi estas tiu N i k e t a s – Ĉi tie estas unu el miaj ĉevaloj, venu kun mi! – Mi ne kontraŭas, tre volonte mi iros kun vi ien ajn – respondis M o n t o p o r t a n t o.

Kvinope ili ekiris. Kiam ili iris sur la vojo, kion vidis iliaj okuloj, neatendite? Ili vidis iun homon kun terure granda nazo paŝadanta antaŭ ili. Liaj du naztruoj estis tiome grandegaj, ke havis lokojn en ili du pretigitaj litoj plenŝtopitaj per littolaĵoj.

– Granda afero estas vianaze havi sufiĉe da loko por tiuj du grandaj litoj kaj la multegaj aldonaĵoj. – diris la mireganta N i k e t a s.

– Jes, vere estas granda afero, sed multe pli granda estas la afero de N i k e t a s, kiu povis trabori tiun ferŝildon – diris ĉi tiu homo.

– Mi estas tiu N i k e t a s, jen por vi unu el miaj ĉevaloj, venu kun mi!

– Bone, mi volonte aliĝos al vi, – respondis G r a n d n a z u l o, – kun vi mi iros ien ajn!

Sesope ekiris ili kune kun N i k e t a s kaj iris ĝis ilia alveno iutaga en iun urbon de la alia lando. Baldaŭ venis ŝanco por halti antaŭ la reĝa palaco de tiu lando. Oni akceptis ilin pompe.

⁷ Stamboul aŭ Stambul estas la praaj nomoj de la historia malnova urbokvartalo de la urbo Istambulo, kiu siatempe estis la unusola konsistiga parto, ĉar aliaj urbopartoj ne ekzistis. (Bv vidi la punkton 4-an)

N i k e t a s loĝis en la palaco, liaj kvin homoj estis lokitaj en lia proksimeco. La reĝo aranĝis akcepton por N i k e t a s dirante al li:

– Mi havas unu vetbatalanton similan al H e r a k l o. Unu el vi devos lukti kun li. Se vi sukcesos, tio estos via feliĉo, sed se ne, mi neniigos vin, do notu tion al vi.

Ne tial estis tie M a l p r o k s i m e n a ŭ d a n t o, ke li ne estus povinta aŭdi la reĝon el la foro. Li atentigis M o n t o p o r t a n t o n:

– Amiko, vi havos laboron morgaŭ, vi devos lukti kun la homo de la reĝo, kun la granda vetbatalanto.

Baldaŭ alvenis N i k e t a s por rakonti la okazintaĵojn, sed la kvin homoj respondis, ke ili jam scias pri la novaĵoj.

– Ne timu la vetbatalanton, M o n t o p o r t a n t o bone regalos tiun per fortaj batoj.

Multaj homoj estis alitage antaŭ la palaco, la homoj atendis kiel haringoj en skatolo, eĉ herbo ne povis kreski pro ilia denseco. Avane la reĝo staris, malantaŭ li multaj korteganoj okupis lokon, sed plej antaŭe la vetbatalanto atendadis kiel furiozanta virbovo. La vetbatalanto alkuregis antaŭ M o n t o p o r t a n t o n kaj dirinte eĉ ne unu vorton vangofrapis lin pli ol sufiĉe. Nu, nia amiko povis fari nenion kroman, ol alkuri al la vetbatalanto kapti lin talie kaj puŝjeti lin al la ĉielo. Li malaperis en la granda alteco. Miris pri tio la multaj homoj. Ili nur rigardis al la ĉielo atendente lian refalon. Tri horoj pasis ĝis la refalo de liaj korpepecoj, sed eĉ ne demandu el tiu kiom atingis surteren. Mi ne volas paroli pri tio. La sekvantan tagon la reĝo denove akceptis N i k e t a s -on komunikinte:

– Kvardek kaldronoj da rizo kaj same kvardek kaldronoj da cepa viando estos morgaŭ antaŭ vi. Se iu el vi malplenigos tiujn kaldronojn, tio estos via feliĉo. Se vi malsukcesos, mi neniigos vin.

Ne tial estis V o r a ĉ a n t o (pro lia grandintesto) tie, ke li faru nenion, nu li decidis malplenigi ĉiun kaldronon. Sekvatage denove ili estis antaŭ la palaco kune kun la manĝaĵoj. Ĉu vi kredas, ĉu ne, unu kaldrona manĝaĵo estis unu gluto kaj kiam V o r e ĉ a n t o estis preta pri la manĝado, li eĉ lamentis pri la malmulta manĝaĵo, kiun oni provizis al li. Li restis malsata. Ankaŭ la trian tagon akceptis la reĝo N i k e t a s -on dirante al li:

– Al la urbo je ses horoj longdaŭra irtempo mi havas ĝardenon kun vinberlaŭbo. Ĉe la morgaŭa aŭroro, ankaŭ vi, ankaŭ mi sendos tien iun homon. Ĉiu deŝiru grapolon da vinberoj el mia vinberlaŭbo kaj rapide portu tiun al mi. Se via homo alvenos pli frue, tio estos via feliĉo, sed se la mia, mi neniigos vin.

Ne por tio estis tie F u l m e k u r e g a n t o, ke li malordigu la aferon. Alitage je aŭroro li iris antaŭ la palacon, por ekiri kune kun la reĝa kureganto.

– Antaŭlonge foriris jam tiu – li ricevis la sciigon, krome oni priridis lin, la kompatindulon.

– Ne estas damaĝo la pli frua ekiro de la reĝa rapidkureganto – diris F u l m e k u r e g a n t o – unue mi eldrinkos unu tason da kafo, mi elfumos ĉibukon – diris li al la soldatoj.

Portis ili la petaĵojn, tre ĝentile. Li eltrinkis la kafon, elfumis la ĉibukon, kaj iom babiladis kun la soldatoj.

– Nu, nun mi povos jam ekiri – diris li kaj ekpaŝadis ursmaniere.

Kiam li lasis la urbon post si, de sur liaj piedoj li malligis la muelŝtonojn, saltis unufoje, svingis sin dufoje kaj jam estis en la ĝardeno, en la vinberlaŭbo de la reĝo. Li deŝiris la grapolon da vinberoj kaj turnis sin por iri reen al la reĝa kortego, al la urbo. Ĝuste tiam venis vid-al-vide la reĝa kureganto, lia vojiro daŭris tiam nur al la ĝardeno. F u l m e k u r e g a n t o ne rekonis tiun, sed tiu rekonis lin.

– Venis mia fino, – pensis en si la rapidkuranto de la reĝo. Se mi ne povos haltigi tiun homon, perdiĝos mia virto, mia bona nomo. Antaŭ nelonge fosita tombo estis en lia proksimeco, do tuj li sidiĝis tie kaj komencis vead, faligi siajn falsajn larmogutojn.

– Kial vi ploras tiom mizere? – demandis lin F u l m e k u r e g a n t o. – Mia ununura infano estis li kaj mi nun perdis lin – respondis la vulpo-anima.

– Sidiĝu apud min, pia fremdulo, manĝu el mia halvao⁸ kaj preĝu ankaŭ vi por lia anima beateco.

F u l m e k u r e g a n t o tien iris al la tombo, sidiĝis kaj enmaĉis en la funebra festeno, sed li ne rimarkis, ke la ploranto ŝutis dormigan polvon al la helva-o. Li apenaŭ glutis iom kaj li tuj ekdormis. Ĉi tiun ekdormon atendis la rapidkuranto kaj el la manoj de la dormanto li elprenis la grapolon da vinberoj kaj ekkuregis al la urbo, al la palaco de la reĝo. M a l p r o k s i m e n a ŭ d a n t o kuŝis surtere ĝuste tiam, kaj aŭdis la interparoladon, nome, kio okazis kun lia kamarado.

– Ej homoj! – li kriis – oni manĝigis per dormigaĵo F u l m e k u r e g a n t o n! Li kuŝas vojrande apud tombo antaŭnelonge fosita.

Aŭdinte la famon N i k e t a s depafis sian sagon en la direkto de la tombo. La sago atingis la orelpinton de lia amiko, kiu vekigis abrupte el la sonĝo kaj ĉirkaŭrigardinte rememoris la okazintaĵon, travidante la vualon li komprenis la kaŭzon de la mensogo. Li saltis unufoje kaj postsekvis impetege la kureganton, kiu ne atingis eĉ la mezon de sia vojo, kiam F u l m e k u r e g a n t o elprenis de liaj manoj la stranĉitan grapolon da vinberoj kaj baldaŭ alvenis en la kortegon. Li elsuĉis sian ĉibukon jam antaŭlonge, kiam senspire aperis la reĝa kureganto. Sekvatage N i k e t a s staris denove antaŭ la reĝo, kiu mielaĉe diris:

– Vi faris ĉion, kion mi ordonis, nun jam vi povus iri hejmen, sed antaŭ tio, vi banu vin. Mi jam ekhejtigis la banejon.

Rapidis la ses amikoj en la banejon, sed kiam ili trovis lokon en ĝi, tiom bruligis ilin la varmego, ke unu minuton ili ne povis resti plu, ili preskaŭ sufokiĝis en la sekbruliganta varmego. Nun ekagis G r a n d n a z u l o. Li ĉirkaŭrigardante unue priesploris la eblojn, poste ekridetis, ĉar kiam li elpakis la du litojn kaj la almetaĵojn el liaj du naztruoj, malvarma vento kirliĝis antaŭen el liaj du naztruoj, kaj ekneĝis tiom dense, ke la multaj banejservistoj preskaŭ frostiĝis. Apenaŭ povis elkuri el la banejo la ses amikoj.

– Malvarma estis tiu hieraŭa banejo – diris N i k e t a s sekvatage al la reĝo – ne multe mankis, ke ni ĉiuj frostiĝis al ĝia planko.

Streĉis la orelojn la ses amikoj, kio povos esti la sekva ordono de la reĝo. La sekva ordono – ruze kiel peto – baldaŭ estis komunikita:

– Ĉi tiun monton, de antaŭ mia placo, mi ŝatus, se vi forportus. Ĝi baras la vojon de la Suno, ĝi ne povas enbrili al mia fenestro.

Denove estiĝis la vico al M o n t o p o r t a n t o. Li prenis la ŝnuregon, faris al ĝi nodon, maŝon kaj ne nur la monton, sed ankaŭ la palacon li ĉirkaŭzonis per la ŝnurego, eĉ la tutan urbon kune kun la loĝantaro kaj pene portis ilin en la direkto de la lando de N i k e t a s. Nur la reĝo pereis, ĉar lin la ŝnurego strangolis. Oni atendis N i k e t a s -on en la palaco, kvazaŭ li estus la reĝo. Nu la reĝidino lia fidela fianĉino same atendis lin. Ne volis finiĝi iliaj brakumadoj kaj kisado, babilado. Kiam ili finis la prirakontadon de la okazintaĵoj, kaj la kvin bonamikojn ili pridonacis, N i k e t a s alparolis sian bopatron: – Reĝpatro mia! Via filino estos mia edzino, tamen vi ne scias, kiu estas mi.

– Jes, mi vere ne scias – diris la reĝo.

– Nu bonvolu ekscii, mi estas tiu homido, kiun via falko prenis sur la arbopinto.

– Sed, mi malliberigis vin – kriis la reĝo.

– Jes, mi suferis longan tempon en via malliberejo, ĉar mi ne volis rakonti mian sonĝon, nek al vi, nek al miaj gepatroj.

⁸ La radikvorto: halva aŭ helva – signifas turkan dolĉaĵon pretigitan el tritikfaruno aŭ grio kun aldonitaj lakto, sukero, mielo, butero, oleo, akvo, pingraĵoj.

- Kio estis do tiu sonĝo? – demandis la reĝo.
- Mi eksongis tion, kio okazis pri mi ekde tiam. Nur la geedziĝo mankis el ĝi.
- Ne manku eĉ tio! – kriis la reĝo kaj grandan geeziĝfeston ekhavis ili. Ili aranĝis tiome grandan, eĉ la grandmanganto bonsatis dum tiu. Ĉi tiu tutsatiĝo estis granda afero, karaj miaj homfratoj!

Korakolingve

Ekzistis iam iu insuleto, sur kiu vivis iu reĝido. Iumatene ĉi tiu fraŭlo vekigis kun la volo geedziĝi. Sed li ŝatus tian fraŭlinon por edzino, kiu scipovas paroli ankaŭ korakolingve. Venis la mesaĝportantoj pri belaj fraŭlinoj, sed eĉ unu el la belaj reĝfraŭlinoj ne povis paroli korakolingve. Tre malgajiĝis la reĝido pro tiu ĉi fakto, kaj iumatene li, preninte pafilon en manon, eliris ĉasi en la arbaro por mildigi siajn malgajecon kaj zorgon. Li iradis meditante ĉiam, tuttage en la arbaro, kiel li povus trovi sian estontan fianĉinon. Jam proksimiĝis la vespero kaj li havis eĉ ankaŭ tiam la saman penson. Li estis tiam ĉe montosubo, kiam hazarde li rimarkis maljunulon kun bela knabino, eĉ brilege bela. Antaŭ li iris la du homoj, li post ili. Kiam ili metinte paŝon post paŝo, malrapide atingis la montosupron, aŭdis foje la reĝido, ke la knabino ekparolas:

– Patrosinjoro mia, klinu viajn piedojn al viaj ŝultroj, pli rapide mi atingos nian hejmon.

– Kion vi parolas, mia filineto? – respondis la maljunulo. – Kiel mi povus klini miajn piedojn al miaj ŝultroj?

– Mi ne pensas pri viaj piedoj – diris la knabino, – sed pri tio, se vi detiros ŝuojn kaj tiujn vi metus sur la ŝultrojn, tiel, via movo estos kaj pli rapida kaj pli facila. Kiel aŭskultis ilin la reĝido, plaĉis al li la knabinaj vortoj. Kiel ili iris, la reĝido denove aŭdis la parolon de la knabino:

– Patrosinjoro mia, helpu min, ankaŭ mi helpos vin. Vesperiĝis, tiel pli rapide ni povos atingi hejmon.

– Pri kio parolas mia filineto? – demandis la maljunulo – kiel mi povus helpi al vi, ja mi apenaŭ havas forton, nur tiom mi havas, ke mi kapblas stari.

– Mi pensis ne pri via forto – respondis la knabinjo – sed pri tio, ke por pasigi tempon ni interparoladu iom, ĉar tiel la tempo flugos pli rapide.

La reĝido aŭdis ankaŭ tiujn ĉi vortojn de la knabinjo kaj ŝi plie ekplaĉis al li. Li decidis iri al ili kaj tie tranokti. Ĉar dume tute vesperiĝis, li tre singarde iris post ili, ĝis ili enpaŝis en sian kiel hejmo servantan dometon situanta en la regiono de la montosupro. Kiam la maljunulo enpaŝis kun sia filino, tuj post ili ankaŭ la reĝido enpaŝis.

– Bonan vesperon! – li salutis.

– Ĝi estis bona, sed malaperis – respondis la knabino. Se nur ni retrovos ĝin.

Ĉirkaŭrigardis la reĝido en la dometo, kie povas esti la domgardanta hundo. Nu, ĝi trovis nek en la dometo nek ekstere, ie en proksimeco de la domo.

– Jam malfrue estas – daŭrigis la parolon la reĝido – mi restus ĉi tie ĝis mateno, se vi permesus.

– Volonte ni bonvenigas vin, – respondis la knabinjo, – sufiĉos kaj ankoraŭ restos loko.

Refoje ĉirkaŭrigardis la reĝido en la dometo kaj ekvidis maljunulinon teksi teksaĵojn por vestoj al siaj ĉeestantaj ĉifonvestitaj tri-kvar infanoj. Ili ne povis havi abunde manĝaĵon, ĉar nur unu kokon ili prenis por buĉi. Ili rapide rostis ĝin kaj altabligis ĉe iu tableto. La kokokapon prenis la knabinjo kaj donis al sia patro, al la patrino la ripostojn, al la gasto la du flugilojn, kaj la aliajn viandojn ŝi disdonis inter la infanoj. La maljunulo hontetis, li rigardis unue al sia edzino, poste al ilia gasto. Nur tre malfrue, kiam ili iris dormi, li demandis.

– Ej, mia filino, strange vi distribuis la kokon. Ĉu vi ne hontis antaŭ la gasto? – Patrosinjoro mia! – respondis la knabinjo – se vi ne komprenis, mi klarigos al vi. La kokokapon ricevis vi, ĉar la kapo (la ĉefo) de nia familio vi estas. Al mia patrino estis la ripoj, ĉar ŝi kuntenas nian familion. La du flugilojn mi donis al la gasto, ĉar li elflugos de ni. La viandaĵojn ricevis la infanoj, ĉar ili bezonas tion por forta kreskiĝo. Tiel scias tiun dividon ankaŭ la korakoj.

En la alkovo kuŝis la reĝido kaj aŭdis la diron de la knabinjo; li miris, ke ŝi konas ankaŭ la korako-lingvon kaj li tuj komprenis tion.

– Nu, bone estus por mi edzinigi ĉi tiun fraŭlinon – pensis en si mem la reĝido – ja ŝi komprenas ankaŭ korakolingvon.

Apenaŭ mateniĝis, la reĝido ellitiĝis, li adiaŭis la gemaljunulojn kaj ekiris al sia palaco. Alveninte li vokis serviston kaj tridek unu panojn, unu rondforman fromaĝon, rostitan kokon, kaj unu ŝafledan vinujon plenan de vino li transdonis al tiu. La servisto metis la aĵojn en sakon, la reĝido provizis per klarigoj la serviston pri la vojlinio surmonten al la montosupro, kaj priskribis la personon, al kiu li devos transdoni la nutraĵplenan sakon:

– Sur la montosupro estas dometo, en la dometo knabinjo, al ŝi vi devos transdoni la sakon. Diru, „la sakenhavo estas donaco” – ordonis li sian serviston kaj krome almetis – diru al ŝi: „Mia mastro sendas saluton kaj mesaĝas: tridek unu estas la tagoj de la monato, ĝuste nun estas la plenluno, la koko kokerikas, la ŝafledo streĉita estas.”

Ekiris la servisto, kaj dum lia penporta iro supren al la monto, renkontis siajn unu-du amikojn, kiuj venis ĝuste malsupren de la monto.

– Kien vi iras kun ŝarĝo, kiun vi pene portas? – demandis ili lin.

– Supre, sur la montopinto staras dometo, tien mi portas ĉi tiun sakon – respondis la juna servisto.

– Kion enhavas la sako? – demandis lin liaj amikoj dume flaradintaj la bonodorojn de rostaĵo kaj vino.

– Pano, fromaĝo, rostita koko, ĉiuj donacoj de mia mastro – respondis la fraŭlo.

La amikaj dentoj tiam jam ne povis forgesi pri sia metio kaj nun kiam ili aŭdis pri la manĝaĵoj, de salivo pleniĝis ilia buŝo kaj preskaŭ ĝi ekgutis.

– Ĉu ne estus bone gustumi ĉiujn? – demandis la malsategaj fraŭletoj. – Sufiĉos kaj ankaŭ restos el ili.

– Bone – konsentis la servisto de la reĝido – manĝetu do ni el tiuj.

Tie ili sidiĝis sur la herbo. Ili malfermis la grandan sakon kaj ekmanĝetis el la proviantoj. Ili bonguste manĝis unu gluton post la alia, ĝis formanĝiĝis la tuta rostita koko. El la panoj restis ne multaj, el la fromaĝo kaj la vino restis apenaŭ la duono. Fine la servisto ensakigis la manĝorestaĵon, kaj li ekiris per ĝi al la dometo kaj transdonis al la fraŭlino. Li transdonis ankaŭ la mesaĝon de sia mastro, nome, ke: „tridek unu tagojn havas la monato, ĝuste nun estas la plenluno, la koko kokerikas, streĉita estas la ŝafledo”. Rigardis la fraŭlineto la donacojn, kalkulis ilian nombron kaj diris respondon al la mastro de la servisto:

– Reiru al via mastro kaj bonvolu diri al via mastro: mi sendas mian saluton al li kaj dankas pro la rememoro. Ankaŭ tion diru, sed ne forgesu, ke „dek ok la tagoj de la monato, nur la duono de la plenluno, la koko ne kokerikas, la ŝafledo gluglas. Se li ekamis la dometon, la porkon ne mistraktu.”

La knabinjo volis komprenigi al la reĝido, ke el la panoj restis nur dek ok, el la ronda fromaĝo restis nur la duono, postsignoj de la rostita koko ne restis, la vinujo estis malplena duone. Sed se li ekamis ŝin, li ne batu sian serviston. La servisto transdonis la mesaĝon de la knabinjo, li nur forgesis pri ŝia lasta frazo koncerne la porkon. La reĝido komprenis la mesaĝon kaj tre indignis. La reĝido bastonigis ĉi tiun sian serviston tiome, ke pro la postrestinta doloro tiu ne forgesis pri tio ĝis sia morto.

– Haltu, atendu iome, mia sinjoro – kriegis la servisto rememorinte pri la forgesita fino de la mesaĝo, – tiu fraŭlino – en la dometo – mesaĝis ankaŭ ion kroman, sed mi rememoris tion nur nun.

– Kio estis ŝia cetera mesaĝo? – demandis la reĝido senspire pro ekscitiĝo. – „Se vi ekamis la dometon, la porkon vi ne mistraktu”- diris la servisto.

– Ho, vi stultulo – komentis ridetante la reĝido – pli frue dirinte la mesaĝfinon, vi ne estus sufereginta.

Ekhavinte grandegan ĝojon, li galopis tuj al la montopinta dometo kaj portis hejmen la fraŭlinon. Ili geedziĝis. Ekde tiam ili babiladas korakolingve. Ili vivadas feliĉe.



Greka virino el Korinto

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=62350>

Malsaĝa sinjorino, kaj ŝia malsaĝa filino

Iuvilaĝe iam pace vivis iu pastro, lia edzino kaj iliaj tri filinoj. Iudimanĉe okazis post la meso, ke el la tri fraŭlinoj, unu, la plej aĝa, iris promenadi. Kiam ŝi post si lasis jam la lastan vilaĝan domon kaj ekvidis iun rokon, ŝi tuj ekploris kaj tre doloreme eksuspiradis:

– Ho ve al mia kompatinda kapo! Se mi edziniĝos kaj mia infano povos veni ĉi tien, la roko povos surfali kaj mortigi mian infanon! Ho ve al mi kaj al mia infano!

Dume, hejme ŝiaj du fratinoj atendis ŝin.

– Kial malfruas nia fratino, kie ŝi restis? – ili demandadis. Foriris unu fraŭlino el ili por serĉi la fratinon. Kiam ŝi forlasis la vilaĝon, ŝi trovis la fratinon plore sidi apud iu roko.

– Kian malbonon vi havas, fratino mia? – ŝia pli juna fratino demandis. – Kial vi ploras?

– Kial mi ne plorus? – respondis la pli aĝa fraŭlino. Ja, se mi edziniĝos kaj mia infano povos veni ĉi tien, la roko povos surfali kaj mortigi mian infanon!

Je tiu diro ekploris ankaŭ la pli juna. Nun jam la du fraŭlinoj priploris la estontan infanon. Iliaj larmoj faladis senĉese. Vane atendis ilin la plej juna. Postiris ilin ankaŭ ŝi kaj same agis kiel la aliaj du. Ili trioje veadis, larmis. Nun jam ankaŭ ilia patrino maltrankviliĝis pro la longa atendo al ili. Ĉe ŝi ĉio okazis same, ja ankaŭ ŝi ploris kune kun ili. Hejme sole restis la kompatinda pastro. Ekiris do ankaŭ li por ekscii, kie restas liaj familianoj. Jam de malproksimo, el la direkto de la roko, li jam aŭdis ilian veadon, ploradon: Ve al mi, ve al mi! – sonis ilia kanto tre malgaje, amarece, malĝoje. Alrapidis ilin la pastro kaj gapmiregante demandis ilin:

– Kio okazis nun, ke vi trioje veaĉadas?

Lia edzino dum unu suspiro pridiris vortgalope ilian malĝojon:

– Se iam edziniĝos via filino, kaj ŝi havos infanon, kaj se la infano alproksimigos ĉi tiun rokon, la roko povos surfali kaj mortpremi la kompatindan. Ĉi tio estas nia granda amareco.

Ekkoleris la kompatinda pastro kaj alkriis kolere al la kvar virinoj:

– Fajro bruligu vian korpon, tiun vian malmultan menson! Mi ne povas resti hejme, ĉar mi havas ne ripozon nek trankvilon. Senplie mi forlasos vin, ĉar fine ankaŭ sur min algluiĝos via stulteco!

Kiam li kunpakis por forporti siajn aĵojn, li turnis sin al sia edzino:

– Mi eliros en la mondon vastan kaj ne revenos baldaŭ. Se mi renkontos tamen pli malsaĝajn ol vi, mi nur tiam rifuĝos denove al vi. Tiukaze vi estos la pli malgrandaj malsaĝaj.

Poste li foriris ne haltante ĝis la najbara vilaĝo. Kiam li preteriris iun domon en tiu vilaĝo, granda ŝrikado, plorado frapis al li la orelojn. Li rigardis en la domon, kia malbono estas tie. Ene staris virino, premeganta la manojn en tuta anima malagordo, ja antaŭ ŝi estis lulilo kun infano kaj super tiu granda hakilo pendis de la trabo.

– Kian malbonon vi havas, bona sinjorino? – demandis la konsterniĝinta pastro.

– Ho, ve! Al mia karega etulo, la hakilo povos surfali!

– Nu, la sama stulteco – pensis en si mem nia pastro – ĉu estos pago por savo de la vivo de via infano? – li demandis la sinjorinon.

– Eĉ mian animon – respondis la sinjorino – nur tiu hakilo ne damaĝu la vivon de mia infano. Prenis la pastro la lulilon, eltiris ĝin flanken de sub la hakilo.

– Nu jam nun vi povas esti trankvila – diris la pastro – la hakilo ne povos fali sur vian infanon.

Pro la forta dankemo la sinjorino pridonacis la pastron per mankavo da mono.

– Eĉ tie mi ne povos resti, ja ĉi sinjorino estis pli malsaĝa ol la hejmaj – pensis li.

Li iris al la sekva vilaĝo. Tie multegaj homoj svarmis ĉirkaŭ iu longstatura fraŭlo kaj ĉiuj ploris, grumblis.

– Kiaspeca malbono povas esti ĉe ili? – demandis sin la pastro kaj por ekscii ion, li miksis sin inter ilin.

La vilaĝanoj volis edzigi altan fraŭlon, sed la domo de la familio de la fianĉino estis malalta, kaj la fraŭlo ne povis eniri tra ĝia pordo. Ili meditis pri la farindaĵoj: ĉu ili tranĉu la kapon aŭ iom mallongigu la piedojn? Tiome forte la pastro ridis, ke li povis apenaŭ ekparoli:

– Kristanoj! Kio mankas ĉe vi? – demandis li la homamason.

– Iu rakontis plende la situacion: la fianĉo ne scias trapasi la pordon, kaj nun la homoj ne scias; ĉu oni tranĉu la kapon aŭ mallongigu la piedojn de la fianĉo?

Li kaptegis la fianĉon ĉe la tufo, kaj diris al li: „Klinu vin, mia filo, klinu vin tre suben!” La fraŭlo klinis sin iom, sed la pastro plu instigis lin: „Klinu vin pli profunden!” La pastro ĝis tiam sinklinigis la fraŭlon kaj premadis malsupren lian kapon, ke fine li povis enfaligi la maldike altan fianĉon en la domon.

– Nun jam vi povos alplandiĝi – instigis la fianĉon la pastro. – Se vi devos eliri poste, aŭ denove eniri, same tiel klinu vin – donis li la konsilon.

Li geedzigis la novan paron kaj kolektis nekredeble multe da mono. Ĝi estis pli multa, ol multo.

– Mi eĉ ne restos ĉi tie – pensis li en si mem – ja ĉi tiuj homoj estis pli malsaĝaj ol la pliaj stultuloj, kaj li pluiris al la sekvaj du vilaĝoj.

Trairinte iun vilagon li ekvidis sinjorinon banantan sian porkidon kaj poste ornamantan ĝin per ormoneroj kaj diamantoj.

– Ej! Kion vi faras, bona sinjorino? – demandis nia mirfrapita pastro.

– Nun mi pretigas porti mian fraŭlineton, mian porkideton al ŝia geedziĝo.

– Kie atendas la edzo de via filino? – la pastro demandis la sinjorinon.

– Tie oni atendas ŝin en la templo – respondis la sinjorino – sed miaj piedoj ne havas jam sufiĉe da forto, ja ili ne toleras jam la multan marŝadon. Ankaŭ vi estas pastro, ĉu vi ne akompanus ŝin kaj geedzigus ilin?

– Kunĝoje – respondis la pastro ne povante rigardi ion alian ol la multe da ormoneroj kaj la brilantajn diamantojn.

Poste li prenis la porkideton kaj tuj ekiris kun ĝi. Li nur atendis la atingon de la fino de la vilaĝo. Tie li deprenis la ormonerojn kaj la diamantojn de la porkido. La trezorojn li enpoŝigis, sed la porkidon repelis. Poste li faris decidon tre faciliĝinte:

– Reiros mi al miaj edzino kaj filinoj, ili estas eĉ la plej saĝaj malsaĝulinoj, ja pere de ili mi havigis al mi ĉi tiun multan monon.

Li rerapidis al sia vilaĝo al siaj malsaĝulinoj.

– Feliĉe, ke vi alvenis! – ĝojadis la virinoj ne sciante kion fari pro la granda ĝojo.

– Kie vi povis esti? Kian bonon vi portis? – demandadis ili lin.

– Mi pensis, vi estas vere malsaĝulinoj – diris la ridetanta pastro, tial mi volis eskapi de vi. Sed vi ne estas malsaĝulinoj, vi povas superruzi multajn aliulojn.

La pastra familio riĉhave vivis de tiam. Unu post alia edzinigis la pastro siajn filinojn. Se tamen iam okazis, ke atakis ilin la horo malsaĝa pro ia virina stulta ago, la maljuna pastro konsolis sin per tio: ne estas homo tiome malsaĝa, ke ne estus pli granda ol tiu.

Eĉ ne unu vorton parolanta reĝidineto

La evento okazis antaŭ longa tempo, ankoraŭ tiam, kiam ĉiuj grekaj insuletoj havis alian reĝon, do ankaŭ la insulo Naksos havis propran reĝon. La reganto de la insulo N a k s o s havis filinon, titolitan monda plejbelulino. Kiom da insulaj reĝoj posedis la aliaj insuletoj, ĉiuj volis gajni ŝin kiel bofilinon. Foje la naksosa reĝo ekmeditis:

– Se mi edzinigos mian filinon al la reĝido de la insuleto A p a r o s: mi tiros sur min la koleron de la reĝido de A t i n o s. Se mi edzinigos ŝin al la reĝido de A t i n o s: koleros sur min la reĝido de K i l o s, kaj la reĝido de Santorini kaj mi havos same problemojn kun la reĝidoj de la aliaj insuletoj.

Iutage la reĝo de N a k s o s kunvokis la konsilantaron, la dek dumembran, ke ili solvu la problemon. Kunsidis la dek du membroj kaj jena estis ilia interkonsento:

– La reĝidineto simulu sin muta, senvorta. Ŝi diru eĉ unu vorton al neniu. Venu poste la svatiĝantoj, kiuj devos ekparoligi ŝin dum la sekvaj tri tagoj. Kiu sukcesos ekparoligi ŝin, tiu estu la edzo ŝia. Kiu ne povos paroligi ŝin, lia kapo falu en polvon.

Apenaŭ disvastiĝis la konsilo, kaj jam amase proksimiĝis al ĉi insulo la reĝidoj, plimultaj princoj kaj kavaliroj de la najbaraj popoloj. Ilia kapo falis en polvon, sed eĉ unu vorton ne parolis la reĝidino. Multaj fraŭlokapoj pereis. Turo ariĝis jam el la kranioj. Tri turoj staris jam, sed la reĝidineto ne ekparolis. De tiuj ĉi insuloj pli malproksime ekzistis iu malgranda insulo, kie vivis maljunulino. Ŝi havis nenian apartenanton envilaĝe krom sia unusola, orfa nepo havanta nek patron, nek patrinon. Ŝi pene laboris, almozpetadante plenkreskigis sian orfon. Kiam li iĝis fraŭlo, iutage atingis ankaŭ lin la onidiro pri la muta reĝidino. Iutage li vizitis sian avinon kun la vortoj:

– Kara mia avinjeto! Ankaŭ mi foriros en la mondon vastan, eble mi ekparoligos tiun reĝidineton.

La avino kunfrapis siajn manojn kaj tiel ekkriis teruriga de la aŭditaĵoj:

– Kiom da reĝidoj pereis, kiom da fraŭlokapoj falis en polvon, kaj ĉu vi estus la plej bona, la pli prava? Prefere helpu min, ke en miaj maljunaj tagoj mi ne suferu pro la nenihavo.

Ŝi ne povis reteni la fraŭleton, ja li argumentis per tio, ke li havas nur unu vivon, unu morton, li volas elprovi sian feliĉon. Kion faru la kompatinda avino, nu ŝi rezignaciis je sia sorto.

– Iru tra la najbara insulo al mia pli maljuna aĝa fratino. Ŝi estas ege sperta kaj certe donos bonan konsilon – proponis ŝi tre malgaja al la nepo. La fraŭlo velveturis al la najbara insulo kaj tre ĝentile salutis sian maljunan onjon alveninte:

– Via onklina moŝto donu manon por kiso de mi.

– Kiu vento vin alblovis? – demandis la sinjorino la fraŭlon.

– En N a k s o s, la reĝidino – respondis la fraŭlo – aŭ ŝi ekparolos je mia demanda voĉo aŭ mia kapo falos en polvon.

– Kial vi ne restas hejme trankvile? – draste alkriis la maljunulino lin. – Via avinjeto sen vi, sen via forto kion farus?

La fraŭlo malakceptis, malobeis ŝian konsilon; li diris, ke ĉar li havas nur unu vivon, unu morton, li devas elprovi feliĉon. La maljunulino sentante sin en altrudita situacio, elprenis branĉeton el iu fakara kesto kaj transdonis ĝin al la fraŭlo.

– Prenu ĉi tiun branĉeton, diris ŝi – kaj sciu, – kion vi ektuŝos per ĝi, tio respondos vian demandon, estu tiu speco homido aŭ alio.

– Ĉu vi vidas tiujn tri turojn? – demandis la reĝo. – De kranioj de bravaj junuloj kreskis tiuj tiom alten. Ankoraŭ unu kapo mankas al la tria, eble via kamparana. – Mi ne bedaŭras, se ĝi estos mia – respondis tre kuraĝe la fraŭlo.

Poste la korteganoj kondukis lin al la palaco de la reĝidino. Alpaŝis ŝin la fraŭlo kaj alparolis ŝin:

– Feliĉan bonan tagon, reĝa fraŭlino! – Eĉ ne turnis sin la reĝfraŭlino liadirekten. – Ho fraŭlino – komencis la fraŭlo petegante – mi havas maljunan avinon hejme, mian etan domon mi lasis for kaj vi tute ne turnas vin al mi?

Ŝi dediĉis nulan atenton liadirekten, ŝi eĉ ne palpebrumis. Ĝis mateno petpetegis la fraŭlo, sed vane, la reĝfraŭlino parolis eĉ ne unu vorton. Kiam alvenis la aŭroro, la korteganoj forkondukis lin, por ke povu ripozi kaj li kaj la fraŭlino. Dumatage denove staris la fraŭlo antaŭ la reĝa fraŭlino.

– Feliĉan, bonŝancan tagon reĝa fraŭlino! – la fraŭlo salutis ŝin. – Li ricevis eĉ ne tiom da respondo, kiel:

– Venis fino de via bona destino.

– Ho fraŭlino! – petegis denove la fraŭlo. – Ĉu vi ne bedaŭras mian malgajon, mian morton por vi estontan?

La fraŭlino ne zorgis pri li. Ĝis vespero petegis la fraŭlo, sed vane. Poste venis por li la korteganoj kaj forkondukis lin el la ĉambro. Alvenis la tempo de la tria tago. La fraŭlo droninta en malespero plore faris la viziton ĉe la reĝa fraŭlino daŭre lamentante pri sia malfeliĉo:

– Ho, fraŭlino, reĝa fraŭlino, se ne per vorto, do nur perokule turniĝu al mi. Dolĉigu mian morton, per via rigardo konsolu min.

Kiam li estis atendanta la kunsentan movon de la fraŭlino, dum li rigardis ŝian vizaĝon, sian manon al koro tenante li eksentis ian malmolaĵon sub sia vesto surbruste. Li eltiris ĝin por rigardi, kio ĝi estas. Ej do, ĝi estis la donaco de lia maljuna onjo. Tuj li rememoris ĉion. Iom li pensadis, poste iris al la pordo kaj ektuŝinte ĝin alparolis jene:

– Via sinjorino, la reĝa fraŭlino parolanta eĉ ne unu vorton, ne zorgas pri mi. Kara pordeto, alkovo, parolu anstataŭ ŝi. Kaj jen, eksonis la pordo:

– Kion mi povus diri al vi? Ĉu la sekvajn vortojn? Mi kreskis en arbaro portante florojn, poste oni elhakis kaj disfendigis min, kaj post tio mi estis portita al lignaĵisto, kiu skulptis el mi pordon. Oni foje malfermas min, foje fermas min. Mi savas mian malgrandan damon, tiel mi vivas mian vivon.

– Ĉu vi vidas, reĝa fraŭlino – parolis la fraŭlo al la fraŭlino – ekparolis jam ankaŭ via pordo, ekparolu ankaŭ vi mem.

Ne, ŝi parolis, eĉ ne unu vorton. Poste la fraŭlo turnis sin al la lampo kaj per sia branĉeto ektuŝis ĝin alparole:

– Via sinjorino – la reĝa fraŭlino parolanta eĉ ne unu vorton – ne perdas vorton al mi. Kara lampo, lumiganta kandeleteto, parolu anstataŭ ŝi. Kaj jen, eksonis la lampo:

– Kion ceteran mi povus diri al vi, ol ke mi estis surmonte sablo, el kiu oni kribris arĝenton, poste portis min al oraĵisto, kiu faris el mi lampon. Mi ricevas frotpurigon foj-foje, oni bruligas min ĉiutage por lumdoni al mia damo, tiel pasas mia vivo.

Dume komencis kreviĝi la malhela grizeco de la frumatena ĉielo. La fraŭlo ŝteliris al la fraŭlino kaj nerimarkite ektuŝis per la branĉeto la kapon de la fraŭlino. Poste, li alparolis ŝin jene:

– Ho fraŭlino, reĝfraŭlino, eksonis jam ankaŭ viaj pordo kaj lampo, ekparolu ankaŭ viaj belaj lipoj.

Turnis la kapon al li la fraŭlino ekparolante jene:

– Damaĝon portis mia deviga silento – damaĝon ne portu mia eksono!

Ĝoje klinis la genuojn kaj la kapon la insula malriĉa fraŭlo dirante al la fraŭlino:

– Mi diros al via patro, kaj al la konsilantaro de la dek du saĝuloj, ke viaj lipoj ne malfermiĝis al parolo por entuziasmigo de mia vivo. Via patro povus mortigi eĉ vin pro via eksono, ja tiujn multajn reĝidojn li mortigis.

Dume jam tutheliĝis la mateno. La korteganoj denove elkondukis lin de apud la fraŭlino.

– Eĉ unu vorton ne diris la reĝfraŭlineto – diris malgaje la fraŭlo kaj esprimis la deziron por iri antaŭ la reĝon.

– Via reĝsinjoro Moŝto! – salutis lin la fraŭlo kaj tuj daŭrigis – Bonvolu kunvoki la dek du saĝulojn, la dek du saĝajn prijuĝantojn! Mia kapo polvonfalos ĉiuokaze, tiel ili aŭskultu mian kazon.

Permesdonis la reĝo kaj kunvokis la konsilantaron, la dek du saĝajn prijuĝantojn. La fraŭlo aperis antaŭ ili kaj komencis la rakonton jene:

– La evento okazis sur mia hejma insulo, Vi havigu juston. En mia vilaĝo vivas pastro, tajloro kaj meblisto. Iutage ili ekiris ĉasi, sed ĉar dume iĝis vespero, ili restis en la arbaro. Irante en la malhelego ili stumblis-plumpis, sed fine estis trovita dometo, kien ili eniris por pasigi la nokton tie. Ili konsentis tiel, ke el ili du kuŝiĝos por dormi, dum tiu tempo la tria gardostaras, poste ili ŝanĝos unu la alian post ĉiu tria horo. La unua gardanto estis la meblisto. Li gardis la aliajn du dormantojn. Li volis iom timigi la tajloron, do li prenis lignon kaj skulptis el ĝi homfiguron. Ĝin li starigis apudporden kaj li vekis la tajloron, ĉar tiu estis la sekvanta laŭvice por gardostari, ĉar ĝuste tiam forpasis la trihora gardo. Kiam tiu ekrigardis la pupon, preskaŭ frostiĝis la sango en liaj vejnoj pro la teruriĝo. La lignopupo ne movis sin, nu li kuraĝis iri al ĝi. Atingante ĝin li rimarkis, ke ĝi estas el ligno kaj certe ĝi povas esti ŝerco de la meblisto. Nu li serĉis necesajojn, kaj li kudris veston al la marioneto: rajdpantalono atingintan la du krurojn, feljaketon al la talio, ruĝan ĉapelon surkapen kaj ĉar la tempo dume forpasis, li iris al la pastro por veki lin. Pene surpiediĝis el kuŝo la pastro, lumigis kandelon por legi sanktan libron.

– Sakramenta Dio! – ekkriis li timiĝante, streĉitante la okulojn al la lingna homo.

Kiam li pli ekzamenis tiun per la okuloj, li ekvidis, ke tiu estas ia ligna homo, maĥinacio povas esti tiu de liaj du kunuloj. Iu ideo fajreris tra lia cerbo. Por realigi ĝin, li genuiĝis kaj fervore preĝpetegis Dion, ke la marioneto havu animon kaj kapablon por paroli. Poste li alkriis la lignan homon kaj jen, miraklo de mirakloj, eksonis tiu, estiĝis el ĝi vivulo. La tri kunuloj kune estis, kune admiris la homon el ligno estiĝinton. – Mia estas la ligna homo! – kriis la meblisto. – Mi pretigis tiun el ligno. – Mia estas la ligna homo – atestis la tajloro, – mi pretigis por li vestojn. – Mia estas la ligna homo – pruvis la insistanta pastro – mi ekparoligis lin. La tri kunuloj ne povis interkonsenti, kaj iniciatis proceson por porti juĝon en ilia afero. – Ĝuste tiutempe mi devis forlasi mian vilaĝon – daŭrigis la fraŭlo – mi ne scias pri la juĝo de la juĝisto.

– Diru Vi, dek du saĝuloj, kiun koncernas la ligna homo: ĉu la mebliston, aŭ la tajloron, aŭ la pastron?

La konsilantoj diskutadis unu kun alia, kaj fine ili kune kun la reĝo eldiris la verdikton: oni pagu la penon de la meblisto, donacu la tajloron pro lia laboro, sed la lignan homon ekhavu la pastro, ĉar li ekparoligis tiun. Ili eldiris la verdikton kaj ankaŭ fiksas ĝin skribe surpaperigite kaj ankaŭ provizis ĝin per stampo. La fraŭlo, transpreninte la surpaperigitan skribitan juĝon, ekkriis:

– Nu, tiuokaze ankaŭ la reĝfraŭlino estas mia, ja mi ekparoligis ŝin.

Miregis la konsilantaro, sed plie la reĝo. Ili tuj vokigis la reĝfraŭlinon.

Ŝi venis kaj atestis la vorton de la fraŭlo. La reĝo rajtis diri eĉ ne unu vorton kontraŭe, ja estis antaŭ li la antaŭ kelkminutoj efektivigita verdikto. Ej, vi ne povas imagi, kiel granda estis la geedziĝa festeno! Ĝia famo disvastiĝis al sep landoj! Oni alportigis la maljunan avinon, kiu restis en la palaco kaj ne plu manĝis fazeolon, prefere ŝiaj manĝaĵoj estis kortaj birdoj. Pli malfrue reĝo estiĝis el nia fraŭlo, reĝo de iu bela insulo. Ili vivus eĉ ankaŭ nun, se ili ne estus forpasintaj de tiam.

La dek du monato-fratoj

Vivis maljunulino iam, ie sur la pleja rando de sia vilaĝeto. Iutage ŝi ekiris al la monto por kolekti branĉetojn por hejti vintre. Montoflanke staris dometo, simila al paŝtista kabano kovrita per pajlo. Kiam ŝi prenetis la branĉojn, cumajn branĉetojn, la pluvo komencis aspergi neatendite. La sinjorino domaĝis la hejtlignaĵon pro la malsekiĝo, tial por savi ĝin ŝi enpaŝis en tiun dometon similan al paŝtista kabano. Dek du fraŭloj restadis en tiu domo; homoj kun enormaj staturoj, belaj, altaj kaj fortmuskolaj estis ĉiuj.

– Bonan tagon, miaj filetoj, – salutis ŝi la fraŭlojn.

– Bonvenon, maljuna onjo, – ili akceptis ŝian saluton.

– De kie vi venis al ni, en la nuna kotmalseka vetero?

– Ho, ve miaj filetoj – respondis la maljuna onjo, – mi estas malriĉa sinjorino kaj kunprenetas lignaĵojn por hejti dum vintro, jam pasemas la bela varma vetero. Mia dometo jam kadukas, la vento trablovas ĝin; vintre ĝi sorbas en si kaj la malvarmon kaj la pluvon.

La plendon aŭdante demandis iu fraŭlo el la dek du: „Maljuna panjo, diru al mi, kiu monato estas la plej malbona?”

– Neniu estas malbona, – respondis la sinjorino kaj kapneis – ĉiuj monatoj estas tre bonaj, ĉiuj monatoj prosperos bone.

– Ne tiel estas, maljuna onjo: – incitetis ŝin la fraŭlo – malvarmas la unua monato la frostohava januaro kaj krome ĝi estas ankaŭ venta, kaj kota pro la malsekeco. Bela estas la monato majo, ĝi estas varma kaj sunbrila.

– Fileto mia, – respondis la maljuna sinjorino – se ne estus pluvo kaj malvarmo, eĉ en majo ne estus floro, nek legomoj nek fruktaĵoj. Kiun klarigon vi komprenos pli bone? Ĉiu monato estas bona monato, ĉiu havas sian tempon. La fraŭloj bonkore ridetis al la sinjorino.

– Diru, onjo! – la fraŭloj petis ŝin poste – ĉu vi havas duoblapoŝan eluzitan sakon pendigeblan al ŝultroj?

Montris la sinjorino sian sakon, en kiu ŝi kolektadis la branĉetojn. Prenis la fraŭloj la sakon kaj plenigis ĝin per ormoneroj kaj pliigis la enhavon per la beno. Ĝoje reiris la sinjorino, ĉar ŝi havos ĉiun bonaĵon por la vintro. Ŝi ne devos plu suferadi kaj penadi pro la mankhavoj kaj lukti pri malsatego. La onjo havis sinjorin-fratinon, la kompatindulino vivis same malriĉe. Foje ekvidis ĉi tiu sinjorino, ke ŝia pli aĝa fratino vivas abundhavante, ormoneroj tintas en la poŝo. Ŝi vizitis tiun iutage kaj demandis:

– Kara mia fratino, kiel vi akiris la bonhavan, kie vi akiris la tintantajn ormonerojn?

La pli aĝa fratino, al la pli juna, rakontis pri sia renkontiĝo kun la dek du fraŭloj, de kiuj ŝi ricevis ĉi tiun grandan benon. Ekvibris la okuloj de la sinjorino. Ŝi rapidis hejmen al sia dometo, elprenis sian plej grandan sakon kaj sekvatage ekiris kun ĝi en la arbaron, por ke ankaŭ ŝi prenetu lignaĵojn kaj eble ankaŭ ion alian kolektu. Ŝi same retrovis la paŝtistan dometon. Kvankam la pluvo ne falis, ŝi tamen malfermis la pordon, enpaŝis la ĉambron kaj salutis tiujn dek du fortikajn fraŭlojn.

– De kie alvenis vi al ni? – la fraŭloj ŝin demandis.

– Mi kolektas branĉojn, vergojn – respondis la sinjorino, – ĉar proksimiĝas la malbonfara malvarma vintro, neĝo – respondis la sinjorino. – Bone estus, se ili tenus sin flanke.

– Kiun monaton vi ŝatas pleje? – demandis ŝin la dek du.

– Eĉ unu el ili mi ne ŝatas – diris la sinjorino tre moroze. – Ĉiuj estas malbonaj de la unua ĝis la lasta, senescepte. Kiun mi favoru? Ĉu mi ŝatu Februaron la laman? Aŭ ĉu mi simpatiu kapricojn de Marto?

– Ĉu la pliajn? Ĉu la somerajn monatojn vi ne ŝatas? – demandis ŝin la sinjoridoj.

– Ili plenas per seka varmego, la diablo frapetu ilin! – grumbladis la maliculino.

La dek du fraŭloj rigardis unu al la alia, poste unu el ili demandis la sinjorinon:

– Ĉu vi havas duoblan poŝan eluzitan sakon pendigeblan al la ŝultroj?

Ŝia koro forte ekbatis kaj plena de ĝojo ŝi montris sian grandan sakon.

– Donu la sakon ĉi tien – petis la fraŭloj – kaj lasu, ke ni plenigu ĝin ĝis tutpleno.

La fraŭloj alprenis la sakon kaj plenigis per io. Eĉ la sinjorino ne rimarkis, per kio estas la sako plenigita. Post ĝia redono, la fraŭloj atentigis la sinjorinon:

– Se vi atingos vian hejmon per ĝi, fermu viajn pordon, fenestron, poste malfermu vian sakon.

Rapidegis la sinjorino, ĝis sia dometo ŝi ne haltis. Kaj kiam pordo, fenestro estis bone fermitaj, ĉiuj fendoj estis baritaj, poste ŝi malfermis sian duobla-poŝan grandan sakon.

– Ho, ve mia kreanto! – teruriĝis la oron-soifanima sinjorino. La sako plenplenis de venenaj serpentoj.

Ŝia galopleno, malbona lango, malbeno kaj malica animo estis la kaŭzoj de ŝia pereco.

Akva nimfo Nereida

Vivis iam iu reĝo kaj lia fileto. Kiam la infano estis je la aĝo por lerni de sia instruisto, la patro farigis al la fileto vitroĉambron por lerni kaj vivi en ĝi kune kun sia instruisto, pasigi la tempon per scioakiroj. Kiam la infano sciis jam konvenanivele, la patro sendis al li viandon kaj oston. La reĝideto estis surprizita, ja li aŭdis jam pri tiuj, sed ne vidis ilin. Kiam li ludadis per la ostoj, li ĵetadis ĝin, li rompis per ĝi unu vitrotabulon kaj neatendite li ekrigardis la antaŭ li estantajn fenomenojn: ĉielon, montojn, kampojn, riverojn kaj ĉiujn aliajn partojn de la vasta mondo. De sopiro instigate li diris al la instruisto:

– Konduku min el ĉi tiu vitroĉambrego, por disrigardi ankaŭ ekstere.

Lia instruisto repondis, ke li povos fari tion nur kun la permeso de lia patro. Post lia lasta vorto malfermis pardonon la patro. Petegis lin lia filo, ke li ŝatus jam vidi ankaŭ la eksteran mondon.

– Bone, mi ne kontraŭas, sed poste vi ne bedaŭru.

Ekiris la reĝido kaj vizitis la najbarajn reĝojn unu post alia. Ĉe iu ĝuste tiam okazis ĉaso. Oni akompanis ankaŭ la fraŭleton, por ke ĉasu ankaŭ li kelkajn sovaĝbestojn. Ĉar li tre ekŝatis ĉasi, li pasigis tempon en arbaro dum la sekvaj tagoj. Li iris aŭ kun ia ĉashundo aŭ li iris sen ĝi. Iutage eĉ unu besto ne iris al lia vojo. Iu a r a b o venis kontraŭ li en la vojo, tiun demandis li, kie pasigas tempon la sovaĝbestoj.

– Iru supren al la granda kampo, – respondis la a r a b o.

– Kiel mi povos iri tien? – li demandis la a r a b o n.

– Mi metos vin en ledon de bubalo, la korakoj rimarkos ĝin, kaptos kaj flugos supren kun vi tien, – klarigis la a r a b o.

– Kaj reen kiel mi venos? – demandis la reĝido.

– Vi vidos ŝtuparon post la monto, sur ĝi vi povos reveni, – la arabo diris al li.

La reĝido decidis por ĉi tiu aventuro. Li vindigis sin en ledon de bubalo kaj la baldaŭ aperantaj grekoj kaptis kaj ekflugis kun li al la monto. Li atingis grandan kampon, sed nenie estis videbla sovaĝbesto nek iu ajn vivulo. Subkriis la fraŭlo al la a r a b o demandante, kiel li revenu, ĉar li vidas nek sovaĝbeston nek ŝtuparon.

– Deĵetu kelkajn ŝtonerojn kaj mi portos malsupren vin de la monto – rekriis la a r a b o.

Dum la fraŭlo deĵetis el ĝi grandan amason, la a r a b o kolektis kaj enpoŝigis ilin, poste forkuris. Diamantoj estis tiuj ŝtoneroj, kiujn volis havi la arabo. Tiu helpis la reĝidon por akiri ilin, sed helpi lin, tiu ne inklinis. La kompatinda restis tie tute sola. La fraŭlo manĝis herbaĵon, maĉadis radikojn, kuris dekstren kaj maldekstren serĉante ian solvon. Foje, foje li sidiĝis por ripozi kaj pensadi pri sia sorto. Iufoje li rimarkis surtere ŝtontabulon. Li levis ĝin tre malfacile. Dio mia! Ŝtuparo kondukis sub ĝi malsupren. Li ekiris, poste pasis unu tago, du tagoj, kaj ne finiĝis la ŝtupoj. Nur dum la tria tago posttagmeze li ekvidis kaj ĉielon kaj teron kun granda palaco. La reĝido rapidis al la palaco espere, ke li trovos ian manĝaĵon tie. Atingantan en la proksimo de la palaco, li rimarkis katenitan maljunulon havantan barbon atingantan ĝis genuoj.

– Donu iom da manĝaĵo – estis la unua vorto de la reĝido.

– Unue malligu min, mi estas ĉenita al ŝtono – petis la maljuna homo.

– Mia forto ne sufiĉas – suspiris la reĝido – mi preskaŭ pereas pro malsato.

– Malfermu do ĉi tiun ŝranketon, – montris la maljunulo al iu malgranda ŝranko – kaj elprenu el ĝi branĉeton. Se vi svingbato per ĝi, vi povos manĝi ĝis foriĝo de via malsato.

Malfermis la fraŭlo la ŝranketon, elprenis la branĉeton, kaj kiam li svingbatis nur unufojon, pleniĝis antaŭ li la tablo per multegaj diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Li liberigis la

maljunulon, poste lavis, vestis lin kaj de tiam ili vivis pace, en senaga trankvilo. Iutage la maljunulo alrigardas la junulon kaj demandis:

– Kio vin afliktas mia fileto? Kial vi estas tristmiena?

– Mi enuas, – respondis la fraŭlo. – krome, mi ŝatus hejmeniri.

La maljunulo transdonis al li ŝlosilfaskon, por ke li iru kaj rigardu ĉion en la palaco:

– Trairu ĉi tiun palacon, malfermu per la ŝlosiloj ĝiajn ĉambrojn. Nur la plej lastan ne tuŝu, vi malfermu ĝin tute ne.

Duope ili rigardis ĉion, sed kiam ili alvenis al la lasta ĉambro, la reĝido obstine persistis, ke li volas vidi ankaŭ tion, li volas malfermi ĝin.

– Vi povos malfermi, – la maljunulo atentigis lin, – sed n e r e i d i n o j (maraj nimfoj) iras tien kaj ili povus pereigi vin.

– Iel tamen estos, – respondis spite la fraŭlo.

– Bone – diris la maljunulo, – sed atentu mian vorton. Per akvo plenplena baseno estas en la ĉambro.

Unu post alia venos la nereidoj, ili malvestos sin kaj enbaseniĝos. Se vi povos alpreni la veston almenaŭ de unu, kaj vi povos kaŝiri kun ĝi, vi estos sendamaĝa de ili. Tiel agis la fraŭlo, kiel proponis la maljunulo. Post la pordofermo li kaŝis sin malantaŭ kolono, de tie li gvatis al la okazontaĵoj. Unue la plej aĝa feino alvenis danĉpaŝe. De ŝi ektimis la reĝido. Li kuraĝis eĉ ne proksimiĝi al ŝi. Poste venis la dua, la tria, fine la plej juna kaj plej bela n e r e i d i n o. Li kaptis ŝian veston kaj jam volis kaŝiri kun ĝi, kiam la malgranda nimfo rimarkis lin kaj ekpetegis tiel:

– Ja mi estas via, redonu mian veston.

– Mi, ne – respondis la reĝido.

– Lasu min preni nur la randon – petegis ŝi al la fraŭlo kaj jam provis repreni sian veston.

Sed la fraŭlo estis atentema. Rimarkinte la provon li batis proksimume tiel al la mano de la nimfo, ke ŝi tuj elfaligis la vestorandon el la mano. Anstataŭ tio li kaptis talie la fraŭlineton kaj elrapidis kun ŝi el la ĉambro. Antaŭ la ĉambro atendis lin la maljunulo.

– Avĉjo – diris al li la reĝido – mi volas iri hejmen al miaj karaj gepatroj. Bone estus havi ĉevalon. Ĉu vi donus ĉevalon sub nin?

– La stalo estas tie – respondis la maljunulo – nur enkriu: „d u r i, d u r i ĉevaleto, al la gepatroj mi iros.”

Ekkriis la reĝido, nu neatendite elsaltis flugila ĉevalo tra la pordo. Tuj sursaltis ĝin la fraŭlo, apud li sur la ĉevalpugo sidis la nimfo n e r e i d a kaj ili tiel forgalopis, kiel la kuranta vento. Ili ne haltis, ĝis ili eksentis malsaton. Sub iu arbo ili ekripozis. sed kiam ili sidiĝis por manĝadi, antaŭ ili aperis d e r v i ŝ o. Li estis frato de la n e r e i d i n o. Bonvenigis lin la reĝido, regalis lin per manĝaĵoj, trinkaĵoj. Sed la d e r v i ŝ o rigardis lin certe kaŝindike, ĉar li turnadis siamane iun bastoneton.

– Kion scias tiu ĉi bastoneto? – demandis tiun la reĝido.

– Tion, ke kiufoje mi ordonas ĝin: v u r bastono mia, ĝi tuj mortbato vin – respondis la d e r v i ŝ o.

Nu li volis tuj ordoni ĝin, sed liajn ordonvortojn la reĝido antaŭis kaptante la bastoneton, li diris: „vur bastoneto mia” kaj li mortbatis per ĝi la derviŝon. Eĉ unu vorton ne diris la nimfo nereida, nur klinis la kapon. Poste ili surĉevaliĝis denove kaj per la vortoj: „d u r i, d u r i ĉevaleto”, ili forgalopas rapide kiel vento. Kiam ili denove sentis malsaton kaj denove haltinte sidiĝis sub arbo, d e r v i ŝ o vidiĝis antaŭ ili. Ĉi tiu estis la dua frato de la nimfo. La reĝido bonvenigis ankaŭ lin, li prezentis al tiu bongustaĵojn manĝi kaj drinki. Sed la okuloj de la derviŝo fulmlumis malhele, dum li turnadis iun felĉapon enmane kaj ŝajnis, kvazaŭ li hezitas ĉu li surkapigu ĝin aŭ ĉu ne.

– En kio spertas via kampanula pinta felĉapo? – demandis lin la reĝido.

– Kiufoje mi surkapigas ĝin, mi iĝas nevidebla, – respondis la derviŝo.

– V u r bastoneto mia! – kriis la fraŭlo kaj mortbatis la d e r v i ŝ o n per ĝi.

Poste li alprenis la kampanulan pintan felĉapon kaj metis flanken al la bastono. Nereida nimfo denove diris nenion, sed ŝi klinis la kapon pli profunden. Nu ili surĉevaliĝis denove al laflugila ĉevalo, kaj de tiam ili flugis jam rapidege ĝis atingo de la hejmo de la reĝido. Ho, granda ĝojo ekokazis en la reĝa palaco, kaj kortego. La homoj admiris la fraŭlon, sed plie la belecon de la fraŭlino. Ankaŭ la geedziĝon oni estus tenintaj, se la fraŭlino ne estus obstine persistinta.

– Mi estos via edzino nur tiam, – ŝi diris al la reĝido, – se vi redonos mian veston.

La reĝido ne redonis ĝin, ĉar la redono povus esti egala al la perdo de la nereidino. Prefere li portis ĝin al lia patrino, ke ŝi bone kaŝu la fraŭlinetan veston, kaj ŝi zorgu ne reposedi ĝin iamaniere al la fraŭlino. Sed, la nereidino estis tre ruza, ĉar foje per artifiko foje per belaj vortoj ŝi petis, petegis la veston, ĝis fine ĝin ŝi ricevis de la patrino de la reĝido. Tiam, ŝi tuj survestis sin kaj diris al la reĝidino:

– Mi estas ne edziniginda por filo via, ja mi estas nimfo n e r e i d a. Post tiuj vortoj ŝi malaperis fulmrapide, kvazaŭ ŝi neniam estus tie.

Ej, la kompatinda reĝido sciiĝinte pri la okazintaĵo ege malgajiĝis. Li kaptis al io kaj ĉio, li kuris tien, reen ĉie serĉanta ŝin, dum li ploregis. Sekvatage surĉevaliĝinte surkape per la kampanula pinta felĉapo enmane kun la bastoneto li ekvojiris al la lando de n e r e i d o j. Li alvenis ĝuste tiam, kiam la reĝo: la patro de n e r e i d o j pretigis sin por milito. Al ĉiuj ĉielaj direktoj de la lando, heroldoj iris laŭte kriadante la mesaĝon pri prepariĝo de milito. Tiel sonis la mesaĝo de la reĝo: „Kiu venkos la malamikon, kun tiu mi edzinigos mian filinon; miraklofaran nimfon n e r e i d a n.” La reĝido decidis tuj pri la militira partopreno por gajni la manojn de la nereidino. Li denove abrupte eksaltis sur sian ĉevalon, li enmanigis la bastoneton, la felĉapon li surkapigis. Li vidis ĉiun, nur lin vidis neniu. Li saltis al la mezo de la malamika armeo kaj tian pereigon li faris, ke se unu homo ne multas, tamen eĉ unu homo ne restis vivinta. Poste li iris antaŭ la reĝon, por fari anoncon pri la fino de la milito.

– Jen, ĉi tie estas mia filinaro – diris la reĝo de n e r e i d o j – vi povas elekti el ili, eble la plej aĝan.

– Mi volas nur la plej malgrandan, la plej junan – respondis la reĝido.

Dum la diro de liaj lastaj vortoj jam kuris al li la plej juna, la plej bela; trabrakumis, kisis kaj jene alparolis lin:

– Per saĝeco, lerteco, heroeco vi gajnis min. La fianĉoparo rerapidis al la palaco kaj aranĝis sian tiome grandan faman geedziĝon, ke ĝia famo restis ankoraŭ por ĉe jarcentoj. Ĉiuj vivantoj estis tie, eĉ pli. El idoj de la N e r e i d o j⁹ estiĝis famaj maristoj.

⁹ La Nereid-oj (Νηρηίδες, aŭ Νηρηίδες néreids, Νηρηίδες) estas maraj nimfoj de la greka mitologio. La 50 maraj nimfoj estas la bluaj okulaj filinoj de la mardio Nereus kaj lia edzino Doris, la helpantaj diinoj de la maristoj, la nimfoj multe helpis ankaŭ Pozidonon:– Bv vidi: <https://www.theoi.com/Pontios/Nereides.html>

Patrino de Maro, Filino de Maro

Sola vivis la iama maljunulo. Sur la marsablo staris lia kaduka malgranda domo unufenestra, unuporda. Ŝuisto estis li. Kiam li havis laboraĵon, li flikadis, se li ne havis farendaĵon li enuis. Kion li faris foje en enuo? Li aĉetis farunaĵon en la butiko kaj knedis el ĝi paston, poste li dividis ĝin al tri partoj. Ĝis tiam li formis, knedis tiujn pecojn, ĝis iĝis el ili tri knabino-pupoj. Poste li vestis la pupetojn kaj dorlotadis ilin, kvazaŭ ili estus vivantaj. Unu havis ruĝecan veston, la alia bluan, la tria pupo blankakoloran veston. Granda flora poto staris ĉefenestre, pro ĝia vido li plezuris ĉiumatene. Ocimo floris en ĝi. Tio kaj liaj tri pupetoj donis al la ŝuisto ĉiumatene plezuron. Iumatene, antaŭ ol li ekiris por fini aferojn atendajn kaj farendajn, li elprenis la blankan vestan pupon, kaj alsidigis ĝin al la fenestro apud la floron, kaj diris al ĝi:

– Filino mia, blankavesta, el pasto knedita mia pupeto, dum mia foresto por fini mian aferonarendan, sidu bele silente kaj plezuru pri la piedirantoj. Ne ĵetu kaŝrigardon al fraŭlo, eĉ nur ne aŭdu dolĉe ĝlatan, logan vorton.

La ŝuisto malfermis la pordon kaj foriris. Sidis la knabina pupeto en la fenestro, en la ombro de la ocimo. Antaŭ ĝi pasis multaj homoj, kaj jen, ankaŭ la reĝido iris tiuvoje. Li ekrigardis la fraŭlineton, la blankvestan knabinpupon kaj li ne povis forpreni la okulojn de ĝi.

– Kiel plaĉa, ekdezirinda vi estas! – diris al ĝi la reĝido.

Rigardis la pupo, gapadis, kvazaŭ ŝi ne komprenus la vortojn de la fraŭlo.

– Donu koron vian pro mia, eĉ kison vi ricevos de alia kiso! – diris la reĝido. Sed kiel ajn la fraŭlo petis kaj petegis, eĉ unu vorton ne parolis la fraŭlineto. Koleriĝis la reĝido, li deŝiris unu burĝonon de la ocimo kaj elpoŝiginte kelkajn ormonerojn ĵetis tien en la antaŭtukon de la knabineto. La ŝuisto venis vesperkrepuske hejmen. Lia unua rigardo falis al lia pupeto. Kiam li rimarkis la lokon de la burĝono kaj ekvidis la orajn monerojn, li tiregis la pupon malsupren el la fenestro, kaj li batis ĝin trae kaj tree, poste la pupo-pecojn li ĵetis en keston.

– Diablida malbelaĉulino! – kriis la ŝuisto, la keston li fermis, la orajn monerojn li elmetis, la fenestron fermis kaj iris dormi.

Alitage post vekigo li alprenis alian pupon, la bluavestan, li alsidigis tiun al la fenestro al la ombro de la ocimo. Li alparolis ĝin jene:

– Mia knabinpupo bluvesta, sidu silente en la fenestro en la ombro de la ocimo. Ne ĵetu kaŝrigardon al fraŭlo, eĉ nur ne aŭdu logan vorton.

Li fermis la pordon kaj foriris por aranĝi siajn aferojn atendajn kaj farendajn. Se la pupo povus vidi, ĝi estus certe rigardinta la reĝidon. Tie staris la fraŭleto antaŭ la fenestro kaj jene petegis la pupeton:

– La blankeco de via blanka vesto, la ĉiela blueco de via blua vesto, donu manon vian, vi estos edzino de reĝo.

Rigardis la pupo, gapadis, eĉ unu vorton ĝi ne komprenis el la parolo. La reĝido denove koleriĝis, li deŝiris unu burĝonon de la ocimo, ĵetis kelkajn ormonerojn al la antaŭtuko de la pupeto kaj reiris al sia palaco. La kompatinda junulo pezakore atingis la hejmon. Jam vespero estis je la alveno hejmen de la ŝuisto. Lia unua rigardo falis al la ĉefenestre sidanta pupo.

Kiam li ekvidis la malaperintan novan burĝonon kaj la orajn monerojn, ekbolis en li la kolerego. Li tiom batis la bluvestan pupon, ke ĝi restis enmane nur en rompitaĵoj, ja el ĝi neniom restis sendifekta.

– Diablida malbelaĉulino! – kriis la ŝuisto, li enkestigis la pecojn de la pupo al la aliaj, fermis la fenestron, li enkestigis la orajn monerojn, kaj iris dormi. Post la vekigo alitage li elprenis la trian pupon la ruĝecvestan kaj ĝin sidigis al la fenestro en la ombro de la ocimo, kaj atentigon diris:

– Mia ruĝvesta filineto, el pasto knedita pupeto, sidiĝu apud la floro, rigardadu la mondon. Sed al fraŭlo ne kaŝrigardu, logan vorton eĉ ne aŭdu. Poste li fermis pardon kaj iris aranĝi la farendajn aferojn. Se la pupeto estus povinta vidi, ĝi certe estus rigardinta la reĝidon alitage matene. Li denove staris tie antaŭ la fenestro kaj lia rigardo spegulis plenan sopiron. Mallaŭte li ekparolis, liaj lipoj ek-ektremitis:

– En blanka, poste en blua vesto vi estis, miajn petajn vortojn vi ne akceptis, via ruĝa vesto estas zenito, mia koro estas enflamiĝanta.

Sed kiel ajn li plorpetis ĝin, la pupeto parolis eĉ ne unu vorton. La reĝido tute malĝojiĝis, fine li denove deŝiris unu burĝonon de la ocimo, denove li elpoŝigante elprenis kelkajn orajn monerojn kaj ĵetis ilin al la antaŭtuko de la pupeto kaj ŝanceliĝante li ekiris hejmen. Apenaŭ vesperiĝis, la ŝuisto estis jam hejme.

– Vi, la tria diablida malbelaĉulino! – kriis li, kiam li rimarkis la estintan lokon de la nova malaperinta burĝono kaj la orajn monerojn.

Li rompis la pupon tiom, ke ĝi enskatoliĝis nur el peco diserigite, en mil pecoj. Poste li fermis la skatolon kaj la fenestron decidinte, ke li malfermos ilin neniam plu. Aliatage la reĝido estis denove tie. Kiam li alrigardis la fenestron kaj vidis, ke nek floro nek knabino estas tie, li tiom paliĝis, ekŝanceliĝis, ke tre malsana li povis atingi la hejmon en la palaco. Vane penis la multaj kuracistoj, pastroj, eĉ ne unu povis resanigi lin. Longe ekzamenis lin per rigardo iu maljuna pastro glatiginta permane la barbon kaj poste alparolis la reĝon:

– Via Reĝa Moŝto, apelaciu al la prudento de via malsana filo, ĉar sekretan malĝojon havas li, kaj eble vi povos helpi lin.

La reĝo vizitis sian filon kaj ĝis tiam li parolis kaj petegis sian filon, ĝis tiu malkovris la koron:

– Reĝpatro mia, – komencis li larmante, – ŝi surmetis blankan veston en la unua tago, bluan koloran veston ŝi metis sur sin al la dua tago, triatage ŝi estis en ruĝa kolora vesto en la ombro de ocimo, ĉe fenestro de malgranda dometo. Aŭ ŝi estos mia edzino aŭ cindriĝos mia vivo.

– Ej, kie ŝi estas? Kie mi serĉu ŝin? – demandis lin lia patrosinjoro.

– Apud la maro sur la sablo estas ŝi en kaduka dometo – ĝemetis la reĝido.

La reĝo forsendis siajn servistojn, kiuj serĉis, esploris la restadejon, ĝis fine ili trovis la maljunan ŝuiston.

– Tuj al la reĝo, – diris ili al li, – li havas priparolindaĵon kun vi – diris ili al li.

Ektimis la maljunulo kaj paliĝante, kliniĝante paŝis antaŭ la vizaĝon de la reĝo.

– Avo, – diris al li la reĝo – tuj portu ĉi tien vian filineton, ŝin portu en mian palacon!

Ĝemete balbutis la ŝuisto, ke li havas filinon nenian, sed draste alkriis lin la reĝo kaj jene voĉis lia alvoka ordono:

– Vi aŭ portos vian infanon ĉi tien, aŭ mi tretos vian animon. Malgaje elvenis la maljunulo el la palaco kaj daŭre li turmentiĝis, kian filinon ili petas de li. Pro sia malgajeco kaj timo li erarvage perdis la vojon kahj eniris arbaron. Kiam li vagis en ĝia densejo, neatendite iu sinjorino alpaŝis antaŭ lin:

– Kial vi erarvagas, kion vi serĉas? – demandis ŝi la malriĉan homon.

– Mia vivo perdiĝis, mi serĉas mian morton. – respondis la pacema ŝuisto.

– Ej, do diru al mi, kio damaĝas vin, kio mankas al vi? – instigis lin la sinjorino.

– Filinon mian petis de mi la reĝo – plendis la ŝuisto – sed de kie mi elprenu, se mi neniam havis filinon?

La sinjorino elprenis branĉeton kaj transdonis ĝin al la maljuna ŝuisto, dirante:

– Reiru al la maro kaj frapu unu fojon al ĝi per ĉi tiu vergo. Al malgranda ondo forte alkriu, sed pri granda ondo ne prizorgu. Kiam antaŭ vi elakviĝos sinjorino de Maro, de tiu vi petu fraŭlinon.

La maljunulo reiris al la maro, kaj klam li frapis sur la maran akvon per la vergo, silenta, malrapide ruliĝanta ondeto aperis renkonte al li.

– Saluton, Patrino de Maro! – kriis la maljunulo.

– Kion vi deziras? – demandis lin iu malalta voĉo el la maro.

– La reĝo volas vidi vian filinon, fianĉino estas bezonata al lia filo – respondis la maljunulo per tremeta voĉo.

– Atendu tri tagojn – sonis la voĉo de la Patrino de la Maro – dum mi pretigos ŝiajn aĵojn. En sia, kun juveloj dekorita, ornamita vesto ŝi iru en la palacon.

Rapidis la maljunulo en la palacon per la bona informo kaj ĝoje li mesaĝis al la reĝo, ke post tri tagoj en la palaco estos lia filino. Kvazaŭ ŝtono falus de la koro de la reĝo. Li sendis la armitajn servistojn al la maljunulo, tiuj akompanu la filinon. La maljunulo ricevis tiom da donacoj, ke eĉ nombri ilin malfacilis. Ĝuste apud la maro sunbaniĝis la maljunulo, kiam pasis la tria tago. Neatendite disiĝis la maro kaj fraŭlineto elpaŝis el ĝi. Ŝia voĉo estis tondrado, ŝia rigardo estis ĉielfajro, rozo estis ŝia rideto, birdotrilo estis ŝia ridego.

Ĉielo kaj stelo videblis sur ŝia ŝaŭma vesto, kampa floro sur ŝia mallonga veŝto, ŝia pelta jaketo marmaniere luliĝis, ŝia vualo aspektis kiel ŝipo naĝanta. Sablero kiel perlo, la mitulo kiel diamanta-fingroringo, sur ŝiaj brovoj korako-plumoj (ili estis tiome nigraj). Ŝi kuris al la maljunulo kaj nomis lin: patro mia. La ŝuisto prenis la manon de la fraŭlino, post ili ekiris la multaj armituloj, tiel ili ekiris en la palacon. Aliulojn preskaŭ blindigis ŝia beleco, la okuloj de la reĝido blindumiĝis. Kaj kvazaŭ li vidus la fenestran fraŭlinon. Ŝi aspektis kvazaŭ la trikolorvesta fraŭlino estus staranta antaŭ li. Li prenis manon ŝian, sidigis ŝin, per afablaj vortoj dorlotis ŝin, sed ŝi parolis eĉ ne unu vorton. Li regalis ŝin per manĝaĵoj, trinkaĵoj; sed la fraŭlino ne ekvoĉis.

– Vi estas la pupilo de miaj okuloj, ekvoĉu jam karegulino, – petegis la reĝido kaj lia senesperigo estis granda, ĉar silentis la elektito de lia koro.

Senespere iris la reĝido en la korton por mildigi sian kordoloron. Je tio de sia seĝo sursaltis la fraŭlineto kaj ordonis al siaj servistinoj fari tuj ardaĵon, porti bakujon, porti kruĉon da freŝa oleo. Oni rapide plenumis la ordonojn, ili portis ĉion kaj post kelkaj minutoj la fraŭlino verŝis la oleon en la bakpladon por boligi ĝin, poste ŝi mergis en ĝin sian mankavon, el kio estiĝis fiŝoj en la oleo. Kiam la reĝido revenis, la fritujo estis plenplena de ruĝo viandaj frititaj fiŝoj kaj oni baldaŭ surtabligis ilin por la reĝido. La fiŝoj brilis kiel oro.

– Kiu fritis ĉi tiujn fiŝojn? – li demandis.

– Via fianĉino – respondis la servistinoj.

Ĝojegis la reĝido, sed ili vane vivis duope, ĉar la fraŭlino ne parolis. Poste iufoje, kiam li iris ripozi, lia kuseno estis ĝuste apud la fenestro. Kiam li klinis la kapon al la kuseno, ĉe la fenestro aperis la tri pupetoj de la marapuda dometo. Ruĝvestita estis unu, la alia bluvesta, la tria havis blankan veston. Ili kontraŭdiris unu al alia babilante daŭre, eĉ replikis unu al alia.

– Kie estas miaj ŝuoj? – demandis unu. – Kie estas mia poŝtuko? – demandis la dua. – Kie estas mia jupo? – demandis la tria.

Vekiĝinte abrupte la reĝido rimarkis la pupojn, sed li ne montris sian vekan staton, ke li aŭdas ilin:

– Ho ve, kiel stranga estas la reĝido – la unua pupo komencis babiladi denove.

– Kial strangas li? – demandis la dua.

– Tial, ĉar li ne povas ekparoligi nian damon – respondis la tria.


– Do, kiel li faru? – scivolemis denove la unua.

– Tiel, – respondis la dua, – ke li demandu ŝin pri la patro de la fraŭlino; pri la brilega S u n o, kaj pri la patrino; pri la P a t r i n o d e M a r o – diris la tria.

Post tiuj sciigoj ili tuj malaperis, kvazaŭ la tero ilin englutis. Kiam sekvamatene vekigis la reĝido, li rapidis al sia fianĉino por saluti ŝin:

- Kiel fartas via patro; la brilega Suno? – la reĝido demandis.
- Supre surĉiele li sidas brilegante – respondis la fraŭlineto ĝojege.
- Kiel fartas via patrino, la Patrino de Maro? – la fraŭlo demandis denove.
- Malsupre en mola sino de marakvo estas ŝi – kriis la fraŭlino.

Ili kunbrakumis kunkisadis unu la alian kaj geedziĝis, poste vivis en feliĉo daŭranta ĝis la morto.



Strato de tomboj en Ateno

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=67441>

La majstro-ŝtelisto

La iamaj fratoj konsistis el du membroj; unu frato estis malriĉa, la alia riĉa. La malriĉa havis tri infanojn, eĉ ne unu infanon havis la riĉa. La riĉa volis helpi la malriĉan, pro tio li diris al sia pli juna frato, ke tiu donu al li sian filon, kaj li edukos tiun infanon al homo inventema, eltrovema, kiu ne ektimos de la propra ombro. La malriĉulo sendis sian plej aĝan filon. La riĉa frato kun la junulo iris al montosupro, kie la onklo demandis la knabon:

- Nu, infano kara, kion ni faru nun?
- Ŝtonojn ni rulu de tie – respondis la junulo – per tio ni povos pasigi nian tempon.
- Ĉu vi ne povus fari ion alian? – demandis denove la onklo.

Silentis la junulo, li ne sciis kion respondi. Poste ili malsuprenvenis de la monto kaj la riĉulo sendis hejmen la junulon petante alian filon de la malriĉulo, notinte, ke tiu eble estos pli bona, ol estis ĉi tiu. La frato nun sendis sian mezan filon. La pli aĝa frato trompiĝis pri la kapabloj ankaŭ ĉe tiu knabo, kiel kaze de la unua, do li sendis ankaŭ tiun hejmen. De nun la vicsekva estis la tria. La onklo portis lin ne al la monto, sed li kondukis tiun en ĉambron, kie de sur la trabo pli frue li pendigis krakenon. Post la sursidigo de la knabo li foriris kaj fermis la pordon. Pasis horoj kaj li ne revenis, sed la knabo malsatiĝis. En la ĉambro ĉirkaŭrigardante, la knabo rimarkis la trabon kun la krakeno. Li konstatis, ke la krakeno estas tro alte por atingi permane, sed la surplanke kuŝanta kanopeco povus esti bona ilo por atingi ĝin. Kanopeco surplanke kaj surtable, la glaso da akvo povus helpi lin, pensis li. Por solvi la soifon, li prenis la kanopecon, suĉis en ĝin akvon, poste blovis ĝin al la krakeno. Ĉar la akvopafaĵo moligis la krakenon, kaj, sekve de tio, ĝi subfalis, la knabo manĝis ĝin kaj tiel atendis plu la revenon de la onklo. La maljunulo alvenis post nelonge:

- Kiel pasas via tempo, fileto mia? – la maljunulo demandis lin.
- Dankon, sufiĉe bone – la knabo respondis.
- Ĉu vi ne malsatis? – la maljunulo informpetis.
- Sed, ja jes! – la filo respondis – sed mi blovis la krakenon mola kaj mi satmanĝis provizore per ĝi.

La fraŭleto ekplaĉis al la maljunulo. – „El li estos lerta homo” – li pensis. Kiel la pli fruajn du knabojn, ankaŭ ĉi tiun li kondukis supren al la monto kaj demandis ankaŭ lin:

- Nu, infano mia, kion ni devus fari nun? – li demandis la fraŭleton.
- Manĝaĵon ni ŝtelu kaj satiĝu per tiu – la knabo respondis.
- Kiel ni komencu? – la onklo demandis la infanon.
- Jen! Tie en la valo estas iu kampulo! – la knabo kriis. – Forŝteletu ni la ŝafidon de lia dorso!
- Sed ja tiu pene portas ĝin sur sia dorso! Ne estos facila afero. – la onklo notis.
- Mi iros antaŭ lin kaj agos por la ŝafid-afero, – la knabo diris – vi atentu la ŝafidon, kaj kiam ĝi jam ne estos surdorse, kaptu ĝin kaj kuru kun ĝi ĉi tien al la monto – proponis la knabo.

La knabo malsupreniris de la monto, kaj kiam li estis malsupre sur la vala vojo, unue sian unu ŝuon li lasis sur la vojo, kaj post kelkaj metroj ankaŭ la duan. Proksimiĝis dume la kamparano kaj ekvidante la unuan ŝuon, poste la alian pli malproksime, li tre ekĝojis. Li apenaŭ ĵetis rigardon al la unua, la ŝafidon ligis al arbo, poste kuregis al la posta ŝuo por alpreni unue ĝin. Nur tion atendis la junulo. Dum la kamparano rapidis post la dua ŝuo, la knabo alprenis la unuan ŝuon kaj ankaŭ mansignis al la onklo por forpreni la ŝafidon kaj kuri kun ĝi. La maljunulo ŝtelis la ŝafidon kaj forkuris kun ĝi. Ĉar la kampulo malfrue maltrovis la ŝafidon, senvole li lasis al la junulo repreni la unuan ŝuon. Poste surmonte ili fritis la ŝafidon kaj ĝue manĝegis el tiu dum kelkaj tagoj.

– Kaj nun, kion ni faru? – la maljuna onklo demandis iutage.

– Denove tie estas la kamparano en la valo! – kriis la knabo. – Sur lia dorso estas alia ŝafideto! Ankaŭ tiun ni forŝtelos de li!

– Sed kiel? – la onklo demandis.

– Tiel, kiel ni faris pli frue – la fraŭleto respondis.

– Denove malsupreniĝu de la monto kaj vi vidinte, ke la ŝafido estas ligita ien, kaptu ĝin kaj metu sur viajn ŝultrojn kaj kuru kun ĝi al la monto. La junulo rapidis malsupren al la valo, li kaŝiĝis ĉe la malantaŭo de la arbo, kaj komencis ŝafbleki: bee ... bee... tute simile al vera ŝafido.

– Mia perdiĝinta ŝafideto, – pensis la konata kamparano kaj la surdorse portatan kunligis, ke ĝi ne forkuru kaj rapidiris en la direkto de la arbo por sia alia ŝafideto.

Tre ĝoje li supozis, ke la perdita nun trovitis. La foriron de la posedanto atendis la onklo. Li kaptis la perŝnure ligitan ŝafideton kaj surŝultriginte ĝin li suprenkuris sur la monton. Ili rostis ankaŭ ĉi tiun ŝafideton kaj ĝue manĝegis el ĝi kelkajn tagojn.

– Ej, kion ni faru nun? – la maljunulo demandis pase de kelkaj tagoj.

– Ĉu vi vidas tie tiun terkulturiston? – la junulo demandis sian onklon. – Per du kaŝtritaj virbovoj li plugas sian teron, ni povus forŝteli unu beston el la du.

– Malfacile solvebla estos tio! – la onklo skrupulemis.

– Vi nur tenu vin ĉe mi – la knabo diris – la plia farenaĵo estas mia tasko.

Kiam ili malsupreniĝis de la monto, la fraŭleto haltis kaj komencis kriadi:

– Tian ĉi miraklon mi ne vidis en mia vivo! Tian ĉi miraklon mi ne vidis en mia vivo!

Ekaŭdis la mastro kaj stultakape li kredis, ke la knabo trovis ian trezoron. La mastro forlasis tie la virbovojn kaj kuris en tiu direkto, de kie li aŭdis la kriadon. Rimarkinte tion la fraŭlo mansignis al la onklo. La onklo kuregis al la virbovoj, li maljungis unu kaj rapidege pelis ĝin supren sur la montoflanko. Dume la mastro atingis la knabon kaj demandis: kio estas la miraklo, kion li ne vidis ĝis nun en sia vivo.

– Tio estas, – la fraŭleto respondis, – por plugi nur per unu kaŝtrita virbovo.

La mastro miregante rerapidis al sia plugkampoj kaj ŝokiĝinte rimarkis sian solan virbovon. Li serĉis ĝian parulon traserĉante la tutan arbaron, sed ĝi neniam aperis. La maljunulo kaj la fraŭleto bakis ĝin surmonte kaj ili ĝue manĝegis el ĝi dum unu-du semajnoj. Denove pasis la tempo, kaj iliaj manĝeviaĵoj por rostaĵoj elĉerpiĝis tute.

– Nu kaj? Kion ni faru nun, nevo mia? – demandis la maljunulo sian nevon.

– Do, nun ni faros gravan paŝon! – respondis la fraŭleto. – Ni senhavigos la reĝon de mono, ni priŝtelos la trezordomon de la reĝo.

Algapis la maljunulo la knabon, kvazaŭ li ne komprenus lian diron.

– Iun korbon akiru al mi – petis la knabo la maljunulon – krome unu ŝnuregon kaj du ferhokojn. Pri la pliaj mi zorgos.

Ili ekiris komence de la vespera krepusko kaj helpe de la hokoj kaj la ŝnurego ili eniĝis tra la domtegmento al la subtegmento, de tie en la trezorejon. Unue la knabo surgrimpis, li tiris supren sian onklon post si. Enirante en la trezorejon, sian korbon ili tutplenigis per oraj moneroj kaj arĝentaj kaj per pliaj grandvaloraĵoj. Dum tri noktoj ili vizitis la domon de la trezorejo kaj ili revenis neniam kun malplenaj korboj. Ĝuste dum la kvara tago okazis, ke la reĝo bezonis monon pro io. Li iris en la trezorejon kaj ĉirkaŭrigardinte surprizegiĝis. Granda Dio! La multaj kestoj malplenis! Neniom da mono restis, eĉ ne unu groŝo estis tie. La reganto postkriis la palacan gardistaron, li vokis siajn konsilantojn, korteganojn. Ili konsiladis, diskutadoj okazis, sed ne estis retrovitanta tiu multega mono. Unu el la konsilantoj, iu pli saĝa homo konsilis, bone estus pridemandi tiun faman ŝteliston, kiu estas enkarcerigita en la malliberejo. Tiu donu konsilon. Oni alkondukis la ŝteliston rakontinte al li la eventon. Li pensadis kaj jene parolis al la korteganoj:

– Fermu ĉiun fenestron kaj pordon. Poste rigardu, de kie la lumo envenas. Se vi scios jam, laŭ tio mi donos mian konsilon.

Kiam ili fermis ĉion, ili vidis, ke la lumo envenas en la ejon el la direkto de la subtegmento. Nu, ili rapidis al la ŝtelisto kaj diris al li la novaĵon.

– Boligu gudron – sonis la konsilo de la ŝtelisto, poste verŝu ĝin en kaldronegon kaj metu ĝin sub la fendon, tra kiu la lumo envenis.

Oni tuj plenumis la konsilon de la ŝtelisto. Ankoraŭ samnokte okazis, ke la fraŭleto kun la onklo denove vizitis la trezordomon. La fraŭleto sentante la odoraĉon de la gudro puŝis sian onklon antaŭ si, ke tiu iru unua. Nu la onklo falis en la gudron kaj en ĝi brulis lia peka korpo. La fraŭleto subsaltis en la trezorejon kun granda singardo. La detranĉitan kapon de la onklo portinte hejmen, li sciigis la onklinon pri la kazo:

– Damaĝo okazis, – li diris al la maljunulino, – sed vi ne ekploru iam ie iel, ĉar povus okazi pli granda malbono.

La korteganoj kun la reĝo iris sekvatage al la trezordomo por rigardi ĝin. Nu, la senkapa kadavro estis tie en la gudro. Ili demandis la karcerloĝanton, kie ili serĉu la kapon de la mortinto. La ŝtelisto konsilis al ili, ke la reĝaj servistoj pendigu la kadavron sur la foirplaco, kaj ili atentu la konduton de la piedirantoj pasantaj apud la kadavro. Ili atentu, kiu priploros tiun. La fraŭleto gapvadis ĉirkaŭ la foirplaco, li vidis la okazintaĵon. Li tuj iris hejmen kaj atentigis la onklinon: – Atentu, iel ne iru en la proksimecon de la foirplaco, ĉar tio povos facile naski plagon al vi, ja estas tie la kadavro de via edzo kaj vi povos nin impliki en malfeliĉon. Sed se vi ne povus regi vian senton, vi volos ĉiumaniere priplori lin por plifaciligi vian malĝojon, tiuokaze, onklino, agu jene: alprenu du argilajn laktuojn kun acida lakto, iru tien al la strato kaj krii, ke: Acidan lakton aĉetu! Acidan lakton aĉetu! Se vi volas vidi vian edzon ĉiumaniere, alproksimiĝu al li kaj dume faligu la du laktuojn por ke ili iĝu frakasitaj plene, pro kio la lakto tute disfluu. Oni pensos poste, vi priploras la laktuojn plenajn de acida lakto nun neniiginta. Oni pensos, ke Vi priploris vian malprofiton. Tiel agis la onklino. Dume alvenis la vespero kaj foriris la kaŝe starantoj por fari anoncon pri la sinjorino vendinta acidan lakton.

– Bedaŭrinde estas, ke vi ne kaptis ŝin, – kriis la malliberejloĝanto, – ĉi tiu sinjorino certe estis la edzino de la mortinto kaj ŝi priploris certe sian edzon.

La reĝo demandis la ŝteliston, kio estu la sekva farenaĵo. La ŝtelisto respondis post ioma medito:

– Kuŝigu la kadavron sur la tero kaj metu kelkajn manplenojn da oraj moneroj apuden. La kulpulo certe venos por tiuj kaj ne lasos orajn monerojn surtere. Sed la kaŝgardistoj rigardu centokule, ĉar la kulpulo estas rafinita.

Ankoraŭ samtage la kaŝservistoj kuŝigis la kadavron sur la teron kaj orajn monerojn enŝovis apuden. Sekvatage vagante la fraŭlo, en ĝia proksimo, vidis la orajn monerojn sur la tero kaj tion, ke infanoj ludas en ĝia proksimo. Li paŝis al iu infano kaj diris:

– Vi ricevos kelkajn piastrojn, se vi ludos kun mi globo-ludon.

La infano ekĝojis por la ricevotaj piastroj. Nia artifikulo faris nur tion, ke siajn ŝuoplandojn li ŝmiris per lignogluo. Nu ili komencis ludi, tien reen kurante post la ruliĝantaj globoj brue kaj petole saltadis, dum iu-iu ormonero ĉiam algluiĝis al unu aŭ alia plando lia. La multaj kaŝobservantoj vidis la du infanojn, sed ne zorgis pri ili. Ili estas infanoj, do ludu. Ili nur vespere rimarkis, kiam ili kunkalkulis la ormonerojn, ke el tiuj mankas multaj. Nu ili rapidis en la palacon por raporti pri la ludantaj infanoj al la reĝo, tiu al la ŝtelisto.

– Kial vi ne kaptis tiujn du infanojn? – kriis la ŝtelisto, – unu el ili estis la kulpulo!

La reĝo petis denove lian konsilon kion fari.

– Prenu dromedaron – sonis la nova konsilo – kaj metu sur ĝin multspecajn altvaloraĵojn, ĉion, kio estas multtekosta, fajna kaj tre valora aĵo. Certe anoncos sin la kulpulo, ĉar salivas lia buŝo al ĉio, kio estas grandvalora.

Alitage oni jam tie promenigis la dromedaron, foje sur la stratoj, foje en la bazaraj foiroj. Ankaŭ nia fraŭleto rimarkis ĝin. Li tuj rapidis hejmen, vestis sin kiel komercisto kaj reirinte al la strato, tie li komencis vendadi sian varon: sian vinon. Ĉiun glason da vino malmultekoste.

– Unu heleron kostas mia vino! Nur unu heleron! – li kriadis.

Li vendis sian vinon tiom malmultekoste, ke ĝia aromo baldaŭ disvastiĝis tiome, ke ankaŭ la dromedarpelistoj kune kun la kaŝrigardantoj laŭvice gustumis ĝin kaj sonis la diro:

– Nu, ankoraŭ kroman glason, kaj denove alian ili trinkis pro ĝia agrabla gusto, poste ankaŭ trian glason da vino ili trinketis nur gustumante. Ili gustumadis ĝis tuta ebriiĝo.

Apud vojrandoj ili kunfalis kaj fordormis nevekeble. Dume la dromedaro iris pelate de la infano vendinta pli frue la vinon. Baldaŭ ili atingis la domon de la onklino. Poste li elprenis razilon, kaj kiom da barboj, lipharoj kaj hararoj havis la multaj ebriuloj, per la razilo li forigis ĉiujn de la dormantoj. Eĉ pro la razilmanovroj ne vekigis la multaj ebriuloj. Finante sian agon malhonorigan, li rerapidis por trovi lokojn al la multaj multekostaĵoj kaj por buĉi la dromedaron. Li fritis ĝian grasajon. Per ĝi plenpleniĝis du grandaj ujoj. Post la vekigo de la dormintoj, la multaj kaŝobservantoj, dromedarpelistoj por sia malhonoro trenpaŝis al la korto de la palaco. Ilin ĉiujn malliberigis la reĝo kaj bastonbatigis. Denove oni bezonis la konsilon de la ŝtelisto.

– Dingu iun sinjorinon – sonis la konsilo – por ke, ŝi iru de domo al domo kaj petegu dromedargrason por celo de medikamentfaro. Tie estos la deliktulo, kie ŝi trovos dromedaran grason.

Sekvatage jam iradis, paŝadis la maljuna sinjorino serĉanta grasajon por esti bona por medikamento. Ŝi frapis la pordon ankaŭ ĉe la onklino de la knabo. Ŝi ricevis plenplenan poton da graso. Ekfulmis la okuloj de la maljuna sinjorino, kaj, ke poste ŝi ne mistrafu la ĝustan domon, ŝi mergis la manon en la graso kaj ŝmiris makulon sur la pordo per graso. Ĝuste tiam proksimiĝis hejmen la knabo kaj tuj ekvidis la grasmakulon.

– Onklinsinjorino mia! – kriis li, – malutile estis doni el tiu graso, damaĝo estos nun evoluanta. La knabo pensis iom, poste li elprenis plenan ujon da graso, kaj kiom da pordoj havis la vilaĝo li ŝmiris grasopecon sur ĉiuj. Dume la dungita sinjorino rapidis en la palacon por porti la bonan informon al la reĝo. Ankaŭ la reĝo kun kelkaj korteganoj ekiris post la sinjorino por vidi la kulpulon. Ja, ili devas trovi nur la grasmakulan pordon, la cetero estos jam aferoj de liaj armitoj.

– Ĉi tie estas la grasmakulo! – kriis iu. – Ankaŭ ĉi tie estas unu! – kriis alia homo. – Ankaŭ ĉi tie estas alia! Ankaŭ ĉi tie! Ankaŭ ĉi tie! – kriadis oni senorde, konfuze kaj ili forte konfuziĝis rimarkante, ke kiom da pordoj ekzistas, tiom da grasmakuloj estas.

Ili turnis sin denove por ricevi konsilon de la malliberulo.

– Tiu estas vera lertulo pli sperta ol ni ĉiuj! – konstatis deprimiĝinte la ŝtelisto, – tiu superruzas nian menson. Domaĝe pro la tempo kaj pro la parolo.

Li ne donis pliajn konsilojn, ĉar li diris tiujn vane. Nu ekmeditis nun la reĝo kaj eltrovis kiel li agu. Li dissendis armilhavantojn, per kiuj li anoncis kriigante: anoncu sin la kulpulo, li ne ekhavos punon. Aŭdinte la alvokon, la knabo alprenis armilon kaj ankaŭ li vestis sin kiel eskortano kaj alkriis al la reĝa kuriero:

– Mi estas tiu, kiun vi serĉas; portu min antaŭ la reĝon.

– Kaptu lin! – kriis la multaj armitoj.

Ho, la fraŭleto tuj ekkomprenante la situacion miksis sin inter la armitoj kaj li komencis kriadi pleje:

– Tie sinkaŝiĝas tiu, kaptu lin, ja li ne gluiĝas.

Li povis liberiĝi tre malfacile el inter ili. Aliatage jam alimaniere parolis la kuriero:

– Se la kulpulo pentos pri sia peko kaj ĉion konfesos, lia estos kaj mia filino kaj post mia morto ankaŭ mia reĝlando.

Ĉi foje la fraŭleto eniris en la tombejon, li detranĉis brakon de iu mortinto kaj kaŝis ĝin sub la vesto. Kiam alvenis la vespero, li ŝteliris en la proksimon de la reĝfraŭlino. Li rakontis al ŝi aferojn ĉiujn siajn de sia plej malgranda kulpeto ĝis la plej granda kulpo kaj sincere li promesis, ke li pekos neniam plu. Neniam plu! La reĝfraŭlino kaptis lin perbrake kaj ekkriis:

– Helpon! Helpon! Mi kaptis la ŝteliston!

Kunkuris la multaj korteganoj, servistoj, kaj kiam ili eklumigis meĉon, ili ekvidis, ke brako de iu mortinto estas inter la manoj de la fraŭlino, sed la fraŭlo troviĝis nenie. Okaze de ĉi tiu evento la reĝo perjure promesis, ke li donos al la kulpulo sian filinon edzinigi kaj ankaŭ la duonon de sia reĝlando, nur anonciĝu la kulpulo. Tre ĝoje anoncis sin la fraŭlo, li pentante konfesis ĉiun sian kulpon. Post paso de longa tempo li iĝis reĝo, sed tiome bona, kian oni ne havus, se ili estus serĉintaj pli bonan reĝon.

La magia spegulo

Sola ĉasista fraŭlo vivis solece en la arbaro. Ĉiutage li iris nur ĉasi, en tio li trovis ĝojon. Li iris iutage enarbore, sed vane li serĉis spurojn, sovaĝbesto nenia troviĝis en lia vojo. Ĉar pro la malsukceso obstino ekregis lin, li ĵuris ne iri hejmen kun malplenaj manoj. Li pasigis ankaŭ la nokton en la arbaro. La sekvantan matenon, freŝe ekvaginte apud la marborda sablo li ekvidis fiŝeton pene baraktanta, frapadanta pervoste por reĝi iel al la marakvo. La ĉasisto kompatis, levis kaj reĵetis ĝin en la maron. La fiŝo glutis el akvo, ĉirkaŭrigardis kaj alparolis la ĉasiston jene:

– Kiel mi dankemu vian bonecon, bonanima ĉasisto?

– Mi faris bonkore, kion mi faris – la ĉasisto respondis – tio nenion sekvigas. –

– Signe de mia danko akceptu de mi iun skvamon – petis la fiŝo, – ĉar se vi iam trafus en danĝeron sidante en amaso de embaraso, bruligu ĝin, mi venos por via helpo.

La ĉasisto detiris unu skvamon, metis en sian burson kaj forpaŝadis kun ĝi. Li daŭrigis sian vojiron en la arbaro ĝis laciĝo. Li ekripozis sur granda kamparo en ombro de alta arbo. Abrupte li vekiĝis pro forta kriegado, pro granda alarmiĝo. Li ĉirkaŭrigardis, do li ekvidis grandan serpenton rampi supren sur la arbo. Li elkaptis sian pafarkon, sagon kaj pafis tiel la serpenton, ke ĝi falis reen senvive al la tero. Agloidoj nestis sur la arbosupro, tiuj kriegadis tiome forte, la serpento volis vori tiujn. La ĉasisto ne rimarkis ilin, sed li kuŝiĝis sub la arbo por daŭrigi la dormadon. Li rimarkis eĉ ne la du grandajn aglojn kriĉantajn supre kvazaŭ ili volus elskrapi liajn okulojn. La aglo-gepatroj pensis, ke la ĉasisto volas fari ion malbonan al iliaj idoj. Sed la idoj kriadante pepadis al la grandaj birdoj: „ne ĝenu la ĉasiston, ĉar li murdis nian grandan malamikon, la serpenton.” La du agloj etendis la flugilojn trankviliĝinte, ke la homo estu en ombro. Ili ventumis lin ĝis vekiĝo el la sonĝo, poste diris al li:

– Ĉasisto frato, per kio ni esprimu nian dankemon al vi pro via bona ago?

– Bonakore mi faris, kion mi faris – la ĉasisto respondis – tio nenion sekvigas.

– Signe de mia danko akceptu de mi iun plumon – petis la vira aglo, – ĉar se vi trafos iam en danĝeron sidante en amaso de embaraso, bruligu ĝin, mi venos por via helpo.

La ĉasisto detiris la plumon, metis ĝin en sian burson kaj ekiris kun ĝi. Li daŭrigis la vojon, sed li ne trovis sovaĝbeston. Li vagadis plu en la arbaro kaj kiam denove alvenis la vespero, iu lupu aperis antaŭ lia sago.

– Bone estas, ke vi venis – diris la ĉasisto – triatage mi ĉirkaŭiradas vin, mia sago soifas vin.

– Ne batu min, ĉasistofraŭlo – petegis lin la lupu. – Detiru unu haron de mia dorso, se vi trafos en danĝeron sidante en amaso de embaraso, bruligu la haron kaj mi venos por via helpo.

Eltiris la ĉasisto la haron, enbursigante metis ĝin apud la skvamon kaj agloplumon kaj ekiris kun ili. Li iris ĝis atingo de alia lando. Tiu ĉi lando havis reĝan fraŭlinon kaj la reĝa fraŭlino havis ian magian spegulon. Ĝuste tiam iris-venis en la lando mesaĝportanto por anonci al tiuj, kiujn la mesaĝo interesas, ke la reĝidino iĝos edzino de tiu, kiu povos kaŝi sin tiel, ke ŝi ne trovu tiun. Se la reĝidino trovos la kaŝiĝintan, ŝi senkapigos tiun homon. La ĉasisto aŭdis la mesaĝportanton, li iris al la palaco kaj anoncis al la reĝa fraŭlino, ke li tenos sin al la veto. La limdato konsistas el tri tagoj, dum tiu tempo li devos kaŝiĝi. Dum du tagoj li nur ripozis, manĝis, trinkis, amuzis sin, en la triataga vespero li promenis al la marbordo, elprenis kaj bruligis la fiŝoskvamon. Tuj aperis antaŭ li la granda fiŝo kaj demandis la ĉasiston:

– Kion vi deziras, ĉasisto-fraŭlo?

– Kaŝu min ie tiel – la ĉasisto respondis, – ke neniu homnaskito povu trovi min.

Je tio la granda fiŝo malfermegis la buŝon, glutis la fraŭlon kaj renaĝis kun li en la maron. La reĝa fraŭlino sidis tie en la palaco kaj elprenis sian magian spegulon. Ŝi ekvidis ĉion en ĝi, ŝi eksciis ĉion el ĝi, ĉar tiu spegulo sorĉis ĉion antaŭ ŝin. Ŝi rigardis al la spegulo esplorante la mondon de dekstro, de maldekstro, de supro, de malsupro, nur tiun ĉasisto-fraŭlon ŝi ne vidis. – Venis fino de mia ludo – la fraŭlineto suspiris – ĉasisto-fraŭlo estos mia edzo, mi vidas tiel.

Ŝi ne suspiris duafoje, ĉar plaĉis al ŝi tiu belstatura fraŭlo. Ŝi denove elprenis la spegulon por enrigardi, kaj kiam ŝi rigardis lastafoje, ŝi rimarkis silkan franĝeton ie profunde en la maro. Silkan rimenon havis la ĉasisto, ĝia franĝeto elvidiĝis el la buŝo de la fiŝo. La fraŭlineto ekvidis ĝin en ŝia spegulo.

– Mi trovis! – kriis la fraŭlineto, – li kaŝiĝas en la stomako de fiŝo.

Sekvatage, kiam antaŭeniĝis la ĉasisto, li rapidis en la palacon, al la reĝa fraŭlino kaj demandis ŝin, ĉu ŝi scias, kie li estis kaŝita?

– En la gastro de fiŝo, marprofunde – respondis la fraŭlineto.

– Vi eltrovis domaĝe – la fraŭlo diris – jen mia kapo, ĝi koncernas vin.

La reĝfraŭlino diris komplete lin:

– Mi redonas vian vivon, sed ne plu risku ĝin, domaĝo estus pro ĝi.

Adiaŭis la ĉasisto, sed kiam li iris el la palaco, li ekhavis penson alian, nome, ke li provos denove eĉ unu fojon. La reĝfraŭlino aŭ estos lia, aŭ li mortos por ŝi. Li returniĝis kaj paŝis al la fraŭlino kaj pridiris sian inklinon, la sopiron de sia koro al ŝi. La fraŭlino, rigardante al la fraŭlo, pensis: eĉ la ŝtono kompatus lin. Tamen ŝi vane provis malkonsili lin, ĉar la fraŭlo ne forlasis sian volon. Li elrapidis el la palaco, du tagojn li ripozis, la trian tagon li elprenis la aglan plumon kaj bruligis. Tuj aperis la granda aglo.

– Kion vi deziras, ĉasistofraŭlo? – ĝi demandis la ĉasiston.

– Kaŝu min ie tiel – la fraŭlo diris, – ke neniu homnaskito povu trovi min.

La aglo, dirinte nenion, sidigis al sia dorso la fraŭlon kaj saltis kun li al la ĉielo. Tie certe neniam homido povos ekvidi lin. La reĝa fraŭlino sidis en sia palaco rigardante en sian spegulon. Ŝi vidis la mondon, kaj de dekstro kaj de maldekstro, kaj de malsupro kaj de supro, ŝi vidis nenie nur la fraŭlon. Laste, denove ŝi rigardis supren al la spegula ĉielo kaj ekrigardis iun franĝeton. La franĝeto de la ĉapo de la ĉasisto elvidiĝis el la figuro de la aglo.

– Mi trovis! – kriis la fraŭlineto. – La ĉasisto estas trovita! – Li flugas surĉiele, sur la dorso de aglo! En la sekva tago la fraŭlo revenis ankaŭ de tie, kaj li vizitis denove la reĝan fraŭlinon. Li demandis ŝin, ĉu ŝi scias, kie li kaŝiĝis?

– Super la ĉielo, aglodorse – respondis la fraŭlineto.

– Vi eltrovis denove – diris la fraŭlo – ĉi tie estas mia kapo koncernanta vin.

La reĝa fraŭlino indulgante al la ĉasisto diris:

– Domaĝe pro via vivo, mi ne deziras de vi. Foriru nun de ĉi tie en la nomo de Dio, kaj ne provu denove!

La fraŭlo pensadis iom kaj respondis al la reĝa fraŭlino:

– Permesu, ke ankoraŭ unu fojon, laste, mi povu sekvi la sopiron de mia koro. Via mano aŭ estos mia, aŭ mia kapo estos via.

Vane malkonsilis la fraŭlino, li ne obeis. Pezakore li foriris el la palaco, kaj kiam li eliris el la palaco, li elprenis la burson kaj eltiris el ĝi la vilon kaj bruligis. Tuj aperis antaŭ li la lupo, demandante:

– Kion vi deziras, ĉasistofraŭlo?

– Kaŝu min ie tiel – la fraŭlo diris, – ke neniu homnaskito povu trovi min.

Post ioma meditado la lupo alparolis jene la ĉasiston:


– Mi fosigos al vi tunelon profunde sub la tero. En ĝi vi povos iri ĝis la palaco de la reĝidino, eĉ ĝis ŝia ĉambro, ĝis ŝia sidloko.

Vere, kiom da lupoj vivis en la mondo, en la vespero ĉiuj alvenis kaj ili fosis, elfosis, kavigis lian vojjon en la tunelo, ĝis ĝi atingis la palacon, en ĝi la ĉambron de la reĝidino, ĝustedire ĝis la subo de ŝia seĝo. Du tagojn la fraŭlo ripozis ankoraŭ, triatage li paŝis en la tunelon kaj promenant ĝis la fino li atingis ĝis la proksimeco de la fraŭlineto. Ĝuste tiam ŝi sidis sur ŝia ora seĝo enmane tenante la spegulon. Ŝi enrigardis, esploradis dekstren, maldekstren, supren, malsupren sed nenie nenio videblis el la ĉasisto. Kaj tiumomente kiam ŝi denove enrigardis en la spegulon, la seĝo leviĝis, apenaŭ ĝi ne renversiĝis kaj aperis la ĉasistofraŭlo.

– Ĉu vi trovis min en via spegulo? – li demandis la reĝidinon.

– Mi trovis vin en mia koro – la fraŭlino respondis tre feliĉa. – Prenu al ĝi ankaŭ mian manon, ĝi koncernas vin, vi gajnis min.

Ili brakumis unu la alian ĝoje, sekvan tagon ili geedziĝis, triatage ili okazigis la nuptofeston por fariĝi edzo kaj edzino. El la ĉasista fraŭlo iĝis reĝo. Antaŭ ili estis la granda mondo kaj la magia spegulo.



Monahinejoj sur la monto Meteora en Tesalio
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=62383>

Reĝfilo Fjorentinos

La iama reĝo, reĝedzino kun ilia belega filino vivis pace en sia palaco. Ilia sola granda zorgo estis ilia belega sola filino, ĉar ili ne sciis edzinigi ŝin al tiu, kiu poste povos esti la nova reganto de la lando. En ilia najbareco kampadis iu drako, kiu baris la vojojn de la svatiĝantoj, aŭ el kaŝejo atakinte ĝi manĝegis tiujn aŭ simple forpelis ilin, neniun lasante iri eĉ en la proksimecon de la belulino. Tamen, kvankam multaj fraŭloj venis el diversaj lokoj pro la famo de la alta beleco de la reĝa fraŭlino, pro la ruĝaj rozoj de ŝia vizaĝo, ili jam ne povis atingi la palacon. La draka inklinio estis: mem edzinigi la filinon de la reĝo, kaj tiel mem estiĝi la mastro de la lando. Ĝi kaŭzis ankaŭ multajn damaĝojn, ja ĝi foje detruis, foje bruligadis kaŭzante incendiojn, foje neniigis ĝardenojn. La reĝo, trafite en embarason, sendis kurierojn kun sia mesaĝo: „tiu meritos gajni lian tutan regnon kaj edzinigindan lian filinon, kiu murdos la drakon.” En malproksima lando, sur iu insulo vivis la kuraĝa kavalirstatura fraŭlo, la reĝfilo Fjorentinos.

– Mi foriros, – li diris iutage, – kaj de la tero mi ekstermos la tie nestantan bestion, tiun murdistan drakon mortigantan fraŭlojn.

La famo kaj la nomo de Fjorentinos ekflugis kaj atingis la palacon, eĉ ankaŭ la kampadejon de la drako.

La terure granda drako gardostaris per tutaj okuloj kaj oreloj. Ĝi dormis nek nokte nek tage kiam Fjorentinos proksimiĝis al ĝia restadejo, ĝia gorgo blovis fajron, ĝia teruriganta voĉo tondradis. Rigidiĝinte staris la fraŭlo. Timante de drakan artifikon li paŝis al pastoro kaj aĉetis veston pastoran kaj la bastonon, sed pluse li pripensis iun ruzaĵon. Vestinte sin kiel pastoro, kun la manoj bastono kaj poteto de jogurto, li sukcese evitis la drakon. Tiel li povis eniri la palacon. Tie la pastoran veston ŝanĝinte al alia, li paŝis antaŭ la reĝon kaj parolis al li:

– Reĝido Fjorentinos petas de vi vian filinon por edzinigi.

La reĝo, rimarkinte la simpatian belstaturan fraŭlon, bonvenigis lin favore kaj diris al li:

– Dum la drako kampadas ĉi tie, ni ne havos ripozon de ĝi. Antaŭ ĉio finu ĝian potencon, poste estos via ankaŭ mia regno kaj ankaŭ mia filino.

– En kio ĝi tenas la forton, kio estas fortodona al ĝi? – la reĝido demandis.

– Trovu la okulvitrojn – la reĝo respondis – helpe de tiuj ĝi kapablas rigardi en la foron, ĝi sciiĝas per tiuj pri ĉiuj aferoj.

Fjorentinos eliris de la palaco kaj kaŝrigardadis dekstren-maldekstren, ĉu li vidos ie la drakon aŭ ne. Li demandadis ĉiun por ekscii, kiu scias kion pri la drako:

– Ses monatojn ĝi dormas, ses monatojn ĝi estas vigla, – la homoj sciigis lin – sed, dum ĝi dormas kaj maldormas, ĝiaj okuloj estas ĉiam malfermitaj. Oni rakontis ankaŭ tion, ke „iam estis forrabita de ĝi iu reĝidino. Ĝi sorĉis ŝin kaptita birdo, kiu gardas ĝian domĉirkaŭon. Se fremdulo erarvagas al ĝia korto, la birdo eksonas anoncante tuj la fremdan vizitanton al sia mastro. Ĝuste tiam daŭras la sesmonata dormoperiodo de la drako.”

Fjorentinos kaptis la okazon kaj malfermis ĉe la drako la kortopordon. Neatendite la birdo eksonis kaj eligadis akrajn voĉojn:

– Ve! Aveto mia! Pordo malfermiĝis!

– Parolu, parolu, mia birdo malgranda, – la drako dormante respondis.

– Ve! Aveto mia! Iu venas enen! – la mallibera birdo ŝrikadis.

– Parolu, parolu, mia birdo malgranda – la drako dormante respondis.

– Ve! Aveto mia, la okulvitroj! – la mallibera birdo ekŝrikis.

– Parolu, parolu, mia birdo malgranda – la drako dormante kapklinadis.

– Ve! Aveto mia! Tiu foriris jam!

- Parolu, parolu, mia birdo malgranda!
- F j o r e n t i n o s estas la forportinto de la okulvitroj!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.

F j o r e n t i n o s rapidis kun la okulvitroj, li kuris al la reĝo por transdoni. La reĝo ĝojis kaj laŭdis la menson de la fraŭlo.

– En kio ankoraŭ povas esti forto de la drako, kio estas fortodona? – li demandis denove la reĝon.

– Trovu ĝian ĉevalon noblan! – diris al li la reĝo – ĝi galopas tiel sur ĉi tiu ĝia rajdĉevalo, ke eĉ fluganta lanco ĝin ne atingos.

F j o r e n t i n o s reiris al la korto de la drako. Kiam li malfermis la pordon, la birdo denove eksonis:

- Ve! Aveto mia, li estas ĉi tie denove!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- Li iras en la stalon!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- Li forportas vian noblan ĉevalon!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- F j o r e n t i n o s estas la forportinto!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.

La fraŭlo enseliĝis sur la nobla ĉevalo de la drako kaj forgalopis tiel, ke li ne haltis ĝis la palaco de la reĝo.

– Via Reĝa Moŝto! Jen la nobla ĉevalo de la drako – la fraŭlo anoncis.

La reĝo ĝojis por la kuraĝo de la fraŭlo, li laŭdis la fraŭlon senfine.

– Kiel gajnas la drako forton? Kio estas fortodona? – la fraŭlo demandis denove la reĝon.

– Trovu ĝian birdeton, ĉar tiuokaze neniu gardos ĝin kaj ĝian palacon. – la reĝo respondis.

La fraŭlo denove foriris por eniri la korton de la drako. La mallibera birdo denove komencis la ŝrikadon:

- Ve, aveto mia, la pordo malfermiĝis.
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- Ve, aveto mia, li venas supren!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- Ve, aveto mia! Li prenas min!
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.
- F j o r e n t i n o s forportas min.
- Parolu, parolu, mia birdo malgranda.

La fraŭlo rapidis transsalte-senhalte kun la birdo rekte al la reĝo. Transdoninte la birdon al la reĝo, la fraŭlo demandis lin: ĉu la drako havas forton ankoraŭ en io?

– Mem la drako estas forto. – La reĝo respondis. – Se vi povus porti ĝin mem ĉi tien, ni ekhavus eternan pacon de ĝi.

F j o r e n t i n o s meditis, planadis, fine li intencis fari denove ruzaĵon. Dume forpasis la ses monatoj kaj iutage la drako vekigis. Ĝi vidis jam per siaj elstreĉiĝintaj okuloj. Kiel ĝi ĉirkaŭrigardis, ĉirkaŭorelumis, ĝi spertis aŭdi nek la sonon de la birdeto, nek la ĉevalblekon de la nobla ĉevalo. Ĝi ekrapidis por surmeti la okulvitrojn por disrigardi en la domĉirkaŭaĵo kaj pli fore. La okulvitroj troviĝis nenie. Ĝi kuris al la birdo, sed tiu same ne troveblas. Ĝi kuris en la stalon, nur la vaporo de la nobla ĉevalo estis trovata tie. Tiam li rememoris pri la sonĝo kaj la ŝrikado de la birdo.

– F j o r e n t i n o s, F j o r e n t i n o s! – ĝi kriis – vi forrabis miajn okulvitrojn: du okulojn, mian noblan ĉevalon: miajn du piedojn, mian birdon: mian langon. F j o r e n t i n o s, F j o r e n t i n o s, trafu en miajn manojn!

Ĝi estiĝis inertia, senkapabla helpi sin. Nu ĝi promenis al la arbaro, inter la montoj kaj daŭre ĝi streĉis la kapon, kiel ĝi povus kapti F j o r e n t i n o s-on por venĝi. Dume ankaŭ la reĝido ne ripozis, sed elpensis ruzaĵon. Li vestis sin kiel maljunulo kun longa blanka barbo kaj kun griza hararo falanta sur la ŝultroj, ĝiba dorso, kaj ĝisfine per ĉifona longa senmanika mantelo. Li akumulis aron da daŭboj, fortajn, dikajn barel-bendojn, segilon, ĉizilon, feronajlojn kaj li iris al la monto kun tiuj en la treege grandan arbaron. Li dismetis la partojn necesajn por la barelo kaj komencis bendizi la barelon, al bela granda, bone larĝa. Kiam li interadaptis la daŭbojn, metis sur ilin la barel-bendojn, dume li lasis vole kaj dole fendojn inter ili kaj sufiĉe grandajn. Marŝinte ĝuste tiudirekte, la drako aŭdis la fortan marteladon. Ĝi trenpaŝadis al la maljunulo kaj vidis la pretiĝantan barelon, la daŭbojn kaj la najlojn.

– Pri kio vi klopodas, maljuna avĉjo? – li demandis la homon.

– Mi elfaraĉas barelon – la maljunulo respondis.

– Kial vi bezonas la barelon? – scivolemis la drako.

– Mi verŝos moskon en ĝin iun tagon estontece, bona vineto estos el ĝi, – la maljunulo respondis trankvile.

– Ĉu vi volas verŝi moskon en ĉi tiun barelon? – la drako miris. – Ja tiom multaj fendoj estas en ĝi, ke eĉ ankaŭ mi mem povus eniĝi, traĝi tra la fendoj.

– Kia? Kiaspeca fendo? – la maljunulo demandis kun stulte gapaj okuloj.

– Jen, ĉi tie – diris la drako, metu vian manon tien.

La maljunulo ĝis fino fingrumis la barelon kaj kapbalancis, li sulkis la frunton, kvazaŭ li ĉagreniĝus pro sia ŝlemileco.

– Iel tamen mi povos enŝtopi ilin, se ne per alia pli bona aĵo, tiam per stupo de kanabo – la maljunulo konsoliĝis. – Miaj okuloj estas jam malfortaj, mi vidas nur malforte per ili.

– Ankaŭ sur la fundo de la barelo estas unu granda truo – diris denove la drako.

– En kiu direkto? – la maljuna homo demandis – mi certe ja ne vidas ĝin.

– Viamane – la drako komentis – vi povos palpi.

La maljuna homo tiel membrostreĉis, kvazaŭ li ne povus atingi ĝin per la fingroj. Li penege streĉis la forton, li klinis sin profunden, tamen la fingroj ne atingis la fundon.

– Vi povus fari komplezon – diris la maljuna homo al la drako.

– Kion? – la drako demandis.

– Tion – respondis la homo, – ke vi enbareliĝos kaj ŝtopos tiun truon. Eĉ la bona Dio benos vin pro tio.

Kaj li parolis ĝis tiam al la drako, ĝis li instigadis, ke fine la drako paŝis en la barelon. Li donis al ĝi eĉ ankaŭ stupon por enŝtopi la fendon. Neatendite la maljunulo fariĝis F j o r e n t i n o s. Li elprenis rapide la najlojn, manpremis la martelon kaj t i k i – t a k a, t i k i – t a k a, li eknajlisis la grandan barelon fortega, dense fernajlita.

– Kion vi faras? – la drako kriegis el la barelo. – Kion vi najlizas sur via barelo?

– T i k i – t a k a, t i k i – t a k a, la barelo najliziĝis.

– Kion vi faras? – la drako kriadis denove. – Ne najlizu ĝis mi elvenos el ĝi!

T i k i – t a k a, t i k i – t a k a, najliziĝis la barelo.

La drako kriis pli forte, por ke la maljuna homo malfermu la barelon, por elgrimpi de tio.

– Se vi engrimpis stultakape – F j o r e n t i n o s respondis al la drako, – vi restos ene ĝismorte.

Poste li dekapigis la perukon, deprenis sian longan blankan barbon, surŝultrojn falintan grizan hararon, de la dorso la ĝibon, sian longan senmanikan mantelon ĝisfino-ĉifonan, kaj post ilia enbarelon-igo li komencis ruli ĝin.

– Mia bareleto ruliĝu, ruliĝu, bone atentu, ne renversiĝu, ni iros en la palacon, en korton de la reĝfraŭlineto.

Nur nun venis la rekono en la kapon de la drako, ke tiu ĉi homo povas esti mem F j o r e n t i n o s, kaj ho ve, li mem lasis sin trompi.

– F j o r e n t i n o s, F j o r e n t i n o s, – suspiradis la drako en la barelo, – vi forrabis miajn okulvitrojn: nome miajn okulojn, mian ĉevalon noblan: nome mian ilon iri anstataŭ piedoj, mian birdeton: la langon, kaj venigis min en la barelon. F j o r e n t i n o s, F j o r e n t i n o s, se vi trafus en miajn manojn!

La fraŭlo respondis al tiu suspiro:

– Bareleto mia, ruliĝu, ruliĝu, atentu bone, ne renversiĝu, ni iros al reĝo mia, al mia fianĉino reĝidina.

Ne pasis multa tempo ĝis alveno al la reĝa palaco.

– La drako estas ĉi tie en la barelo. – F j o r e n t i n o s sciigis la reĝon.

Ĝojegis la reĝo, ĝojegis la reĝa fraŭlineto, la korteganoj en la palaco, la tuta lando. La reĝo ekstaris, alpaŝis la barelon kaj enkriis al la drako:

– Vi damaĝis en mia havaĵo, en mia korto, en mia palaco; vi detruis kaj bruligadis, vi tute senhavigis min. Nun la vico venis al vi. Nun vi devas neniigi, por via malhonoro cindriĝi.

Post tiuj vortoj li ekbruligis la barelon. Ĝia flamo flagris, ĝis la drako tucindriĝis en la barelo. Ĉi tiel okazis la kazo de la reĝiĝo F j o r e n t i n o s, ĉi tiel li gajnis la bonŝancon edzinigi la reĝfraŭlinon. Dum la nuptofesteno sonis fajfilo, tamburo, violono kaj tiel okazis, ke post sufero venis prospero.

La tri cervoj

Iam, en granda soleco vivis iu sinjorino. Ŝi havis ĉion bezonatan, ŝi nur sopiregis infanon. Iutage ŝi petegis al la Suno jene:

– Donacu al mi iun infanon, plenkreskiĝintan mi redonos tiun.

Kaj jen, kiam alvenis la tempo, la sinjorino naskis filinon. Ili lulkareis, dorlotis, banis la suĉinfanon, edukis la filinon al plenkreska fraŭlineto. Iutage promenante la filino renkontis la Sunon. Ĝi, suben rigardante, alparolis ŝin:

– Diru al via patrino, ke ŝi plenumu la promeson.

La knabineto hejmeniris kaj transdonis la mesaĝon al la patrino. La patrino ektimis kaj tiel parolis al la filino:

– Se vi denove renkontiĝos kun tiu, diru al la S u n o, ke ĝuste tiam mi knedis paston, vi ne povis paroli kun mi.

Ŝi renkontiĝis kun la S u n o, ankaŭ la sekvan tagon, kaj ankaŭ la trian tagon. Ĉiam ŝi transdonis la mesaĝojn al la patrino, sed tiu havis ian pretekston ĉiam. Ŝi havis ĉi-foje iun farenaĵon, aliffoje alian kaj denove aliffoje ŝi forgesis pri tio. Elĉerpiĝis la pacienco de la S u n o. Je ilia refoja renkontiĝo, la S u n o diris neniom, nur mangvide kondukis la knabineton en sian ĝardenon proksime al sia palaco. Ve! La patrino veade ploris pri sia ununura filino. La S u n o tre gardis la knabinon, ŝi ne estis lasata libere iri-veni. Ŝi povis iri nur de la ĝardeno ĝis la palaco kaj returne. Iumatene la S u n o ekiris al sia vojiro en la mondo por disverŝi helon. La knabino, restinta sola, komencis mediti pri la sorto sia. Dume venis la patrino en la kapon de la kompatindulino, kaj nur faladis ŝiaj larmoj pro ŝia granda malĝojo. Kiam ŝi ploradis en la ĝardeno kaj rigardis la multajn grandajn arbojn, eksplodis el ŝi la amareco:

– Velkas la koreto de patrino mia, velku ankaŭ la arbofolioj! Ŝi turmentis, ŝiris, mordis sian vizaĝon tiel, ke fluis la sango sur ĝi. La arbofolioj faladis, ĉiuj falis velkinte de la arboj. Alveninte vesperkrepuske, la S u n o ekvidis la sangantan vizaĝon de la knabineto.

– Kiu batis vin, knabineto mia? – demandis ŝin Suno amoplene.

– Hundo-kato interkoleriĝis, – respondis la knabineto, kaj kiam mi alkuris al ili por disigi ilin – kato ungovundis min.

La S u n o kaptis la katon kaj ĵetis en la maron. Sekvatage, kiam la S u n o denove estis survoje, la knabineto denove mordvundis sin.

– Kiu damaĝo okazis? – denove la Suno alveninte demandis la knabineton.

– Hundo-porko interkoleriĝis. Sed kiam mi volis disigi ilin, la hundo mordis min.

La S u n o prenis la hundon kaj ĵetis en la maron. Ankaŭ triatage ekiris la S u n o al vojo, sed ne iris malproksimen. Tiu kaŝis sin inter nuboj. De tie ĝi kaŝrigardis la knabineton kaj spertis, ke ŝi mem vundadas sin kaj daŭre ŝi sopiras la patrino. La S u n o iris al la knabineto kaj diris al ŝi:

– Nu bone, mi ne kontraŭas, iru do al via patrino. Vi ricevos akompananton certigotan de mi.

La S u n o vokis la korakon kaj demandis ĝin:

– Kio estas via nutraĵo, koraketo?

– Freŝa sango, freŝa viando – respondis la korako.

– Por mi sango estas mia akvo – respondis la S u n o – kaj forpelis la korakon.

Poste la S u n o fajfis trifoje, je kio tri cervoj saltis antaŭ ĝin.

– Kio estas via nutraĵo? – demandis ilin la S u n o.

– Ni manĝas herbon kaj trinkas akvon. – respondis la cervetoj.

– Mi taskas al vi ĉi tiun knabineton – prenu kaj akompanu ŝin al ŝia patrino – diris la S u n o.

– Ni pretas plenĝoje – la cervetoj respondis kaj ekvojiris al la foro; cis kaj trans la monto. Atinginte la duonvojon, ili estis jam lacaj kaj volis iom ripozi kaj manĝi. Ili turnis sin dirante al la knabineto:

– Ni iros nun trinki akvon, manĝi herbon kaj ripozi iom.

Ili staris ĝuste tiam antaŭ granda ĝardeno. Tri grandaj cipresarboj kreskis en tiu ĝardeno. Ĉe iu arbo ili sidigis la knabineton kaj diris al ŝi:

– Se vi bezonos nin, fajfu trifoje kaj ni estos tuj ĉi tie sub la cipreso.

Ankaŭ iu puto troviĝis en la ĝardeno sub la arboj, apud la domo staris iu dometo, en kiu loĝis drako-sinjinorino kaj ŝiaj tri filinoj. Tiutempe la drako-sinjinorino diris al iu sia filino:

– Iru al la puto, portu freŝan akvon.

La drako-filino prenis la kruĉon kaj la sitelon kaj iris por akvo al la puto. Kiam ŝi klinis sin super la putakvo ĉerpi el ĝi, tie en la akvo speguliĝis la vizaĝo de la knabineto sidanta surarbe. Ĝuste super la puto estis la citrusarbo. De ŝi brilis la akvo tiel, kiel la brileco de la flava oro. Mire gapadis la drakfraŭlino kaj eksplodis el ĝi:

– Jen, jen! Se mi estas tiom superba, kial mi devas penporti la akvon?

Ŝi prenis la kruĉon kaj por rompi la sitelon ŝi ĵetis ĝin en la puton kaj iris hejmen ege paŭteme.

– Kie estas la freŝa akvo, kie estas la kruĉo? – la drako-sinjinorino demandis ŝin.

– Se mi estas ĉi belegulino, kiel oro mi brilegas, tamen kial mi devas kuntreni la akvon? Mi frakasis mian kruĉon kaj ĵetis la sitelon en la puton! – la filino diris kun kolera voĉo.

La sinjinorino sendis alian filinon, sed ankaŭ tiu filino revenis tute same. La sinjinorino forsendis la trian, sed ankaŭ tiu revenis same.

– Ej, do jam mi devas rigardi la aferon – diris la drako-sinjinorino, kio trafis ĉi tiujn tri filinojn.

La sinjinorino iris al la puto. Kiam ŝi atingis ĝin, ŝi vidis la ĝardenon lumi, kaj la akvon brili. La lumbrilo estis tia kiel la brilego de la Suno mem. Ŝi ĉirkaŭrigardis, eĉ ankaŭ rigardis supren ankaŭ al la arbopintoj, do sur unu estis videbla la knabineto. Ŝia vizaĝo brilis tiel. La dentoj de la drako agaciĝis, ja la drako volis manĝegi la kompatindulinon. Ĝi turniĝis al la knabineto per mioldolĉe afablaj vortoj por logi ŝin veni de la arbo al la tero:

– Knabineto mia, saltu malsupren de via cipresarbo, mi lavos kaj kombos vin, dolĉan mielon mi donos al vi.

– Mi estas eĉ ne malsata, mi ne malsupreniĝos eĉ de mia arbo. – respondis la knabineto.

– Malsuprenvenu prompte! – hurlis la drakosinjinorino – aŭ mi maĉos sub vi la arbon al du pecoj!

Pri la tri cervetoj rememorante la knabineto fajfis tri fojojn al ili. El la cervetoj mergiĝintaj en ĝuo de paŝtiĝo de herbo, foje la plej malgranda abrupte haltis, ĉar ĝi rimarkis fajfojn kaj ĝi ekkriis:

– Estas kvazaŭ la knabineto vokus nin, kvazaŭ mi aŭdus fajfojn!

– Supozeble viaj oreloj sonoris – la du aliaj cervetoj diris – ni aŭdis nenion.

Kiam la knabineto ekfajfis, la drako-sinjinorino malfermegis la faŭkon, grincigis la dentojn kaj ekmordis tiome forte en la arbon, ke la granda arbo kunfalis sub la knabineto. Nur momento pasis, ke ŝi kapablis transsalti al alia arbo. – Ĉu vi desupros de tie? – kriis la drako al la knabineto.

– Mi ne – respondis la knabineto – ankaŭ dum mi vivos. – kaj al la cervetoj ŝi denove fajfis tri fojojn, nun pli forte ol pli frue.

El ili denove nur la plej malgranda, la plej juna aŭdis:

– Ĉu ne aŭdis vi? – kriis ĝi al la du pli grandaj – kvazaŭ la knabineto vokus nin.

– Viaj oreloj sonoris denove! – diris la aliaj du, eble tion vi aŭdis fajfo. Dume en aflikto estis la knabineto, ĉar la drako plu atakis ŝin sidanta sur la dua arbo. Ĝi maĉis, mordadis ĝin kaj fine ankaŭ tiu arbo kunfalis sub la knabineto. Ŝi povis apenaŭ transsalti al la tria arbo.

– Senprokraste, tuj deĝu de tio! – la drako montradis minace la dentojn kriadante, – provu nenion, ĉar vi povos fuĝi neniel!

– Mi havas nur unu vivon, unu morton – diris la fraŭlineto; sur la arbo estas mia loko.

La drako komencis maĉi, mordi nun la trian arbon, sed ĉar la dentoj malakriĝis pro la multaj maĉadoj, ne povis esti facila la tramaĉo de la tria arbotrunko. Ĝi mordis, mordis, klakigis la dentojn. La kompatinda knabineto pro timo vivis apenaŭ. Ŝi fajfis denove tri fojojn tute forte kaj samfoje ankaŭ kriis. La tri cervetoj streĉis la orelojn, ja nun jam ĉiuj tri aŭdis la fajfojn kaj ankaŭ la kriojn. Kuregis la tri cervetoj, dum la arbo komencis kliniĝi ruiniĝante kaj la knabino kliniĝis kun ĝi malsupren. Kuregis la tri cervoj, avane la plej malgranda, la plej juna, dum la drako malfermegis la faŭkon por engluti la knabineton, tiam la malgranda cervo ekkaptis la drakon. La aliaj du same alvenis transsalte-senhalte kuregante en la spuro de la malgranda cervo kaj ekluktis kun la drako. Dum ili baraktis kun la drako, ĝi formordis la voston de la malgranda cervo:

– Ho, ve, mia vosto! Ve, mia vosto! – kriis la cerveto.

– Vi ricevos el oro estantan anstataŭ ĝi! – la knabineto konsolis, – nur mi povu atingi mian patrinon.

Post la mortigo de la drako, la cervetoj kondukis la knabineton al ŝia hejmo al la patrino.

– Mastrino, mastrino mia! – kriis la porkido – venas hejmen via filineto!

– El oro estos via dentaro, se veras via voĉo – la mastrino diris, grandan ĝojon sentante.

– Mastrino mia, mastrino mia! – kriis la koko – venas via filineto hejmen!

– El oro estiĝos via kresto, se realiĝos via sono! – la mastrino diris gaje.

– Mastrino mia, mastrino mia! – kriis la kokino – venas via filineto hejmen!

– El oro estos via egreto! – se via beketo diros veron, – la mastrino diris ĝojege.

Kaj jen! La tri cervetoj enpaŝis neatendite, kondukante la knabineton. Ho, kiom ĝojegis la patrinjo! Kiom ĝojegis la knabineto! Ili interbrakumadis kaj interkisadis unu la alian kaj babiladis senfine. La cerveto ricevis oran voston, la porko oran dentaron, la koko batitan-oran kreston, la kokino puroran plumtufon. Ili vivis ĝoje ĝismorte kaj kiam la knabineto promenis, la Suno ridetis al ŝi.

La bronza ringo

Tre malproksime de ĉi tie, kaj en longa foro de la tempo, vivis iam iu reĝo. Li havis grandan ĝardenon ĉirkaŭantan lian palacon. Sed herbo ne verdiĝis por esti herbejo, floro ne floris, frukto ne produktiĝis, ombroj de arboj ne bruniĝis en ĝi kontraŭ tio, ke ĝia grundo estis bela grasa tero kaj estis ankaŭ multaj ĝardenistoj tie. Foje, kiam la reĝo ĵus meditis pri tio, alpaŝis lin iu aĝegulo kaj diris al li:

– Eĉ herbo ne kreskas en via ĝardeno, ĉar vi ne havas konvenan ĝardeniston. Tian fakulon serĉigu, kies patro, grandpatro, la prapraavo kaj ankaŭ la prapra avo estis same ĝardenisto.

La reĝo obeis la konsilon kaj serĉigis la konvenan ĝardenist-fakulon. Dum kvardek tagoj oni serĉis, kaj je la fino de la kvardeka tago ili trovis lin. La fakulo havis kaj edzinon kaj bonstaturan filon. Ili translokis la tutan familion en la palacon.

Eklaboris la nova ĝardenisto kaj ne pasis eĉ unu jaro kaj jam floris la multaj floroj, kreskis la herbo sur la kampo, fruktoj produktiĝis sur la arboj kaj bruniĝis la ombro sur la vojo en la ĝardeno. Nur la filo estis pli lerta ol lia patro. Tagon post tago li faris viziton ĉe la reĝo portinta la multajn belajn fruktojn, al la reĝidino li portis multajn belajn florojn. Bela estis la reĝidino, belega, kiel surĉiele la plenluno. Iutage la reĝpatro vokigis lian filinon por diri al ŝi:

– Fraŭlino mia, fraŭlino mia, mia karulineto, alvenis la tempo, ke de nun vi vivu geedzo-paran vivon. Al tio konvena fraŭlo estas la filo de mia unua veziro. Tiu estos via edzo, via inda parulo.

– Mia reĝpatro kara, – respondis la knabineto, – mi volas nek la filon de via unua veziro, nek tiun de via dua veziro.

– Kial? – demandis ŝia patro konsterniĝinte.

– Tial, ĉar mi amas la filon de la ĝardenisto – respondis la knabineto kaj mi volas esti la edzino lia.

La reĝo ekflamis en granda kolero, poste li minacis ŝin, pli poste li insiste petis, ke ŝi ne malhonorigu lin, ja la ĝardenisto ne indas al ŝi la reĝfraŭlino. Sed vana estis la parolo, vana estis la peto, la knabino volis la filon de la ĝardenisto. La reĝo kunvokis siajn vezirojn, por peti konsilon. La plej maljuna konsilis al la reĝo; la du fraŭloj: la filo de la veziro kaj la filo de la ĝardenisto, survojiĝu al alia lando kaj kiu alvenos de tie unua, tiu estu la edzo de la reĝidineto. La reĝo tuj akceptis la konsilon pensante, ke tiel li facile liberiĝos de la teda ĝardenisto. Sekvatage li vokigis la du fraŭlojn kaj ordonis ilin vojaĝi en tre foran landon. Belan ĉevalon li donigis al la filo de la veziro, lamantan ĉevalaĉon ricevis la filo de la ĝardenisto. Li donigis ormonerojn al la vezirfilo, la ĝardenistfilo ricevis nur kupromonerojn.

La du fraŭloj ekvojis kune, sed ili iris vere kune nur ĝis la pordofosto, ĉar de tie la filo de la veziro jam tiel prenis la impeton, ke sur la vojo forta polvonubo flugis post li kaj oni ne plu povis sekvi lian spuron. Malrapide amblis la malgranda ĝardenisto pensanta, ke li ne mortlacigos la ĉevalon, ja li atingos celon entempe, do superflua estus la troa rapido. Dume tre rapide galopis la alia fraŭlo ne haltante survoje, por pli frue atingi celon kaj reveni unue. Povis esti eble la tria tago, kiam li atingis riverbordon. Maljunulino sidis sur iu ŝtono en tutĉifona vesto, ŝia vizaĝo montris malsatadon.

– Bonan tagon, mia fileto – la maljunulino salutis lin.

La fraŭlo tute ignoris la maljunulinon, li rigardis ne volonte al ŝi.

– Mia fileto – petegis lin la sinjorino, – triatage mi ne manĝis, mi pereos pro malsato.

– Forportu vin de mia vojo! – la fraŭlo kolere alkriaĉis al la maljunulino. – En infero estas via loko, olda sorĉistino! – post siaj vortoj la vezirfilo galopegis for pasante sur sia vojo ĉiam antaŭen.

Ankoraŭ samtage vespere ankaŭ la ĝardenistfilo alvenis al la riverbordo sidante sur sia lama ĉevalaĉo.

– Bonan vesperon, mia fileto, la maljunulino salutis lin.

– Bonan vesperon, patrinjo, la fraŭlo bonkore akceptis la saluton.

– Fileto mia, kompatu min – petegis la maljunulino – mi fartas malbonege pro la malsato kaj la laceco.

– Estas ĉi tie mia ĉevalo, sursidiĝu, – la fraŭlo respondis, – ĉar mi vidas, ke viaj piedoj jam ne toleras la iradon. Jen mia mono en la monujo, aĉetu al vi, kion vi bezonas.

La sinjorino ne lasis sin denove peti, sed sursidiĝis sur la ĉevalon malantaŭ la fraŭlo kaj ili tiel ambliis al la urbo. Ankaŭ la filo de la veziro ĝuste tiutempe alvenis. Unu el ili tranoktis en bela gastejo, la alia mizeraloke, en la domaĉo de la maljunulino. Sekvatage la ĝardenisto vekigis pro granda bruado-kriado en la urbo. La mesaĝportantoj galopante kriadis: tre maljuna estas jam ilia bona reĝo, li estas jam preskaŭ senpova, sed reĝa estos la rekompenco al tiu, kiu certigos por li junaĝan forton. Aŭdis ilin la maljuna sinjorino kaj ŝi tiel turnis sin al la ĝardenisto:

– Atentu bone miajn vortojn kaj vi ricevos rekompencan. Gapis la fraŭlo kaj atentis ŝian parolon:

– Kiam morgaŭ vi forlasos la urbon tra la suda urba pordo, – klarigis al li la maljunulino – tri malgrandaj hundoj saltados antaŭ vin. El inter ili, unu estos blanka, alia nigra, la tria ruĝa. Prenu la tri hundetojn, batfalu ilin, poste cindrigu ilin. La cindrojn de la tri speciaj hundoj metu en tri saketojn. La cindron de la blanka hundo en blanka saketo, la cindron de la nigra hundo en nigra saketo, la cindron de la ruĝa hundo en ruĝa saketo. Poste reiru antaŭ la palacon de la reĝo kaj krii tra la pordo:

– Jen kuracisto el J a n i n a, el la malproksima A l b a n i o! Li resanigos la reĝon, li povos redoni lian forton!

Je via anonco oni kondukos vin en la palacon kaj tie vi povos eklabori. Ordonu porti lignon en grandan ĉambron, sufiĉan por porti per tri muloj, pluse estu portita granda kaldrono plenigita per akvo. Per la ligno ekbruligu la fajron, kaj kiam la akvo bolas, enkonduku la maljuna reĝon kaj sidigu lin en la akvo, lasu lin en ĝi, ĝis la viando dekuiriĝos de liaj ostoj kaj disfalos la ostoj. Poste kolektu la ostojn, ostopecojn, alĝustigu tiujn unu al la alia, poste per la cindroj vi aspergu, superŝutu ilin tute. El la tri cindrohavaj saketoj, el unu la cindro estu por lia kapo, el la alia por lia talio, el la tria por liaj manoj kaj piedoj. La reĝo reviviĝos de tio al nova vivo, tiom da forto enplenigos lin, kiom li havus kiel dudekjaraĝa juna homo. Se la reĝo prezentos al vi donacon, vi petu de li nur la bronzan ringon. La ringo havas tiun magian forton: kion vi deziras, ĝi plenumos ĉion al vi. Nu rapidu kaj faru, kion mi diris. La fraŭlo adiaŭis la sinjorinon kaj elrapidis el la urbo tra la suda pordo. La tri hundojn li mortbatis, bruligis, iliajn cindrojn li ensaketigis kaj kun tiuj li revenis al la urbo. Kiel kuracisto el J a n i n a, li iris en la palacon. Bolis la akvo en la kaldrono kaj li kuiris en ĝi la reĝon. Liajn ostojn li kolektis, surŝutis per la tri koloraj cindroj kaj aperis antaŭ li iu junulo, kvazaŭ tiu ne estus reĝo. Per kio mi rekompencu vian agon? – la ĝoja reĝo demandis lin.

– Per la bronza ringo. – respondis la junulo.

– Ĉu vi volas la duonon de miaj trezoroj?

– Ne, nur la bronzan ringon.

Ĉu vi volas mian filinon?

– Ne, nur la bronzan ringon.

– Ĉu vi volas la duonon de mia regno pluse al ŝi?

– Ne, nur la bronzan ringon.

Fine, vole-nevole la reĝo transdonis la ringon. Poste li adiaŭis la anojn en la palaco, de la maljunulino kaj ekiris de la urbo, por ke li reiru en sian landon. Elprenis la ringon kaj jene parolis al ĝi:

– Necesas al mi iu ŝipo, por iri hejmen sur ĝi. El oro estu ĝiaj ŝiptabuloj, el arĝento ĝia masto, ĝia velo estu el brokato. Dek du maristoj plenumu siajn taskojn en silkaj vestoj, kaj Sankta Nikolao staru ĉe la direktil-stango. En la ŝipfundo la kargo estu diamantoj, rubenoj, smeraldoj, grenatoj.

Apenaŭ li eldiris sian deziron, jam estis tie la ŝipo balanciĝanta sur la maro. La multaj silkvestaj maristoj salutis lin enŝipiĝintan, kaj brilis sur ĝi ĉio kvazaŭ estus miraklo de la transmondo. Sankta Nikolao kondukis la ŝipon. La ŝipo kun ili naĝis, velis, ĝis ili alvenis en iun grandan urbon. Proksime al la marbordo staris palaco. La fraŭlo volante pasigi kelkajn tagojn en la urbo, eniris en la palacon. Kiam li promenadis en la urbo iutage kaj rigardadis dekstren kaj maldekstren, liaj okuloj retenigis sur iu fraŭlo portanta malpuraĵojn. Lia mizero tiome okulfrapis, ke eĉ la rigardo al li vekis bedaŭron.

– Kiu vi estas, al kiu loko vi apartenas? – la ĝardenistfilo demandis lin.

– Mi estas naskito en riĉa lando – la malpuraĵportanto respondis. – La unua veziro estas mia patro. Mi ekvojaĝis ĉevale kaj kun trezoroj, sed mi disipis ĉion. Hej tamen, se mi povus hejmeniĝi.

La ĝardenistfilo rekonis sian malnovan kunulon kaj tiel alparolis lin:

– Mi povus helpi vin por hejmenatingi, se vi volas tiom forte. Eĉ ankaŭ ŝipon vi povus ricevi de mi kun homoj, al ĝi konvenajn, nur unu kondiĉon mi havas: ...

– Eĉ du – diris la ĉifonulo, – nur en ĝustatempe mi povu hejmenveni.

La fraŭlo portis la filon de la veziro en la palacon, lin li senvestigis ĝis talio, li surdorsigis sian ardan sigelon, kiel oni premas la sigelon al la sklavec-sortanoj. La vezirfilo ne bedaŭris, se nur li povu ekiri al la hejmo. Dum li ekiris al la maro, la ĝardenistfilo elprenis la bronzan ringon kaj diris lian deziron:

– Mi bezonas ŝipon, por ke la filo de la veziro povu ekiri per ĝi. Ĝiaj tabuloj estu putrintaj seke, ĝia masto estu fragmentiĝinta, ĝia velo estu ĉifono, kaj ĝiaj maristoj estu fipersonaj homaĉoj ĉiuj, por ke eĉ ankaŭ ĝia rigardo veku abomenon, naŭzon.

Kiam la filo de la veziro atingis la marbordon, sur la maro jam tie tangis lia ŝipo. Li tuj alŝipiĝis, kvankam la aspekto de la ŝipo estis ne nur premanta, eĉ estis plie abomeninda, tamen li akceptis. Ili ekiris kaj foje la ŝipo duonflanken kliniĝinte, foje ŝanceliĝinte, foje knarinte foje krakinte, sed iutage tamen alvenis en la hejmlanda haveno.

– Mi alvenis unue! – li kriis jam de malproksimo – mia estas la reĝidino!

– Nur ne estus li veninta kun tiu ŝipo vekanta malĝojon – la reĝo lamentadis – nur havus li pli homecan figuron.

La nuptofesteno komenciĝis, la reĝfraŭlino ekmalgajiĝis. Kiam komencis jam kolektiĝi la multaj gastoj, neatendite albordiĝis iu ŝipo. Jam de malproksimo brilis ĝia masto kaj fajreris ĝiaj tabuloj kaj relo, kvazaŭ pura arĝento kaj oro estus sur ĝi ĉio. Ĝuste tiam la reĝon sidantan ĉefenestre tre surprizis la vidaĵoj.

– Kia miraklo de la mondo estas ĉi ŝipo? – kriis li, – ke ĝiaj tabuloj estas el oro, ĝia masto el arĝento, ĝia velo el brokaĵo? – Kaj kiu estas la mastro de tiuj multaj maristoj? – kriis li ankoraŭfoje, – ke ili ĉiuj havas silkan veston? – Ho, mia Disinjoro, mia Kreanto! – kriis li ankaŭ triafoje – Sankta Nikolao estas ĝia rudristo!

La reĝo mesaĝis al la kapitano honorigi lian hejmon, paŝi en lian palacon. La korteganoj kuris antaŭ lin por aranĝi lian akcepton, kaj la kapitano iris dignoplene. Ĉiuj admiris lian veston. Ĝi estis plena de diamantoj, ĝian ornamon perloj riĉigis.

– Kapitano, – la reĝo diris al li, – mia palaco estas via palaco, vi povas disponi pri ĝi.

La kapitano dankis pro la belaj salutvortoj, dum ili sorbetis la kafon, kaj suĉis la ĉibukon.

– Ĝuste nun ni festas geedziĝon, – diris la reĝo – la nuptofeston de mia filino. Ĉu vi iĝos nia atestanto por tiu okazo?

– Volonte – respondis la kapitano.

Venis jam la gefianĉoj kaj haltis proksime al la trono, en proksimeco de la kapitano.

– Ĉu vi volas edziniĝi vian filinon kun tiu ĉi homo? – kriis la kapitano, duone frapita pri la vidata fianĉo, duone ĉagreniĝante.

– Ĉi tiu fraŭlo estas la filo de mia unua veziro – respondis al li la reĝo.

– Se li estas tiu, eĉ tiam mi ne povas esti lia atestanto.

– Kial? – la reĝo miris.

– Tial, – la kapitano respondis – ĉar li estas el anoj de servistaro, ĉar mia sigelo troveblas liadorse. En urbo malproksima al ĉi loko, mi renkontis lin penportadantan la malpuraĵojn kaj li iĝis mia servisto. Ankaŭ la ŝipon mi donis al li por hejmenveni. Ĉu mi pravus, vi: malpuraĵkolektisto?

Tiome ekhontis la fraŭlo, ke li tuj forlasis la palacon kaj de tiam oni ne vidis lin.

– Ej, ĉu vi scias, kiu mi estas? – li demandis la korteganojn.

Oni vane rigardis lin, neniun rekonis lin. Nur la koro de la reĝidino batis forte, kaj ŝi jam alkurinte la kapitanon ekkaptis liajn du manojn, alpremiĝante lin ŝi diris:

– Vi estas fianĉo mia, vi estas la filo de nia ĝardenisto.

Ili daŭrigis tiel la edziĝfeston kiel ili finis, nur la fianĉo estis alia, nur la ĝojo iĝis pli granda kaj ankaŭ ilia feliĉo. Rapide kuras la tempo en la fabelo, unu-du monatoj estas tiome mallonga tempodaŭro, kion oni ne kalkulas. La ora ŝipo balanciĝis sur la maro, la juna paro vivis en la palaco, ĝoja estis ilia unua tago, pli ĝoja iĝis la dua, sed la tria estis multe pli feliĉa. La pliaj tagoj sekvintaj ĉi tiujn estis multgrade pli ĝojplenaj. Nur tiu unu tago ne estu veninta, nur la edzo ne estu ekvojaĝinta. Iutage li surŝipiĝis al tiu el oro estanta, adiaŭinte la edzinon li promesis revenon baldaŭan. En la urbo loĝis iu malica sorĉisto, kiu sciigis iel pri la bronza ringo.

– Iel mi akiros tiun ringon – li murmuris en si – se mi vivos portempe.

Ankoraŭ samtage li iris al la maro, kaptis fiŝetojn ruĝventrajn, ruĝvostajn. Antaŭ la palaco li komencis enkriadi:

– Freŝajn fiŝojn mi kaptis, ruĝventrajn, ruĝvostajn!

La reĝa junedzino aŭdis ĉi tion kaj ekdeziris manĝi la fiŝon. Ŝi sendis servistinon por demandi la fiŝiston: kiom da mono kostas la fiŝetoj.

– Mi donas ne pro mono, – la homo respondis, – sed mi donos la fiŝojn pro eluzita bronza ringo, se vi havas tian.

– Ho, tiu stultulo, – la reĝa junedzino ridegis, – de kie mi elprenu bronzan ringon?

– Tiaspeca estas en la ĉambro de la reĝido sub lia kuseno – sciigis la sorĉisto.

– Elserĉu ĝin, – la junedzino ordonis la servistinojn; – kaj se vi trovis, donu al la fiŝisto, se li tiome ekdeziris ĝin.

Oni eniris en la ĉambron kaj vere la bronza ringo estis tie sub la kuseno. La junedzo forgesis ĝin hejme, je sia malutilo. Prenis la servistino la ringon kaj portis ĝin kontraŭ la fiŝetoj. La sorĉisto tre atendis sian hejmeniron kun la ringo. Hejme li elprenis kaj diris al ĝi:

– Mi volas, ke la ora ŝipo ŝanĝiĝu al ligna, nigra ligna, la maristoj estu saracenoj, kaj kiom da kargo ekzistas sur la ŝipo el ĝi estu nigraj katoj.

Kiam okazis la granda damaĝo, ĝuste tiam la kapitano estis sur la vasta maro. Tuj malhelo ĉirkaŭis lin kaj ĉirkaŭrigardinte li rimarkis, ke lia ŝipo estas el nigra ligno, liaj maristoj estas saracenoj, kaj jen ĉi tie iu nigra kato, tie alia nigra kato, kaj multaj katoj miaŭacis ĉirkaŭ li.

– Ho, ve, – suspiris li, – oni forŝtelis mian ringon, venis la fino de mia feliĉo.

Lia ŝipo ĵetiĝadis de unu bordo al la alia, de unu insulo al la alia, la nutraĵprovizo estis jam apenaŭ sufiĉa, ĝi estis elĉerpiĝinta, ankaŭ lia bonsano estis ĉesanta. Jam-jam la malsato turmentis ilin, nur radikojn ili manĝis, kiam iutage aperis antaŭ ili pli granda insulo, kie albordiĝis la ŝipo. La kapitano rigardis kien ajn, kien ajn li paŝis, li vidis ĉie nur musojn kaj musojn. Kelkaj katoj deŝipiĝis kun li, ja la malsato pelis ilin al la bordo. Nu, se ili estis jam tie, do la musoj ekhavis grandan festenon amaran. Unu post la alia venis eksteren la katoj, unu post la alia neniĝis la musoj. Konsterniĝis Musolando, la estraranoj kunsidis por interkonsiliĝi.

– Ĝis la lasta ni neniĝos – la reĝino de la musoj ekparolis, – se oni ne revokos tiujn terurajn katojn.

– Nur la kapitano povos fari, al tiu ni devus diri kelkajn vortojn – ŝia ĉefkonsilanto diris.

– Kiu havas kuraĝon? – la reĝino demandis.

Du musofraŭloj saltas antaŭen, ke ili kaŝiros al la ŝipo antaŭ la kapitanon. Ili kuraĝkore ekiris kaj paŝis antaŭ la kapitanon alparolante lin:

– Nia sinjoro kapitano, reordonu viajn katojn kaj forŝipiĝu de ĉi tie, kontraŭe pereos nia lando, ĝis la lasta muso ni neniĝos.

– Tre volonte mi faros, – respondis la kapitano, – se ankaŭ vi plenumos mian deziron.

– Kion vi deziras? – demandis la du musoj.

– Malproksime, transe de la insuloj, mia lando estas tie, kie perdiĝis mia bronza ringo. Iu sorĉisto vivas en mia urbo, nur tiu povis forŝteli ĝin de mi. Vi aŭ portos por mi tiun bronzan ringon aŭ mi sendos al via lando ĉiujn miajn katojn. Ili estas kelkcentoj.

La du musoj terure timiĝis, ili panike fuĝis.

– Kion ni faru nun? – la reĝino demandis.

Ili kunsidis por interkonsiliĝi denove. Ili disputis, demandis la multajn musojn, sed neniu sciis ion pri la ringo. – Tri amiketoj estas ĉi tie – kriadis kelkuloj foje. Kaj tri musoj venis antaŭen pene irante, ja ili nun alvenis de malproksima loko. El inter ili unu estis blinda, la alia lama, la tria havis moviĝemorelon, kiu nun montris kompreneton pri la temo de la disputo.

– C i n, c i n, c i n, – la musoj cincis, – ni travagadis malproksiman lokon, ni alvenis de la malproksimo.

– Ĉu vi aŭdis ian informon pri la bronza ringo? – la reĝino demandis ilin.

– C i n, c i n, c i n, – ili respondis. – Fiŝojn donis la sorĉisto, bronzan ringon li ricevis pro tiuj; malhelnokte li tenas ĝin en la buŝo, tage li gardas ĝin en la poŝo.

– For! Rapidege tuj foriru kaj portu ĉi tien tiun bronzan ringon, male nia lando neniĝos! – la reĝino ordonis ilin.

La tri musoj konstruis ŝipeton rapide iom fuŝe, sed uzeblan kaj poste ili enŝipiĝis kaj ekiris en la proksimon de la sorĉisto. Vespero estis jam alveninta, sed ili tuj kuris rekte en la palacon, ĉar la sorĉisto translokiĝis tien. Nur la blinda museto restis surborde por gardi ilian ŝipon. La du musetoj traserĉis la palacon, de unu ĉambro al la alia irante, ĝis fine ili trovis la sorĉiston. Tiu ĝuste tiam enlitiĝis enbuŝe preninte la bronzan ringon. Dume la moviĝanta orela museto serĉadis, kaj feliĉe ĝi trovis oleon en iu ujo, en alia ujo troviĝis pipro. Ĝi prenis la vosteton, kaj unue metis ĝin en la oleon poste en la pipron. Ĝi grimpis al la dormanto, ĝuste tiam tiu forte ronkis kaj la museto englitigis la vosteton en la nazotruon.

– A t c i, a t c i – ternis la homo kaj dume la ringo elflugis el lia buŝo.

La lamulo al si kaptis la ringon, la moviĝema-orela museto kaptis la lamulon kaj ekforkuris kun ili haltanta nur ĉe la bordo, poste ĉe la ŝipo. Ilia ŝipo naĝis jam malproksime de la bordo, kiam sekvatage vekiĝis la sorĉisto. Ne demandu pri liaj koleraj agoj, ankaŭ mi ne parolas pri tio. Dume flugis la ŝipeto kun ene la tri musoj. Ili jam proksimiĝis al la lando de la musoj, kiam ili ekmeditis: sulkinte siajn fruntojn kaj jene ili ekparolis:

– De inter ni tri, kiu havas la meriton pro la akiro de la bronza ringo?

- La blinda diris: Mia estas, ĉar mi gardis nian ŝipon.
- La moviĝema-orela diris: Mia estas, ĉar mi elsaltigis la ringon el la buŝo.
- La lamulo interkriis: Mia estas, ĉar mi alkaptis ĝin de la tero.

Ili tiom interkoleriĝis unu al alia, ke ili kaptis vilojn unu de alia, kaj foje hop, la ringo falis en la maron. La tri musoj rigardis unu al la alia senkonsile, sed unu estis blinda inter ili.

– Kion diros la reĝino? – suspiris unu. – Se ni kuraĝos iri antaŭ ŝin, ĝemis la dua. – Ĉi tie estas iu insulo en nia proksimeco, ĉi tie ni povos entombiĝi – diris tre malgaje la tria.

Ili alboridiĝinte faris kuŝejon por si kaj vivetis tagon post tago tiel, ke la blinda museto restis hejme, dum la aliaj du ĉasis skarabojn kaj aliajn manĝeblaĵojn. Malgaje iris-venis iutage la blinda museto, ĉar ankaŭ la malsato suferigis ĝin, krom la sopiro al sia insuleto. Kiam ĝi skrapis per piede kaj flaradis sur la bordo, ĝi stumblis sur fiŝon, kiun la maro ĵus tiam elĵetis. La museto ekmaĉadis la fiŝon, sed neatendite ĝiaj dentoj frapiĝis al iu malmola aĵo. Ĝi kriaĉis post la kunuloj, ili rigardu, kio estas tiu malmola io en la fiŝo.

– La bronza ringo! – kriis la du musoj kaj pro ĝojego ili ekdancis tiel, ke ankaŭ la blindan ili turnis.

Rapide ili eniĝis en sian etan ŝipon kaj kiam ili pripensis ĉi tiun sukceson, ili jam atingis sian insuleton, la landon de musoj. Ili alvenis ĝustatempe. Ja la kapitano jam volis lasi elkuri siajn nigrajn katojn por surkuri la insulon de la musoj. Ili kuris al li kaj transdonis la bronzan ringon. En sia senlima ĝojego la kapitano kriis tiom forte, ke la multaj musoj ĉiuj kaŝis sin. Kun la bronza ringo enmane, la kapitano tiel esprimis sian deziron:

– Mi deziras mian orŝipon, mian belan orŝipon.

Eĉ unu momento ne pasis kaj antaŭ li aperis la orŝipo, el oro ĝiaj tabuloj, el arĝento ĝia masto, el brokaĵo ĝia velo kaj maristoj aktivegis sure, silkvestaj, dek du. Sankta Nikolao ĉe la rudra stango. Kuris la maristoj al la silkecaj veloj, silkecaj haŭseroj kaj la ŝipo flugis kune kun la kapitano reen al lia lando, al lia ornama-tura palaco. La sorĉisto entempe aŭdinte la onidiron, honte forportis sin el la urbo, el la lando, kaj eĉ famo ne restis post li. De tiam la juna reĝa paro vivas siajn tagojn en bona trankvila feliĉo. Baldaŭe reĝo estiĝis el la kapitano, el la filo de la ĝardenisto, kaj kie li aperis kun sia orŝipo, oni klinis kaj kapon kaj genuojn antaŭ li.

La ses fratoj

Foje, sur ia bela insuleto regis la tiama reĝo. Sed la ununuro de la patro, lia filino, pli belis eĉ ol la insulo. Florplena ĝardeno pompis apud la palaco, kie ŝi ludis kun siaj ludkunulinoj, kun knabinoj loĝantaj enpalace. Iutage, dum ilia kaŝludo la reĝidino kaŝiĝis inter la rozujaroj, en ombro de la rozoj, kiam neatendite, kvazaŭ la tero krevus antaŭ ŝi, tioma bruvo estiĝis. Iu terure granda drako antaŭensaltis el la profundo kaj kaptinte la kompatindan knabinon, malaperis kun ŝi. Ŝiaj ludkunulinoj aŭdis nur la grandan kriadon, sed ili vidis nenion. Ili ploure, veade rapidis al la reĝo kaj rakontis al li la grandan malfeliĉon trafintan ŝin. Ho ve, granda estis la malesperiĝo de la kompatinda patro. Ili traserĉis ĉiun loketon kaj angulon por trovi ioman detalon, ili serĉis ŝin en la ĝardeno, en la palaco, en la tuta insulo, sed ŝi ne postlasis spuron almenaŭ por scii nur tiom, ĉu ankoraŭ ŝi vivas, ĉu ŝi jam mortis? La palaco envolviĝis en nigran funebron. La mesaĝportantoj de la reĝo kriis en ĉiuj direktoj: ŝia trovinto, ricevos la reĝidininon por edzinigi kaj ankaŭ la reĝlandon insulan. Venis multaj reĝidoj, iuj surŝipe, aliuloj barke, rajdante, marŝante, sed neniuj eksciis ion, neniuj atingis sukceson. Iutage aperis maljuna sinjorino antaŭ la reĝo, proponanta, ke ŝi forsendos siajn ses filojn por trovi la reĝidininon:

– Mi havas ses filojn fraŭloaĝajn, ilia forto estas kiel tiu de la virbovo, kaj ili timiĝas de nenio.

– En kiuj aĝoj prezentiĝas iliaj fortoj? – demandis la reĝo.

– Eĉ mi ne scias, mi mem ne vidis tion – respondis la maljunulino, – sed se vi donos materialon por unu ora vesto, mi sendos ilin por serĉi vian filinon la reĝidininon.

Al la sinjorino la reĝo transdonis la materialon por vesto, la sinjorino portis ĝin hejmen kaj komencis kudri ĝin. La tempo jam komencis vesperiĝi, kiam ŝia unua filo alvenis hejmen. – Al kiu vi kudras tiun veston? – li demandis sian patrino.

– Al mia plej bona filo – respondis lia patrino.

– Ĉu ne mi estas la plej bona? – la fraŭlo demandis.

– Nur tiam mi konus vin tia, se mi konus vian forto. – diris al li lia patrino. – Tio donas al mi forton: se mi metas mian oreilon surteren, mi aŭdos ĉion ekzistantan en la granda mondo – diris ŝia filo.

– Al vi mi kudras ĉi tiun veston – lia patrino ridetis al li.

Venis poste ŝia dua filo, ankaŭ li demandis pri la afero de la vesto, la patrino demandis ankaŭ lin pri lia forto.

– En tio estas mia forto, – ŝia filo respondis, – ke ne ekzistas tia peza aĵo en la mondo, kion mi ne povus levi. Eĉ se estus sur mi dek du homoj, mi tiel forkuros kun ili, ke neniuj povos postatingi min.

– Al vi mi kudras ĉi tiun veston – la patrino ridetis al li.

Unu post alia alvenis ŝiaj pliaj filoj, ĉiuj raportis pri sia forto, ŝi promesis oran veston al ĉiu. La tria filo diris:

– Mi tiel elprenas la bovidon el la abdomeno de ĝia patrino, ke la patrino ne rimarkas.

La kvara filo rakontis: kiam li per pugno tiel forte enfrapis en la aeron, ke la movo donis siblan sonon, laŭ la spuro de lia pugnofrapo (sekve la pugnosvingon) estiĝis turo. La kvina filo fanfaronis per tio: kiam aglo forkaptis ŝafidon de la tero, poste ĝi flugis kun la kaptaĵo supren tiome, ke el ambaŭ videblis nur kuloj, li perokule povis ekrimarki ilin kaj tiel pafi persage la aglon, ke la ŝafo restis netuŝita, nevundita.

– Kaj ĉu vi? – demandis la sinjorino sian sesan filon.

La sesa filo respondis:

– Kiam mi postflugis de mi alĉiele supren ĵetantan pomon, mi povis kapti ĝin ĉe la horizonto tiel, ke mi povis revenigi ĝin ne difektita al la tero. Miregis la sinjorino laŭ la

preparoloj de siaj filoj kaj rapidis raportoj al la reĝo. La reĝo vokigis la ses fraŭlojn por ordoni ilin: serĉi lian filinon kaj porti hejmen viva aŭ morta. – Nu, nia patrino bone provizis nin – murmuris en si la ses fraŭloj kaj ĉiuj ses ekvojiris.

Ili iris longtempe jam per grandaj distancaj paŝoj, nur la malsato haltigis ilin. Tiam la unua fraŭlo subkliniĝis, sian orelon li metis al la tero, kvazaŭ li aŭdus ian ploradon-lamentadon, tre malproksime en la terprofundo. Li rakontis pri tio al siaj fratoj. Nu ili cerbumis kiel trovi tiun lokon. Ili iris paŝante longajn distancojn tre klopodantaj progresi pli rapide antaŭen, pro la dume de malproksimo ekrigardanta granda monto. Ili proponis al tiu frato – kiu povis vidi eĉ kulon el malproksimo, – li ĉirkaŭrigardu, eble li vidos ion gravan. Ĉirkaŭrigardis la fraŭlo, ankaŭ al la montego, nu li vidis, ke iuj levas grandan ŝtonplaton montopinte kaj poste ili malaperas sub ĝi. La ses fratoj rapidis tien. Tiu junulo, kiu kapablis levi iun ajn pezan aĵon, kiu povas ekzisti enmondo, post levo de la ŝtonplato, rimarkis ŝtupojn sub ĝi.

La ses fratoj ekiris stumbladante en la malhelto suben, sur la ŝtupoj. Ili pasis ĝis atingo de palaco. Ili malfermis la pordojn kaj trairis la multajn ĉambrojn kaj ĝardenojn. En unu laŭbo sidis la reĝidino kun la drako apude dormanta kun malfermitaj okuloj. Ili prenis je la mano la reĝidinon kaj rapide ekiris kun ŝi sur la multaj ŝtupoj, supren al la pinto de la granda monto. Tiu fraŭlo kaptis la fraŭlineton kaj siajn fratojn, kiu, kiam dek du homoj estis sur lia dorso, eĉ tiuokaze povis kuri tiel, ke neniu povis postatingi lin. La fraŭlo kuris kiel fulmo. Dume la drako vekigis kaj rimarkis, ke neniu estas proksime, ĝi sentis nur la odorojn de la fremduloj. Senprokraste ĝi postkuris la fraŭlineton kaj jam preskaŭ postatingis ilin, kiam tiu frato venis helpi, kiu frapante en la aeron pugnosvinge faris, ke la turo leviĝis tie. La fraŭlo forte svingis pugne, kaj jen granda turo leviĝis tuj antaŭ ili, kien ili ĉiuj enkuris. De tie ili gvatis la alvenon de la drako. La drako antaŭen kuregis fajrovomante, tuj rekte al la turo, sed la turomurojn ĝi ne povis trarompi. La reĝidino staris ĉe la fenestro de la turo, kun sia bela vizaĝo kun tri vualoj. Rigardante ŝin, la drako planis ruze alproprigi ŝin. Ĝi elprenis oran pomon kaj komencis ludi kun ĝi tiel, ke ankaŭ la fraŭlineto povu vidi.

– Ho, kiom bela pomo, kiom ĝi brilas! – ekkriis la fraŭlineto.

– Vi povus doni al ŝi – la fraŭloj kriis al la drako.

– Kiam ŝi deprenos unu vualon de ŝia vizaĝo – respondis la drako.

La fratoj deprenis unu vualon, tiel ili montris ŝin al la drako. La drako ĝojis, ke ĝi almenaŭ iom povis spekti la vizaĝon de la fraŭlineto, kaj ĵetis tien al ŝi la oran pomon. Ŝia vizaĝo pli bele brilis de ĝi. Poste la drako elprenis pli belan pomon.

– Kiom bela pomo, kiom ĝi lumas! – la knabino ekkriis denove.

– Ĉu ankaŭ ĉi tion vi povus doni al ŝi? – la fraŭloj kriis.

– Kiam ŝi deprenos ankaŭ la duan vualon – la drako respondis.

Ili deprenis de ŝi ankaŭ la duan vualon, tiel ankaŭ la duan pomon ekhavis la fraŭlineto. La drako elprenis la trian pomon, de kiu brilegis ĉio.

– Ho, ve, se ankaŭ tion mi povus havi! – la fraŭlineto kriadis tre avide.

– Ankaŭ ĉi tiu povus esti via, – la drako kriis al ŝi – kiam vi deprenos ankaŭ la trian vualon kaj staros al la fenestrokornico. Ne fidinte al la drako la fraŭloj hezitis plenumi la peton. Sed la fraŭlineto petegis tiom, ke ili tre malfacile konsentis pri la ŝanĝo. Ili deprenis de la vizaĝo de la fraŭlineto ankaŭ la trian vualon, kaj ili lasis stari ŝin al la kornico de la fenestro, ili lasis. ke la drako vidu ŝin. Ŝia beleco forte brilis, ŝia vizaĝo estis brilanta. La drako prenis la trian pomon sed dum ĝia ĵeto al la fraŭlineto, neatendite ĝi ŝanĝiĝis al aglo fluganta al la fenestro por kapti la reĝidinon kaj ekflugis kun ŝi al la nuboj. La fraŭloj nur staris skandaligante kaj gvatis en la altecon.

– Ne timu, – konsolis la fraŭlo sciinta flugi – kaj tiumomente, kiam la drako kune kun la fraŭlineto jam estis tiom alte, ke ili videblis kiel kuloj, li prenis la sagon kaj depafis per ĝi la drakon.

La sesa fraŭlo, kiu povis postflugi al la suprenĵetita pomo tiel, ke li povis kapti ĝin ĉe la horizonto, flugis post la knabino, ŝin al sia sino kaptis kaj kun la reĝidino sendifekta, li reflugis al la tero. Post ilia sukcesa surteriĝo la drako komencis fali al la tero, kie ĝia korpo dispecetiĝis al multmiloj da pecoj. Granda ĝojo kreigiĝis inter la fraŭloj. Poste ili hejmeniris kune kun la fraŭlineto en la palacon de ŝia patro. La gepatroj de la fraŭlineto ploris pro la granda ĝojo kaj ili dankodiradis senfine. La reĝo estis senkonsila, al kiu li donu sian filinon el la ses fraŭloj: – Al kiu mi donu mian filinon? El inter vi, kiu postulas? Bedaŭrinde estas, sed mi ne havas ses filinojn, por ke vi ĉiuj havu fianĉinon.

Ekparolis la unua fraŭlo:

– Min koncernas la fraŭlino; mi trovis ŝian restadejon.

Ekparolis la dua fraŭlo:

– Mi levis la ŝtonon, ŝi koncernas min, mi sursultrigis vin por fuĝi.

Ĉi-maniere respondis la tria fraŭlo:

– Miaj okuloj gardis.

Alparolis la kvara fraŭlo:

– Kio estus okazinta sen la turo de mia mankavo?

Sursaltis la kvina fraŭlo:

– Kiu mortigis la drakon?

La sesa fraŭlo trankvile demandis:

– Ĉu vi pensis jam pri tio, ke post la falo la reĝidino surteron atingante estintus frakasiĝinta sen miaj brakoj savaj?

La reĝo ĝisaŭskultis iliajn voĉojn kaj diris solvon trafante:

– Unu el inter vi nur sola ne povus solvi la aferon. Inter vi meti pravon estas ne aprecata tasko. Ĵuru, ke vi ne koleros unu al alia, se mia filino elektos el inter vi.

– Ni ĵuras – la fraŭloj respondis, – ke ni akceptos la elekton de la reĝidino.

Venis la reĝidineto. Ŝi okulumis la ses fraŭlojn ridetante al ĉiuj, ŝi havis karan diron al ĉiuj, sed elektis la plej junan. La aliaj kvin fratoj klinis sin antaŭ ŝi, manon kisis al ŝi kaj ĝojis pro la feliĉo de la plej juna. La reĝo iom meditante rigardis ilin, poste diris:

– Via afero ne estas finita! Ses fraŭloj ses fianĉinojn meritas! Ses fidelaj koroj meritas ses fidelajn korojn!

La reĝo vokis la plej belajn filinojn de siaj kvin korifeoj de sia palaco kaj samtempe ses geedziĝofestenojn ili okazigis. La reĝo pridonacis ilin riĉe. La ses fraŭloj ĝoje vivis en la ricevita palaco en potenco riĉhave, en senlima feliĉo. La plej ĝoja estis ilia patrino kudrinta unu post la alia la orajn vestojn, foje al siaj fortegaj filoj, foje al siaj genepetoj.

La ora vergo

Foje tiel okazis, ke reĝidino estiĝis la reganto. Por ŝi venis multaj svatigantoj el ĉiuj direktoj de la vasta mondo, reĝidoj, sveltaltoj fraŭloj. La fraŭlino estis la plej bela inter la belaj, multaj fidelaj koroj sopiris ŝian amon.

– Nur tiu estos mia edzo – la reĝidino diradas, – kiu atingante la duonokulan drakon, portos al mi ĝian oran vergon. Nure tiu ekhavas min neniŭ alia.

La ora vergo havis magian kapablon: ĉiuj pordoj malfermiĝis antaŭ ĝi. La unuokula drako estis tiom enorme granda, ke oni ne riskis iri eĉ en ĝian proksimecon, ne nur por ekscii ion pri ĝia groto.

Iutage venis iu fraŭlo, kavalirstatura reĝido, kiu promesis kunporti tiun oran vergon ĉiumaniere. Sekvatage li ekvojiris al la lando de la drakoj. Dum lia marŝo li preskaŭ stumblis en maljuna sinjorino kribrinta farunon survoje. Antaŭ ŝi estis pastokorbo, en tiun ŝi kribris la farunon. La fraŭlo haltis kaj vidis, kvankam la sinjorino volis kribri la farunon en la pastokorbon, sed tio falis tamen sur la vojon. La sinjorinon li alrigardis por serĉi kialon. Li vidis, ke la kompatindulino estis blinda, tial ŝi kribris al malĝusta loko.

– Onklino mia! – salutas ŝin la reĝido, – vi faligas la multan farunon al la tero. Donu al mi la farunon, mi trakribros anstataŭ vi.

Li jam prenas la kribrilon, kribras la farunon kaj verŝas ĝin en la sakon. Li agis zorgeme, bele, ke neniom perdiĝu el ĝi.

– Per kio mi rekompencu vian bonecon? – demandas lin la blinda maljuna sinjorino.

La reĝido perpete turnis sin al la maljunulino:

– Mi ĝojos, se vi donos al mi informon pri la groto de la unuokula drako. Ĝi havas iun oran vergon, kiun mi ŝatus akiri por mi iel. Ĝi farus feliĉa du homojn.

– Ve, mia fileto, – komencis la onjo, – vi ne povos facile atingi ĝin. Sed la benoj de via patro, patrino kaj mia, iel certe helpos vin. Bone atentu mian instruon: de ĉi tie la vojo kondukas al herbejo, de tie al la monto, tie estas la groto de la unuokula drako. Jen, prenu ĉi tiun kruĉon. Ĝi plenas per vino. La pliajn vi mem eltrovos. Kiam vi estos en la proksimeco de la drako, rapide vi klopodu akiri ĝian ŝlosilon. Ĝin ĝi portas ligite en sia barbo. Kiam la ŝlosilon vi havas jam, iru supren en la turon, kies pinton ankaŭ de tie ĉi vi povas vidi, kaj malfermu per ĝi la pordon. Eniru en la korton. La pliajn vi eltrovos. Nun iru kredante dian helpon. Multan feliĉon.

Ekiras la reĝido kaj al la tria tago li estas jam en la proksimo de la groto. Li ĉirkaŭrigardias enpaŝante, sed li ne vidis la drakon tie. Anstataŭ ĝi li trovis unu grandegan patkukon (flanon) estinta tiel multe grandmezura, ke liaj okuloj laciĝis dum ĝia rigaĝo. Li estis malsata, do li deigis de ĝi iom da peceto kaj ĝue formanĝis. Multaj kruĉoj staris laktoplene apud la patkuko, ĉar ii estis ankaŭ soifa, do li malplenigis unu kaj anstataŭ tio li metis sian vinan kruĉon. Poste li kaŝis sin, ne ekvidu lin la drako, se dume ĝi povos alveni.

Vesperkrepuskiĝas. Li aŭdas el ekstero la sonon de koltintado. La fraŭlo kasrigardadas kaj timiĝadas la kompatinda, kiam li ekrigardas la drakon. Ĝi venas rekte en la groton, antaŭ ĝi la granda ŝafregro. Ĝi enpelas la ŝafojn, poste grandan ŝtonon ĝi rulas antaŭ la enirejon, post kio, li melkis la ŝafojn. Finanta la laboron ĝi sidiĝas por komenci la vesperan manĝadon.

– Kurioza, – murmuris la drako, – kvazaŭ estus rompita iom el mia patkuko. Ho, jen! Eĉ ankaŭ iu kruĉo estas apud ĝi!

Ĝi prenis la kruĉon kaj gustumis la vinon, poste ĝis tiam ĝi gustumis, la vinon, dum la drako elĉerpis ĝin ĝis la lasta guto. Ĝi penstariĝus el sia sido, sed ĝi ne povas stari sur siaj piedoj, ĉar damaĝis al ĝi la multaj vinoj. Ĝi terenfalas kaj tuj endormiĝis. Tia estas ĝia ronko, kia estas la ĉiela tondro.

La reĝido atendis nur ĉi tion. Tre singardeme li antaŭenpaŝadas, ekflamigas la fajron, poste elprenante iun bastonon li fajrigas ĝian pinton por esti arda, li forbruligas la unusolan okulon de la drako. Kriegas la terure enorme granda drako, kiel toleras tion ĝia gorĝo, pro kio antaŭen kuregas multaj drakoj, el la familioj de la ĉirkaŭaĵe loĝanta drakoaro.

– Kio mankas? Kio malbona? Kial vi ŝrikas? – demandas ĝin la kunuloj.

La drako estis ankaŭ ebria, ankaŭ la sentata doloro estis terure granda, pro kiuj ĝi povis elĝemi eĉ ne unu vorton. La reĝido dume kaŝis sin sub la ventron de iu virŝafo, kaj kiam la grego estis elpelita, li povis kaŝiri for kune kun ili. Dum la drako kriegadis, li malligis la ŝlosilon el ĝia barbo.

Poste ne perdi tempon, li kuras al la turo, por malfermi. Kiam li paŝas tra la pordo, tie en la korto staras ĉevalo kaj hundo. Antaŭ la ĉevalo estas aro da ostoj, antaŭ la hundo estas stako da pajlo. La fraŭlo metis la pajlon antaŭ la ĉevalon kaj la ostojn ĵetas al la hundo. Post la bonsatiĝoj de la du bestoj, ili jene alparolas la reĝidon:

– Kiel vi kuraĝis veni ĉi tien? Fuĝu de ĉi tie, se kara estas via vivo al vi, ĉar venos la unuokula drako kaj ĝi frakastos pecetojn kaj splitojn el vi.

– Mi estingis jam ankaŭ la vidkapablon de ĝia unusola okulo – respondas la fraŭlo.

– Diru tion al mi, kie estas ĝia ora vergo?

– Malfermu dekstre ĉi tiun ĉambron – ili klarigis al li – du reĝidinoj estas ene, ambaŭ ŝnurligitaj. Ili povos diri, kie estas la ora vergo de la drako.

La fraŭlo trovas la du fraŭlinojn, li liberigas ilin kaj rakontas al ili pri la drako. Al la bona famo ekbrilas la vizaĝoj de la fraŭlinoj, kaj ili tiel turnas sin al la fraŭlo:

– En la korto kiom da bestoj estas, iam ili estis reĝidoj, kaj eskortanoj de reĝidoj. Ili ĉasis iam ĉi regione kaj envenis ĉi tien por ioma ripozo. Sed la drako ekvidis ilin, sur ilin ĝi aspergis ion, kaj el ili bestoj estiĝis. Prenu ĉi tiun oran vergon, eventuale vi povos helpi ilin.

La reĝido enmanigas la oran vergon kaj kiel li tuŝas la multajn bestojn unu post alia, tiuj reviviĝas kiel homoj. Iuj estiĝas reĝidoj, aliuloj estiĝas eskortanoj. Ili plore ĵetas sin ĉirkaŭ la kolo de unu al la alia, brakumadas unu la alian, ili surgenuas antaŭ la reĝidon, tiel dankegadas al li pro la liberigo. Kiam la reĝido paŝas antaŭ la hundon kaj la ĉevalon por tuŝi ankaŭ ilin per la vergo, ili timeme diras:

– Ne tuŝu nin per la vergo. Ni havas tempon al tio – diras la ĉevalo. – Mi portos hejmen la du reĝidinojn. – Kaj mi, – diras la hundo – gardos la drakon, por ke ĝi ne povu proksimiĝi al ni.

Tiel okazis ĉio, kiel volis la du bestoj. Ĉiuj ekiras, la du reĝidinoj sidante ĉevaldorse, la hundo post ili. Kiam ili atingis la landvojon, la multaj savitaj reĝidoj adiaŭis ilian savintan reĝidon kaj ĝoje iris for, ĉiuj en sian landon. Nur la du reĝidinoj restis kaj la du fidelaj bestoj. La reĝido akompanis ilin al la kortego de ilia patro.

La gepatroj ne sciis, ĉu ili nur sonĝas aŭ estas veke? Ili apenaŭ povas kredi la grandegan ĝojon atinginta ilin.

– Kiu estu via edzino? – demandas la reĝo la fraŭlon.

– Eĉ ne unu – respondas la fraŭlo, – ĉar jam mi havas fianĉinon.

Nun jam alvenis la tempo, por ke li tuŝu per la ora vergo la ĉevalon kaj la hundon. Post la magiaj tuŝoj aperis tie du reĝidoj, ĉiuj kavalirstaturaj junuloj, ĉiuj belaj, el ili oni ne povis elekti, tiome belstaturaj estis ambaŭ. El la du, unu reĝido jene ekparolis:

– Kiam la drako forrabis ĉi tiujn du reĝidinojn, ni du ekvojiris por liberigi ilin. Sed ni trafis inter la ungojn de la drako kaj ĝi sorĉis nin bestoj.

– Nu, tiuokaze vi estas miaj bofiloj – ĝojegas la reĝo kondukante ilin al liaj filinoj.

Poste la fraŭlo adiaŭas la reĝon kaj de la du feliĉigitaj fianĉoparoj kaj ekrapidis al la korto de la reĝidino por transdoni la oran vergon.

Ej, sed de tiam tre malĝojiĝis la reĝfraŭlino pro la ebla pereco de la reĝido.

– Li povas perei, mortfali kaj mi estos la kaŭzinto – ŝi suspiris ofte. Ŝi iĝis preskaŭ malsana pro sia malĝojo.

Ŝi fermigis la pordegon de sia palaco, neniu eliru kaj neniu povu eniri. Ej! Dume staras jam tie la reĝido. Sed, li vidante la fermitan pordon li apenaŭ tuŝas ĝin, kaj jen! La pordo malfermiĝas antaŭ li! Tuj revenis la bona sano de la reĝidino, kiam ŝi ekrigardis la reĝidon. Baldaŭ unu geedza paro estiĝis el ili, kaj ili vivis gaje kaj feliĉe ĝismorte.



Regiono de Termopiloj (Defilejo de Tesalio)

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=62382>

La kvinoble bela

La tiama reĝo havis edzinigeblan filinon. Iutage el fora lando venis svatiganto por ŝi, reĝo de alia lando.

– Nur tiel mi eldonas ŝin por edzinigi, – diris la reĝo, – se vi restos en mia lando, en mia palaco kaj vi forportos mian filinon de mi nek hodiaŭ nek alia foje.

Ili iĝis geedzoj kaj vivis pace. Sed, iutage venis mesaĝo, en kiu oni sciigis: se la juna reĝo ne reiros baldaŭ, aliulo estas elektota anstataŭ li. La juna reĝo meditis gratinte al si la orelbazon, poste turnis sin jene al sia edzino:

– Mia sinjorino, mia edzino, se Dio benos nin per filo, kaj se tiu adoleskiĝos fraŭlo, sendu lin al mi, al lia patro. Nur tion vi votigu, promesigu kun li: neniam li amikiĝu kun kalvulo, eĉ ne parolu kun tiu. Sed, se ni ekhavos filinon, al tiu vi edzinigu ŝin, kiun ŝia koro elektos.

Plorante ili adiaŭas unu la alian, kaj la reĝo ekiras al sia lando. La tempo pasis kaj la reĝedzino naskis filon. Ŝi prizorgis lin, nutris lin, kaj kiam la filo iĝis jam fraŭloaĝa,¹⁰ la patrino transdonis al li la mesaĝon de lia patro. Nome la peton por viziti lin la patron al lia lando, sed la filo ne elektu amikon kalvan, eĉ tute ne parolu kun tiu.

Preparas sin la fraŭlo al la vojaĝo. Li serĉas kunvojaĝanton por vojaĝi ne sola. Sed la klopodo montris sin senrezulta por trovi konvenan vojkunulon en la tuta urbo, li trovis neniun alian, nur unu kalvan homon. Fine li enuis la sensukcesan strebon, kaj li akceptis la solan eblon, ke lia servisto estu tamen la homo senharara. Li adiaŭis sian patrinon kaj ekiris al la lando de sia patro.

Ili atingis jam preskaŭ la vojuonon, kiam la kalvulo kaptegis sian dormetantan mastron, li ŝnurligis la manojn kaj la piedojn. Poste li metis malvestigite la fraŭlon super la aperturon de iu puto profunda. La reĝidajn vestojn mem la kalva homo surigis al si, la proprajn vestojn li volis doni al la reĝido.

– Ĵuru! – kriaciis al li la kalvulo, – ke vi diros al via patro, mi estas lia filo kaj vi estas mia servisto! Se vi agos tiel, vi ne havos mistrakton, mi ne ĵetos vin en la puton. Via sorto estos same, se intertempe vi mortos, aŭ vi releviĝos el la mortintoj.

Kion faru la povruleto? Li ĵuris al ĉiuj sanktaj: al vivoj de la patro kaj patrino. La kalvulo deprenis la reĝidon de la putobuŝo, liaj manoj kaj piedoj estiĝis deligitaj kaj poste ili daŭrigis la vojaĝon. Ili iris, marŝis ĝis la alveno en la alian landon al la palaco de la tiea reĝo. La kalvulo estis la reĝido, la vera reĝido estis la lakeeto de la kalvulo. La reĝo kaj ĝojis al sia filo kaj ne.

– Ĉu vi estus mia filo? – demandas li la kalvulon kun malkonfidaj okuloj.

– Eĉ mia servisto ĵuros al tio – respondas trankvile la demandito.

La reĝo akceptis la respondon per rezignacio, nur lia koro diris neon. Iutage la reĝo kaj la kalvulo promenadas en la ĝardeno. Preskaŭ ĉiujn ĝiajn loketojn kaj angulojn ili envagis, nur ĉiam ĝian unu flankon preterpasis la reĝo.

– Kial ni ne iras en tiun direkton? – demandas la kalvulo la reĝon.

– Tial, ĉar iu drako kampadas tie, kaj ĉiun ĝi manĝegas ĵetiĝanta en sian direkton.

– Mi sendos tien mian lakeeton – diras la kalvulo, – finu li la drakoaferon.

La reĝo vane malpersvadas deadmonante lin, la kalvulo ne lasis sin konvinki. Li ordonis per strikta tono al sia servisto, al la kompatinda tre juna reĝido, ke sekvatage li iru kontraŭ la drako. La kompatinda fraŭlo iris en la stalon por elekti ĉevalon por si. Inter la ĉevaloj estis unu maldika ĉevalaĉo kaj blinda kaj lama, li tamen pleje ŝatis ĝin kaj nun li elektis ĝin.

– Kial vi malgajas, mia kara mastro? – la maldika ĉevalo demandas.

¹⁰ Tiu vorto esprimas la aĝon, kiam la lipharoj de la junuloj (fraŭloj) jam komencas kreski.

- Al la kampadejo de la drako sendas min mia malica mastro. – respondas la fraŭlo.
- Faras nenion! – diras la ĉevalaĉo – nur faru, kion mi diras al vi. Graso de sebumo estu ĉe vi kaj kiam vi ekvidos la drakon, ĵetu tion al ĝi. Tiam ĝi malfermos la okulojn, glutos la sebumon kaj diras al vi, ke pro via bona faro deziru ion. Respondu:
- Glutu min, por, ke estante en via stomako, mi povu ellerni la parolon de la bestoj.
- Tiel okazis ĉio, kiel diris lia ĉevalo. Li ĵetis la sebumon al la drako, kaj li ellernis la parolon de la bestoj. Kiam li deiĝis el la drako, li reiris en la palacon al sia kalva mastro. La reĝa kortego forte surpriziĝis ekvidante lin kaj demandis, kion li vidis ĉe la drako, kion ĝi faris.
- La drako mesaĝas, ke vi povos libere promeni en sia ĝardeno, neniuj havos mistrafon.
- La sekvan tagon la kalvulo promenis al tiu direkto, liaspure kun du servistoj. Du birdetoj sidis sur malgranda arbo kaj pepadis unu kun la alia. La reĝido atentinte ilin dume ekridetis.
- Pri kio vi ridetas? – demandis lin la kalvulo.
- Kial mi ne ridetu? – respondis la servisto – ja ĉi tiuj birdetoj pepadas pri tio; nur unu bela fraŭlino ekzistas en la vasta mondo, tiu estas la kvinoble bela blondulino.
- Venigu ŝin ĉi tien je mia ordono, – diris la kalvulo, – se via vivo via karas por vi!
- Malgaje, malrapide iradis la fraŭlo al lia ĉevalo, al tiu lama kaj blinda, kaj li elverŝis sian koron al ĝi. Sia ĉevalo respondis:
- Mi kondukos vin tien, sed ankaŭ de nun vi obeu min.
- La sekvan tagon kiel ili galopis sur la vojo, ili atingis riveron, kie ili planis ripozi iom. Kiam li paŝis sur la teron, li vidis kiome svarmas la formikaro sur la riverbordo volanta traĝi la riverakvon por akiri la transbordan pli multan manĝaĵon. Li komprenis la inklinon de la formikoj kaj faris ponteton por ili, ke sur ĝi ili povu trairi. Ili vere trairis sur ĝi kaj ekhavis la semojn ĝis satiĝo. Dume al la fraŭlo paŝadas grandega formiko, certe ĝi estas la reĝo de la formikoj, kaj diras al li:
- Akceptu de mi ĉi tiun flugileton, kaj forbruligu, se vi enmiksiĝos en malagrabraĵon. Helpi vin estos nia tasko.
- La fraŭlo daŭrigis la vojaĝon. Survoje li renkontis abelsvarmon, kio ĉirkaŭflugis lin. Avane flugis la abelreĝino, la povruleto estis ege malgaja.
- Kia malbono povis atingi vin? – demandis la fraŭlo.
- Iu urso venas ĉi tien – respondas la Abelreĝino – tiu formanĝas nian mielon. Ni malsatmortos pro tiu.
- Mi helpos vin por eviti tiun malbonon! – diras konsolo la fraŭlo. – Kiam venos la urso denove?
- Ĉirkaŭ noktomezo – respondas la reĝino.
- La fraŭlo embuskas la urson, kiam ĝi antaŭambulas malrapide al la abeloj. Li atakas kaj per unu frapo mortfaligis la urson. Alflugas la reĝino al la fraŭlo kaj diras:
- Akceptu de mi ĉi tiun pikileton kaj forbruligu, se vi enmiksiĝos en malagrabraĵon. Helpi vin estos nia tasko.
- La fraŭlo ekiras plu denove, kaj kiam ili paŝadis plu penete, neatendite du agloj ekflugas tuj antaŭ ili. Ili ploras, amare kriaĉas.
- Kial vi ploras birdetoj? – demandas ilin la fraŭlo.
- Kiom da niaj birdidoj ekvidas la lumon – suspiradas la agloj – ĉiujn deprenas de ni iu malica serpento.
- Helpos mi vin kontraŭ via malbono. – konsolas ilin la fraŭlo. – Kiam antaŭgrimpos tiu serpento?
- Ĉirkaŭ tagmezo – respondas la du agloj.

La fraŭlo embuskiĝis. Kiam ĉirkaŭ tagmezo la serpento komencis grimpi al la nesto, ĝin surbate per la glavo li tuj tranĉas al du pecoj. Estis ja granda ĝojo ĉe la agloparo. La viraglo flugas al la fraŭlo kaj diras:

– Akceptu de mi ĉi tiun plumeton kaj forbruligu, se vi enmiksiĝos en damaĝon. Helpi vin estos nia tasko.

Ili adiaŭis unu la alian kaj ĉiuj daŭrigis siajn farenaĵojn. Surĉevale la fraŭlo pasas plu kaj alvenas baldaŭ al iu palaco, al la reĝa kortego de la kvinoble bela blondulino. La fraŭlo alpaŝas antaŭ la reĝon kaj petas lian kvinoble belan blondan filinon por edzinigi al sia reĝido-mastro. La reĝa respondo estas:

– Se vi plenumos mian ordonon, tiukaze mian filinon mi donos al via reĝido-mastro.

– Kion vi ordonas? – demandis la fraŭlo.

– Granda sako estas en la maizejo – respondas la reĝo – ĝi plenas per tritiko, hordeo kaj lolo. Unu horon vi ricevas por agi. Se dum tiu tempo vi apartigos la tritikon, la hordeon kaj la lolon unu de la alia, via sinjoro estos la edzo de mia filino, sed se ne, vi adiaŭu vian kapon!

Eniras la fraŭlo en la maizejon apud la sakon, li elprenas laflugilon de la formiko kaj forbruligas. Tuj aperas la multmiloj da formikoj kaj eĉ ne pasis unu horo, sed jam staris en apartaj montetoj la tritiksemoj, la hordeosemoj kaj la lolosemoj. Kapsignis la reĝo kaj diras:

– Vi ne finis tute viajn taskojn. Morgaŭ kvardek fraŭlinoj staros antaŭ vi, unu estas tia, kia estas la alia. Inter ili staros mia filino: la kvinoble bela blondulino. Se vi eltrovos, kiu estas ŝi, vi povos porti ŝin al via sinjoro. La fraŭlo eliris en la korton. Li bruligis la pikileton de la abelo, poste tuj aperis granda abelsvarmo avane kun la reĝino, kiu konsole parolis al la fraŭlo:

– Ne timu, vi rekonos la kvinoble belan blondulinon. Mi flugos al ŝia dekstra ŝultro, vi povos rekonu tiel tiun filinon.

Sekvatage la fraŭlo iras en la palacon, kie oni kondukas lin en iun ĉambregon. Kvardek fraŭlinoj staras unuvice, ĉiuj estas unuformaj, ĉiuj estas bele blondaj. La fraŭlo rigardas ilin kaj sur la ŝultro de iu fraŭlino li ekvidas la abeleton.

– Ĉi tiu estas la kvinoble bela blondulino – ekkrias la fraŭlo – ĉi tiu estas la elektito de la reĝido.

– Mia fraŭleto – diras la reĝo – se vi mem petus mian filinon al si mem, mia filino tuj estus via. Sed kiu, kia estas via reĝido, ke li laborigas aliulon anstataŭ si? Ankoraŭ unu laboro atendas vin, ankaŭ tion vi devas plenumi.

– Mi staros je via dispono! – diris kuraĝe la fraŭleto.

– Al mia filino portu la akvon de la vivo – diris la reĝo – por ankaŭ gardi ĝin al tiu okazo, kiam eventuale vi povos utiligi ĝin.

Senesperigante ekiras la fraŭlo al sia ĉevalo.

– Kion mi faru, ĉevaleto mia? – demandas li sian ĉevalaĉon.

– Tuj sursidu min – respondas la ĉevalo, kaj neatendite, el ĝi iĝis tia nobla ĉevalo, kies okuloj fajreris ne estis blindaj, ĝi ne estis maldika, eĉ lama ne estis.

Li abrupte eksaltas al ĝi kaj forgalopas tiel, ke eĉ la vento ne atingas ilin. Sur iu montopinto la ĉevalo abrupte haltas. Nigraj nuboj ĉirkaŭis ilin, tondris la ĉielo kaj zigzakis la fulmo.

– Nun la agloj devos helpi – diris la nobla ĉevalo.

La fraŭlo elprenis la agloplumon, forbruligis ĝin. Kiam ĝi forbruliĝis, aperis tuj la viragloflugilojn klakigante kaj demandante la fraŭlon:

– Kion vi deziras, mia mastreto?

– Mi deziras la akvon de la vivo, oni deziras tion de mi – diras la fraŭlo.

– Tuj ĝi estos ĉi tie – diris la aglo.

Li ne povis eĉ fini la diron de la preĝo: Patro nia, kaj jam revenis la birdo, enbeke portanta kristalbotelon ene kun la akvo de la vivo.

Li dankis dankeme pro la akvo, poste li surseliĝis kaj baldaŭe ili estis denove en la palaco. La vitroboteleton li transdonis al kvinoble bela blondulino. La gardon de sia filino la reĝo komisiis al la fraŭlo, kaj ili reiriis tiel en la landon de la patro de la fraŭlo. La kalvulo estis feliĉa, nur sian serviston li ne volis vidi antaŭ si.

– Iel, mi povos mortigi tiun – li pensis en si.

La kalvulo plaĉigis sin al la fraŭlino, li estis ĉiam en ŝia proksimeco. Dume li urĝigis la tenon de la nuptofesto. La reĝo nur pli ĝeme ol eme, sed la kalva fianĉo multe pli.

– Mia patrosinjoro, – petegas la fraŭlineto al la reĝo – ne urĝigu la nuptofeston, unue lasu min ekkoni por ellerni vian filon.

La reĝo ne bedaŭris, la afero ne estis laŭ lia gusto. Malĝoje iris-venis la fraŭlineto, ŝi trovis lokon nenie. Ŝi evitis la kalvulon kiel eblis. Ŝi ne havis simpation liadirekte, sed ŝi plie ŝatis la servistan fraŭlon.

Vekiĝas suspekto en la kalvulo kaj li plektas venĝon en si. Iutage li diras al sia servisto, ke li volas kolekti helikojn dum promenado. La kalvulo ekiras kun la servisto al la arbaro kaj klopodas konduki la serviston al profunda fendego, ĉar tie estas la plej belaj helikoj. Ekvidante ilin, la servisto klinas sin suben por kolekti tiujn, kiam la kalvulo forte puŝjetas sur li. La kompatindulo malsuprenfalas kaj rompas sin tute al pecoj.

La kalvulo trankvile iris hejmen kaj nur vesperkrepuske diris al la fraŭlino, ke lia servisto falis de la monto kaj mortompis sin. La kvinoble bela blondulino mergiĝis en sia malĝojo, sed fortigis la animon:

– Mi nek manĝos, nek trinkos, nek parolos, ĝis vi ne portos ĉi tien lian korpon – diris ŝi al la kalvulo.

– Kiel mi portu ĝin ĉi tien, – indignis la kalvulo, kiam lia korpo pro la falo frakasiĝis je eretoj?

– Ankaŭ tiuokaze, se ĝi estos eĉ en mil pecoj! – alkriegis la fraŭlineto lin – tiam el ĝi eĉ ne unu peceto manku el la plej etaj eroj de la tuta korpo! Rapidu, ĝis ne falos la vespero!

– Kaj se mi alportos ĝin? – demandis la kalvulo timeme, – via koro moliĝos miarilate?

– Vi vidos poste – respondas la fraŭlino.

La kalvulo vole-nevole ekiras por kolekti la pecojn de la kadavro, kaj li portas tiujn al la fraŭlino. La fraŭlino transprenas la kadavron de li kaj diras:

– Nun lasu min sola, por priplori la kompatindan. Se mi mesaĝos al vi, iru al via reĝsinjoro. Ankaŭ mi estos tie, tiam.

Eliris la kalvulo esperante, la fraŭlino restis sola. Ŝi elprenas la akvon de la vivo kaj ekŝprucas al la korpo, al ĉiuj ĝiaj pecetoj. Kiam ili estas jam alĝustigitaj unu al la alia kaj ŝi denove ekŝprucas la akvon de la vivo, la fraŭlo reviviĝas post nelonge, nova vivo flugas en lin.

Rigardas la du junuloj unu la alian. Ili iras al la reĝo prenantaj la manojn de unu al la alia. Ankaŭ la kalvulo staras apud la reĝo. Miras, gapas la reĝo, dum flaviĝas la vizaĝo de la kalvulo.

– Patrosinjoro mia! – krias la vera filo de la reĝo – ne imageble multan mi suferis pro la malobeo de via peto.

Senvorte rigardas la reĝo al la fraŭlo, poste al la kalvulo.

Poste denove la vera reĝido ekparolas kaj rakontas ĉion al la patro, de komenco ĝis la tiam.

La patro kaj la filo kuregas unu al la alia, ili brakumas, kisas unu la alian, pro la ĝojo ili foje ploras, foje ridas.

– Kial vi ne parolis pli frue? – demandis la patro la filon.


– Ĉi maliculo devigis min ĵuri – respondas la reĝido – mia ĵuro reprenis min. Dankojn al ĉi tiu kvinoble bela blonda reĝidineto, ja ŝi savis min al vi.

La reĝo glatigas al si la frunton, poste krias:

– Prenu ĉi tiun kalvulon kaj ĵetu en la korton de la drako!

Oni portis lin tien kaj de tiam neniu vidis plu lin. Li malaperis por eterne, certe voris lin la drako.

Ili ĝoje festis la geedziĝfeston kaj ĝia famo disvastiĝis al sep landoj kaj maroj, trans la Fabeloceano.



Bildoj el Grekujo – Viro kaj virino el Livadia

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=53057>

Vulpo Manjo jurisdikcias

La iama homo vivis kiel kamparano, li plugis-semis sur sia agro. Rande de lia agro, herbaĉoj kreskis sur la nekultivita terpeco. La herbaĉo trakreskis la agroapudan vojon. Li lasis ĝin kreski libere. Tamen iutage, li pensis alion.

– Mi elbruligos tiun herbaĉon neniigonte tiun sarkindaĵon, tiel mi povos plugi la tutan terenon – diris iutage la kamparano, kiam li rigardis ĝin la fino sian malgrandan agron.

Li faris fajron, kaj kiam li aliris al la aro da herbaĉoj por bruligi ĝin, neatendite eksiblis vortoj de iu serpento:

– Atentu amiĉjo, vi neniel ekbruligu mian domon!

– Mi tute ne atentos pri ĝi, ja, mi certe ekbruligos ĝin – respondis la kamparano. – Mi lasos bruli ankaŭ ĝin.

– Etendu almenaŭ vian bastonon – petegas la serpento – lasu por elŝovi min el mia kuŝujo.

La kamparano etendas sian bastonon. La serpento trarampante ĝin volviĝas ĉirkaŭ la homo, kaj ĝi malfermas buŝon por manĝegi la kamparanon. – Ĝis tiam ne, – diras la kamparano – ĝis tri juĝistoj ne verdiktos pri nia kazo, – diras la kamparano.

Post sia ekiro ili renkontis unue iun ĉevalon. Ili eldiris sian plendon. Unue la kamparano parolis, poste la serpento. Aŭskultas ilin la ĉevalo kaj jene prijuĝas:

– Junaĝe ankaŭ mi havis mastron, kiu nutris min per grajnaĵoj kaj trinkigis min. La mastro rajdis ĉiutage sur mi. Poste li lasis min foriri, mi rajtis fari ion ajn libervole. Liberiĝis ankaŭ la serpenteto, ĝi rajtas manĝegi sian mastron.

Dum ili iris por serĉi alian juĝiston, ili renkontis mulon. Al la mulo ili plende rakontis pri sia problema afero. Ĝia juĝo estis tute identa kun la pli frua verdikto, ke la serpento rajtas manĝegi la kamparanon.

– Ni devas pluri por serĉi la trian juĝiston, – diras la kamparano, – ĉar tiu juĝo estos decida, ĝusta.

Kiam ili iras, ili ekrigardas sinjorinon **M a n j o n V u l p o** venante renkonte.

– Sinjorino **M a n j o** – ili alparolas ŝin – ni atendas juĝon de ci. Ni estas procesantaj unu kun la alia. La vera juĝisto ci estos.

– Kiel mi povu diri juĝon, kiam el inter vi unu estas sur la dorso de la alia? – demandas vulpo-onjo konsterniĝante. – Antaŭ ol diri iun ajn verdikton, serpento rampu de la kamparano! Mi povos juĝi pri la problemo nur post tiam.

La serpento rampas malsupren de la kamparano, poste jene verdiktas **M a n j o V u l p o**:

– Al kio atendas vi bona homo? Elprenu bastonon kaj mortbatu ĉi tiun serpenton!

La kamparano ekkaptas iun bastonegon kaj mortbatas la serpenton per ĝi.

– Per kio mi danku pro via boneco? – demandas la kamparano la vulpon.

– Ĉu vi havas unu-du kovantajn kokinojn, vi povus porti por vespermanĝo, – diras modeste **M a n j o V u l p o**.

– Ho, jes, mi portos, – krias la kamparano kaj jam rapidas hejmen. – Hej, sinjorino! **M a n j o V u l p o** savis mian vivon! – krias li al sia edzino – mi portos al ĝi kovkokinon; eĉ ne unu, sed du!

– Ĉu eble freneza estas vi, mia kompatinda edzo? – hurlas al li lia edzino. – Du hundojn metu en sakon, tion portu al la vulpo. Almenaŭ ili aprobos ĝin la ruzan animon.

La homo decidas obei la edzinon. Li kaptas la du hundojn, ensakigas ilin kaj tiel li ekiras al Manjo Vulpo. Jam atendas sinjorino Vulpo la kokinojn por rostaĵoj, la salivo jam gutadas de ĝia buŝo.

– Li estas jam ĉi tie, li venas jam! – la vulpo ĝojadas kaj kuras al la sako, ke elprenu el ĝi la estaĵojn por farigi ilin al rostaĵoj.

Ĝi prenas la sakon. Kiam ĝi jam iĝas deligata elsaltas la du hundoj tuj saltante al la vulpo. Ili tiel aprobas la kompatindan M a n j o n. Sur ĝi apenaŭ restis felo. Ĝi povis apenaŭ rekaŝi sin en sian subteran kavon.

La kompatinda rigardas kaŭriĝinte sian vunditan felon kaj dume suspiras amare:

– Nek mia patro, nek mia avo estis juĝisto. Frenezakape mi entreprenis por esti tio. Kaj anstataŭ profito pro la bona verdikto, mi iĝis prijuĝita, ĉar ili sufiĉe multe certigis al mi decan porcion de la suferoj. Neniam plu mi estos juĝisto.

La malica vicpatrino

Feliĉe vivis la iama familieto: la patro, la patrino kaj ilia dekdujara filino. La knabino vizitis la lernejon, kie ŝi havis iun instruistaron, kiu tre klopodis agi laŭ ŝia plaĉo. Kiam povis iri la instruistino, ĉiam ŝi vizitis la gepatrojn de la knabino en ilia hejmo. La instruistino enviis la ĝojan vivon de la malgranda familio kaj volis prempuŝi sin inter ilin. Iutage ŝi diris al la knabino:

– Petu vian patrinon, ŝi vestu vin per via plej bela robo, por ke ni promenadu, kaj kiam ŝi serĉas vian robon en la kesto, frapu al ŝi la kesto-tegmenton, vi konas tiun, ĝi estas el marmoro.

– Ĉu eble ĝi ne povos forte bati ŝin? – demandas la knabino.

– Ho, ne. Ĝi ne batos ŝin. Ŝi ridos pro via ŝerco.

La knabino obeante petas hejme sian robon. La patrino malfermas la keston. Kiam ŝi klinas sin en ĝin por serĉi la robon inter la aliaj aĵoj, la knabino piedfingre proksimiĝante iras al la malantaŭo de sia patrino kaj frapas al ŝi la marmoran tegmenton de la kesto. Tie abrupte mortis la kompatinda patrino. La forto de ŝia edzo tute elĉerpiĝis pro la malĝojo. Eĉ do la knabineta funebro estas terura. Ŝi ploras tra longaj horoj, tagoj, semajnoj ŝirante al si la kaphararon tiome pro la turmentado de la malĝojo, ke oni timas ŝian junan animon. Paso de multaj semajnoj estis bezonataj al ŝi por trankviliĝi iom. Ĉiam tie estis la instruistino farinta ion ajn en ilia intereso en ilia hejmo. Ŝi konsolis ilin kaj agadis laŭ ilia plaĉo ĝis la patro forte bedaŭrante la orfinon volinta doni patrinon, anstataŭ la patrino, li edzinigis la instruistaron.

Iom da tempo pasis bone, ĉar la nova edzino igis sin ekamata, pro kio ili afable akordis. Sed pase de la tempo, ankaŭ la karaktero de la nova edzino ŝanĝiĝis simile al la vetero. Ŝi provokis ĉiun vivanton kaj ĉiun okazintaĵon. Ĉiam ŝi ĉikanis, kritikaĉis kaj nenio plaĉis al ŝi, ĉar la knabino ĝenis ŝin. Dume venis tempo, kiam malamegante la knabinon, ŝi volis liberigi sin de tiu. Iutage ŝi hurlis dirante al sia edzo:

– En la domo aŭ mi restos, aŭ via filino.

Ĝis tiam ŝi apelacias al la prudento de sia edzo, kaj ĝis tiam ŝi ronĝas, mordas la koron de sia edzo, ke iutage la patro forportas la filinon al iu granda monto. Li lasis tie ŝin en la groto de la granda monto kun manĝaĵoj por du monatoj. Priplorante, preskaŭ inerte inter duboj, tamen espere, ke lia infano ne malsatmortos, li lasis ŝin sola tie.

En la groto la kompatinda knabino ploradas sola. Ĉirkaŭ ŝi estas nek homo por vidi, nek besto por timeti, nur la granda malhelo ĉirkaŭas ŝin pri la plensilenta izoleco. Iutage, de sia kuŝo kiam ŝi pene surpiediĝas, konsterniĝante vidas, ke ŝi apenaŭ havas jam manĝaĵon. Ŝi povas havi sufiĉan eble nur por du tagoj, poste komenciĝos la malsato. Ŝi elgrotiĝas trenpaŝante kaj malsupreniras de la monto al la valo, sub la liberan ĉielon de la Dio. Kaj, jen! Kvazaŭ ia miraĝo blindumus ŝajn okulojn. Iu palaco staras antaŭ ŝi, kvazaŭ ĝi estus mem ia fabellanda feinkastelo. Ĝiaj multaj kolonoj estis faritaj el oro, la multaj fenestroj estis el diamantoj kaj rubenaj estis la riĉe ornamitaj muroj. La kompatindulino estis malsata, do ŝi kuraĝe eniris en la grandan domon.

La palacon havis kvardek grandeguloj, infanoj de unu patrino. Alialoke havis ili aferojn aranĝendajn, neniu restadis tiam en la domo. La knabino iras-venas tra la lokoj de la kastelo. Foje ŝi rigardas la dormoĉambron, alifoje ŝi faras viziton en la kuirejo. La multajn neordigitajn litojn ŝi preparis por dormo. En la kuirejo ŝi kuiris la multajn nekuiritajn ingrediencojn al bongustaj manĝaĵoj. Kiam ŝiaj laboraĵoj pretiĝis, jam vespero estis. Ŝi refoje ĉirkaŭrigardas, ion pliĝustigas, poste foriras el la palaco kaj surgrimpas al la monto al sia arbara-monta groto.

Alvenas vespere la kvardek grandeguloj, kaj forta estas ilia surpriziĝo, gapado.

– Kiu povis iri en nia palaco? Kiu pretigis niajn litojn? Kiu kuiris nian vespermanĝon? Kiu ajn estis, tiu faris tiujn bonintence – diradis ili unu al la alia.

Ili konsumis sian vespermanĝon konstatante, ke la manĝo estas tre bongusta, ili kuŝis en siajn litojn, agrable ili dormis en tiuj kaj sekvatage ili denove iris aranĝi siajn aranĝindajn aferojn. Triatage la knabino same agis. Ŝi denove eniris la palacon, preparis la multajn litojn, kuiris la multajn manĝaĵojn kaj vespere ŝi reiris en sian groton. Ankaŭ tria tage same okazis.

La kvardek grandeguloj falis de unu gapmiro al la alia:

– Ni devas klopodi por klarmeti, kiun ni estimu, kiu estas nia nevidebla bonfaranto – ili konstatis.

Ili priparolis, konsiladis inter si, kiel solvi la enigmon. Ili decidis por atenti kaŝe, en la intereso de akiro de la scio pri la bonvola helpanto. La plej aĝa fraŭlo komencos la kaŝobservon, la kvardeka frato. Li kaŝstaris ĉe la subo de la pordego, kaj preskaŭ elstreĉiĝis liaj du grandaj okuloj, tiel li gvatis dum la tuta tago. Je la vespera alveno de la fratoj la litoj estis denove preparitaj, la manĝaĵoj kuiritaj, sed la grandeguloj eĉ nun ne sciis, kiu estas la efektiviganto.

Sekvatage la dua frato estis la observanto, triatage la tria, kaj unu post alia ĉiuj fratoj provis diveni la enigmon ĝis ilia plej juna frato. Ĉiutage la litoj estis preparitaj, la manĝaĵoj kuiritaj, ili vidis nenion ceteran, ili sciigis pri nenio.

– Nun jam vi estos la vicostara – diris ili al la plej juna frato.

– Se tiu estas ĝ i n o aŭ alia estaĵo, eĉ se knabino aŭ se knabo estas, ni akceptos tiun al nia fratino, aŭ frato, ni traktos tiun kiel fratino, fraton.

Matene la fratoj iris fini siajn aferojn, nur la plej juna restis hejme.

Kiam la fraŭlo pensadis kiel li agu, venis la memoro en lian kapon, ke la palaco havas ankaŭ flankan malgrandan pordon kaj eble bone estus rigardi ankaŭ tiun. Li alrapidis al la dorsflanka malgranda pordo de la palaco kaj kaŝstaras ĉe la ĝardeno pordeto. Subite li ekvidas, ke knabino kaŝiras supren en la palacon. La knabino povis eniri ĉiam tra ĉi tiu pordego, pro tio ili ne rimarkis ŝin. Ĝis la sunsubiro staras tie la grandegulo gapante ĉe la malgranda pordo. Sed vespere, kiam la knabino volis ŝteliri for el la palaco, haltigas ŝin la saluto de la grandega fraŭlo:

– Bonan vesperon, knabineto.

Alrigardas la knabino la longulon kaj kvankam ŝi konsterniĝas pro lia longeco, tamen ŝi trankviliĝas pro liaj vortoj.

– Se vi estis jam ĉi tie, ankaŭ restu, – petas ŝin la granda fraŭlo.

Ili poste rakontis unu al la alia siajn nodajn kaj klopodajn aferojn. Sankta estis inter ili la paco.

Vespere alvenis ĉiuj tridek naŭ fratoj kaj jam de malproksimo ili kriadis, ĉu trafis fiŝeto sur lian hokon?

– Jes, trafis! – respondis ilia plej juna frato – eĉ orfiŝeto!

– Ĉu ineksa vivaĵo estas tiu? Ĉu ĝino estas? – demandas la surprizataj. – Nek la unua kaj nek la dua estas, sed belega knabino estas – respondas la fraŭlo tre fiere.

– Kie ŝi estas? Lasu nin vidi ŝin! – kriadas la tridek naŭ fratoj.

– Ĝuste nun ŝi preparas nian tablon por manĝo, tie ŝi atendas vin. – respondis la plej juna.

Ĉiuj kvardek rapidas supren kaj kuras al la knabino nomante ŝin: „nia karega fratineteto”, aminda nia fratineteto, kaj ĉe ili ne elĉerpiĝas la multaj belaj vortoj. La knabineton ili kune kondukas al sia plej bela ĉambro, kaj aparte ĉiuj fraŭloj alfingrigas unu-unu belan ringon por ŝi, el oro estantaj. Plibeliĝis la vivo de la kompatinda knabino.

Dume hejme ŝia patro vegetis, suferis pro la malĝojo. Plurfoje li volis iri por informiĝi pri la vivo de sia filino, sed la edzino ĉiam dekonvinkis lin por ne agi tiel. Per falsa informo

naskita en profundo de ŝia malica animo, iutage ŝi rakontis pri la morto de la knabino kaj priploris la mortinton per falsaj larmoj tiome, ke ŝia edzo kredis tiun mortfamom.

– Nun jam mi estas la plej bela – pensis en si la sinjorino kaj ĉiam pompaĵaĉis, ĉiam ŝmiris sin per kremo.

Foje ŝi staris en sia korto turnante sin al la Suno kaj demandis:

– Bela, grandega mia ora S u n o, mia kolosa S u n o, vi, kiu vidas la tutan mondon, diru nur, ĉu vi vidis pli belan ol mi?

– Ankaŭ mi estas bela, ankaŭ vi estas bela, sed nek vi nek mi estas tiom bela, kiel via vicfilino. – diris la S u n o.

– Ej, do, ĉu vere, tiu knabino vivas? – demandas la sinjorino konsterniĝante. – Vivas, – diris la S u n o – ŝi estas la reĝidino de kvardek grandeguloj.

– Ĉu ĝoja estas tiu knabino? – demandas denove la sinjorino.

– Ŝi estas eĉ pli ĝoja ol vi. – respondas la S u n o.

– Kie estas ŝia palaco?

– Tie, trans la granda monto, plej sube en la valo.

– Ankaŭ mi rigardos, por ke mi plezuriĝu per ĝia vido – diras la nigraanima sinjorino kaj jam briletadas la malbonintenco en siaj okuloj.

Ŝi estis simila al la sorĉistinoj, ja ŝi komprenis pri la diversaj specaj missorĉoj. Nu, sekvatage ŝi vestanta sin kiel komercisto promenas en la valon al la palaco de la grandeguloj kaj frapetas, frapas sur la pordo. La knabino malfermas la pordon kaj ekparoladas kun tiu komercisto.

– Belas viaj ringoj – diras ŝi al la knabino – sed pli belas la mia. Eĉ se vi surprovus.

Prenas la knabino la ringon kaj kiam ŝi tiras ĝin al sia ungo, ŝi kunfalas kaj surteriĝas. La sinjorino tirigis sorĉan ringon sur la knabinan ungon, pro kio ŝi mortis antaŭ sia maljuna aĝo. Ho, ve! Kiam la kvardek fratoj alvenas vespere, ĉiuj alkuras la knabinon, kaj vivigas ŝin por montri vivsignojn. La kvardek fratoj prenas la ringajn manojn de la knabino, kaj kiam la plej juna frato rigardas la kvardek ringajn manojn, li rimarkas, ke surmane estas pluse unu ringo.

– Jen! La malamiko estas en la ringo! – krias la fraŭlo kaj unu post la alia li detiras la kvardek ringojn de ili ricevataj.

Nur tiu sola, plusa restas tie, la ringo donita de la komercisto por tiri sur la ungon de la knabino. Dum ĝia malsuprentiro, ŝajnas, kvazaŭ vigleco estus fluganta en la knabinon. Ŝia vizaĝo ruĝiĝas, ŝia brusto supren-malsupren ekanheletas. El sia kuŝa pozicio ŝi sidiĝas. Laŭvideble okazas, kiel ŝi malfermas siajn du belajn okulojn, poste ŝi stariĝas kaj ĵetas sin ĉirkaŭ la kolo de la fratoj.

– Miaj amindaj fratoj! – krias la knabino.

– Karega nia fratineteto! – krias la kvardek fraŭloj kaj tiom granda estas la ĝojo, la feliĉo, ke iliaokule larmoj briletas kaj tremetas la sono en siaj gorĝoj. – Alifojte gardu vin pli bone, eĉ ne unu kreitan animon lasu enveni en la domon! – avertas ŝin ŝiaj multaj fratoj.

Iutage la vicpatrino, tiu virino malboninklina kombas sin, kaj ŝi rigardas sian vizaĝon en sia spegulo. Ŝi turnas sin al la S u n o kaj demandas:

– Mia bela, grandega, ora S u n o, kolosa mia S u n o, vi, kiu vidas la tutan mondon, diru do, ĉu vi vidis pli belan ol mi?

– Ankaŭ mi estas bela, ankaŭ vi estas bela, sed nek vi, nek mi estas tiome bela, kiel via vicfilino. – diras la S u n o.

– Ej, do, ĉu vere, tiu knabino vivas? – demandas la sinjorino iĝante ŝajne morta.

– Vivas, – diras la S u n o, – ŝi estas la reĝidino de kvardek grandeguloj – diras la S u n o.

– Ĉu tiu knabino estas ĝoja? – la sinjorino denove demandas.

– Ŝi estas eĉ pli ĝoja ol vi. – respondas la S u n o.

Sekvatage la sinjorino vestas sin kiel vendistino, kaj metas grapolojn da vinberoj en sian korbon, tiel ŝi promenas al la valo, al la palaco de la grandeguloj kaj frapas la pordon. De ekstere vidas la sinjorino, ke, kvankam la knabino ne malfermas la pordon, sed malfermite estas iu fenestro eble en la ĉambro de la knabino. La sinjorino ekprenas grapolon da vinberoj kaj ĵetas ĝin en la ĉambron. La knabino paŝas ĝuste tiam en la ĉambron, kiam bum, la grapolo da vinberoj falas sur la ĉambran plankon! Ekrimarkante la belajn vinberojn, la knabino ne povante malatenti tiujn, ŝi alprenas unu beron kaj enbuŝigas ĝin. Ŝi kunfalas samloke surteriĝante.

Ho, ve! Hejmenalvenante vespere la kvardek fratoj jam vane vekas ŝin, vane provas animi en ŝin, ĉar ŝi jam ne rekonsciiĝas, ŝi jam ne venas al si mem.

– Venis la fino de nia feliĉo! – malĝojadas la kvardek. Ili prenas la knabinon por meti ŝin ripozi por eterno inter la floroj kreskantaj montopinte, sed ne en la nigra tero. Inter floroj, super rokoj sub vitrotegmento kuŝas la knabino. La S u n o surradiis ŝin, dum ŝia beleco reradiis al la S u n o.

Iu lando situis en la proksimeco de la monto. Ĝi havis grandpotencan reĝon kun sia reĝfilo kavalirstatura. Iam tiu reĝido ĉasadis, kaj foje kiam li rigardis al la montosupro, li rimarkis kvazaŭ io brilegus montosupre.

– Iru kaj rigardu, kio estas tie, – li ordonis al siaj ĉashelpantaj fraŭloj – se la brilegon kaŭzas ia trezoraĵo, ĝi estos via, sed se io alia, tiuokaze ĝi estos mia.

La fraŭloj suriris, kaj kiam ili alrigardis la vitran platon, kaj sub ĝi la knabinon, ŝia spiro preskaŭ haltis, ŝiaj piedoj preskaŭ radikiĝis. Ili vidis neniam tian belecon dum sia tuta vivo. La reĝido sentis tiel same eĉ do kun sia koro. Ju pli multe da tempo, li rigardis la knabinan vizaĝon de tiu pli dolorema iĝis sia koro. Li portigis la knabinon en la palacon en sian ĉambron, por ke nur li povu rigardi, neniu alia enmonde. Lia tago ne estis tago, lia nokto ne estis nokto; lia trinkaĵo ne estis trinkaĵo, lia manĝaĵo ne estis manĝaĵo, nenio estis ĝojdona por li pro sia granda malĝojo.

Preskaŭ freneziĝis lia patro, ĉar ili estus devantaj militiri, kaj tamen li devis lasi sola sian filon hejme. La filon do li lasis hejme por ne ĝeni lin en sia malĝojo. Nur post unu semajno li sendis mesaĝportanton kun la mesaĝo: iru ankaŭ la reĝido, ĉar ilia lando estas en danĝero. Kontraŭe la malamiko estis jam venkita kaj la reĝo jam estis survoje al la hejmo, kvankam ĉirkaŭvoje. La reĝido rapidis plenumi la patran ordonon laŭ la ricevita mesaĝo transdonita de la mesaĝportanto. Pro la ricevita mesaĝo li tiom rapidis pro la ekscito, ke li forgesis fermi sian ĉambron. Li rapidis en la militon post sia patro.

Apenaŭ li foriris, alvenis hejmen lia patro, kiu kune kun sia edzino rapidis en la ĉambron de sia filo. Tie kuŝis la knabino sub la vitra plato, kvazaŭ ŝi estus ia ĉielregna huri-o¹¹, sed povas esti, ke ŝi estis pli bona ol la aliaj huri-oj. Ili levas la vitran platon. La reĝo rigardas, esploras, ekzamenas, ĉu ankoraŭ estas vivo en la knabino. Dum la esploro, kiam la reĝo premadas la stomakon kaj la gorĝon, neatendite la knabino ektusas pro la forta premo kaj eltusas la vinberon. Ŝia vizaĝo ekruĝiĝas, ŝia brusto supren-malsupren ekanheletas, ŝi malfermas siajn du belajn okulojn, poste ŝi eksidas kaj kun hezitemaj okuloj ĉirkaŭrigardas.

Oni rapide sendas kurieron post la reĝido kun la mesaĝo: „alvenis la reĝo, finiĝis la milito.” Alvenas la reĝido pro entuziasmo tre ekscite kaj kiam li malfermas sian ĉambron, kvazaŭ li estus enpaŝanta tra la pordo de la ĉielregno. Tie sidas la knabino inter liaj gepatroj. Ŝia unu mano estas en la mano de la reĝo, ŝia alia mano en la mano de la reĝedzino, kaj kiam la gejunuloj staras alfrontiĝante unu al la alia kaj rigardas unu la alian, unu iom honteme, sed la alia ridetante rigardas la alian. Ili iĝis geedzoj, unu paro da ĝoja edzo kaj ĝoja edzino.

¹¹ Laŭ la islama teologio, la **huri** estas senmakula virgulino, enparadiza donaco por la muslima viro. La hurio estas pli superranga virino ol la aliaj.

Iutage la vicpatrino denove sidas antaŭ sia spegulo por rigardi ene sian belecon, poste atendente la laŭdon pri sia beleco, turnante sin al la S u n o demandas ĝin:

– Mia bela, kolosa, ora S u n o, vi, kiu vidas la tutan mondon, diru do; ĉu vi vidis pli belan ol mi estas?

– Ankaŭ mi estas bela, ankaŭ vi estas bela, sed eĉ ne unu el inter ni estas tiom bela, kiel via vicfilino. – diras la S u n o.

– Ej, do! Ĉu veras, ke tiu knabino vivas? – demandas la sinjorino konsterniĝanta.

– Vivas, – diras la S u n o, – ŝi estas ĝoja edzino de grandpotenca reĝido. – diras la S u n o.

– Ĉu tiu knabino estas ĝoja? – la sinjorino denove demandas.

– Ŝi estas eĉ pli ĝoja ol vi. – respondas la S u n o.

– Kie estas ŝia lando? Kie troviĝas ŝia palaco?

La S u n o rakontas pri ĉio kaj la sinjorino ekvojiras iutage al tiu loko. Post paso de certa tempo ŝi alvenis kaj pasumis ĉirkaŭpalace. De la servistoj ŝi sciigis pri la ĝuste nun alveninta tempo antaŭanta la naskon de la edzino de la reĝido. Ŝi haltis antaŭ la pordo kaj komencis kriadi enen:

– Alvenis la fama akuŝistino, alvenis la fama akuŝistino!

La reĝido aŭdante la kriadon envokigas la sinjorinon kaj tuj akompanas tiun al la ĉambro de la puerperulino. Ŝi ĝuste tiam estis post la nasko de sia infano, la belan feton de bela patrino. La nigra anima sinjorino vidante la situacion tuj pikas iun kudrilon en la kranio-supron de la novpatriniĝinta reĝid-edzino. La puerperulino tuj ŝanĝiĝas al blanka kolombo kaj elfugas de la ĉambro al la granda ĝardeno. La akuŝistino tuj enkuŝas en la lokon de la novpatrino, kvazaŭ ŝi estus la junedzino. Post iom da tempo, la reĝido enpaŝas kaj miregante rigardas la vizaĝon de sia edzino, ke kiel ŝi povis ŝanĝiĝi tiome multe.

– Ne gravas, – li pensas en si mem – post paso de tempo ŝi superos la naskon, kaj revenos ŝia koloro.

Malsupre en la ĝardeno de la palaco dum ĉiu bele sunradia mateno iu blanka kolombo flugadas kaj al la ĝardenisto flugante demandas:

– Ĉu dormas ankoraŭ la reĝido?

– Dormas – respondas la ĝardenisto.

– Ĝoja estu lia sonĝo, plenumiĝu la sopiro de lia koro. – la kolombo respondas.

– Kaj do la sinjorino? Ĉu ankaŭ tiu dormas? – la kolombo demandas denove.

– Dormas ankaŭ tiu, – respondas la ĝardenisto.

– Aflikta estu ŝia sonĝo, neniam plenumiĝu, sia deziro. – la kolombo respondas kaj forflugas.

Sekvatage denove estas tie antaŭ la ĝardenisto la kolombo kaj denove demandas la hieraŭtagan; la trian tagon kaj poste ĉiutage la sama estas la kolomba diritaĵo. Ĉar la okazintaĵo ekpripensigis la ĝardeniston, li rakontis pri la afero al la reĝido. Sekvatage frue ellitiĝas la reĝido kaj iras en la ĝardenon promeni. La kolombo tie flugadas ĉirkaŭ la reĝido, ĝi rukuladas proksime al lia vizaĝo kaj foj-foje flugas sur liajn ŝultrojn.

– Kiome ĉarma estas ĉi tiu kolombo, – diras la reĝido – metu ĝin en oran kaĝon, ĝia loko estu en mia ĉambro.

La ĝardenisto enkaĝigas la kolombon kaj de tiam ĝi tie rukuladas en la reĝida ĉambro apud la lito de la reĝido.

– Ĉu vi dormas reĝido? Ĉu vi dormas? – demandas la birdo frumatene.

– Mi dormas, kolombeto, mi dormas. – la reĝido respondas.

– Ĝoja estu via dormo, plenumiĝu ĉiu via deziro. – deziras al li la birdo.

– Kaj do la sinjorino? Ĉu dormas tiu ankoraŭ? – la kolombo demandas denove.

– Dormas ankaŭ tiu. – la reĝido respondas.

– Aflikta estu ŝia sonĝo, neniam plenumiĝu, ŝia deziro – respondas la kolombo kaj fermas siajn okulojn.

La parolo de la kolombo iĝis ĉiutaga, ĉiutage ĝojis la reĝido. Kiel, kiel ne, sed la sinjorino ekaŭdis, kiujn parolis la kolombo kaj ŝi rekonis pri ĝi al la iama knabino. Tuj ŝi simulis malsanon, kaj forte ekĝemis en sia lito.

– Mi portigos medikamenton de kio vi resaniĝos – konsolas ŝin ŝia edzo.

– Mi resaniĝos nur de tio – respondas la sinjorino – se tiun kolombon vi buĉigos, ĝian viandaĵon vi kuirigos kaj manĝigos kun mi.

Pezkoloro akceptas la peton la reĝido, sed pro emo de sia edzino tamen li devas agi tiel. Sed li tre bedaŭras tiun senpekan kolombeton. Oni prenas la kolombon, buĉas, kuiras, manĝigas kun la sinjorino. Nur ĝiajn ostojn oni ĵetis eksteren en iun angulon de la ĝardeno.

Kaj, jen, miraklo de mirakloj! Kien falis la ostetoj, tie tri belaj verdaj pinarbetoj elkreskis el la tero, ombron donante. Kiam la reĝido forpromenis antaŭ la tri arboj, ĝiaj branĉetoj ŝajnis esti kvazaŭ movantaj, tiel ŝajnas, ili kvazaŭ kliniĝas antaŭ li. Tiel ŝajnas, ke la branĉoj kliniĝas tri fojojn, kaj la pinglaroj flustras. La vicpatrino vidante la tri pinarbetojn tuj konjektis, ke ili kreskis el la ostetoj de la kolombo. Ŝi denove enlitiĝis kaj veadis foj-foje antaŭ sia edzo.

– Mi portigos medikamenton al vi – konsolas ŝin ŝia edzo – ĝi resanigos vin.

– Nur de tio mi resaniĝos, se el la radikoj de tiuj elhakigitaj tri pinarboj –vi kuirigos teon al mi kaj trinkigos kun mi.

La reĝido bedaŭris la elhakojn de la junaj malgrandaj arboj, sed pro emo de sia edzino li tamen agis laŭ la deziro. Laŭ la deziro oni elhakis la tri arbojn kaj el la radikoj kuiris teon. La reĝido trinkigis la teon kun sia edzino. Nur ĝian unu maldikan ŝelopecon oni forĵetis en iun angulon en la ĝardeno. Kaj, miraklo de mirakloj okazis antaŭ iliaj okuloj, ĉar el la tero, kien falis la ŝelopeco, blua kolora kolombo flugis supren. Iumatene la kolombo flugas al la ĝardenisto kaj demandas lin:

– Ĉu dormas ankoraŭ la reĝido?

– Dormas.

– Ĝoja estu lia sonĝo, plenumiĝu lia deziro.

– Kaj do la sinjorino? Ĉu dormas ankaŭ tiu?

– Dormas ankaŭ tiu. – respondas la ĝardenisto.

– Aflikta estu ŝia sonĝo, neniam plenumiĝu ŝia deziro – respondas la kolombo kaj fermas siajn okulojn.

Kuras la ĝardenisto al la reĝido per la famo pri la kolombo, kuras la reĝido al la kolombo. Li prenas ĝin, karesadas, premadas al sia koro. La kolombo rukuladas kaj rigardas en la reĝid-okulojn profunde, longatempe, kun duone fermitaj okuloj. Kiam la reĝido glatumadis ĝin, sur ĝia kapo li ekrigardis iun kudrilon pikite en la verton. Li kaptas la kudrilon, kaj kiam li eltiras ĝin, subite malaperas la blua kolora kolombo, aperas ĝialoke la tri pinarbetoj. Kiam li rapidas al la tri pinarbetoj kaj glatumadas ilin, subite anstataŭ la tri pinarboj ilialoke aperas la blanka kolombo. Kiam li alrapidas al la blanka kolombo kaj glatumadas ĝin, subite malaperas ankaŭ tio, kaj aperas antaŭ li, la knabino sia ĝismorte enamiĝinta edzino. Ili ĵetas sin al brusto de unu al la alia kaj plorante priparolas sian grandan feliĉon.

Ili kaptas la vicpatrinon kaj karcerigas ŝin; ili sian infanon brakumas al siaj brustoj. Ekde tiam ilia estas la mondo¹², ĉi tiu bela, rideta ĉio. Kiam la S u n o pasis antaŭ ilia palaco, haltis iom kaj gapis al la reĝida familio. Kvazaŭ dirus la S u n o: tamen la reĝida edzino estas la plej bela en la tuta mondo.

¹² Ili kiel gefeliĉuloj pensis: se estas feliĉo, ĉio estas, kiu havas feliĉon, lia/ŝia estas la tuta mondo.

La bovogastra-kapa reĝidsinjoreto

Tri filojn kaj unu filinon havis la iama insula reĝo. Lia palaco estis ĉirkaŭigita per granda ĝardeno, kiun iu drako vizitis foj-foje. Pro la drako kuraĝis iri tien eĉ ne unu animo; nek homo, nek besto. Iutage la plej juna reĝido malsupreniras en la ĝardenon kune kun sia fratino estinta pli juna ol li. Ili apenaŭ rigardas ĉirkaŭen tie, kiam subite alkuregas ilin la drako, kaj prenante la fraŭlineton subite flugas supren kun ŝi portante ŝin tre malproksimen. Ĝi portis ŝin al tia alta monto, kie supren ŝtuparo ne kondukis kaj de tio same neniu povis malsupreniĝi.

La eventon sekvis grandmezura funebro en la reĝa palaco. La plej juna reĝido malgajis pleje, ja li estis la kaŭzanto de la granda amareco. Iutage li aliris al sia patro promesante, ke li postiros sian fratineton. Laŭ sia espero eble li trovos ŝin, aliokaze ankaŭ li mortos. La reĝpatro kontraŭis la decidon, ĉar la plej amata estis ĉi tiu lia filo. Li vane dekonsilis la filon de la ekiro, ĉar tiu volis iri ĉiumaniere. La reĝo pezkore lasis foriri lin kaj sufiĉe provizis la filon kun bonaj konsiloj kaj kun ankaŭ ceteraĵoj, dece al iu reĝida sinjoreto.

Iras, iras la fraŭlo, kaj iutage li alvenas al la granda monto. Grimpus li, la kompatinda, sed neniel li trovas ĝian konvenan manieron. Kiam li meditas ĉe la montopiedo, li ekrigardas du serpentojn: blankan kaj nigran lukti unu kun la alia. Ili baraktas unu kontraŭ alia, ŝiras, mordas unu la alian. La fraŭlo kaptas sian glavon kaj tranĉas al du pecoj la nigran serpenton. Dankeme alrigardas lin la blanka serpento kaj jene alparolas la reĝidsinjoreton:

- Kiun bonan mi povus fari viarilate, vi kuraĝa fraŭleto?
- Al ĉi tiu monto mi ŝatus supreniĝi, – respondis la fraŭleto.
- Alligu vin al mia vosto – diras la serpento – mi surigas vin al ĝi.

La fraŭlo ligas sin al la serpentovosto kaj la serpento baldaŭ rampas supren al la monto-supro kun li. Tie ili adiaŭs kaj poste ambaŭ iras for. Dum la irado kaj venado de la fraŭlo sur la monto, li renkontas paŝtist-specan homon, kiu paŝtas la ŝafidojn de la drako. Li tuj reversas sian veston kaj proponas sin al servisto. La paŝtisto dungas lin al la tasko: por porti panojn al la drako, ĉiusemajne unufoje.

Iutage, kiam li portas la multajn panojn, kaj ĉirkaŭrigardas en la palaco, li ekvidas sian fratineton. Ili interbrakumas kaj ekbabilas. Ilia ĝojo estas grandega.

- Kiel vi povis veni ĉi tien? Ĉu vi ne timas la drakon? – demandas lin la fratineton.
- Mi venis por vi – respondas ŝia frato – mi volas forporti vin de ĉi tie.
- Vi volas maleblan – respondas malgaje la fraŭlineto. – Ni malliberulinoj, multaj estas ĉi tie, krome ne ekzistas vojo malsupren. Mil mirakloj estas, ke vi povis supreniĝi ĉi tien, kiam eĉ unu birdo ne povas veni ĉi tien.

Al sia fratino la fraŭlo rakontas pri sia afero kun la du malgrandaj serpentoj. Poste ili interŝanĝas siajn pensojn, interkonsiliĝas pri la farendaj kaj farindaj aferoj, fine la fraŭlo donas konsilon:

– Kara mia fratineton, kiam alvenos la drako, demandu, kie ĝi tenas sian forton. Mi kaŝos min ie, ĝis vi rakontos tion al mi sekvatage.

Kiam la drako venis hejmen, krepusko estis. Ĝi komencis konversacii kun la fraŭlineto. Nu, la fraŭlineto ĉiam pli kaj pli kuraĝiĝante babiladas kun ĝi, fine kaĵolante demandas ĝin; kie ĝi tenas sian forton.

– Tri oraj hareroj kreskas sur mia kapo, – respondas la drako mildiĝante pro la fraŭlina afableco, – per ili malfermiĝas unu ĉambro, en kiu estas tri kolomboj. Kiam unu kolombo perdas la vivon, mi malsaniĝas. Kiam ankaŭ la dua mortas, mi estos agonianta, sed kiam ankaŭ la tria kolombo pereas, mi tuj mortos.

La fraŭlino povis apenaŭ ĝisatendi la matenon. Ŝi tuj serĉis sian fraton kaj rakontis al li la vortojn aŭditajn de la drako. La reĝido donis la sekvan konsilon:

– Hodiaŭ vespere, kiam vi kombos la drakon, detranĉu tiujn tri harerojn de ĝia kapo, malfermu la ĉambron kaj murdu la tri kolombojn.

La fraŭlo denove kaŝis sin kaj atendis la sekvatagan matenon. Vespere alvenis la drako. Kiam ĝi rimarkis la fraŭlineton, ĝi komencis babiladi kun ŝi. Ŝi kaŝoladis al ĝi kaj ĝis tiam karesetis ĝin, kantadis al ĝi, dum la drako ekdormetis. Tiam ŝi rapide alprenis la tondrilon kaj tranĉetis la tri orajn harerojn, poste kuregis en la ĉambron, kie ŝi mortigis la kolombojn unu post la alia. La drako tuj pereis pro la elflugo de sia animo.

Spertante la mortigon de la drako, ŝi kuris por sia frato por rakonti pri sia liberiĝo. Ili kune vizitas la multajn ĉambrojn de la palaco. Per oraĵoj, arĝentaĵoj kaj ceteraj grandvaloraĵoj estas plenaj la ĉambroj. Tri reĝidinoj sidis en iu ĉambro. Ili estis forrabitaj de la malica drako. La reĝido kaj lia fratino kune kun ili iris al la rando de la monto por elpensi kiel ili povu suben iĝi de la monto.

Kiam la reĝido rigardas malsupren, li vidas, ke liaj fratoj de li pli aĝaj, ĝuste tiam restadas tie. Tiuj kriadas supren, ili kriadas malsupren. Fine la fraŭleto akiris de ie longegan ŝnuregon. Pere de tiu ŝnurego li subglitigas unua foje, sian fratino. Granda ĝojo kreiĝas inter la fratoj, sed ankaŭ la fratino ĝojegas. Poste okazis la subigo laŭvice de la tri reĝidinoj. La reĝideto unue la pli aĝan reĝidinon vokis por subigi.

– Ŝi estos por mia frato pli aĝa, – li pensas kaj subigas la reĝidinon al tiu.

Poste li vokas la duan fraŭlinon.

– Ĉi tiu estos por mia frato malpli aĝa – li diras en si mem, kaj la duan fraŭlinon li sendas al sia frato.

Fine li vokas la plej junan fraŭlinon kaj diras en si mem:

– Ĉi tiu estas mia elektito – kaj li glitigas malsupren ankaŭ ŝin.

La plej juna estis la plej bela, la plej plaĉa.

Ŝi vekis envion en la koroj de la du fratoj, kaj pensante la samon, la ŝnuregon al du tranĉite, ili lasas sian plej junan fraton sur la pinto de la monto. La fraŭlinoj, supren rigardante al li, eklarmis. Pleje ploris la plej juna.

La fraŭleto malĝojege reiras en la palacon de la drako, ne povanta fari alion. Li komencas esplori denove la ĉambrojn unu post la alia, ja en ĉiu ĉambro estas ia mirindaĵo. Li vidas malfermante la unuan ĉambregon, ke tie estas ĉio el verda veluro. Troviĝas tie ĉashundo pelanta leporeton; ambaŭ el verdaj veluroj. En la alia ĉambrego ĉio estas farita el oro. Tie estas videblaj granda plado el oro, apude kun ora kruĉo, akvo orkolora fluetas el ĝi sen fluetanto. La malfermita tria ĉambrego enhavas kovantan kokinon, kies piedoj estis faritaj el oro, el diamantoj estas ĝiaj flugiloj kaj ĉirkaŭas ĝin multaj malgrandaj kokidoj, kaj ĉiuj havas piedetojn el oro kaj flugiletojn el diamantoj.

Poste li iras en la korton al la multaj staloj. Trafe-maltrafe, divenpove li malfermas iun stalon. Tri ĉevaloj staras en ĝi. Noblaj orflugilaj ĉevaloj¹³ estas ili. El inter ili estas unu cindrogriza kolora, la alia estas beja ĉevalo¹⁴, la tria estas surkape makula ĉevalo.

– Per kio ni dankemu al vi, ke vi malfermis pordon al ni por viziti nin? – la tri eksvirĉevaloj alparolis lin.

– Mi ne deziras ceteron, ke mi povu malsupreniĝi de ĉi tiu monto, – respondas la reĝido.

– Sidu sur min – respondas la cindrogriza nobla ĉevalo – mi malsuprenportos vin de la monto.

¹³ La noblaj ĉevaloj estas eksvirĉevaloj, kastritaj.

¹⁴ La beja ĉevalo havas plurajn kolorojn, eble la plej ofta estas la ruĝeĉebruna kolora nobla ĉevalo.

Antaŭ ol adiaŭi, la ĉevaloj donis al li ses vilerojn, du vilerojn de ĉiuj ĉevaloj, el oro estantaj, dirante al li:

– Kiam vi bezonos ion, ĉiufoje unu vileron forbruligu kaj ni estos tie je via helpo.

La reĝido sidiĝas al la cindrogriza nobla ĉevalo kaj post momento li estas jam sur la kampo ĉe la montosubo. De tie li jam konis la vojon. Ankoraŭ unu-du tagojn li malsekiĝas de la pluvo, li sentas malvarmon de la vento, sed je la tria tago jam li hejme estas en la lando de sia patro, en sia naskiĝurbo.

– Antaŭ ol ia ekago mi ĉirkaŭrigardos – li decidas – kaj eniras en iun buĉejon.

Li aĉetis bovogastron kaj metas ĝin sur la kapon, por ke neniu povu rekoni lin. Poste li pasumadas stratojn vagante. Fine li eniras oraĵiston kaj dungiĝas ĉe li kiel metilernanta servistfraŭlo.

Kio okazis dume pri la kvar fraŭlinoj? Iutage alvenis ili en la palacon kaj la du fratoj anoncis sin por aperi antaŭ la vizaĝo de ilia reĝpatro.

– Kie restis via frato plej juna? – demandas ilin la reĝo.

La du fratoj fikore, fivorte mensogas, ke la juna frato pereis. La patro povis ĝoji nur al sia filino, sian plej junan filon li priploris. Dume denove pasis kelkaj tagoj, foje ĝojplene, foje male, iuj suspirante, aliuloj amuziĝante.

Iutage la plej aĝa filo turnis sin dirante al sia patro, ke li volas havi kiel edzinon la plej aĝan reĝidino, tial li volas edzinigi ŝin. La reĝo vokigas la reĝidino por prezenti al ŝi la intencon de sia plej aĝa filo.

– Nur tiam povos okazi la geedziĝo, se li povus doni al mi: leporeton pelatan de ĉashundo, konsistante ambaŭ el verda veluro – respondas la reĝidino.

Sekvatage kuras la mesaĝportisto en la urbo anoncanta la deziron de la reĝido:

– Iu portu en la palacon: leporeton pelatan de ĉashundo, ambaŭ el verda veluro, ĉar la reĝido bezonos tiujn baldaŭ.

Aŭdas la mesaĝon la bovogastra kapa fraŭlo, kaj diras al sia mastro al la oraĵisto, se aliulo ne, do li akiros, venigos la deziratajn objektojn. La majstro subtakse alrigardas la metilernanton dirante:

– Vi ne scias eĉ tion, kiel devas komenci al tiu laboro!

– Ne zorgu pri tio – respondas lia metilernanto, – nur donu unu litronon¹⁵ da vino kaj unu litronon da rostita manĝebla kaŝtano, la plia farenaĵo estos mia afero.

Oni portas al lia nokta restadejo la vinon kaj la rostitan kaŝtanon, kaj fermis la pordon. La mastro estis scivolema, tra la ŝlosilingo li kaŝrigardadis, sed vidis nenion alion, ol sian serviston, kiel tiu maĉas la kaŝtanojn kaj trinkas la vinon. Poste la majstro iris dormi pensante: estos, kiel estos. La tempopaso jam montris la komencon de la aŭroro, kiam eklaboras la fraŭlo bovogastra kapa. Li elprenas unu el inter la vileroj de la cindrogriza ĉevalo kaj bruligas ĝin. Kiam la vileron li bruligas, jam estas alveninta la nobla ĉevalo kaj demandas:

– Kion vi deziras, mia kara mastro?

– Mi ŝatus la ĉashundon – respondas la fraŭlo – konsistante el verda veluro kaj la leporeton konvenan al ĝi estante same el verda veluro.

La ĉevalo skuiĝas kaj malaperas de antaŭ li, sed dum la alia palpebrumo (momento) jam estas antaŭ li la du aĵoj el verdaj veluroj. Apenaŭ komencis mateniĝi, jam malfermas la pordon la mastro:

– Jen, ĉi tie estas la aĵoj deziritaj de la reĝido – diras la fraŭlo kaj transdonas la du aĵojn – laŭ la deziro estante ili el verda veluro. Rapidis la majstro en la palacon kun la du aĵoj. Li ricevis tiome multajn ormonerojn pro la laboro de sia servisto, ke lia poŝo malvasta estis por tiom. La plusaj ormoneroj da unu mankava kvanto jam ne havis lokon en ĝi.

¹⁵ Unu litrono da iu ajn fluaĵo estas ĉ.7-8 decilitroj.

Dimanĉe okazis la geedziĝa festeno de la reĝido, la granda festantaro amuzis sin per ĵeto de ĵetlancoj¹⁶. La oraĵisto same foriris gapi, nur sia servisto restis hejme en la metiejo. La bovogastro-kapa ulo elprenas la vileroparon de la jam bruligita, kaj bruligas ĝin. Tuj aperas denove la cindrogriza ĉevalo antaŭ li:

– Kion vi deziras, mia malgranda mastro? – demandas ĝi la fraŭlon.

– Veluran veston verdan koloran, – respondas la bovogastro-kapa ulo.

La vesto aperas antaŭ li post momento. Li tuj survestas ĝin, surseliĝas al la nobla ĉevalo kaj jam galopegas al la kampo inter la lancoĵetantojn. Li saltas inter la luktantojn kaj kiom da kavaliroj estas tie, per sialance ĉiujn li elĵetas de siaj seloj. Ĉiuj turnirantoj defalas de siaj ĉevaloj. Poste li forgalopas de la kampo kaj denove sidadas en la metiejo.

Dum la dua dimanĉo lia alia frato estis laŭvice, ĉar tiu volis edziĝi. Oni parolis al la reĝidino, al la dua fraŭlino, pri la intenco de la reĝido:

– Nur tiam mi konsentos, – respondas la dua fraŭlineto, – se estos ĉi tie: ora plado kun ora kruĉo, el kiu ora kolora akvo fluetos de si mem.

Oni mesaĝas al la oraĵisto, ke nun estas bezonata ora plado kun ora kruĉo, el kiu ora kolora akvo devas flueti. La oraĵisto gratas al si la malsupron de la orelo; kiel li akiru tiujn aĵojn, kion li faru nun.

– Neniam malgaju, – diras lia metia servisto – se aliulo ne, mi akiros tiujn deziroobjektojn. Vi nur donu al mi du litronojn da vino, kaj du litronojn da rostitaj kaŝtanoj kaj fermu post mi la pordon. La plia farendaĵo estos mia afero.

Tra la tuta nokto li maĉadis la rostitajn kaŝtanojn kaj sorbetadis la vinon. Nur ĉirkaŭ la aŭroro komencas al la laboro la bovogastro-kapa. Li elprenas unu vileron de la alia ĉevalo, la vileron de la beja ĉevalo kaj bruligas. Forbrulinte, jam tuj estas antaŭ li tiu beja ĉevalo:

– Kion vi deziras, mia kara mastro? – demandas la ĉevalo beja.

– Oran pladon, oran kruĉon kaj al ĝi konvenan oran akvon mi deziras – respondas la fraŭlo.

Apenaŭ pasis momento kaj jam estas antaŭ li la deziritaj objektoj kune kun la ora akvo.

Sekvamatene la majstro vidante la aĵojn nur dupis-gapis pro la belaj, oraj mirindaĵoj. Li portis ilin rapide en la palacon. Li ekhavis por tiuj tiome multe da ormoneroj, ke li ne havis sufiĉan lokon en siaj poŝoj teni ilin, ja ĉiuj liaj poŝoj plenpleniĝis per tiuj. Li ricevis eĉ pli multe ĉ. per du manplenoj. Post la geedziĝa festeno la festantaro denove iras por lancoĵeto. La fraŭlo bruligas la alian vileroparon de la ruĝabrunda ĉevalo. Post ĝia forbrulo denove tuj aperas la nobla ĉevalo antaŭ li.

– Kion vi deziras, mia kara mastro? – ĝi starigas la demandon al la fraŭlo.

– Nun la fraŭlo deziras veluran veston ruĝan koloran. Ricevante la veston li tuj vestas sin, surseliĝas kaj tiel elĵetadas la kuraĝulojn el iliaj seloj, ke ĉiuj rulbaraktas surtere. Post la turniro li galopas hejmen kaj tiras sin en sian metiejon.

Por okazigi la trian geedziĝan festenon, la sekva dimanĉo estis planata. La pli juna frato de la reĝo volis edzinigi al sia parulino la trian fraŭlinon, la plej junan, la plej belan. Nu oni parolis al ŝi pri la edziĝa intenco por ke ŝi preparu sin al sia nupto.

– Nur tiam povas temi pri tio – diris la fraŭlino – se iu portus al mi kovkokinon, kies piedoj estas el oro, la flugiloj el diamantoj kaj ĉirkaŭos ĝin multaj kokidoj kun oraj piedetoj kaj diamantaj flugiletoj.

Oni denove turnis sin al la oraĵisto. La majstro tute malesperiĝis; ja li neniam vidis tiajn, li eĉ ne aŭdis pri tiuj.

– Neniam malgaju – konsolas lin lia metilernanto – mi akiros ankaŭ tiujn. Nur provizu por mi tri litronojn da vino, tri litronojn da rostitaj kaŝtanoj, poste fermu la pordon mian.

¹⁶ La lanco aŭ la ĵetlanco estis la plej specifa armilo dum la mezepokaj kavaliraj turniroj. La lanco estis simbolo de la kavalerio.

Li nur tiun atendis, ke komencu mateniĝi. Tiam li elprenis la vileron de la tria ĉevalo kaj kiam li bruligis ĝin, jam antaŭ li staris la tria ĉevalo, la surkape makula:

– Kion vi deziras, mia kara mastro? – demandis ĝi la fraŭlon.

– Nun mi volas kovkokinon kun oraj piedoj, diamantajflugiloj kaj la kokidojn al ĝi konvenajn kun oraj piedetoj kaj diamantajflugiletoj.

Nur momento pasis kaj jam antaŭ li estas la kovkokino kaj la multaj kokidoj kaj brilegas iliaj oraj piedetoj kaj diamantajflugiletoj. Venas la majstro kaj frotadas la okulojn pro la blindigoj de la multaj oraĵoj kaj diamantoj. Baldaŭ li portas la aĵojn en la palacon. Oni tiel plenstopas lin per ormoneroj, ke el ili troviĝas ankaŭ en lia ĉapelo, eĉ ankoraŭ pli multan li ricevas per tri manplenoj. Antaŭ ol okazigo de la nuptofesteno, la festantaro iras por lanconĝeti. La fraŭlo elprenas la lastan vileron, la vileron de la makula ĉevalo kaj bruligas ĝin. Kiam ĝi forbrulas, jam denove aperas antaŭ li la nobla ĉevalo makula:

– Kion vi deziras, mia kara mastro? – demandas la fraŭlon la nobla ĉevalo.

Veluran veston, blanka-koloran volas nun la fraŭlo. Post momento estas antaŭ li la brilanta vesto, kiun baldaŭ li survestas kaj ekgalopegas inter la ĵetantojn de la lancoj. Li ĵetis tiom forte sian lancon, ke la pli juna frato de la reĝo, lia kara onklo tuj mortis de tio.

Oni gardas jam lin, ke li ne povu rifuĝi denove. Do, oni kaptas malfacile kaj akompanas lin antaŭ la reĝon, antaŭ la vizaĝon de sia reĝpatro. Alrigardas la reĝo la fraŭlon, kaj kiom longe li rigardas lin, tiom forte briliĝas lia vizaĝo pro la falintaj larmoj de liaj okuloj. Larmas kaj la reĝo, larmas kaj la blankvesta fraŭlo.

Poste la bovgastra kapa sinjoreto alkliniĝas al la kolo de lia patro kaj rakontas al li ĉiun sian malgajon, lin atingitajn malbonojn pro la dufrata malico. Nu, tiuj pensuferis pro tiuj.

En la mondo eble ne ekzistis tiome granda geedziĝa festeno, kia estis de la reĝidfraŭlo bovgastra-kapa. Kaj ne ekzistis eĉ pli bona reĝo, ol kia estiĝis la bovgastra-kapa fraŭleto. Ĝia famo flugas de buŝo al buŝo kiel la birdo de branĉo al branĉo. Ĉu estis, ĉu ne estis, estis iam iu bovgastra-kapa fraŭlo.

Kie menso estas, tie ankaŭ mono estas

Iu malriĉa homo vivetis iam en iu malgranda loko. La kompatindulo estus havanta klaran menson en saĝa kapo, sed li havis malmultan, eĉ neniom da mono por prosperi. Iutage li pripensis, ke li simulos sin freneza kaj dise-larĝe, ĉie kaj ĉiuloke li kriados: Mi havas menson en mia kapo, sed mono ne estas en mia poŝo.

Sekvatage li jam kriadis; okazis grandaj ridoj kaj miroj. Ia riĉa homo iris ĝuste tiutempe en tiu direkto kaj li aŭdis la ŝajne frenezulon.

– Ĉu aŭdas vi, malriĉa homo – li alparolis la frenezulon – donas mi monon al vi, por kiom vi havos lokon en via poŝo. Vi havas menson, vi certe prosperos iel per ankaŭ ĉi mono. La duono da profito estos via, la alia duono la mia.

Ili manpremiĝante de unu al la alia estigis la interkonsenton. Transprenas la malriĉulo la monon, kaj kiom da pajloj ekzistas en la vilaĝo, li aĉetas ĉion. Fine li interkonsentas kun iu ŝipisto pri la kosto kaj frajto, kaj li alŝipigas la multegajn pajlojn por iri kun ĝi en la landon de E g i p t i o. La ŝipisto antaŭĝojante jam kaŝe en si al la atendebla fiasko de la malriĉulo, turnas sin al la frenezulo:

– Amiĉjo, via varo ne bonas. Pajlon vi povas aĉeti ankaŭ en E g i p t i o, eĉ pli bonan kaj pli malmultekostan.

– Ne zorgu pri mia afero – respondas la homo, – mi interkonsentis kun vi kaj ankaŭ kvitigis la koston, la pliajn lasu al mi.

Ŝultrojn tiradas la ŝipisto, sed li ekirigas sian ŝipon. Ankaŭ vojaĝantoj estas sur la ŝipo, komercistaj homoj, kiuj aŭdas ion pri la pajlo kaj pri ĝia duone freneza posedanto, kiu entute havus multan menson, sed li havas malpli multan monon ol menson.

– Li bone komencas sian aferon, – ridetas la komercistoj – li povos multe gajni per siaj pajloj. De buŝo al buŝo disvastiĝas lia famo kaj oni bone ridas pri lia negoco.

Dume pasis la tempo ankaŭ surŝipe kaj iutage ili albordiĝis en E g i p t i o. La vojaĝantoj deŝipiĝis. Ili pene portis siajn varojn. Prenis la malriĉa homo siajn pajlojn, kaj li surmetis tiujn al la bordo, sufiĉe malproksime de la urbo. Tie li metis la pajlojn al stako, poste ekbruligis kaj nur ĝian cindron li kunkolektis. La multaj komercistoj rigardinte la frenezulon moke priridis lin:

– Ej do, vi frenezulo! – ili diris al li – pereis via pajlo, vi ne plu havos zorgon pri ĝi.

La frenezulo tute ne zorgis pri ili, kvazaŭ li ne vidus ilin. Li atendis la vesperon. Li prenas la multan cindron kaj disŝutas ĝin sur la bordo apud la akvorando. Poste, ke neniam homido povu rimarki lin, li kaŝas sin. Kiam fondiĝis la vespero, komencas ondadi la maro, noblaj ĉevaloj elsaltas el la marakvo. Tiuj estis la feo-noblaj ĉevaloj de la maro. Ili alkuris al la cindro kaj tre baldaŭe avide alglutegas ĝin. Antaŭ ol la rekuro en la maron ili elsputas iujn el siaj buŝoj. Nia frenezulo atendis nur tiun momenton. Li rapidegas al la maro por rigardi, kiuj estas la elsputaĵoj. Ĉiuj estis juvelŝtonoj. Li nombris ilin ĝis la sescenta peco. Li kolektas la grandan trezoraĵon kaj ekiras kun ĝi en la urbon por utiligi la kolektaĵon. Li aliras al brikofaranto kaj mendas pretigojn de tiuj mil ducent pecojn da brikoj, el ruĝakolora tero per muldilo. Ĝian duonon faris mem la brikomuldisto, la plurajn sescentojn li mem faris propramane. Li kaŝis juvelŝtonon po unu en ĉiun brikon faritan de si mem, por ke neniu vidu la juvelŝtonojn. Poste li metas siajn brikojn al loko sunvarma por sekiĝi. La multaj brikoj, ĉiuj sekiĝis al la sekva tago. En skatolegon li metis ilin. La enjuvelŝtonajn brikojn li metis de la malsupro supren en la skatolego. La sen juvelŝtonajn sescent brikojn li metis sur la jam menciitajn brikojn, plenigite per ili la skatolegon ĝis la supro. La brikoplenan skatolegon li metigis sur la ŝipon saman por hejmeniri kun ĝi. Rigardis la ŝipisto la skatolegon, ene kun la multaj brikoj, kaj li denove priridis kaŝe la homon.

– Amiĉjo, vi povis fari bonan negocon – ridetis la ŝipisto – pajlon vi semis kaj brikon vi rikoltis.

– Ne zorgu pri mia afero – respondas la frenezulo – mi interkonsentis kun vi, eĉ elpagis vin, la plian lasu al mi.

La ŝipisto tiradas ŝultron kaj ekiras kun sia ŝipo. Sur la ŝipo denove ĉeestas la multaj komercistoj, ili priridas la homon kaj lian varon. Li certe bone finis sian aferon – diradas ili unu al la alia, – ja li pajlon draŝis kaj briko estiĝis el ĝi.

Dum ilia paso surakve, subite komencis la ĉielsubo vesti sin ŝtorma. La ŝipo tangas-klakas, foje ĝi klinas sin al sia maldekstra flanko, foje al sia dekstra flanko, dum la sovaĝaj ventoj postkuradas unu la alian. Timiĝadas la maristoj, timtremas la homoj kaj la ŝtormo ĉiam fortiĝas.

– Surŝipe multaj estas la varoj, – krias la ŝipisto. – Ĵetu en la maron ĝian grandan parton! – krias plu la ŝipisto.

Ekvoĉis ankaŭ la komercistoj kriantaj al la frenezulo:

– Ĵetu en la maron viajn brikojn, plie ni volonte pagos la brikokostojn.

– Mi ne bedaŭras, se vi surpaperigos vian promeson koncerne la repagon de la valoro de miaj perdotaj brikoj, kiel mian malprofiton.

Pretiĝis la surpaperigita eldiro, pri ilia preno sur sin la malprofiton de la frenezulo pro la perdo de la sescent brikoj, ke ili repagos tiom da valoro, kiom la juĝisto pritaksos. Ili eĉ ĵuris je tio. Poste ili prenis la skatolegon kaj el ĝi la supre estantaj sescent brikojn ĵetis en la maron. La ŝipo multe pli malpeziĝis pro la elĵeto de la brikoj kaj ĉar ankaŭ la ŝtormo silentiĝis, ili gaje pasis plu kaj ĉar ankaŭ la vento trankviliĝis dume, ili ne volis enmarigi la aliajn sescent brikojn. Nur unu du tagoj pasis kaj ili alvenis iutage al sia vilaĝo. Unu post la alia elŝipiĝas la kunvojaĝantoj, ĉiuj kun siaj varoj, ankaŭ la frenezulo kun siaj sescent brikoj.

– Homoj! – la frenezulo ekvoĉas – donu ĉi tien la koston de la sescent brikoj!

La multaj homoj mokridas dirante al la frenezulo, ke ili ne volas kompensi lin pro ĉi tiu bagatelajo, do estas superflue paroli pri tio, ĉar vane estas ĉiuj liaj vortoj por tio. Sed la frenezulo nenion cedas el sia rajto. Li petas akordon antaŭ juĝisto pri sia afero. Li rakontas ĉion al la juĝisto, montras al li ankaŭ la surpaperigitan eldiron pri la prezo-repaga promeso koncerne la sescent brikojn.

– Voku iun brikomuldiston – diras la juĝisto – taksu la sescent brikojn.

– Ĉi tie bezonatas ne brikomuldisto, sed oraĵisto el inter la plej bonaj, – respondas la frenezulo.

Ridetas la juĝisto, ridetas la multaj komercistoj.

Je tiu la homo aliras la brikostokon, li disrompas unu, disrompas du, disrompas kromajn kvin, krome dek pecojn, en ĉiuj estas trovata unu juvelŝtono.

– Kiom da brikoj estas, tiom da juvelŝtonoj estas! – ekkrias la saĝa frenezulo, de sescent brikoj, de sescent juvelŝtonoj mi postulas la prezon.

La juĝisto estis devigata forsendi iun homon por voki oraĵiston. Li pritaksigis la valorojn de la multaj juvelŝtonoj, kaj fine jene sonis la prijuĝo: „la prezo de la sescent juvelŝtonoj devas esti donata al la saĝa frenezulo”.

Nun surpriziĝis la komercistoj, ĉar ilia tuta havaĵo ne sufiĉis al la plena pago, eĉ ne al la pago de ĝia centono, eĉ ne al la milono de la tuta sumo.

– Tiuokaze vi estos liaj sklavoj – la juĝisto diris al ili, kaj sklavigis ilin surĉenigante ilin al la ĉeno de sklavoj. La frenezulo tiel portis hejmen ilin kun si.

Intertempe disvastiĝis la famo pri la alveno de la frenezulo portinta kun si nur brikojn estantajn el aĉa ruĝa tero. Timiĝas la riĉulo, la mondoninto, kaj li kurante klopodas atingi la frenezulon:

– Redonu mian monon – li krias – sufiĉis el via negocofaro.

– Ne rapidu tiom – petas lin lia kunulo, – vi povas gajni per ĝi multe.

Sed la malsaĝa riĉa homo volis nur ricevi sian iam donitan monon. Li ne volis foriri de sia ŝuldanto ĝis li ne ektenos sian monon enmane denove.

– Vi certe bedaŭros poste, – deadmonas lin ankoraŭfoje la frenezulo. – Ankaŭ tio estos mia malbono, – respondas la riĉulo. Vi aŭ repagos al mi mian monon, aŭ mi enkarcerigos vin.

– Bone do, estu – respondas la homo – lernu pri via damaĝo propra.

Li elprenas unu juvelŝtonon, li vendas ĝin kaj el ĝia prezo li repagas sian ŝuldon por la kunulo. La frenezulo petas ties surpaperigitan anoncon, ke la ŝuldo estas pagita, kaj li jam ne plu ŝuldas. La pruntedonanto rajtas postuli plu eĉ ne unu heleron.

La riĉulo informiĝis nur poste pri tio, kiome multan trezoraĵon havas la frenezulo, ja kiom da brikoj li havas, tiom da juvelŝtonoj estas lia havaĵo enbrike.

La riĉulo denove rapidirante vizitas la frenezulon kaj pretendas la duonon de la profito kiel kontentigon. La frenezulo antaŭmontras la surpaperigitan eldiron de la riĉulo, ke li havas jam neniom da pretendindaĵo.

La riĉulo kuras al la juĝisto kaj prezentas sian postulon. La aliulo pravis, ĉar la postulo estis ne motivita, neniom estas pagenda al la riĉulo, eĉ ne unu helero.

– Kial vi ne kredis mian vorton? – demandas la frenezulo. – Se Vi estus fidanta min, nun inundus vin la multaj trezoraĵoj.

Tiel estiĝis saĝulo el la frenezulo, tiel estiĝis riĉa homo el la malriĉa. Li vivas riĉhavante, kvazaŭ lia estus la tuta mondo, kaj laboras liaj sklavoĵoj, la orgojlaj komercistoj.

Iutage li vokis ilin antaŭ sian vizaĝon kaj jene alparolis ilin:

– Mi redonas vian liberecon kaj eĉ ankaŭ vian monon. Sed bone notu por si, ne moku kaj ne ĉikanu mizeron de alia homo kaj ne enmiksiĝu en aferon de aliulo. Ĉar kie estas menso, tie ankaŭ mono estas.

– Ni laŭdas vian menson – dankegadas la multaj komercistoj, kaj ili ĝoje iras hejmen.

Mastro Lazaro, la heroa botisto

Ĉiuj konis mastron Lazaro, la heroan botiston. Kiam ankoraŭ li nur flikadis, kaj li multe kuris dumtage tien-reen por akiri laboron, ke fine de la tago li iĝis mortlaca, li vivis tamen malriĉe, eĉ li vivetis en granda mizero. Tamen, ĉar Dio donis al li prosperon, de tiam oni konis lin el la onidiro, kiel heroon. La granda evento okazis jene.

Iutage por glui ion, li uzis farungluaĵon en sia domaĉo, kiam centoble zumis ĉirkaŭ li la multegaj muŝoj. Kaj varme estis, kaj paneroj estis multe sur lia tableto, al kiuj venis la muŝoj. Por forigi ilin, li la majstro kolere frapis perpugne inter ilin al la tableto. Li nombris ilin. Vidu! Ĝuste kvardekojn li mortbatis. Li eksentis fieron pro si, kiu jen, grava, lerta mastro-homo estas. Do li rektigis sian spinon pro la fiereco. Li lasis surtablete la farungluaĵan pladeton, la mortigitajn muŝojn, kaj rapidis al la armilfaristo, ĉe kiu li aĉetis ian glavon por si kaj grandlitere li algravurigis: – Kvardek animojn mortbatis per unu frapo mastro Lazaro, la heroa botisto.

Poste li ekiris por provi akiri sian feliĉon. Li trairis multajn vojojn, montojn, valojn, marojn kaj kontinentojn. Iutage li sentante sin tre laca farante kuŝejon al si apud iun puton, li kuŝas por ripozi iom. Ĝuste tiuteritorie restadis la drakoj, ne malproksime al la puto. Ĵus proksimiĝas unu al la puto ĉerpi akvon. Kiam ĝi rimarkas la dormantan homon, ĝi kaŝiras al lia proksimo por tuj manĝegi lin, se tiu estas jam tie, je sia feliĉo. Sed dum la sekva momento ĝi rimarkas la glavon kun la skribaĵo: Kvardek animojn mortbatis per unu frapo mastro Lazaro. Ektimetas la drako pensante:

– Tju! Hu-ha! Tiu estas ne ŝerco, eĉ ne ĝia duono estas blago! Ĝi ekkuras reen eksterordinare rapidege pro la granda ekscito kaj diras al la pluraj, kia terura ulo estas trovebla apud la puto. La aro de drakoj estas treege timita. Ili kunsidas, konsiladas kaj poste irigas iun kunulon el inter ili kun la mesaĝo, ke la homo aliĝu al ili, li estu ilia amiĉjo.

Timante proksimiĝas la drako, kaj kun tremetaj lipoj ĝi petas la homon por aliĝi al ili, por ke tiu estu ilia plej bona amiko.

– Bone, enorde, – respondas mastro Lazaro, kaj li iras inter la drakojn por esti ilia plej bona amiko.

Li vivas inter ili trankvile, liaj tagoj pasas pace. La drakoj kutimis iri al la puto por ĉerpi akvon, kaj al la arbaro kolekti lignon por meti fajron. Unu iris iutage, alitage la alia, triatage la tria drako kaj tiel plu laŭvice. Tiel okazis, ke iutage por iri, sekvis mastro L a z a r o. La drakoj portis la akvon en fela akvujo tiome granda, ke en ĝi povus havi lokon la akvo per eĉ 200 siteloj. Prenas Lazaro la grandegan felan akvujojn, li penportas ĝin al la puto, kaj kiam li verŝadas la akvon per sitelo en ĝin, li spertas, ke li kapablos nek plenigi ĝin, nek hejmenporti poste la akvoplenan felan akvujojn per propra forto.

Dume la drakoj eksoifis kaj ili bezonis la akvon ankaŭ por kuiri, sed ĉar neniom da akvo estis hejme, ekiris unu drako post mastro Lazaro por rigardi, kio estas kun la akvo, kial li ne portas jam. Vidas la drako la homon fosantan ĉirkaŭ la puto kaj demandas lin:

– Kion vi faras ĉi tie, mastro Lazaro?

– Ej, do! Mi ne penportos ĉiam ĉi tiun felan akvujojn – indignis mastro L a z a r o, – plie mi elfosas la puton tute, kaj tion mi portos hejmen.

La drako kuregas hejmen kaj rakontas la novaĵon al la pluraj drakoj. La multaj drakoj terurigiĝis ĝismorte kaj petante petis sian plej bonan amiĉjon por lasi tiun puton, ĉar ĝia akvo eble povos forflui kaj tiam ili soifmortos.

– Prefere ni mem portos la akvon eĉ anstataŭ vi – la drakoj insiste petas lin.

Memkompreneble, ne bedaŭras L a z a r o, li eĉ ĝojas sekrete. Pasis la tempo dume, kaj venis la tempo post unu-du semajnoj por L a z a r o, estu li la laŭvica lignoportanto por la

fajro-faroj. Vidante li, ke la drakoj portas hejmen surdorse tiom altajn, dikajn trunkojn, ke eĉ dudek homoj ne povus porti nur unu inter la trunkoj, li komencis pripensi kion fari, ĉar li povus porti nur eĉ ne unu trunkon. Nu, iutage malrapide kiel urso movanta sin, L a z a r o siavice iras al la arbaro. Per la kunportita ŝnurego li komencas ĉirkaŭligi la arbaron. Ĝis vespero atendas la drakoj lian revenon, kaj ĉar li ne revenis, sed ili jam tre atendis la bezonatan brullignon, ili sendas iun sian kunulon post li por konstati, kie restas la lignaĵo, kio povas esti pri L a z a r o, kial li ne venas. Vidas la drako la aferon pri la homo kaj demandas lin:

– Kion vi faras, mastro Lazaro?

– Ej, do! Mi ne penportos tiujn po unu – indignas L a z a r o – sed mi kunligas la tutan arbaron kaj samtempe mi portos hejmen la tuton!

La drako kuregas hejmen kaj pridiras la sperton al siaj kunuloj.

La ŝokiĝantaj drakoj bele petante petas sian amiĉjon por ne bati la arbaron, ĉar se li portos hejmen la tutan arbaron, putriĝos la multaj arboj kaj ili, unu post la alia frostiĝos vintre pro la malvarmo.

– Prefere ni mem penportos hejmen eĉ anstataŭ vi – bele petante petas lin la kamaradoj.

Jes, ja, vere ne bedaŭris L a z a r o, li eĉ priridis tion sekrete. Dume pasis la tempo. Dum la drakoj laboris, Lazaro pigradis. Iutage la multaj drakoj konsentis, ke la ĉeesto de L a z a r o estas ĝena por ili, pro kio ili jam ne volas kune vivi kun li, do bona estus mortigi lin. Poste ili preparolis kiel ili agu; post lia fordormo ili ĉiuj tranĉos al li siajn hakilojn – estis ilia plano.

Dume Lazaro antaŭsentinte ilian planon, post la vesperiĝo anstataŭ si al la tero al sia kuŝloko, li ruligas arbotrunkon, sur ĝin li metas sian veston kaj ĉapelon, poste li kaŝas sin alie. En la malhelo, kiom da drakoj estis, ĉiuj kaŝiras al lia kuŝloko kaj tranĉas en la trunkon sian hakilon tiom fortege, ke nur pecoj, pecetoj estiĝas el la granda trunko. La stultuloj kredis, ke ili finis per Lazaro kaj trankviliĝante iris dormi. Post ilia foriro Lazaro forigas la trunkorompitaĵojn kaj por dormi li reglitas al sia loko. Tiel li ŝajnis, kvazaŭ estus okazinta nenio dumnokte. Matene li vekigis je tio, ke la multaj drakoj strabas al li. Li suspiras profunde, forte:

– Kio pri vi mastro Lazaro? – demandas lin la drakoj angore.

– Nokte, kvazaŭ puloj estus pikintaj min, – respondas Lazaro – mi vekigis pro tiuj tempon post tempo.

Unu al la alia rigardas la multaj drakoj kaj ek-ektre metas ilia animo. Ili sekrete denove ekkonsiliĝas frustrante, kion ili faru. La plej kuraĝa el inter ili paŝas antaŭen kaj demandas la homon:

– Ĉu estas hejme ĉe vi edzino, kaj ankaŭ infanetoj?

– Jes, estas, – respondas tre trankvile nia heroo mastro Lazaro.

La drakoj proponas al li akcepti plenan sakon da ormoneroj, por ke li portu ĝin hejmen al sia familio.

– Bone, mi akceptas ĝin – diras al ili Lazaro, – se iu el inter vi portos ĝin post mi.

La drakoj plenigas iun sakon kaj surmetas al la dorso de iu drako, al la plej forta, kaj kun karaj vortoj ili adiaŭas lin antaŭ la ekiro. Poste Lazaro paŝadas al sia hejmo, post li marŝas la drako surdorse per la plena sako da ormoneroj. Kiam li atingas en la proksimecon de sia domaĉo, li turnas sin malantaŭen al la drako:

– Atendu min ĉi tie por iom da tempo. Mi rapidiros antaŭen por ligi miajn infanojn, ĉar ili tre ŝatas la drakoviandaĵojn kaj eble vin ili povus manĝegi.

La kompatinda drako tiome timiĝis, ke ĝiaj dentoj ektimtremetis. Lazaro kuris hejmen por ligi siajn infanojn ŝajne-simule al unu al la alia kaj diri al ili:

– Kiam vi vidos la drakon, komencu laŭtege krii, hurlu: – Drakoviandon ni volas!

Poste li rerapidiris al la drako por diri, ke ĝi venu, ĉar li ligis jam siajn infanojn. Tiel ili pasis duope, unue Lazaro la heroa botisto, malantaŭ li la drako surdorse kun la sako plena de ormoneroj. Liaj infanoj staris antaŭ la pordo. Rigardante la drakon ili tuj komencas la hurladon:

– Ni volas drakoviandon, ni volas drakoviandon!

Cetero jam ne interesis la drakon. Ĝi dedorsigis la sakon al la tero kaj ekkuris malantaŭen en hejmdirekton, tute ne rigardanta dorsoflanken sed subite haltigis ĝin iu lupu.

– Kien vi kuras tiom rapide? – demandas la lupu.

– Ho ve, ne demandu, – respondas la drako timiĝante ĝismorte, – la infanoj de la heroa botisto Lazaro volas vori min. De ili mi devas fuĝi.

– Ĉu la infanoj de la botisto Lazaro? – demandas la lupu kaj ekridas tiome, ke ĝi eklarmas.

– La familio de la botisto havis du kokinojn – respondas la lupu – ĝuste hieraŭ mi manĝis el ili unu, nun mi iras por la dua. Timas ili eĉ sian ombron.

Ekmiras la drako ne kredanta la diron de la lupu.

– Se vi ne kredas, venu kun mi, ligu vin al mia vosto, kaj tiam vi vidos.

La drako ligas sin al la vosto de la lupu kaj ili duope iras al la familio de Lazaro. La botisto gardostaris ĉe la ĉirkaŭo de sia domo por atenti, se la drako povus reveni, kion li faru por fortimigi tiun. Ekrigardante ilin, per koleraj vortoj li alkriegas al la lupu:

– Ĉu mi ne diris, vi mizerulaĉo, ke ne nur ĉi tiun penportu kun si, sed ankaŭ la plurajn?

Nun jam komprenis la drako, kial tromp-promesis sin la lupu. La forte timiĝinta drako ekrekuras impetege ree sur la vojo tiom rapide, eĉ la vento ne postatingas ĝin. La drako kunportis la lupon al vosto ligante dum sia kuro, dum kio pro la akiritaj multaj vundoj la lupu pereis.

Tiel liberiĝis la heroa botisto de sia mizero, tiel li estiĝis rekonata, riĉhavanta homo en sia vilaĝo. Kiun ĵetas lia sorto antaŭ lian domparcelon, tiu povas legi:

– Kvardek animojn per unu frapo mortbatis mastro Lazaro.

Vasilopulo¹⁷

Vivis iam iu komercisto, kies komerca teritorio etendiĝis ĝis Hindujo. Li havis tri filinojn. Ĉiu estis pli bela ol la alia, sed prefere la plej juna estis la plej bela. Foje, kiam li preparis sin al sia nova vojaĝo en Hindujon, li demandis siajn filinojn, kion li portu al ili revenonte. Unu filino petis oran veston, la alia estus ŝatanta oran vualon, la plej juna petis la patron por porti al li la oran arbeton. Sed, se li ne plenumus iliajn petojn, lia ŝipo ne ekiru reen – deziris ili. Per tiu diro ili volis timigi lin tial, ke ilia peto plenumiĝu.

Foriras la komercisto, plensukcese li alvenas kaj li aĉetas siajn ĉiajn planitajn varojn. Poste li aĉetas kaj la oran veston kaj la oran vualon, nur pri la tria donaco: pri la ora arbedo li forgesis. Kiam li enŝipiĝis kaj volis ekiri hejmen, la ŝipo ne ekiris, kvazaŭ io estus baranta ĝin, ĉar ĝi tute ne ekmovis sin, kontraŭ tio, ke la maro estis trankvila kaj ankaŭ la vetero konvenis. Li sidiĝas surborde meditante pri sia afero, kiam iu kamparanspeca homo alparolas lin:

– Pri kio vi pensadas, paĉjo?

Li ne respondas pro la mergiĝo en la pensoj. La demandanto denove alparolas lin, sed li denove ne respondas, nur rigardas la maron kaj sur ĝi sian ŝipon.

– Ĉu povas esti, ke vi promesis ion al iu kaj vi forgesis pri tio? – scivoladas refoje la kamparano.

Ĉi demando memorigis la komerciston al la petita: orarbeto kaj mencias tion al la kamparano demandante:

– Kie mi altrovos tion?

– Ĉi tie estas antaŭ vi la vojo. Iru tri horojn sur ĝi kaj vi trovos. – diras la kamparano.

Obeas la komercisto kaj ekiras sur la rekta vojo. Kiam forpasas la tri horoj, li haltas por ripozi iom kaj demandas la tie estantojn; kiudirekte troveblas la orarbeto.

Ili montras al iu palaco klarigante, ke tie loĝas la reĝido, la vasilopulo¹⁸, lia nomo estas la: orarbeto. La komercisto iras en la palacon. Tie li malfermas la pordon, petante, oni konduku lin antaŭ la reĝon.

Oni kondukas lin, antaŭ la vizaĝon de v a s i l j a s¹⁹ (reĝo). Li petegas lin ĝis malfermiĝas iu pordo, la pordo de la orarbeto – reĝido la v a s i l o p u l o kaj li enpaŝas al tiu.

– Kion vi deziras de mi? – demandas lin la reĝido.

– Mi havas tri filinojn – respondas la komercisto – la deziro de mia plej juna filino estas, ke mi portu al ŝi la orarbeton.

Vasilopulo respondis eĉ ne unu vorton, sed kondukas lin en iun ĉambron, de feino pli brilegan. Multaj belaj knabinvizaĝoj trovitis surmure. La reĝido demandas lin:

– Ĉu via filino estas tiom bela, ol ĉi tiuj ĉi tie?

– Milfoje pli bela estas mia filino – diras la komercisto.

De tie, en alian ĉambron, en pli belan ejon kondukis lin la reĝido. Iu knabinvizaĝo pendis de la muro, estanta ŝi rave superbela. La reĝido vidis ŝin songante kaj post la songbildo li pentris ŝian vizaĝon, kaj li enamiĝis en ŝin.

– Ĉu via filino estas tiome bela, ol ĉi tiu ĉi tie?

¹⁷ Laŭ la Antaŭparolo, la signifo de la vorto estas: filo.

¹⁸ La noto **vasilopulo** signifas supozeble – laŭ la senco de la fabelenhavo – ne nur filon, sed ankaŭ tronheredanton. La noto **orarbeto** estis skribita malgrandlitere en la hungara teksto, ĉar ĝi povis servi en la fabelo plie kiel epiteto. Ja lia beleco estas simila al iu ora arbedo.

¹⁹ Laŭ la Antaŭparolo la signifo de la vorto **vasiljas**, estas: patro. Sed laŭ la senco de la teksto ĝi povas servi ankaŭ kiel reĝo.

La komercisto tre surpriziĝas kaj liaj okuloj ekfajreras:

– Ja, mia filino estas ĉi tiu! – ekkrias li kunĝoje.

La reĝido transdonas al la komercisto: iun skribaĵon, unu oran pladon kaj unu oran ringon, petante, ke tiujn la patro transdonu al sia filino. Prenas la homo la tri oraĵojn kaj reiras al sia ŝipo apud la bordo en la haveno. Kiam li alŝipiĝas, la ŝipo ekiras kaj li ne haltas ĝis sia patrujo. Demandas hejme liaj filinoj:

– Paĉjo, ĉu vi portis donacon?

– Mi portis – respondas ilia patro, kaj li transdonas al la pli aĝa: la orvestaĵon, al la mezaĝa: la orvualon, al la plej juna: la donacojn de la reĝido.

Prenas la knabinjo la tri oraĵojn, ŝi eniras en sian ĉambreton kaj fermas la pordon. Malfermas ŝi la leteron kaj legas la vicojn de la reĝido. Ĝia enhavo estis:

– Kiam via koro tiel deziras, elprenu la oran pladon, per kristalakvo plenigu, ĵetu en ĝin la oran ringon kaj trifoje unu post alia sinsekve diru: Venu, ho venu orarbeto. Je via voko aperos malgranda blanka kolombo, banas sin en akvo de la plado, rigardos la ringon kaj ŝanĝiĝos al fraŭlo. Mi estas tiu fraŭlo, mi estas la orarbeto.

La fortan ekĝojiĝon de la knabino montras sia korbato kiam sekve ŝi plulegas la skribaĵon:

– Sed vian fenestron lasu malfermite, ke la kolombo povu enflugi.

La knabino faris ĉion obeeme, ŝi agis laŭvorte.

Kaj kiam vesperiĝis, la duonon de sia fenestro ŝi lasis malfermate kaj:

– Venu, ho venu mia orarbeto, ... tiel ŝi vokas, tiel ŝi atendas sian kolombeton.

La kolombo tuj venas per flugilo klakante, enflugante la ĉambron, enflugas la oran pladon kaj kiam elflugas el ĝi, aperas tie la reĝido brileganta kiel orarbeto. Ili rigardas unu la alian, kaj kun afablaj vortoj ili babiladas ligante vortojn al vortoj. Unu oran juglandon transdonas la reĝido dirante al la knabinjo:

– Matene rompu ĉi tiun juglandon kaj surprenu, kio defalas el ĝi.

Poste la kolombo enflugas en la akvon, lia formo ŝanĝiĝas al kolombo kaj kiel birdo prrr... forflugas tra la fenestro. La knabinjo apenaŭ povis ĝisatendi la matenon. Ŝi rompas la juglandon matene. Belega vesto falas el ĝi. Sur ĝi brilegas la ĉielvolbo kaj la multegaj steloj. Survestas la knabinjo la veston por promenadi en ĝi en la ĝardeno. Ŝiaj du fratinoj admiras ĝin kaj envias al sia plej juna fratino pro la vesto.

Samtage vespere denove malfermata estas la fenestro de la knabinjo. Ŝi elrigardas tra tio kaj preskaŭ preĝas jene:

– Venu, ho venu mia orarbeto.

La kolombo denove enflugas tra la fenestro en la pladon kaj el la plado denove la reĝido aperas antaŭ ŝi. Afable ili babiladas kaj kiam alvenas la forirtempo, li donacas unu oran avelon dirante al la knabinjo:

– Rompu matene la oran avelon, – diras li al la knabinjo – kaj surprenu, kio elfalas el ĝi.

Poste li iĝas denove kolombo kaj prrr... li elflugis tra la fenestro. Sekvatage la knabinjo rompas la avelon. Tia vesto defalis el ĝi, sur kiu brilegis la maro, la ondo de la akvo kaj en ĝi la multaj orfiŝoj. Surprenas la knabinjo la veston kaj iras en la ĝardenon por iom promenadi. Ŝiaj fratinoj plie admiras ŝin enviante ankaŭ la veston.

Ankaŭ triafoje estas malfermata la fenestro de la knabinjo kaj ŝi denove vokas, ke:

– Venu, ho venu mia orarbeto. – tie estas la kolombo ĉe la fenestro, tra la fenestro ĝi flugas en la pladon, kaj post momento antaŭ ŝi aperas la reĝido.

Man' en mane, rigardante okulojn la okuloj, ili paroladas unu kun la alia. Sed la tempo pasas, kaj la reĝido devas foriri. Li elprenas iun figon, transdonas al la knabinjo kaj diras:

– Matene tranĉmalfermu la figon kaj surprenu, kio elfalas el ĝi.

Sekvatage la knabinjo tranĉmalfermas la figon, do denove nova vesto elfalas el ĝi. Sur ĝi pompis multaj belegaj majaj floroj. Survestas la knabinjo la veston kaj promenadas en ĝi en la ĝardeno. La du fratinoj miregas pro la vesto, sed ili estas plie enviaj.

Ĝis tiam aŭdacis la du malicaj fraŭlinoj, ke ili kunflustrante decidis fari damaĝon al sia plej juna fratineto. Ilia plano estis; kiam ili iros bani sin, ili faligos saketon da perloj sur la polva tero, kiujn ili kolektigos kun la fratineto. Dum ŝi kolektos tiujn, ili eniros en la ĉambron de la fratineto kaj finos tie sian laboron. Ja, pli frue ili jam kaŝrigardis la sekreton de sia fratineto pri la ora plado, ringo, akvo kaj la kolombo, do ili decidis haltigi tiun ĝojdonan aferon.

Dum la sekva tago ili ekiras trioje bani sin en la lago de la ĝardeno. La du fratinoj faligas la perlan saketon al la tero, en la polvon de la vojo.

– Nur kolektu trankvile ilin, nia fratineto, – diris la du pli aĝaj fratinoj.

Dum kiam la knabinjo kolektas ilin, la du maliculinoj ŝteliras en la ĉambron de la fratineto. Eĉ la ŝlosilon ili forprenis de ŝi dumtempe. La du fraŭlinoj elprenas la oran pladon, puran akvon verŝas en ĝin kaj ĵetas tranĉilon kune kun la ringo en la akvon, poste ili komencas voki:

– Venu, ho venu mia orarbeto. – diras la pli aĝa fraŭlino kaj kaŝas sin kun sia fratino malantaŭ iun ŝrankon, ĉar ili iom singulte ploretas.

Huŝ – enflugas la kolombo, huŝ ... en la pladon kaj kiam ĝi skuetas en ĝi, la tranĉilo ektranĉas ĝin. Ekfluas ĝia ruĝa sango, la plada akvo iĝas tute sanga. Malgaje rigardas ĉirkaŭen la kolombeto kaj kiel ĝi alvenis, tiel ĝi forflugas. La du fratinoj forkuris pensante: nu, nun pompu la fratineto. Rapidis dume la knabinjo en sian ĉambron kaj diras: Venu, ho venu mia orarbeto. Ŝi prenas la akvon por verŝi en la pladon, sed ho ve, granda estiĝis ŝia terurigo ekvidante la ruĝan sangon en la ora plado. Granda estas ŝia malgajeco, kiam al ŝiaj petegaj vortoj ne alvenas ŝia orarbeto. La kompatinda knabino ploras, plorĝemegas, ŝi malesperigante interplektiĝante la fingrojn premadas siajn du manetojn. Ŝi ĉirkaŭrigardas, serĉadas en la ĉambro, meditas pri sia malgaja sorto, kaj subite ŝi rememoras pri la ruzaj, enviaj, strabaj rigardoj de siaj du fratinoj. Ŝi diras nenion al siaj fratinoj, sed rapide iras al sia patro (al la vasiljas-o) kaj jene alparolas lin:

– Karega mia patro, kudrigu al mi veston r u m -an (eŭropan) kaj certigu al mi ŝipeton por porti min al fremda tero, trans la maron al malproksima lando.

Ŝia patro vane provas konvinki sian filinon longe kaj denove kaj refoje, ĉar la knabinjo petegas ĝis tiam, ke li kudrigas la veston r u m -an (eŭropan) kaj li donigas al ŝi ŝipeton, kaj ŝi ekiras iutage al la transmara Hindujo.

Dum la paso de ŝia ŝipo sur la maro, neatendite alvenis du birdetoj, kaj ili surflugis por ripozi sur la maston.

– Nia reĝido estas jam proksime al sia morto, ja plenplenas per vundoj lia bela juna korpo, – alparolas unu birdeto la alian.

– La medikamentoj kaj la balzamoj de la kuracistoj senefikas, la malsanulo pli malsanas de tiuj – suspiradas la dua birdeto.

– Sed lia damaĝo kuracebla estas – diras denove la unua birdeto.

– Eĥ, per kio? – demandas denove la dua.

– Se oni murdas nin ambaŭ, kaj oni ĉerpas akvon el la ĉi tie estanta marborda fonto, tia ŝmiraĵo, tia balzamo estos el ni, kio kuracos liajn vundojn.

La knabinjo komprenis la lingvon de la birdoj, ĉar ŝia orarbeto instruis ŝin al tio. Do la knabinjo prenis sian sagon kaj pafis ambaŭ birdojn. Poste ŝi remigis al la bordo kaj ĉerpis el la fontoakvo. Ŝi pretigis la ŝmiraĵon, dum ili pluiris sur la maro al la tero de Hindujo.

Iutage ili alvenas, la knabinjo vestas sur sin sian r u m -an (eŭropan) veston kaj komencas promenadi antaŭ la palaco de la reĝo.

– Kuracisto mi estas, el R u m -o, mia ŝmiraĵo estas por vundo – ŝi kriadas sur la stratoj.

La reĝo aŭdante la vortojn de la kuracisto vokigas tiun en la palacon kaj demandas ŝin:

– Malsana estas mia filo, la vasilopulo. Ĉu vi povus resanigi lin?

– Mi konstatos post la rigardo lia – respondas la knabinjo vestita kiel kuracisto.

Oni kondukas ŝin al la reĝido, kie ŝi atenteme rigardas lin, la belan amaton de sia koro, sian odorantan rozarbeton. Ŝi esploras, ekzamenas, karesas lin kaj poste diras al la reĝo:

– Dum ok tagoj mi resanigos lin, dum la oka li partoprenos kun mi ĉasadon.

– Ne kredu ŝin – diras la pluraj kuracistoj al la reĝo – jen nia kapo, se lin tiu resanigos!

– Ne via kapo estas bezonata al mi, – diras la reĝo – sed la vivo de mia filo, la vivo de la vasilopulo.

Neion diris la knabinjo, sed aliris al la reĝido kaj ŝmiras, ŝmiradas lin per sia ŝmiraĵo. Pli trankvila iĝis la reĝido, dormo falis sur lin. Sekvatage denove iras tien la knabino kaj ŝmiradas lin per sia ŝmiraĵo. Vekiĝas la senforta malsanulo, kaj diras jam kelkajn vortojn. Tagon post tago ŝi ŝmiradas lin. Tagon post tago reflugas lia forto. Ankoraŭ ne pasis la ok tagoj kaj la reĝido jam estis tie en la ĉasado. La maljuna reĝo havante senliman ĝojon tiel alparolas la kuracisto-knabinon:

– Per kio mi rekomencu vian bonecon kaj lertecon?

Respondas la knabinjo:

– Neion alian mi volas, nur tion, ke vi kunvoku al gastigo grandan festantaron kaj ĉiuj potenculoj, kiuj estas en via lando estu kune en via festeno.

Preparas sin la reĝo al la granda amuziĝo, kune sidas la gastaro. Ili manĝas-trinkas, amuziĝas, laŭte festenadas. La kuracisto-knabinjo turnas sin al la reĝo kaj diras al li:

– Viajn gastojn silentigu, lasu min komenci fabelon.

Mansigne admonas la reĝo al peto de silento. Profunda silento iĝas dum la festeno. Ekstaras tiam la juna kuracisto kaj ekrakontas sian fabelon pri sia propra vivo. Ŝi rakontas pri sia juneco, la knabinaĝajn malĝojojn, damaĝojn, la vojaĝojn de sia patro en Hindujo, la rozarbeton de sia koro; la envion de siaj du fratinoj, la vundiĝon de la reĝido. Pervorte ĉion ŝi rakontas, kion ŝi sentis aŭ pensis. Sed sin mem ŝi ne malkaŝis, ja la rakontita historio estis de iu knabino.

Nur la reĝido atentis forte ĉiumomente rigardanta ŝin: sian kuraciston.

La knabinjo rakontis plu, kaj atingis la okazintaĵon kiel ŝi ekiris el sia hejmo en sia vesto R u m -a (eŭropa) vesto kiel kuracisto, kiel ŝi akiris la ŝmiraĵon kaj kiel resaniĝis de tio ŝia malsanulo.

Subite la reĝido sursaltas el sia sido, kuras al sia kuracisto, trabrakumas, ekkisas ŝin kaj ĝojavizaĝe jene ekkrias:

– Rum-a kuracisto, Rum-a knabinjo, vi estas la parulino de mia koro, vi estas la parulino de mia animo!

El la granda gastigado iĝis granda nuptofesteno, el la ĝoja geedzoparo iĝis pli multe ĝojaj edzo kaj edzino. Mesaĝo estis sendita el Hindujo al la familio de la ĝojega edzino. Ĝoja iĝis la komercisto, lia tre amata filino alvenis en sekuran rodon per la gajno de sia feliĉo. Nur la du fratinojn suferigis la tristo pro la nesukcesinta venĝo, pro kio ili maljuniĝis jam antaŭ la natura tempo de la alveno de la maljuniĝo.

La fantomeca reĝidino

La iama reĝo ĝuis abundon de ĉia bono tera. Lia filineto estis tiome bela, ke oni opiniis ŝin Nereida; akva nimfo. La fraŭlineto havis multcentojn da svatiĝantoj, sed ŝi elektis neniun, ŝi ne volis scii pri tiuj. La fraŭlino havis unu grandan eraron. Ŝi petis ĉiutage tute novan paron el silkaj ŝuoj, sed je la sekvataga mateniĝo, tiuj iĝis ĉifonaj, foje kotaj, kaj ĉiam trivitaj. Neniu sciis, kiel okazis tio, neniuj konjektis eĉ ĝian kaŭzon.

Ŝia patro kolere ekflamiĝis pro ĉi tio kaj anoncigis sian mesaĝon: al tiu li donas sian filinon por edzinigi, kiu ekscios la aferon de la ŝuoj. Kial ili estas ĉifonaj, kial estas kotaj la ŝuoj? Sed la svatiĝanto bone atentu, ĉar eble la filino povos venĝi kaj mortigi la svatanton.

Kontraŭ la timigo venis multegaj fraŭloj, eĉ inundis la multaj svatigantoj, kaj mortis ĉiuj, la kompatindaj. Ili eksciis nenion pri la ŝuoj kaj eĉ la fraŭlinan menson ili povis ne trompi en intereso de akiro de ia ajn scio.

Trans la maro loĝis iu reĝido, kiun same atingis la famo pri ĉi tiu reĝidino. Iutage la reĝido viziton faris ĉe sia patro, kaj raportis pri sia plano de la forvojaĝo:

– Mi vizitos tiun fraŭlinon Nereida-faman kaj elscios, de kio eluziĝas ĉiutage ŝiaj ŝuoj.

Lia patro petegas lin:

– Ne lasu min sola. Domaĝe estos pro via bela vivo. Ankaŭ vi povos pereji kiel la plujaj plurcentoj da fraŭloj.

La patro provas konvinki lin, sed li ne cedas al la instigo, li volas iri eĉ ĝis la fino de la mondo por ŝi. Lia patro malgaje rezignacias je la foriro. La filo mankas la patron kaj ekiras. Dum marŝado li renkontas iun maljunulinon.

– La beno de Dio estu sur vi, mia onjeto, salutas ŝin la fraŭlo.

– Bonvenon ĉi-loke, – resalutas lin la maljuna sinjorino, – kien, en kiun direkton vi klopodas, mia fileto?

– Mi iras tien, kie loĝas tiu Nereida-speca reĝidino, pro kiu jam tre multaj fraŭloj pereis.

– Kial ili pereis? – demandas la maljunulino.

– Ĉar ili ne trovis la solvon de la problemo koncerne la reĝidinon, kaŭzita de iu nekonata kaŭzo.

– Kian problemon? – demandas la grandaĝulino.

– Ŝi ricevas ĉiutage novajn silkajn ŝuojn, sed je la sekva mateno ili iĝas ĉifonaj, foje kotaj, kaj ĉiam trivitaj.

– Ho, mia fileto, – respondas la maljunulino – al tio bezonatas fortaj piedoj kaj bona menso, ja tiun enigmon oni povas diveni, eltrovi nur tiel.

– Mi havas kaj menson kaj piedojn – respondas la junulo – mi aŭ ektrivos ĝian kaŭzon, aŭ ankaŭ mi pereos.

Dum iom da tempo dronas en pensoj la maljunulino, poste tiel respondas:

– Mi bedaŭras vian Junecon, do mi ŝatus helpi vin. Eksciu, ke tiun fraŭlinjon fantomoj tenas en mallibereco. Se vi havas bonan koron kaj klaran menson, ŝian korpon kaj animon vi povos savi.

Ŝi elprenas el sia sako blankan kampanulan pintan felĉapon kaj transdonas al la fraŭlo dirante:

– Neniu povas ekvidi vin, ĝis ĉi tiu kampanula pinta felĉapo estas sur via kapo. Kiam vi estos ĉe la fraŭlino, kaj ŝi sidigas al sia tablo, ŝi regalos vin per vino por tintigi la glasojn. Ŝi metas du karafojn sur la tablon, en unu estas dormiga vino. El tio ŝi regalos vin. Bone atentu, ne gustumu ĝin, kiel ajn proponas la fraŭlinjo. Vi metu spongon sub viajn lipojn, en tion verŝu vian vinon. Simulu, ke vi iĝis dormema, fermu la okulojn, sed malfermu vian menson, kaj tiel

kaŝobservu la artifikaĵojn, artaĵojn-lertaĵojn de ŝiaj agoj. Se vi rimarkos, ke ŝi survestas siajn novajn ŝuojn kaj ekiras el la palaco, tuj survestu la kampanulan pintan felĉapon kaj de spuro al spuro sekvu ŝin. La pliajn agojn elpensi estos la taskoj de via menso kaj viaj piedoj.

– Karega mia patrinjeto, vian bonan konsilon, vian grandan bonecon, per kio mi povas rekompenci? – demandas ŝin la reĝido.

– Per nenio – respondas la sinjorino, – ja mi estas via mirinda-sorto.

Per tiuj vortoj ŝi malaperis nekapteble, kiel la fluganta vento, kvazaŭ ŝi estus tie neniam. La fraŭlo kaŝis la kampanulan pintan felĉapon sub sia ĉemizo ĉe la brusto kaj ekiris al la lando de la fama reĝidino. Li paŝadas inter montoj, li trarapidas arbarojn kaj valojn, li promenas sur kampoj, ĝis iutage li alvenas en tiun alian landon, eĉ al ĝia reĝa palaco. Alpaŝante al la reĝo kuraĝkore li salutas tiun:

– Longa estu via vivo, ho mia reĝo; pro via filino mi venis, mi edzinigus ŝin. Per kio mi komencu, kiel mi komencu mian agon?

– Kiu, kio vi estas? De kie vi venis? – demandas lin la reĝo.

– Mi estas filo de mia reĝpatro, la unusola filo de mia patrino – respondas la fraŭlo.

– Estas damaĝe pro via juneco kaj via kuraĝo – respondas malgaje la reĝo – pli bone estos, se vi returnos vin, kaj eĉ unu paŝon vi ne movos.

– Mi ne retiriĝas! Mi iras nenien eĉ ne unu paŝon de tie! Plie parolu al mi pri via filino, – respondas la junulo, – pri via belŝueta ido.

– Ekde tri jaroj – ekrakontas la reĝo, – ke ĉiuvespere ŝi ricevas novajn ŝuojn kaj ili tamen estas foruzitaj al mateno. Neniu povis ekscii iom ĝis nun, el ĝia kaŭzo. Multaj junuloj perdis vivon pro tio, sed vane, ĉar ne trovitis spuro.

– Mian sorton mi direktas, – diras la fraŭlo – do vidu mi, kiel mi povos diveni la solvon.

La reĝo aplaŭdas, kaj aperas iu servisto, kiu jam akompanas la reĝidon en la internan ĉambron de la reĝidino. Admirinde bela estis la fraŭlino, preskaŭ blindiĝis la okuloj de la reĝido. La fraŭlino alrigardas la junulon kaj mallaŭtvoĉe ŝi ripetadas nur si mem:

– Kiom damaĝe estas pro ĉi tiu fraŭlo, kiome bedaŭrinda estas lia juna vivo.

Poste ŝi turnas sin al la junulo kaj invitas lin al sia tablo. Rapidas la multaj sklavinoj por primeti la tablon kaj jam portas la altvalorajn manĝaĵojn, dolĉaĵojn, fruktojn kaj la vinoplenajn du karafojn.

– Sidiĝu, reĝido vidu la delikataĵojn, komencu la manĝadon, – instigas lin la fraŭlino.

Ili komencas la manĝadon, babiladas, ŝercadas. La fraŭlino regalias per vino la fraŭlon, ŝi volas tinti la glasojn.

– Nur antaŭzorgeme, – respondas la reĝido – ne estiĝu vaporo en mia kapo pro via vino.

Trinkas la fraŭlino el la alia korifeo, el sia vino, kaj el la alia korifeo ŝi plu regalias la fraŭlon. Prenas la fraŭlo la glason, kaj ŝajnigas kvazaŭ li trinketus el ĝi, sed la vinon li fluetigas sub la buŝon, al iu spongo.

– Mi vertiĝis iom, – diras la reĝido – kaj subite li kliniĝas, kvazaŭ li estus sinkopinta.

– Nu, mi finis ankaŭ pri ĉi tiu kompatindulo, – diras suspire la fraŭlino, kaj ŝi portigas la fraŭlon al la lito, por daŭrigi tie la dormadon.

Apenaŭ malheliĝis, kaj la fraŭlino kaj la servistaro enlitiĝis. Nur la fraŭlino ne fordormis. Ŝi ellitiĝas singarde, vestas sin, survestas siajn novajn silkoŝuetojn, poste alpaŝas al iu ŝranko, malfermas ĝin kaj du vergojn ŝi elprenas el ĝi. La unua estis el oro, la alia el arĝento. Poste ŝi ekiras al la pordo. Kiam ŝi proksimiĝas al la pordo, ankaŭ la reĝido sursaltas, sur sin kaptas la kampanulan pintan felĉapon kaj tuj ekiras post la fraŭlino. Nur la arĝentan vergon tenas la reĝidino al la pordo kaj ĝi malfermiĝas de si mem. Poste ŝi elpaŝas de la ĉambro, ŝi promenas malsupren sur la ŝtupoj al la elirejo de la pordego. Tuj post ŝi iras la nevidebla reĝido en la kampula pinta felĉapo. La pordegon tuŝis la fraŭlino per la ora vergo kaj ĝi malfermiĝis sen ŝlosilo. La fraŭlino elpaŝis eksteren, la reĝido post ŝi, kaj ili ekiris en la profunda malhelo, tra

ebeno, arbaro, dorno, valo, marĉejo, marĉa grundo, seka tero. Ĉio estis tiome malhela, nigra, kia la gudro estas. Surda silento regis, kia la morto estas. Ili iris stumbladante, unue la reĝidino, post ŝi filo de iu reĝo. Foj-foje haltas la reĝidino, ŝi returniĝas, kvazaŭ ŝi aŭdus sonojn de paŝoj aŭ kliniĝon de branĉo, ŝajnas, kvazaŭ iu sekvus ŝian spuron. Ŝi vidas nenion kaj ili iras plu, inter dense kreskantaj arboj, en arbaro, transsalte-senhalte, en salikejo. Fine la reĝido ekrigardas grandan palacon. Ĝiaj fenestroj lumigitaj, la pordego vaste malfermita. Tri reĝido-specoj atendadas ĉe la pordego kaj lumigas antaŭ la reĝidino. Ili estis la fantomecaj reĝidoj, sorĉitaj feoanimoj. Baldaŭ pasos tri jaroj, ke ili ekvidis la reĝidinon kaj ŝi fascinis ĉiujn tri. Ilia potenco estis fantomeca kaj la reĝidino vole-nevole iris post ili fascinite de ilia ravpotenco alligite.

– Kial malfruis vi tiom longe? – demandis la tri reĝidoj.

– Iu fraŭlo venis al mi hodiaŭ, kaj nur tre malfacile mi povis dormigi lin. Kiam mi venis survoje, kvazaŭ mi aŭdus bruojn de paŝoj, kvazaŭ iu sekvus min. Mi ne scias, ĉu fantomo aŭ serpento estis, sed mi tre timis.

– Timu eĉ ne fantomon kaj ne serpenton – trankviligis ŝin ĉiuj tri, ĉar per, nia potenco ni subpremas kaj serpentospecon kaj fantomon. Nur halucino, fantaziado estis la tuto.

Poste ili suriris sur la ŝtupoj, post ili la reĝido en kampula pinta felĉapo. Florarbeta pompis ĉe la alkovo, ĉiuj floroj estis el pura oro, la burĝonoj el karbunkoloj²⁰. Meze plorsaliko staris, ĝiaj folioj estis el diamantoj, ĝiaj branĉetoj el koraloj. Kiam ili preterlasas ĝin, la reĝido detranĉetas unu branĉeton kaj kaŝas ĝin surbruste. Baldaŭ ili atingas iun tableton, sur kiun lumas diamant-lampo kun brilante inundanta diamanta lumo. Ili alsidiĝas kaj ĝis la tutsatiĝo ĝue manĝegas el la manĝaĵoj de la diamantaj pladoj per la rubenaj forkoj kaj per la smeraldaj kuleretoj. Kiam ili finis la konsumon de la manĝaĵoj kaj iris al la alia ĉambro, la fraŭlo kaŝis la diamantan pladon, la rubenan forkon kaj la speraldan kulereton apud la aliaj sur la bruston. Venas poste la tri fraŭloj, la fantomecaj reĝid-junuloj, el kiuj la unua tenas oran pladon, la alia oran kruĉon kun ora akvo, la tria oran tukon prezentas al la reĝidino por lavi manojn. En la oran pladon el la ora kruĉo fluas la ora akvo al la du manoj de la reĝidino kaj ora tuko sekigas ilin. Ankaŭ ilin kaptas kaj kaŝas la reĝido, nevidebla pro la kampanula pinta felĉapo. Poste venas la tri reĝidoj enmane per meĉoj kaj akompanas la reĝidinon ĝis fino de la ŝtuparo kaj adiaŭas ŝin.

Poste denove ekiras la reĝidino reen sur la jam konata vojo, en malhelo, tra ebena, arbaro, dorno, valo, marĉejo, marĉa grundo, seka tero. Post ŝi iris la reĝido nevidebla. Ĉirkaŭ la aŭroro ili realvenis. Denove la ora vergo malfermis la pordegon, de la arĝenta vergo malfermiĝis la ĉambra pordo. Ŝteleniris la fraŭlino, tuj post ŝi la reĝido. Li saltas en la liton, kiam li kuŝiĝas en la lito, ŝajnigas dormi tiom profunde, kvazaŭ vivo ne estus en si. Ankaŭ la fraŭlino enlitiĝas, post kiam ŝi demetas la ŝuetojn. Ĉiuj ĉifoniĝis, ĉiuj estas kotaj, foruzitaj.

Mateniĝinte, kiam brilis jam la sunradio, aperis la homoj de la reĝo, kaj ili rigardis unue la ŝuetojn. Ej, do tiuj tute same aspektas kiel la hieraŭtagaj, konstatas ili. Ili vekas la reĝidon kaj kondukas antaŭ la vizaĝon de la reĝo.

– Fileto mia, – diras li al la reĝido – denove foruzita estas tiu ŝuet-paro! Kion vi eksciis nokte? Kion faris la reĝidino?

La reĝido ne hezitante pri la respondo petas, ke la reĝo kunvoku la divanon, por ke li povu raportii antaŭ tiuj ĉefhomoj de la reĝo pri siaj noktaj spertoj. La reĝo kunvokis la grandan konsilantaron. Kiam ili ĉiuj sidis ĉirkaŭronde de la tablo, la reĝido petis la reĝon por plenumi sian ankaŭ alian deziron.

– Plenumiĝu via deziro – kapsignis la reĝo.

²⁰ La karbunkolo povas esti ruĝkolora juvelŝtono; granato, rubeno.

– Voku ĉi tien ankaŭ la reĝidinon – petis la reĝido – sidu ŝi malantaŭ la kafes-- o (krado) kaj tie ŝi aŭskultu miajn vortojn.

La reĝo mesaĝas al sia filino, kiun oni sidigas malantaŭ la kradon, ke neniu povu vidi ŝin, sed ŝi povu aŭdi ĉiun vorton. La reĝido jene komencas sian dirindaĵon:

– Ĉu vi tre admiras, ĉu ne, kiome foruzitaj, ĉifonaj, kotaj estas la ŝuetoj de la reĝidino ĉiutage post la noktoj? Kial ne estus tia, ja ĉiunokte ŝi kuretas transsalte-senhalte trans kavoj, arbetoj, montoj, valoj, arbaroj.

– Bone pripensu viajn vortojn, – atentigis la reĝo la fraŭlon – alion ne diru, nur la sanktan veron!

– Mia vivo estas de la pravo – respondas la fraŭlo – kaj se mi povas savi multan vivon, mi ne indulgas la mian.

– Pri kia kavo, arbedo vi parolas? – demandas la reĝo. – Kian monton, valon kaj kian densegan arbaregon?

– Kiam hieraŭ mi enpaŝis en la ĉambron de via filino, – komencis la rakonton la reĝido, – per manĝaĵoj preparita tablo atendis min kaj du karafoj plenaj de vino. Unu estis por mi, la alia por via filino. Min regis la suspekto, kial mi ricevis alian karafon. Mi superruzis vian filinon, ja mi ne trinkis ŝian vinon, ĉar dormiga vino estis ene.

Poste la fraŭlo vicigas la okazintaĵojn antaŭ la konsilantaro. Li rakontas la vergojn oran kaj la arĝentan kiel malfermigilojn de la pordego, ilian dumnoktan vojon ĝis atingo de tiu fremda palaco inter la fantomecajn junulojn. La reĝido alrigardas al la krado, malantaŭ kio jam tre maltrankvile, senĉese moviĝante sidas la reĝidino. La fraŭlo daŭrigas poste la rakonton pri la tento de la tri reĝidoj, kiel ili lumigis la vojon antaŭ la reĝidino en la alkovo kaj dum ŝia akompano sur la ŝtupoj. Pri la florarbedo, kies floroj estis el oro, la burĝonoj el karbunkolo. Pri la ĝiameze kreskanta plorsaliko, kies folioj estas el diamantoj, la branĉetoj el koralo.

– Kiam ĝin mi preteriris, mi tranĉetis branĉeton.

Finante ĉi vortojn li elprenas la branĉeton dirante:

– Jen ĝi, por vidi. Ĉu vi: reĝidino konas la branĉeton, ĝiajn koralon, diamantojn?

La reĝidino diris eĉ ne unu vorton, sed ŝi iĝis pli nerva, kiel same ankaŭ la maljuna reĝo, kiu dume daŭre glatigas sian barbon, sulkigas sian frunton.

– Poste ili sidiĝis al tablo – daŭrigas la reĝido – diamanta lampo lumdonis al ili, diamanta lumo brilegis sur ili, diamanto estis la plado de la reĝidino, rubeno estis ŝia forko, smeraldo estis ŝia kulereto.

Tiam li elprenas de sia brusto la pladon, la forkon kaj la kulereton kaj almontras al la reĝ-fraŭlinjo:

– Ĉu vi konas viajn pladon, forkon kaj kulereton?

Eĉ ne unu vorton diras la fraŭlinjo, ŝi nur kunpremas siajn lipojn kvazaŭ maĉus feron.

– Venis poste la tri fraŭloj – daŭrigas denove la reĝido – ili prezentis al la reĝidino: oran pladon, kaj oran kruĉon kun ora akvo por lavi manojn, kaj oran tukon por viŝi la du manojn.

Li denove metas manon sub la veston sur la brusto kaj elprenas la oran pladon, la oran kruĉon, la oran tukon kaj montras ilin al la fraŭlinjo, demandante:

– Ĉu vi konas ĉi tiun tukon?

Eĉ ne unu vorton diras la reĝidino, ŝi nur faligas siajn amarajn larmojn tremetante. Senkonscie estante la maljuna reĝo eksaltas el sia sidpozicio, li eltiregante la glavon alkuras al sia filino por dispecetigi ŝin.

– Ekde tri jaroj! – krias la reĝo – De nokto al nokto vi agas ĉi tiel kaj ankoraŭ nun vivas via peka korpo!

Oni postkuras lin kaj ekkaptas lian brakon:

– Ĉu vi volas senhavigi de sia vivo vian unusolan infanon? Ĉi tie estas ĉi tiu heroa reĝido, donu ŝin por esti lia edzino.

– Eble, unue vi devus demandi min: ĉu mi volas edzinigi ŝin?


– La reĝidino vin koncernas – respondas la membroj de la konsilantaro – vi venkis ŝin kaj ne ŝi vin.

– Se ŝi forbruligos ĉi tie antaŭ mi ŝian sorĉan, magian libreton, la vergetojn oran kaj la arĝentan, kaj ŝi venos kun mi en mian landon en la brilan kortegon de mia patro, kaj se ŝi amas min kaj ankaŭ restos tie, mi pensos pri la edzinigo ŝia. Sed male, ŝi povos forlasi min – diras la reĝido.

Ĉiuj alrigardas la reĝidinon kaj atendas ŝian verdiron konigante per ĝi sian internan konvinkon akorde kun la ekstera situacio. Ŝi honteme rigardas malsupren, sed dankeme, kun sincera sento, kun vera estimo ŝi balbutadas mallaŭte:

– Estu via deziro, mia sopiro estas la via.

Ĉio iĝis tiel, kiel estis priparolite; fine granda nuptofesteno okazis, dise en la lando drinkfestenoj. Ankaŭ mi estis vokita gasto, kiam mi vizitis ĝin por mallonga tempo, oni ĵetis al mi diversajojn por mangi, eĉ ankaŭ unu grandan oston. Mi suĉis, suĉadis ĝin, sed ostomedolon mi ne trovis ene. Mi ekadmonis miajn makzelon kaj mandiblon, agu ili laŭnecese. Kiu kredas, prosperu kiu ne kredas forkuru.



Bildoj el Ateno – Detalo de Ateno kun la akropolo
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=62330>

La kismet-o²¹

En la malgranda insulo M i d i l l i, prefere en ĝia arbaro, vivis inter malabundaj vivcirkonstancoj iu arbohakisto kune kun sia edzino kaj du infanoj, kun sia hakilo, hipo, malfortiketaj du muloj. Entute tiom estis lia havaĵo.

Ĉiutage, kiam jam alvenis la aŭroro sunradia, aŭ male, li jam estis en la arbaro. Li elektis arbon indan por elhaki kaj ĝis tiam li tranĉadis, frapadis ĝin per siaj iloj, ĝis li dispecetigis ĝin. Per la arbopecetoj poste li ŝarĝis siajn du mulojn kaj li portis la lignon en la urbeton, kie li sukcesis vendi la brullignon aŭ ne. Foje bonapreze, foje male. Iatempe post la forvendo de la ligno, ili povis manĝi ĝis satiĝo, sed lastatempe ili vegetas mizere. Ĝuste nun estas ĵus dudek jaroj, ke jene pasas lia vivo. Samforme li agas ĉiutage, multfoje li malsatas; ja lia forto jam komencas malmultiĝi, sed plie lia toleremo. De tempo al tempo, ĉiam iom pli, li apatiĝas, ankaŭ lia bonhumoro ekforlasas lin, ĉar lia bonŝanco ne altrovas lin, eĉ la ĉiutagaj manĝaĵpecoj ne estas certigataj.

– Kial mi penas tiom, – diras li iutage – ja mia laboro ne havas videblan rezulton.

Per tiuj vortoj li frapis siajn hakilon kaj hipon en la angulon de la domaĉeto, komunikante al la edzino, ke li ne laboros plu, eĉ tute ne iros en la ĉirkaŭaĵon de la arbaro. Se ie estas lia k i s m e t -o (lia bonŝanco), tio certe vizitos lin iel. Tutcerte, li ne postiros plu ĝin. La morgaŭan matenon li jam ne ellitiĝos, sed anstataŭe li plie bonetendos sin sur la lito. Kaj tio okazis vere, ke li turniĝis foje sur sian dekstran flankon, aliafoje al sia maldekstra. Surpriziĝis lia edzino. Ŝi alpaŝetis al la edzo, por, se li dormas, ŝi veku lin.

– Ellitiĝu paĉjo, jam la koko kokerikis – vekigas ŝi la edzon.

– Al mi egalas! Tio min ne interesas, ĝis vespero ĝi povas kokeriki, – murmuris la hakisto.

Pli mire, pli malafable rigardas la edzino al la edzo kaj kolere diras al sia parulo:

– Estas tempo por penleviĝi!

– Kia tempo? Por kio? – demandas denove la hakisto.

– Ho, jes, por ke vi iru al la arbaro arbon haki! – la edzino respondas kolere, – vi demandas tiel, kvazaŭ vi ne scius.

– Ĝi jam tedas min ĝis gorĝo! KREDU min, ĝi jam tro sufiĉas al mi! – diras la homo – en la arbaron mi iros neniam plu. Renkonti mian kismet-on mi faros eĉ ne unu paŝon. Se ĝi bezonas min, ĝi povos trovi min en mia kuŝejo! – Edzo mia! Ĉu povas esti, ke via menso foriĝis? – krias la edzino paraliziĝante. Ĉu eble vi pensas tion, ke via kismet-o kuros post vin? Tion ne atendu! Ek! For! Senprokraste! Tuj! Tuj ellitiĝu kaj iru al la arbaro! Male, ni malsatmortos, ja eĉ unu guto da pano ne estas en nia domo!

– Ne estas mia zorgo, – diras la homo per granda indiferenteco, neglekteco. – Mi ne ellitiĝas, mi ne iros plu enarbaren.

La virino provas bele peti la edzon, sed vane. Ekploras la sinjorino, sed ankaŭ tio vanas. La homo estas forte obstina, ne cedas el sia volo. Li turniĝas al la muro sur sia kuŝejo, kaj la bona edzino povas paroli ĝis vespero predikante, saĝumante, grumblante, ĉiu ŝia klopodo estas senrezulta. La homo diras; venu ĉi tien tiu kismet-o!

Kaj jen! Malfermiĝas la pordo de ilia domaĉeto! Iu kamparanmastro envenas tra ĝi kaj diras al la hakisto:

– Mi havas iun forportendan aĵon kaj ne toleras la porton mia dorso. Viaj du muloj povus, se ankaŭ vi helpus.

²¹ La signifo de la baza vorto **kismet** estas bonŝanco.

– Mi bedaŭras – respondas la hakisto – mi volas eĉ neniom moviĝi de mia loko, neas tion mia voto.

– Tiam, donu ĉi tien viajn mulojn, mi reciprokos vian bonecon – petas la homo.

– Miajn mulojn vi povas forporti – respondas la hakisto.

Prenas la mastrohomo la mulojn kaj forportas ilin. Ĉi tiu kamparanmastro volis sekrete porti hejmen la trovitan multan trezoraĵon de sur sia agro, kiujn li malkovris tie fosante kaj hojante la teron, sed surdorse li ne povis porti hejmen. Li metis la trezoraĵojn en sakojn, surmetis ilin al la muloj. La du malfortiketaj, magraj muloj ŝanceliĝis sub la ŝarĝo.

Kiam li marŝetas hejmen al sia vilaĝo, subite li vidas tre terurite, ke: z a p t i j e (armitulo) pasas sur la vojo. Ili havis la saman irdirekton al sia vilaĝo. Nur ĝuste nun rememoris la mastro, (pri tio, kion li sciis ankaŭ pli frue), ke la trezoraĵo elfosita de la tero koncernas la padiŝaĥon. La kontraŭordonan pekanton oni juĝos al mortpuno. Ek! Zu! Kuregu bona mastro! – nu, la bona mastro, pro la morta angoro kaj mortotimo, forkuris de tie tiom rapide, ke li ne haltis ĝis sia hejmo. Li lasis tie la mulojn kun la sakoj, kun la trezoraĵoj, kun ĉio. Sen pelanto, la muloj ne sciante kion fari, nu ili ekamblis hejmen al sia stalo, al la domaĉeto de sia posedanto.

Ĝuste tiam la sinjorino faris ion en la korto, kiam ŝi vidas, ke la du muloj staras apud la pordo. Ili apenaŭ povas stari, ŝanceliĝas iliaj genuoj sub la granda ŝarĝo. Kuras la edzino al sia edzo kriante haste kaj impete:

– Ĉi tie estas niaj du muloj apud la pordo, tiom da sakoj estas sur ili, ke ili eĉ povas terenfali. Rapidu, por helpi demeti tiujn de ilia dorso, ĝis ne estos malfrue.

– Tiuj ja povas esti iaj ajn, mi ne ellitiĝas! Mi diris jam, kial vi ne volas akcepti mian vorton?

Kuras la kompatinda sinjorino al la korto por lasi enveni la du mulojn. Ŝi prenante tranĉilon distranĉas la ŝnuregojn, per kiuj estis la sakoj ligitaj al la bestoj. Kiam la ŝnuregoj iĝis detranĉitaj kaj subruliĝanta iu sako, ekfalas el ĝi multaj arĝentaj moneroj, el la alia sako elfalas multaj ormoneroj. Sonoras, tintas la multaj arĝentaj kaj oraj moneroj, ili aspektas kiel drapiraĵoj arĝenta kaj ora, kiam ili dissterniĝas sur la tero.

– Kreanta A l a h o! – krias la edzino – alvenis la k i s m e t -o, ĉi tie estas via bonŝanco!

Ŝi enkuregas al sia edzo, kaj foje ŝi ridas, foje ŝi ploras, foje ŝi balbute parolas tiel rigardanta sian edzon.

– Kion do vi volas de mi? Kio okazis pri vi? – demandas ŝin la edzo.

– Alvenis via k i s m e t -o! Viaj muloj portis al ni! Tio estas ekster ĉia dubo, ke multega oro kaj arĝento estas en nia korto; ne ekzistas plu malriĉeco, ne estos plu mizero!

Je tiu famo, la hakisto tamen surplandiĝas, kaj kiam li elrigardas al la korto, do li kaptas la du manojn al siaj du okuloj, tiome blindiĝas liaj okuloj pro la granda brilego. Li rigardas la trezoraĵon kaj pripensas.

– Ĉu vi vidas, sinjorino, – fine li ekparolas – tamen bone estas, ke mi ne aliris la arbaron, mi pravus, kiam mi atendis veni ĉi tien mian k i s m e t -on. Ĉar stranga estaĵo estas tiu k i s m e t -o. Se vi klopodas post ĝi kaj diskuradas por ĝi, vi povas postatingi ĝin neniam; sed se vi ĝisatendos ŝajne ne zorgante pri tio, ĝi de si mem vizitas vin kaj nur falas al via kolo.

En la klostro de blindaj derviŝoj

En Ateno vivis iu komercisto honora kun granda havaĵo. Li havis edzinon, fileton, kaj feliĉan vivon kun ili. Kiel okazis, kiel ne, sed iutage la komercisto iĝis bankrotita. La malĝojo afliktis lin, ĝis fine li malsaniĝis kaj forpasis. La edzino restis sola, ŝia fileto orfiĝis. Laŭnecese, la kompatinda edzino ĉiam vendis ion, el kies prezo ŝi instruigis, edukigis sian filon. La filo estis jam plenkreskanta, kiam iutage li alparolis sian patrinon:

– Kara mia panjeto, mi devas komenci ian laboron, por ke mi povu certigi nian ĉiutagan panon. Pli-malpli frue, sed baldaŭe nia havaĵo tute elĉerpiĝos.

– Ni devos vendi nian malgrandan agron – suspiras la patrino. – Per la mono vi forvojaĝos en Stambulon, vi aĉetos diversajn varojn por vendi ilin en Ateno. Vi povos esti komercisto, kio via patro estis.

Nu, ili vendis sian agron, adiaŭis unu la alian kaj la fraŭlo enŝipiĝis por ne halti ĝis Stambulo²². Irante-venante sur la stratoj, en la zig-zagaj bazaroj, li eniras iun butikon de helva-oj²³, al la maljuna preparanto de helva-oj. Li restas tie kelkajn tagojn por helpi al la maljunulo, kaj dume li ellernas la metion. La maljunulo ekamas la fraŭleton kaj demandas lin iutage:

– Kiucele vi venis ĉi tien en nian grandegan urbon?

– Komercisto estis mia patro en Ateno, – respondas la fraŭlo, – ankaŭ mi ŝatus esti tio.

– Restu prefere en mia butiko, ankaŭ ĉi tie vi povos enspezi monon – entuziasmigas lin la maljunulo.

– En Ateno atendas min mia patrino – respondas la junulo – mi estas ŝia solulo, ŝia nuno kaj estonto. Li rakontas poste, kio okazis pri ili, kaj pri lia celo pri aĉeto de varoj en Stambulo. Ĉi tie li aĉetas, hejme forvendas, kie la patrinjo atendas lin hejmen.

– Tiukaze, gardu vian monon, kaj vian korpan-animan sanstaton – atentigas lin la maljunulo, – ĉar ĉi tie multas la malbonaj homoj, sed pli multa estas la tento.

La fraŭlo transdonas sian monon al la maljunulo, gardu tiu ĝin por iom da tempo, ĝis li ne aĉetas ĉiun varon vendendan. Tiam li enŝipiĝas kaj reiras al sia patrino, eduka mamnutristino. Li restadis iutage ĝuste en la ĉ a r ŝ i - o (foiro), kiam li aŭdas de iu komercisto, ke ĝuste sekvatage ekiros iu ŝipo portanta varojn al Ateno. Li rerapidas en la butikon de helva-oj kaj petas sian monon, por aĉeti ion kaj alion. Li transprenas sian monsaketon kaj ekiras reen en la bazon. Li preterpasas ĝuste iun trioblan vojon, kiam ekaŭdas la lamentadon-veadon de iu blinda d e r v i ŝ o. Tiu almozetegas de la piedirantoj jene kantante:

– Blinda mi estas, lumon nevidanta, mi almozetegas la senhelpa; donu, se vi doneblas unu groŝon, mi manĝemas unu gluton.

Bedaŭrante la blindan derviŝon li enigas la manon en sian monujon por serĉi moneron donace, dum ektintas la ormoneroj. La blinda almozeteganto ekaŭdas ĝin kaj demandas la fraŭlon, ke ĉu eble ormoneroj sonas-tintas ene?

– Jes, tiuj – respondas la pacema fraŭlo. Mi estas el Ateno, por aĉeti mi venis ĉi tien.

– Ho, permesu mia fileto – petegas la derviŝo, – ke mi karesu oron, dumane mi fingrumu. Antaŭlonge mi prenis oran monon, lasu min aŭdi ĝian tintadon.

La fraŭlo aldonas la monsaketon por fingrumi la ormonerojn pere de la maljunulo. Tiam la derviŝo elprenegas la monsakon el la mano de la fraŭlo kaj veade ekkriadas:

²² Stamboul aŭ Stambul estas la praaj nomoj de la historia malnova urbokvartalo de la urbo Istambulo, kiu siatempe estis la unusola konsistiga parto, ĉar aliaj urbopartoj ne ekzistis.

²³ La radikvorto: halva aŭ helva – signifas dolĉaĵon turkan pretigite el tritikfaruno aŭ grio kun aldonitaj lakto, sukero, mielo, butero, oleo, akvo, pingraĵoj.

– Rapidu bonaj homoj, oni volas derabi min, oni volas ŝteli de mi.

Ĝuste estis en ilia proksimo du ĉausoj²⁴, kiuj kurante al la derviŝo, ekbatas, frapas la fraŭleton.

– Sendia malmuslimido – kriadis la du ĉausoj – ĉu vi volas priŝteli blindan derviŝon, ĉu forrabi lian monon?

Li vane rifuzas la kulpigon. Vane diras la fraŭlo, ke la monsako lia proprajo estas. Oni ne kredas, ke ĝin la derviŝo elprenegis de lia mano. Oni ne kredas lin kaj nur batas, frapas lin, pro kio li devas kurante rifuĝi el inter la manoj de la du ĉausoj. Li repaŝadas ŝanceleligante en la butikon helva-an, kie li kunfalas pro la granda doloro, pro sia korpa-anima granda suferego.

– Kia damaĝo suferigas vian koron? – demandas la konsterniganta maljunulo, – kio okazis pri vi?

La fraŭlo plore plendante rakontas la okazintaĵojn pri li. La maljunulo indignas, kapbalancas kaj demandas la fraŭlon:

– Ĉu vi rekonas tiun blindan derviŝon?

– Jes, mi rekonos, – respondas la fraŭlo, – eĉ el inter cent.

Denove plu pensadas la maljunulo dum li glatigas al si la barbon, poste li alparolas la fraŭlon:

– Mi portos al vi veston kaj bastonon por d e r v i ŝ o. Se vi survestos la veston kaj traligos vian okulon, vi aspektos kvazaŭ derviŝo estus ankaŭ vi. Tielmaniere reiru al la ĉarŝi (foiro) kaj se vi retrovos tiun d e r v i ŝ o n, laŭspure sekvu lin sur ties vojo, kvazaŭ ankaŭ vi estus blinda. Kiam tiu ekiras hejmen al la t e k k e (klostro de blindaj derviŝoj), ankaŭ vi iru post li, kaj kiam li malfermas en lian ĉelon, vi kaŝiru post li. Bone atentu, kion li faras tie, ĉar se vi havas menson, vi povos trovi vian monon.

Poste kuras la maljunulo por la vesto, li vestigas la fraŭlon al derviŝo kaj deziras bonŝancon al li. La fraŭlo rapidas al la bazaro, do estas tie la senhelpa derviŝo, li almozpetegas tie. La almozpeteganto petas kantante almozon de la preterpasantoj:

– Blinda mi estas, lumon nevidanta, mi almozpetegas la senhelpa, donu, se doneblas; unu groŝon, mi manĝemas unu buŝplenon.

La fraŭlo kaŝrigardas, kaŝatendas la derviŝon. Kiam tiu ekiras perbastone palpadante provi trovi sian vojdirekton, li postsekvas tiun ŝtelirante longdaŭre. Iras la derviŝo al la klostro, post li la fraŭlo; la derviŝo malfermas pordon, poste malfermas sian ĉelon. Post li la fraŭlo. Ĉirkaŭrigardante en la ĉelo, li rimarkas supre iun kvertrabon. Rapide li surgrimpas ĝin kaj de tie li atentis la blindulon. La derviŝo ĉirkaŭpalpadas perbastone kaj eltiras iun bakitan bakargilan poteton el la ŝranko. Li jetas la ormonerojn al la aliaj, estantaj tiuj en ĝi.

– Miaj karaj ormoneroj brilu, unu al alia bone alpremiĝu, – diras li tre ĝoje kaj sia vizaĝo ŝanĝiĝas al rikana.

Poste li denove prenas sian bastonon, kaj per ĝi li palpas ĉie la plankon kaj la murojn: ĉu estas aŭ ĉu ne, ia fremdulo en la ĉambro, poste li kuŝas al sia kuŝejo kaj ekdormas. Ĉirkaŭ noktomeze li vekiĝas, elprenas la poteton, ĝin karesas, dorlotadas, poste li denove kuŝiĝas en sian kuŝejon kaj profunde ekdormiĝas. Ĉi tiun atendas nia komercisto. Li degrimpas singarde de la trabo kaj elprenas la poteton por malplenigi. Enpoŝigante ĝiajn enhavaĵojn, li denove surgrimpas al la trabo. Li vekiĝas aliatage je tio, ke ĝuste tiam ellitiĝas la d e r v i ŝ o. Tiu komencas la tagajn farendojn per la kuro al la ŝranko por elpreni sian poteton. Sed kiam li metas siajn du manojn en ĝin, ho granda Alaho kaj lia profeto! Neniom, eĉ ne unu groŝo trovatas en ĝi! La blindulo kuras al la muro, de la muro al la pordo, malfermas ĝin kaj gorĝostreĉe li krias:

²⁴ La signifo de la vorto ĉauso estas: turka soldata policano.

– Helpu, ho homoj, ho ve, mi estas priŝtelita, mi estas derabita! Antaŭenkuras la multaj derviŝoj po unu elkurante el siaj ĉeloj kaj perbastone larĝmove gestadante, permane palpadante ili kuregas al la damaĝito.

– Pro Alaho, kia damaĝo okazis? – demandas la teruriĝantaj blinduloj.

– Mian monon vi forŝtelis, miajn ormonerojn vi forrabis – kriadas la blinda derviŝo, kaj tiom granda svarmado, tien-reen diskuradoj estas, ke oni ekbatas unu la alianpermane, perbastone, perpiede.

– Silentigu! – krias la d e r v i ŝ o plej maljuna inter ili, kaj li jene voĉas al la damaĝito:

– Kie vi gardis viajn ormonerojn?

– En ĉi tiu malgranda poteto, mia poteto estis en la ŝranko, – kriegas la pia derviŝo kaj montras la malplenan poteton kiel la ejon de sia derabita trezoraĵo.

– Ho, mallertulo! En bovlo vi tenas vian kunakiritan, kolektitan havaĵon? – ekkrias la maljuna d e r v i ŝ o.

– Kie aliloke? – demandas la damaĝito.

– Kie mi, en mia turbano! – respondas la maljunulo. Kiam li frapas al sia turbano, tintas en ĝi la multaj ormoneroj.

Tie sur la trabo kaŭris la komercisto, li aŭdis kaj vidis ĉion desupre. Li atentis nur tion, iom trankviliĝu la maljunulo.

Tiuokaze li deligas de sia talio la zonon. La turbanon de la kapo de la maljuna d e r v i ŝ o li kaptas malsupren kaj anstataŭ ĝi, li metas sian zonon sur ties lokon. La maljuna d e r v i ŝ o alkaptas la manojn al sia kapo kaj timplena voĉe ekveade:

– A m a n, a m a n (ho, ve) – kriadas, – kie estas mia trezora turbano, kiu deprenis ĝin de mia kapo?

Li frapadas dekstren-maldekstren, kuradas, permane li frapas, perpiede li piedbatas; sed la turbanon li ne atingas. Iĝas pli granda la kirliĝo, la dise-mise kurado, sed lia mono ne retroviĝas.

– Prave punite, laŭ merite^{(Z)25}, – ekvoĉas iu alia d e r v i ŝ o, – la mono ne taŭgas por esti en turbano!

– Ej, do, kie estu ĝi? Kien ni metu? – oni demandas lin timvoĉe.

– Ankaŭ mi havas ormonerojn – diras iu pli saĝa d e r v i ŝ o, – sed mi havas ene malplenan bastonon, kiu nun plen-plenas komplete per ormoneroj.

Kaj kiam li levas la bastonon kaj tintigas en ĝi siajn ormonerojn, de malsupro etendas manon la fraŭlo kaj prenegas ĝin al si, kaj sian bastonon li ĵetas malsupren anstataŭ ĝi. Frapiĝis laŭte surtere la granda bastono, pro kio tion kredis la d e r v i ŝ o, li faligis sian bastonon surteren. Li rapide kliniĝis por levi ĝin, sed pro teruro, en li glaciĝas la sango, ja li sentas, ke aliiĝis lia bastono, ja ne tintas jam en ĝi la ormoneroj.

– Ŝtelistoj! Rabistoj! Rabistaro! A m a n, a m a n, a m a n, a m a n; vi forŝtelis mian bastonon, miajn bele briletantajn ormonerojn! – veadas ŝirante al si la hararojn la multscia saĝa d e r v i ŝ o. Nun iĝas la plej granda la kirliĝo, tien-reen kurado. Ili piedbatadas, vangofrapadas, kaptas kaj al manoj kaj al piedoj, ili ekŝiras reciproke la hararojn. Tia granda estas la brukaoso, ke eĉ rakonti estas malbone. Ormoneroj plu ne ekzistas. Nek en bovlo, nek en turbano, nek en bastono. La fraŭlo elfuĝas de la ĉelo, dum li frapas iun alstomake, ĉe aliulo li utiligas sian pugnon. Post lia rifuĝo el la t e k k e (klostro) li iras rekte al la b u t i k o h e l v a -a. Ĝojo brilas sur lia vizaĝo, kiam li rakontas pri siaj travivaĵoj al la maljunulo.

– Ĉio okazis je ordono de Dio – diras la maljuna butikisto de helva-oj, kaj li helpas iri la fraŭlon al sia vojo en la transmaran A t e n o n.

²⁵ La onidiro estas zamenhofa.

Komercisto de Ateno

Iutage, sidas la komercisto de Ateno, ĉe sia malnova amiko, en la malgranda butikoj de helva-oj. En Stambulon li denove portis kun si monon elspezendan por varoj. Lia reŝipo troviĝis ĉirkaŭ Malgranda-Azio, pro kio li devas atendi kelkajn semajnojn. Kiam ili babiladas unu kun la alia kaj sorbetas siajn kafojn, suĉadas siajn ĉibukojn, iu homo eniras neatendite en la butikon: la bofilo de la stambula veziro, la ruzafama saraf-o, (bankisto).

– Helvadžibaba (avo helvabutikista), – ekvoĉas la saraf-o – nur, al kelkaj tagoj mi bezonas monon, proksimume mil pecojn da ormoneroj.

– Sinjoro mia, vi venis kvazaŭ vokita kaj petita^(Z) – respondas la helvadŝi²⁶ (la etkomercisto de helva-oj), kaj li montras al la juna komercisto.

– Ĝuste nun li havas ioman monon loki tiel, ke je la rricevo li ankaŭ ricevu pluse ioman interezon. Baldaŭ ili interkonsentas, pri la pruntedono de siaj ormoneroj pro ne tro alta profito.

Pretiĝas pri tio la skribita atestilo kaj ili adiaŭas unu la alian. Poste pasas ĉ. du semajnoj, dum la komercisto atendas sian ŝipon. Iutage li ekhavas la sciigon, ke ĉe borde estas jam la reŝipo kaj ĝi preparas sin reiri en Atenon. La juna komercisto rapidas al sia ŝuldanto al la saraf-o kaj repetas sian monon, por ke li povu revojaĝi en Atenon. Tie sidas la edzino de la saraf-o malantaŭ la kafes-o²⁷ (krabo) kaj ŝi aŭdas la paroladon de la du viroj:

– Mi venis por rricevi mian monon, – diras la juna komercisto – baldaŭ ekiros mia ŝipo kaj mi ekvojaĝus per miamone sur tio.

– Pro kia mono? Pri kia ŝipo vi parolas? – demandas la perfida saraf-o (bankisto).

– Pri tio, kion mi prunedonis al vi antaŭ du semajnoj, miajn mil ormonerojn en la butikoj de helva-a, ĉe la maljuna helvadžisi, (butikisto) – la komercisto balbutas ektimiĝante.

– Mi konas eĉ ne vian vizaĝon kaj eĉ ne vian monon – respondas la saraf-o. – Ĉu vi havas ian kvitancon pri tio?

– Jen la skribaĵo pri tio – krias kaj montras ĝin la komercisto al la homo.

Enmanigas la skribaĵon la saraf-o, kvazaŭ li volus ellegi ĝin, kaj neatendite li ĵetas ĝin en la braĝo²⁸-fajron. La kompatinda komercisto malgajegiĝis droninte en la malespero, lia koro kunpremiĝis. Plorĝeme, pro sia granda ĉagreno, li petegas por rricevi sian monon.

– Silentu! Fermu la buŝon – alkrias lin la saraf-o, – ĉar mi tuj pendigos vin, havanta mi potencon al tio!

La sinjorino, la filino de la veziro ekaŭdis ĉion, ŝi ekbedaŭris la junan komerciston. La junulo timiĝante pro la minacaj vortoj, malgaje reiras al la malgranda helva – vendejo. La kompatinda rakontas, kia granda malfeliĉo trafis lin kaj li nur ploras kaj ploras senĉese.

– Ne malgaju – konsolas lin la maljunulo. – Ja antaŭ nelonge helpis Dio, do ankaŭ nun helpos.

Kaj jen, malfermiĝas la pordo, aperas iu sklavino, iu saracenino. Ŝi alpaŝante la komerciston diras:

²⁶ La turka vorto helvadŝi egalas: malgranda komercejo de helva-oj: butikoj, do la helvadžisi baba signifas: avo aĝa butikisto de helva-oj, tial et-komercisto, ĉar ankaŭ lia varkvanto malmultas tiel same la butikoj estas malgranda, ja li komercas ne grandvolumene kiel la ĉarŝi-o=foiro. Ĉi tie la butikisto mem pretigis siajn varojn la helvaajn kaj vendas en sia malgranda butikoj.

²⁷ La signifo de la turka vorto: kafes, egalas krabo. La signifo estas notita en la hungarlingva teksto samkiel la signifo de la aliaj turkaj vortoj.

²⁸ Braĝo egalas lignokarbo.

– Hodiaŭ vespere venu en la konak-on (palaco), kie estis forbruligita via skribaĵo. Iu volus paroli kun vi.

La fraŭlo atendis la vesperon. Kiam li staras antaŭ la pordo de la palaco, subite aperas apud li la saracena virino, ŝi enkondukas lin en la konak-on (palacon), al la ĉambro de sia mastrino. Juna, bela sinjorino estis la edzino de la s a r a f -o, la filino de la stambula v e z i r o. Ŝi akceptis per afablaj vortoj la komerciston kaj diris al li:

– Estu trankvila, komercisto, vian monon vi ricevos. Se mia edzo ne, al vi mi repagos ĝin per malgrandaj detaloj.

Ŝi elprenas sian monujon kaj transdonas cent ormonerojn. La saracena virino poste elkondukas la komerciston. Kiam ili atingas la pordon, diras al li la nigra vizaĝulino, ke li venu ankaŭ la sekvan vesperon. Ŝi atendos lin ĉe la pordego. Ĝoje rapidas la komercisto al la helva-butikisto kaj rakontas pri sia feliĉo, kaj pri la invito al la sekva tago. En la domo de la s a r a f -o okazis sekvatage, ke dum la tagmanĝo la edzino demandis la edzon, ke ĉu li ne volus ludi kun ŝi la ŝatatan ludon: J a d e s -on (la centoble belan veto-ludon). Ducent ormoneroj estas la punmono de tiu, kiu perdas la ludon. Akordas la sarafo cedanta sin persvadi kaj pretas la vetofiksigo. Post la tagmanĝo foriras la s a r a f -o. La saraceno atendas jam la junan komerciston je la vesperiĝo. Ŝi ne atendis longe. Lin ŝi kondukas supren en la konak-on²⁹, en la ĉambron de la sinjorino. Afablavorte ŝi akceptas la junan komerciston kaj regalas per kafo, kaj ŝorbetspecoj³⁰, kiam timiĝante enkuregas la saraceno per la famo, ke proksimiĝas la s a r a f o, la sinjoro de la domo. Je tiu famo, la sinjorino malfermas iun grandan skatolon kaj kaŝas en ĝin la komerciston, poste fermas la seruron, kaj la ŝlosilon metas en sian monujon. Dume ŝi forigas la sklavinon el la ĉambro. Kiam enpaŝas la mastro, lin per tio akceptas la edzino, ke:

– Viro venis en mian ĉambron, mi fermis lin, en ĉi tiun skatolon: jen, ĉi tie estas ĝia ŝlosilo, vi malfermeblas, lian kapon vi tranĉeblas.

La kompatinda komercisto en la kesto frostotremis, liaj dentoj povis interfrapiĝi. Al si kaptas la homo la ŝlosilon kaj jam malfermus ĝian seruron, kiam la sinjorino ege dolĉe laŭte ridas kaj kriadas, kaj ŝi aplaŭdas tiel, ke la buŝo edza iĝas malfermita pro la miro:

– Jades! Jades! Mi gajnis la veton!

– Mi tute forgesis pri tio – diras la homo kaj redonas la ŝlosilon al la edzino.

– La ludo ne estas finita jene. Kaj ĉu miaj du cent ormoneroj? Donu tuj mian gajnitan monon al mi – diras la edzino.

La edzo iras en sian ĉambron por porti la monon. Dum lia foresto la sinjorino liberigas la komerciston. La saraceno akompanas lin ĝis la pordego. La fraŭlo rapidis en la butikon helva-an. Oni sendis la monon tien post lin.

– Kion vi finis? – demandis la maljunulo.

– La sinjorino tiom ektimigis min – respondis la fraŭlo, – ke eĉ mia koro timtremetis pro tio, sed la sinjorino superruzis sian edzon, eĉ mia mono komencas plimultiĝi.

Li rakontis ĉion al la maljunulo, kaj ili agrable ridis pri la ludo. Sekvatage, subite alvenis la s a r a f -o. Rimarkinte la komerciston ĉe la helva-a maljunulo, li demandas kial li ne jam forportas sin hejmen.

– Hieraŭ mi havis timigan vesperon – respondas la fraŭlo.

– Kial, pro kio? – demandas la s a r a f -o.

²⁹ Konako signifas turklingve palaco.

³⁰ Ŝorbet noma turka dolĉaĵo povis servi kiel niaj nuntempaj glaciaĵoj faritaj el krudaj aŭ el glaciigitaj fruktoj. Tiun deserton oni konsumis je fino de la manĝadoj. Jen, bildo pri ĝi:
<https://www.google.com/search?q=mi+a+serbet>

– Ve! Ne demandu – respondas la fraŭlo. – Mi estis en iu konak-o, invitita tien de iu sinjorino. Kiam ni babiladis, ŝercadis kaj kafumis, subite enkuregas ŝia nigra sklavo anoncanta al sia mastrino, ke venas la edzo. Ili baldaŭ enŝovis min en grandan keston, fermante ĝin al mi, kaj kiam malfermas la pordon la edzo, la sinjorino donis al li la ŝlosilon kaj – Jades! Jades! – ŝi kriadas – mi gajnis la veton! Ŝi forsendis la edzon por sia mono.

Ĝis kiam li estis eksterĉambre, ili liberigis min el la kesto. Tiel mi eskapis el la konako sen frakaso el la granda embaraso.

La aŭditoj tiom forpelis la sangon el vizaĝo de la s a r a f -o, ke li tute paliĝante demandas de la fraŭlo:

– Ĉu ankaŭ hodiaŭ iros vi en tiun konak-on, se oni vokos vin?

– Se oni vokos, certe mi iros. Kial mi ne irus? – diras la fraŭlo tre fierege.

La s a r a f -o apenaŭ foriris, venis la saraceno tre rapide portante la mesaĝon de sia sinjorino, ke al la hodiaŭa vespero oni denove atendas lin.

Vespere ekiras la komercisto. La saraceno jam atendas lin ĉe porde kaj kondukas lin al sia sinjorino. Ili paroladas, kafumadas, per afablaj vortoj amuziĝas. Subite enkuregas la saraceno kaj ekscite balbutas; venas la s a r a f -o, la sinjoro de la domo. La sinjorino malfermas iun grandan ŝrankon kaj kaŝas la fraŭlon tie. La ŝrankon ŝi fermas, la ŝlosilon ŝi englitiĝas en la poŝon.

Grumblante malfermas pordon la s a r a f -o, kaj petas la ŝlosilon de la kesto.

– Ĉu vi suspektas vian edzinon, la filinon de la stambula veziro, pri malfideleco? – demandas la sinjorino ofendeme, kaj ŝi alĵetas la ŝlosilon al li.

Ŝia edzo kaptanta la ŝlosilon alkuras al la kesto, malfermas ĝin, kaj ej do, nenio!

El la ĉambro de la edzino li forportas sin perdinte prestiĝon. La sinjorino malfermas la ŝrankon kaj la komercisto denove eskapas sen frakaso el la embaraso. Sekvatage denove aperas la s a r a f -o kaj serĉas la komerciston en la helva-a butikon.

– Ĉu vi estis invitita hieraŭ al la sinjorino? – demandas li la fraŭlon.

– Jes, mi estis vere vokita, – respondas la komercisto. – La edzosinjoro serĉis min en la kesto, sed ĉi okaze mi estis kaŝite en la ŝranko. Ej, vi ne scias, kian vizaĝon havis la kompatindulo, kiam li forportis sin el la ĉambro, – rakontas ridante la komercisto.

– Ĉu eble vi iros tien ankaŭ hodiaŭ? – demandas la s a r a f -o tre moroze. – Kial mi ne irus, se okazus invito? – respondas aŭdace la fraŭlo.

La s a r a f o foriris survizaĝe per forta kolerego. Li apenaŭ forlasis la butikon, jam tuj aperis tie la saraceno virino rapide portante la mesaĝon de sia sinjorino; ke li estas atendata ankaŭ al la hodiaŭa vespero en la k o n a k-on. Vespere la komercisto rapidis tien, kaj li estas kondukita denove en la ĉambro de la sinjorino. Ili denove paroladas afable unu kun la alia, kafumadas, gustumas sorbetojn.³¹

– Atentu miajn vortojn. Hodiaŭ kun mia edzo mi denove vetos. En la plena mezo de nia ĝardeno estas puto apud la konak-o. Surbaze de la puto estos duono da lagenario, kaj kiu trafos ĝin el inter ni, tiu gajnos tricent ormonerojn.

– Kio estos pri mi? – demandas la komercisto.

– Vi estos malsupre en la putakvo – respondas la sinjorino – sur via kapo estos la duono de la lagenario, kaj vi atentos tiel la ekfrapiĝon. Mi iros tien kun mia edzo. Kiam li ĵetos la ŝtoneron, vi flanken saltos, por ke ĝi ne trafu. Poste mi ĵetos, tiam staru tiel sur la putobazo, ke mia ŝtonero povu trafi la lagenarion sur via kapo. Tiel mi povos gajni viajn ormonerojn: tiel vi ekhavigos denove la perditajn.

Post ĉi tiu parolado la saraceno virino kondukas malsupren la fraŭlon, kaj li malsupreniĝas en la puton. Li alkapiĝante la duonon de la lagenario atendas la veton, la J a d e s ludon de la

³¹ Ŝerbeto estas speciala turka deserto simila al la eŭrope kutima frukta glaciaĵo.

sinjorino. Dume venas la s a r a f -o kaj li malfermas foje la keston, foje la ŝrankon. Sed li trovas spuron, nek iu ajn homo, nek la komerciston. Koleretas la edzino paŭtante siajn lipojn, ankaŭ la viro koleras, senkonsilas ambaŭ.

– Ĉu pretas jam mia vespermanĝo? – ekvoĉas la s a r a f -o.

– Malsupre en la ĝardeno mi primetigis la tablon por la manĝado, – respondas la sinjorino kaj ekiras al la ĝardeno en sian kioskon apudputan.

Post ŝi paŝadas la homo. Poste ili eksidas al la manĝotablo. La sinjorino rigardas malsupren en la puton kaj ekvidas en ĝi la fraŭlon surkape per la duono de la lagenario.

– Vidu nur, duono de lagenario estas en la puto, iel ĝi enfalis. Ĵetu ni ŝtonereton al ĝi. Kiu trafos bone, ties prezo estos tri cent ormoneroj.

Ĝojis la homo, ke la kolereta sinjorino parolas kun li, nu li lasis sin persvadi. Subite li kaptas iun ŝtoneron de la grundo kaj ĵetas ĝin al la lagenarieto en la puton. Sed la komercisto flankensaltis, tiel la ŝtonero maltrafis kaj falis rekte en la akvon.

– Nun sekvas mi! – diras la sinjorino ridante.

Ankaŭ ŝi prenas ŝtonpecon, kaj kiam ŝi ĵetas ĝin malsupren en la puton, la komercisto tiel tenis la kapon, ke la ŝtonero trafis. Ŝi laŭte ridis kaj aplaŭdis pro sia granda ĝojo.

– Mi volas tuj mian monon, miajn tricent ormonerojn! – krias la sinjorino – dum la edzo malrapide iras supren por porti la ormonerojn.

Dum lia foresto por porti la monon, la saracena virino eltiras la fraŭlon tratrempiĝintan el la puto, elkondukas lin el la konak-o. Li malseke ĝishaŭte rapidis al la butikio helva-a. Li rakontas ĉion al la maljunulo kaj ili bone ridas pri la peripetio de la fraŭlo. Sekvatage denove aperas la s a r a f -o en la butikio de la helva-butikisto. Ne lasis lin trankvila, kio povis okazi pri la fraŭlo.

– Nu vi, komercisto, – li demandas la fraŭlon – kiel vi amuzis vin hieraŭ vespere?

– En puto mi trempiĝis, kaj mi malvarmumis – respondas la fraŭlo.

– En kiaspeca puto? – demandas la konsterniĝanta s a r a f -o.

– Per la duono da lagenario sur mia kapo, mi staris surbaze de la puto – respondas la fraŭlo. – La edzsinjoro ĵetis ŝtoneron unue sed ne trafis la lagenarieton. Poste la sinjorino ĵetis ŝtoneton kaj ĉar ŝi sukcese trafis mian vereton, ŝi gajnis la veton, la tricentojn. Ankaŭ tiu estos en mia mano.

Post kelkminuta pensado la s a r a f -o turnas sin al la fraŭlo:

– Morgaŭtagmeze ni aranĝas grandan gastigon en la konak-a granda ĉambrego. Kiuj ĉeestos tie, ĉiuj gastoj estas gravaj sinjoroj. Venu ankaŭ vi, estu gasto mia.

– Pro kio? Kion mi devos fari tie ĉe vi? – demandas la komercisto suspekteme.

– Tial, ĉar vi ricevos vian tutan monon, kiom vi pruntedonis al mi, kaj vi ricevos aldone ankaŭ interezon – respondas la s a r a f -o.

– Kiamaniere mi devas agi por ricevi mian monon? – demandas la komercisto, unuokule alrigardante lin strabe.

– Nenion alian faru, – respondas la s a r a f -o, nur rakontu fabelon, historion de viaj tri vesperoj.

– Per la plej granda plezuro! – respondas la komercisto, kaj foje-foje ekbrilas liaj okuloj.

Sekvatage granda estas la irado-venado, la prepariĝo en la konako. Oni primetas por granda tagmanĝo la tablojn, al majesta sinjora socio. La s a r a f -o jene sciigas sian edzinon:

– Hodiaŭ granda tagmanĝo estos ĉe mi, ĉeestos tie ankaŭ viaj patrosinjoro, fratoj, viaj bofratoj, viaj ĉiuj branĉaj parencoj. Se vi volas, vi povos sidi malantaŭ la kafes-on, por de tie rigardi nian amuziĝon. Nur unu fremdulo estos inter ni, la juna komercisto de Ateno.

Kapjesas la sinjorino, ke ŝi ĉeestos malantaŭ la krado. Venas vice la gastoj, elektitaj junuloj kaj maljunuloj. Tie estas la patro de la edzino: la veziro, fratoj, bofiloj, ĉiuj branĉaj

parencoj de la sinjorino, nur unu, la komercisto estas fremda inter ili. Ili estis jam en la pleja pleno de amuziĝo, kiam la s a r a f -o alparolas la komerciston:

– Juna komercisto de Ateno, rakontu al ni fabeleton, historion de viaj tri vesperoj.

La fraŭlo ĉirkaŭrigardante ĵetas kaŝrigardon al la kafes-o, kaj komencas rakonti sian dirindaĵon, la historion de siaj tri vesperoj. Kiel okazis la Jades-o -ludo, kia estis la afero pri la kesto, ĉe kiu estis la ŝlosilo de la ŝranko, kaj kiel li kaŭris en la profunda puto. La s a r a f -o ĵus intencus ekjubile almontri sian edzinon, sed la voĉo de la komercisto malhelpas lin en la plenumo de la volo, pro kio li ne povas montri al sia edzino sidanta malantaŭ la krado. La rakontanto daŭrigas:

– Mi havas ankaŭ ceteran dirindaĵon, bonvolu finaŭskulti ankaŭ ĝin:

Mansignas la veziro, li komencu kuraĝe. Li rakontas la aferon de sia monhistorio kun la s a r a f -o, – kun la bofilo de la veziro,- kiel okazis la neo de la ŝuldo kiel trompo lia, fine kiel okazis la forbruligo de la kvitanco pri la s a r a f a ŝuldo al li. – La ceteraj, kiujn mi diris pli frue, estis nur fabelo – diras la komercisto – tio okazis nur je la ordono de la s a r a f -o. Eĉ mian monon li promesis repagi, la forrabitan de mi de li, – se mi rakontas ĉi tiun fabelon, laŭ kiu mi kalumnios lian edzinon, la filinon de la veziro.

– Laŭvorte ĉio veras, dirite de la komercisto! – krias la sinjorino el la k a f e s -o. – De vorto al vorto ĉi tiel okazis ĉio!

Fajron ŝutis la rigardo de la okuloj de la v e z i r o. Li supren – suprensaltis el sia sidpozicio kaj alkriis al la s a r a f -o:

– Malnobla homo, orsoifa animo! Atingas vin via puno. Mi ne vidu vin plu en ĉi tiu domo, eĉ ne aliloke en la urbo. Al malproksima loko estu ekzilita, forigita, forgesita.

Oni portis la pekanton trans la maron, li neniam plu reveneblis en Stambulon. De sia edzino li estis eksedzigit, la komercisto rericevis sian monon kronite per alta interezo. Ĝoje rerapidis la komercisto en la helva-komercejon, kaj de tie al la ŝipo por reveni al sia patrino en la grandan urbon de Ateno.

La hirundo kaj la serpento

Ĉi tiu evento tiam okazis, kiam ankoraŭ la saĝa reĝo Salomono regis kaj bestojn kaj homojn. Grandan scion havis la grandpotenca reĝo estanta en multaj aferoj sperta, kompetenta kaj komprenanta multajn lingvojn eĉ ankaŭ la lingvojn de la mortontuloj kaj de la hurlojn de la arbaraj sovagbestoj, la muĝon de la kvarpieduloj, la sibladon de la serpentoj, la pepadon de la birdoj, la zumadon de la skaraboj, eĉ ankaŭ la susuron de la arboj kaj la eksusuron de la arbofolioj. Iutage li ordonis pri tio, kiu besto nutru sin per kio. Li proponis al iu viandosupon konsumi, foje kuirite el malfortaj bestoj, alfoje el fortaj bestoj. Por aliuloj li proponis manĝi herbon, radikojn kaj specojn de fruktoj.

Iutage, ĝuste iu serpento ringiĝis antaŭ li, do la granda reĝo ordonis al ĝi:

– Via nutraĵo estu la sango de la homo. Al ĝi li proponis suĉi la sangon de la homo.

Ekde tiu momento la serpento kaŝe atendis la homon, ekmaĉis ilin, tiel ĝi suĉis ilian sangon. Pro la malkontenteco murmurado, kritikado eksplodis inter la homoj. Iutage venis ĝia famo ĝis la oreloj ankaŭ de la reĝo, kiu tiel alparolis ilin:

– Kial vi plendas?

– Ni plendas pro maljusteco, – respondas la homo per granda humilo, – se la serpento ankaŭ plue pereigos nin jene, nia raso tute neniĝos, ni formortos de la tero.

– Mi havos zorgon pri via damaĝo – diras la reĝo – mi helpos vin pro via nekontentiga situacio.

Dume pripensadas la granda saĝulo, kiel li solvu la problemon. Li ordonas aperi kaj alkolektiĝi antaŭ sin ĉiun beston, kiu vivas sur la tero. Ili ĉiuj kolektiĝis surmeze de iu granda ebenaĵo. Leono, tigo, lupo, ĉevalo, elefanto, aglo, vulturo kaj multaj – multaj miloj da bestoj antaŭ la reĝo. Surtroniĝis la reĝo kaj alparolis la bestaron:

– Tial mi vokigis vin, por ke vi diru viajn plendojn. Parolu!

La homo proksimiĝas al la trono kaj genufleksante jene ekvoĉas:

– Ho, saĝa reganto! Nia peto estas, ke la serpento nutru sin per sango de iu alia besto kaj ne per la sango de la homo.

– Kial? – demandas la reĝo.

– Tial, ĉar ni estas la pleje elstaraj inter la kreitaĵoj de la vivularo.

Granda paniko eksplodis je tiu diro. Nun la bestoj protestis. Ili tiom kriegis, hurlis, intermite bojadis, porkoblekis, eĉ ankaŭ la tero tremetis pro ĝi.

– Estu silento! – sonis la ordono reĝa, – atentu mian diron!

Muta silento plenigis la grandan ebenaĵon. La granda reĝo jene ekparolis:

– Mi direktas mian ordonon al la plej malgranda estaĵo de la bestoj, mi ordonas al la kulo! Vi, eta kulo gustumos la sangon de ĉiu besto laŭvice, unu post la alia. Kies sango estos la plej bongusta, tion mi donos kiel nutraĵon al la serpento, eĉ ankaŭ tiam, se tiu estos la sango de la homo. Kaj vi – turnas li sin al la bestaro – al unu jaro post la hodiaŭa tago venos ĉi tien kaj ni aŭskultos la kulon, kion ĝi anoncos.

La reĝo stariĝas, la aŭdienco finiĝas, la bestaro disiras, kiom da bestoj, en tiom direkten foriras. Longa tempo estas la unu jaro, dum kiu la kulo finis sian laboron, unu post alia, vice ĝi gustumis la multspecan sangon. La unu jaro ĵus estis finiĝanta kaj la multegaj bestoj jam svarmas rapidante al la ebenaĵo.

Tie zumas ankaŭ la eta kulo, kaj kiam ĝi flugetas al la ebenaĵo, dume ĝi renkontas la samvoje flugantan hirundon.

– Bonan tagon, amiketo hirundo! – salutas la kulo.

– Estu bonvenata, amiĉjeto! – akceptas la saluton la hirundo; kien tiom rapide?

– Mi rapidas antaŭ la vizaĝon de la reĝo, en la grandan kunvenintaron – respondas tre fiere la malgranda kulo.

– Veras – la hirundo diras, – ja ĝuste vian vorton atendas ĉiuj bestoj, homo. Diru nur, do kies sango estas la plej bongusta?

– De la homo! – la kulo elbabilas la sekreton pli frue, ol estus necese.

– Ĉu de la homo? – la surprizita hirundo ekkrias.

– Do, de tiu, de la homo, – la kulo ripetas refoje.

Kaj kiam ĝi ripetus jam triafoje kaj jam-jam malfermas larĝe la buŝon, al ĝi frapas la hirundo kaj elŝiras ĝian etan langon. Forte ekzumas la kulo kaj eskapas de la birdeto, al la ebena, antaŭ la vizaĝon de la reĝo. Siaspure la hirundo rondflugas fluganta ĉie ĉirkaŭ tio, tiel ĝi atentigas ties intencon. Tie sidas la saĝa reĝo sur sia trono kaj sian plej unuan vorton li direktas al la eta kulo:

– Nu, vi malgranda kulo – demandas ĝin – ĉu vi gustumis la sangon de la bestoj vicorde? Ĉu vi gustumis de ĉiu?

Volus respondi la kulo, sed ne scias la kompatindeto, ja ne havas sian langon.

– Kz... kzzz... kzizzzz... – nur ĉi tiom ĝi povas elĝemi.

– Mi ne komprenas vin, – diras la reĝo, – parolu pli klare.

Denove nur: kz... kzzz... kzzzzz... – nur ĉi tiom povas elĝemi la kulo. Rigardas la reĝo la kulon, ĉu ĝi ne havas ian damaĝon. Tie flugadas la hirundo ĉirkaŭe, pensante en si mem, ke ĝi nun povas helpi la homon, kaj nun estas tempo por fari tion. Nu la hirundo tien flugetas antaŭ la reĝon kaj alparolas lin humile klinante sin:

– La kompatinda mutiĝis pro kio, ĝi ne parolas. Dumvoje ni estis kune kaj tiam rakontis al mi la aferon de la sango.

– Tiuokaze parolu vi, anstataŭ la kulo – ordonas la reĝo.

– Ej do, kiu besto havas la plej bongustan sangon? Kies sangon elektis la kulo?

– De la rano – respondis la hirundo tre trankvile. – Ĉu vere, malgranda kulo?

– Kz... kzzz... kzzzzz... – ĝemas la kulo tre malfacile.

– Bone, ekde hodiaŭ, ranon devas postuli la serpento kaj ne la sangon de la homo.

Stariĝas la reĝo de la trono, kaj kiom ili ĉeestis, tiomdirekte ili disiras. Ĉiu iĝis trankviligita, nur al la serpento ne plaĉis la ŝanĝo. Por venĝi, ĝi kasrigardis la hirundon. Kiam la hirundo preterflugis ĝin gaje pro sia ŝerco, ke ĝi povis helpi la homon, al ĝi frapas la serpento por mordi sur tio. Nur momento pasis, ke la hirundo rimarkis la serpenton, tiel ankoraŭ en bona tempo ĝi sukcesis eskapi, nur sian voston povis kapti la serpento elŝirante la mezan parton el tio.

Ekde tiam estas forkoforma la hirunda vosto kaj ekde tiam manĝas ranon la serpento.

La hirundo ŝatas la homojn, kaj tiel same la homo la hirundojn. La homo ĉirkaŭ sia domo donas lokon al la hirundo por nesti kaj panerojn por nutraĵo. La homo kaj la hirundo kunapartenas, ja la homo pli feliĉas, se hirundo vivas en lia proksimeco.

La tri miraklo-vestoj

Iu admirinda pomarbo floris en la ĝardeno de la iama reĝo. Ĉiujare ĝi produktis nur tri pomojn estintaj el oro. Sed ili vane produktiĝis, ĉar nek la reĝo, nek liaj tri filoj ne povis gustumi ilin. Apenaŭ maturiĝis la pomoj, antaŭeniĝis ia monstrospeco kaj ĝi malaperis kun la pomoj. Estis pomo, ne estas pomo.

Demandas la tri reĝidoj iutage:

– Reĝpatro mia, kial ni ne manĝeblas el tiuj tri or-pomoj?

La maljuna reĝo rakontas; kiam maturiĝas la tri pomoj, en la ĝardeno aperas iu monstro, dum la unu nokto ĝi forportas la unuan pomon, dum la dua nokto la duan pomon. Dum la tria nokto la trian pomon ĝi portas for.

– Ni deĵoros gardi ĉe la pomarbo, – krias la tri fraŭloj, – ni baros la vojon de tiu monstrospecio.

– Mi ne bedaŭras – diras la maljuna reĝo, eble vi povos venki ĝin.

Ankoraŭ samtage vespere okazis, ke iris la plej aĝa fraŭlo por servi garde. Inter la arbetoj li kaŝis sin en la ĝardeno, tie li atendis la pomorabiston. La tempo pasis senevente, sed kiam la murhorloĝo batis la noktomezon kaj subite ekaŭdiĝis timiga hurlo, lia kuraĝo svenis kaj lia animo forkuris en la pinton de la piedo^(Z), pro kio li forkuris de tie tiom rapide, kiel li povis. Sekvatage vespere la mezaĝa reĝido staris gardon, sed pri li same okazis ĉio, kiel ĉe la pli aĝa frato. Triavespere laŭvice la plej juna reĝido staris garde. Ho, ne, li ne kaŝas sin, sed kuŝas sub la pomarbon kaj tiel atendas la monstron. Terurkrion aŭdigas tiu fantoma besto, klakigas siajn grandaj dentojn kaj jam ĵetas sin sur la fraŭleton. La juna reĝideto surplanden eksaltas leĝere, celas per sia lanco kaj tiel trafas per ĝi la naŭze malbelan estaĵon, ke ĝi hurlas kaj kunfalas pro sia granda suferego. Ĝi apenaŭ povis sin fortreni kun siaj vundoj.

– Restis nia ora pomo, – ĝojiĝas la fraŭlo, kaj li nun klinas sin sub la pomarbon ripozi sufiĉe.

Sekvatage demandas liaj fratoj, kion li faris per tiu monstro?

– Povas esti, ke ĝi jam pereis ekde tiam, – respondas ilia plej juna frato. – Proponatas rigardi en la ĝardeno ĝiajn spurojn.

Komplete sanga estis la vojo de la ĝardeno, ili pasis antaŭen laŭ la spuro de la sango. Ĝis tiam ili sekvis ĝian spuron, ĝis ili atingis grandan, malnovan, disfaleman, ege profundan puton.

– Ne estas plu, jen la fino! – diras la plej juna fraŭlo, – nia malamiko povis iru suben en ĉi tiun puton en la profundon.

– Unue mi iros suben en la puton – diras la plej aĝa frato. Ŝnuregon ligu al mia talio, pere de tio mallevu min. Se mi krios malvarmon, mallevu min trankvile, sed se mi kriegos varmon, tuj retiru min supren.

La ŝnuregon ili ligas al la talio de la plej aĝa frato, la aliaj du komencas mallevigadi lin al la malsupro de la puto. Eĉ la duonvojon li ne povis atingi, kiam la supre estantaj aŭdas lian senesperigintan kriadon, ke: varma, varma, varma. Ili tuj suprentiras la fraŭlon, kies ĉiuj artikoj tremetas, kiel la poplofoliaro en la vento.

– Nun mi sekvas, – diras la pli juna fraŭlo.

La aliaj du alligas la ŝnuregon nun al lia talio kaj mallevigas lin en la puton profundan. Li apenaŭ atingas iom pli grandan profundon ol la duono, kaj estas aŭdebla lia kriado: varma, varma, varma. La fratoj tuj suprentiras lin. Liaj ĉiuj korperoj pli forte tremetas ol de la antaŭa frato.

– Donu ĉi tien tiun ŝnuregon – diras nun la plej juna frato, – sed min nur tiam tiru supren, kiam mi krias malvarmon.

Kriis li nek malvarmon, nek varmon. La fratoj subigis lin ĝis atingo de la bazo de la puto. Tie, ĉie ĝardenoj etendiĝis, floroj pompis ĉirkaŭ li. Promenadante tie, iu palaco leviĝis antaŭ li. Li enpaŝis tra ĝia pordego, supreniris sur la ŝtupoj, unue li eniris en ĉambron tute arĝentan, sen iu ajn ĉeestanto, poste li eniris ankaŭ en alian ĉambron tute diamantan. En la lasta sidis tri belegaj fraŭlinoj, kiaj belaj povas esti la h u r i³² -oj en la ĝardeno de la paradizo.

– Kies filo vi estas? Kion vi serĉas? – demandas admirante la tri fraŭlinoj.

– Mi kiel reĝfilo venis sekvante la spurojn de iu monstro, – respondas la fraŭlo, ĝia loĝejo povas esti ĉi-loke.

– En bona loko vi estas – diras la fraŭlinoj – ĉi-tiu loko estas ĝia regno, se vi ne timas ĝin.

– Mi timas nenium kaj nenion – respondas la fraŭleto kuraĝe.

Pro ĝojo eklumiĝas la vizaĝoj de la tri fraŭlinoj kaj jene sciigas la fraŭlon:

– Ĉi tie, en la alia ĉambro estas via monstro; vi povos surprizi ĝin per pordpuŝe, se vi havas aŭdacon. Se ĝi dormas, tiam ne dormas, sed se ĝi ne dormas, tiam dormas.

– Kies filo vi estas? Kion vi serĉas? – demandas admirante la tri fraŭlinoj.

– Kiel reĝfilo, mi venis sekvante la spurojn de iu monstro – respondas la fraŭlo, ĝia loĝejo povas esti ĉi-loke.

– Bona loko vi estas – diras la fraŭlinoj, – ĉi-loko estas lia regno, se vi ne timas ĝin.

– Mi timas nenium kaj nenion, – respondas la fraŭleto kuraĝe.

Pro ĝojo eklumiĝas la vizaĝoj de la tri fraŭlinoj kaj jene sciigas la fraŭlon:

– Ĉi tie, en la alia ĉambro estas via monstro; enpaŝante vi povos surprizi ĝin pordpuŝe, se vi havas aŭdacon. Se ĝi dormas, tiam ne dormas, sed se ĝi ne dormas, tiam dormas.

– Ni trioje estas reĝidfratoj, kiel same vi trioje reĝidinfratinoj, – diras la fraŭlo, – ankoraŭ povas esti el ni unu-unu edzoparo.

Li tiras ringojn al la fingroj de la fratinoj kaj kondukas ilin al la suprenirejo de la puto. Unue li ligas la ŝnuregon al la talio de la plej aĝa fraŭlino, kaj li kriadas la malvarmo-n ĝis tiam, ĝis la du fratoj suprentiras ŝin. Poste same okazis kun la fraŭlino dua. Kiam laŭvice sekvas la plej juna, la plej bela, li alrigardante la fraŭlinon diras al ŝi:

– Vi estos la edzino mia, se vi same volas.

La fraŭlino reridetas al la fraŭlo kaj ĝoje respondas:

– Kaj vi estos mia edzo, se vi volas.

La fraŭlo jam ligas la ŝnuregon al talio ŝia, kiam la fraŭlino denove ekvoĉas:

– Mi timas, viaj du fratoj ne suprentiros vin, ili trompos vin kaj vi restos ĉi tie sur la profunda bazo de la puto.

– Iel mi certe trovos vojmanieron supren, – respondas la fraŭlo.

La fraŭlino elprenas tri juglandojn el sia poŝo, kaj transdonas ilin al la fraŭlo, dirante:

– Se vi trafus en malagrablojn, disrompu ĉi tiujn tri juglandojn. Vi vidos, ke el ili tri vestoj elfalos: sur unu vi vidos la brilantan ĉielon kun same brilaj steloj. Sur la dua estos la ronda tero kun verdiĝanta arbo, floranta floro. Sur la tria videblos la ondadoj de la maroj kaj en ili la plezurbaniĝo de la fiŝoj.

Poste ili adiaŭas unu la alian kaj la fraŭlo ekkriadas la malvarmo-n.

De supro jam tiras la du reĝidoj la trian fraŭlinon, sed kiam ili ambaŭ ekrigardas ŝin, estiĝas ravataj de ŝia beleco. Ambaŭoj por si mem volas ŝin. Ili preskaŭ malpaciĝas unu kun la alia por si.

³² Laŭ la islama teologio, la **huri** estas senmakula virgulino, enparadiza donaco por la muslima viro. La hurio estas pli superranga virino, ol la aliaj.

– Nu, nun mi sekvus – diras en si mem la plej juna reĝido.

Li ligas la ŝnuregon al sia talio kaj komencas kriadi la malvarmo-n, sed kiel ajn li kriadas, la du fratoj ne tiras lin. La kompatindulo restis malsupre sur la plej profunda parto de la puto.

Malgaje li disrigardas. Li skrapas la orelbazon iom, dum li pripensas kion fari, poste ekiras al la malsupra lando. Kiam li promenas inter la ĝardenoj en la mola, verda herbaĵo, iu maljunulo, ŝajne ĝardenisto venas kontraŭ li.

– Bonan tagon, avo! – salutas la fraŭlo.

– Donu Dio tion ankaŭ al vi! – resalutas lin la maljunulo.

– Kion bonan vi finas ĉi-direkte?

– Iel, mi povis vojerari ĉi – direktan – respondas la fraŭlo, – mi ŝatus reĝi en la supran landon.

– Facilas ties maniero, – la maljunulo respondas, – nur rapide iru malantaŭen de tiu malgranda arbaro.

– Kio estas malantaŭ tiu arbaro? – la fraŭlo demandas.

– Du virŝafoj paŝtiĝas tie, – diras la maljunulo, – unu el la du estas blanka kiel la freŝe falanta neĝo, la alia nigra kiel la pipro. Fermu viajn okulojn, tiel kuregu al la du virŝafoj. Se vi ekkaptas la blankan, sur ĝi vi povos iri en la supran landon, sed se vi kaptos la nigran, ĝi falegos kun vi en la landon pli malsupran.

La fraŭlo adiaŭas la maljunulon kaj rapidas al la malgranda arbaro. Tie paŝtiĝas la du virŝafoj; unu estas blanka kiel la freŝe falinta neĝo, la alia nigra, kiel la pipro. Li fermas la okulojn kaj alkuras ilin impetege. Li ekkaptas iun permane, bum, li falas suben en la malsupran landon. La kompatindulo povis kapti permane la nigran. Li rekonsciiĝis kuŝante sur subo de iu roko, apud kiu lirlas iu fonto. Ĉe la fonto ia knabineto plorĝeme premadas manojn kaj verŝas larmojn.

– Kial vi ploras, knabineto? – la fraŭlo demandas ŝin.

– Ho, ne demandu, – plorbaltas la kompatindulino, neniel vi povus helpi min.

– Kaj se tamen jes? – instigas la fraŭlo.

– Terure granda drako, sepkapa loĝas en nia lando, – ekparolas la knabineto – homviandaĵo estas ĝia nutraĵo, homsango ĝia trinkaĵo. Ĉi tie en nia urbo nur ĉi tiu fonto estas. La drako ne lasas iri la loĝantojn, eĉ ankaŭ al ĉi tiu fonto, se ĉiutage ĝi ne ricevas unu virgulinon. Laŭvice je hodiaŭ mi estas la sekva, la drako voros min hodiaŭ.

– Kies filino vi estas? – demandas ŝin la fraŭlo.

– Mi estas la solulino de mia reĝpatro. En la palaco oni nun priploras mian morton – respondas la reĝidino ploregante.

Subite aŭdiĝas timega hurlado, post skualo jam aperas la sepkapa drako tie ĉe la subo de la roko. Ĝi blovas flamojn el la naztruoj, vomas fumon el ĝia gorgo, tiel alkuregas al la fraŭlino. Rimarkante la fraŭlon ĝi retropuŝiĝas pro la surprizo, kaj abrupte haltas la piedoj. La fraŭlo saltas al ĝi kaj sian ponardon li puŝegas en la koron de la drako. La naŭza drako hurlas forte, poste ĝi kriaĉas pli terure kaj en ĝia stara pozicio morte kunfalas. El la sep buŝoj de la drako la fraŭlo detranĉas la sep langojn kaj metas ilin en sian burson. Poste li kuŝiĝas sub iun arbon por ripozi iom pro la granda laceco. Li forgesas pri drako kaj knabineto ekdormigante.

Li vekigetiĝis je siblado de serpento en sia proksimo. Kiam li malfermas la okulojn li vidas, ke sur la apuda arbotrunko serpento grimpas supren. Birdonesto estis sur la arbo granda, agloidoj pepadis ekscitite en ĝi, la serpento grimpis al ĝia direkto. La fraŭlo enmanigas la ponardon kaj tranĉas al du partoj la serpenton.

Poste li denove kuŝas sur la teron, sub la arbo kaj daŭrigas la dormadon. Post nelonge, la reĝo de la agloj venas rapide flugante al la nesto, kie ĝiaj idoj restadas. Kiam ĝi ekrigardas la fraŭlon la dolĉe dormantan, ĝi alflugegas lin tre kolere por kavigi liajn okulojn.

– Karega nia patro – kriadas la multaj idoj, – neniel vi damaĝu la fraŭlon dormantan.

– Kial? – demandas ilia patrobirdo konsterniĝante.

– Tial, – respondas la birdetoj – ĉar se li ne ekzistus, la serpento jam estus manĝeginta nin antaŭ longe. Li liberigis nin de la serpento.

La aglo-reĝo hontante pro la pli frua ago, flugilojn etendas super la dormanton, tiel gardante lin kontraŭ la fortaj sunradioj. Ĝi atendas, ĝis la fraŭlo vekigigas de si mem.

– Vi estas bonvolema fraŭlo, – diras al li la granda aglo – vi savis miajn idojn kaj mortigis nian malamikon la serpenton. Kiel mi rekompencu vian bonvolecon?

– La supra lando estas mia patrujo – respondas la fraŭlo – mi ŝatus supren iri tien.

– Mi helpus vin bonanime, sed la vojo estas tiome longa pro la granda distanco, – diras la aglo, – ke malsate kaj soife mi pereos.

– Ĉu pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj mi povus zorgi? – demandas la fraŭlo.

– Sed, sed jes! – respondas la reĝo de la agloj. – Sed kvardek ŝafojn kaj kvardek felajn akvujojn da akvo mi konsumos. Ĉi tiom da provizaĵoj povas doni maksimume nur la reĝo.

– Mi savis lian filinon de la drako – ĝojadas la fraŭlo, – certe li ne rifuzos la peton mian.

La fraŭlo ekrapidas al la urbo dume interesiĝante pri la reĝo kaj lia palaco. Oni apenaŭ respondas liajn demandojn pro la enurba granda ĝojo. Kaj infanoj, kaj plenkreskuloj sciis, ke la drako estas murdita kaj vivas la bela reĝidino. Mesaĝportistoj eniris la tutan landon, por ke anoncu sin la drakomurdisto, ĉar donaco atendas lin. Venis la multaj bravuloj, iuj venis perpiede, aliuloj rajdante, kategorie asertante, kiuj kiel finis, kiuj kiel finis kun la drako. Ili diris, se ili ne estus, la reĝidino jam ne vivus, ĉar tiu bestio vivus eĉ nun. Eĉ ankaŭ la lingnokarbobruligantoj (karbigistoj) antaŭeniĝis montrantaj la sep drakokapojn tre laŭdantaj sin, ke ili mem neniigis la drakon kaj ne tiuj bravuloj. Ili certe ne rakontis, ke ili detranĉis jam la kapojn de la jam mortinta drako.

– Unue ni murdis ĝin, la kapojn vi tranĉis poste – diris la bravuloj.

– Nek vi bravuloj mortigis ĝin, nek vi lignokarbobruligantoj, – diras la subite antaŭvenanta reĝidino, – sed iu reĝido per unusola puŝpiko!

En ĉi tiu momento alvenas tien la fraŭlo. Li alpaŝas antaŭ la reĝon, salutante lin diras:

– Reĝsinjoro, mia! La sepkapan drakon mi murdis, ĉi – tie estas la langoj de ĝiaj sep kapoj.

Preskaŭ sinkopas la reĝidino al la brakoj de la fraŭlo, sed dume ŝi alkrias al sia patro, ke: Ĉi tiu fraŭlo estas mia savanto, li murdis la drakon! La multaj bravuloj kaj la multaj karbigistoj forportis sin senhonorigite; unu vorto ne estas multa, ili povis diri eĉ ne tiom.

– Kion vi deziras de mi? – demandas la reĝo la fraŭlon. – Ĉu vi deziras, miajn trezoraĵojn? Ĉu la duonon de mia regno? Kion ceteran vi volas?

– Reĝsinjoro mia, – respondas la fraŭlo – mi bezonas nek viajn trezoraĵojn, nek vian regnon, eĉ ne viajn aliajn aĵojn. Mi ne volas alian, ol kvardek ŝafojn kaj kvardek felajn akvujojn da akvo, por atingi la supran landon.

– Eĉ la duoblon, – respondas la reĝo kaj transdonas al la fraŭlo la ŝafojn kaj la felajn akvoplenajn akvujojn.

La fraŭlo adiaŭas poste la reĝan familion kaj rerapidas al la aglo. Li almetas sur la aglodorson kaj la ŝafojn kaj la akvujojn, sed antaŭ ilia ekiro, la aglo atentigas la fraŭlon:

– Kiam mi diras krak-on, vi metu vandon en mian bekon, ĉiufoje duonon da ŝafo. Kiam mi diras kruk-on, vi trinkigu min per akvo, ĉiufoje per duonakvujan kvanton verŝu en mian bekon. Atentu, alvenis la tempo por ekflugi. Sidiĝu sur mian dorson, ankaŭ vi havos lokon tie.

La aglo desalte forte elanas, poste ĝi flugas tiel, ke eĉ la plej forte blovanta vento ne postatingas ilin. Kiam ĝi diras K r a k-on, la fraŭlo manĝigas per viando, kiam ĝi diras K r u k-on la fraŭlo trinkigas ĝin per akvo. Ĝis tiam li manĝigis kaj trinkigis, ke elĉerpiĝis kaj la viando kaj la akvo, sed ili estis jam proksimiĝantaj al la supera mondo.

– K r a k, krias la aglo.

Kion faru la kompatinda? Per sia ponardo li eltranĉas unu pecon de sia femuro kaj tion li donas al la aglo.

– Ej, do, li donis el sia propra viando? – murmuris la besto-reĝo, kaj ĝi ne glutas tion, sed tenas sub la lango, ĉar ĝi ne volis gluti tion.

Ili havis grandan feliĉon pro la baldaŭa alveno, ĉar estis bezonata plu nek viando, nek akvo.

– Paŝu malsupren de mia dorso – diras la aglo al la fraŭlo.

Li volonte obeus, sed ne kapablas ekstari surpiede, tiome doloregas lia femuro pro la profunda vundo. La aglo, vidante sian pravon, diras nenion, sed ĝi elprenas la viandopecon sub sia lango kaj alĝustigas tion al ties loko, fine malsekigas ĝin per sia salivo. Je ties efiko la fraŭlo tiom grande saltis, kvazaŭ li neniam estus havinta damaĝon. Poste ili adiaŭis unu la alian, la aglo forflugis, la fraŭlo restis tie sur la tero de sia propra patrujo.

– Mi estas hejme, se veras, – suspiras la fraŭlo per plifaciliganta koro.

Poste li ekiras sur la landvojo, al la urbo de sia reĝpatro. Li ĝuste preterpasas antaŭ la metiejo de la tajloro de sia patro. Li eniris por ripozi iom. La tajloro ne rekonis lin pro lia ĉifoniĝo.

– La leviĝanta vento de kie blovis vin ĉi tien? – demandas lin la majstro.

– De malproksima lando mi venas, la tajlista metio estas ankaŭ la mia, – respondas la fraŭlo. – Ĉu min vi ne bezonus al via helpisto?

– Vi venis al mi kvazaŭ vokita kaj petita^(Z), frato mia pli juna, – respondas la tajloro, – ĝuste niatage mortis mia helpanto.

En la reĝa kortego multspecaj eventoj okazis ekde la foriro de la reĝido. Jam delonge alvenis la du reĝidoj kune kun la tri reĝidinoj. La du fifratoj kverelis unu kun la alia, el inter ili, kiu edzinigu la plej junan fraŭlinon, la plej belan. La reĝo juĝis ŝin al sia plej aĝa filo, dirante, ke li havas rajton al ŝi. Oni sciigas ankaŭ la fraŭlinon, ke ŝia edzo la plej aĝa filo estos.

– Volonte, – respondas la fraŭlineto, sed mi havas tri dezirojn, antaŭ ĉio ili estu plenumotaj.

– Prezentu viajn tri dezirojn, – oni diras al ŝi.

– Kudrigu al mi tri vestojn, sed nepre tian, ke sur la unua estu tie la brileganta ĉielo kaj la multegaj brilantaj steloj, sur la dua estu la ronda tero, la verdiĝanta arbo kaj floranta floro, sur la tria estu la ondado de la maroj kaj la plezurbaniĝo de la fiŝoj.

La reĝo vokigas la tajloron kaj ordonas lin prepari la tri vestojn, ĉar kontraŭe li perdos la kapon. Malgaje iras hejmen la tajloro. Siajn du manojn kruce kunmetite li premadas pro la senesperigado, ŝiras kaphararon pro sia angoro, ĉar li ne estas la majstro de la vestoj ĉi-tiaj specaj. Li ploras, veadas, grumbladas. – Kian damaĝon vi havas, mia mastro? – demandas lia helpisto. – Tri vestojn ordonis la reĝo – respondas la tajloro, ke sur la unua estu la brileganta ĉielo kaj brila stelo, sur la dua ondado de maroj kaj plezurbaniĝo de fiŝoj.

La mastro denove premadas la manojn senesperigante kaj ŝiras la hararojn. Ekridetas la helpanto kaj diras al sia mastro:

– Ej do, ĉi estas tiom granda afero? Ja, ĉi tiun eĉ iu infano povas pretigi.

Gapas al li la tajloro en si pensante, ke eble lia helpanto freneziĝis.

– Pretigos mi tiujn tri vestojn, – ekvoĉas denove la fraŭlo – eĉ je morgaŭmatene mi povos esti preta kun ili.

La majstro pli grandan gapas al li.

– Tutcertas, ke li freneziĝis – li pensas en si mem.

– Kiujn mi aldonu al tiuj kiel necesajojn? – demandas la tajloro, ke li tamen diru ion.

– Eê tio ne estu via zorgo, – respondas la fraŭlo – eê kudrilo ne estas bezonata al ĝi. Ŝorbeton³³ da tuta kruĉo kaj avelojn da tuta korbo, donu en la metiejon, la pordon de la metiejo vi fermu al mi, matene kiam vi malfermos ĝin, tiam pretos la tri vestoj.

Al ŝerco kaj al freneza parolo pensis la majstro la diritajn, tamen li donas la ŝ o r b e t o n kaj la a v e l o j n al sia helpanto, fermas al li la pordon kaj iras por ripozi, se oni povas paroli pri trankvila ripozo.

Li nur ĵetadas sin sur sia litaĉo, dum la fraŭlo tutnokte rompas la avelon, maĉadas ĝin kaj sorbetadas al ĝi la ŝ o r b e t o n. Jam frumatene estas veka la majstro, antaŭ la sunleviĝo li frapetas sur la pordo de sia helpanto:

– Ĉu pretas la tri vestoj? – demandas li amarece ridetante.

– Ankoraŭ ne estas sunleviĝo, – respondas la fraŭlo.

Li elprenas la tri juglandojn kaj unu post la alia rompas ilin. Tiaj tri vestoj elfalis el ili, ke sur la unua estas la brileganta suno kaj la multaj brilaj steloj, sur la dua estas la ronda tero, la verdiĝanta arbo kaj la floranta floro, sur la tria videblas la ondadoj de la maroj kaj la plezurbaniĝoj de la fiŝoj.

Je komenco de la sunleviĝo jam tie frapetas la tajloro:

– Ĉu pretas jam la tri vestoj? – li demandas denove, nur traktante la fraŭlon desupre, malŝate.

– Pretas – respondas la fraŭlo, – vi povas enveni por ili.

La tajloro malfermas la pordon de la metiejo. Kiam li rigardas kaj rimarkas la tri vestojn, li nur gapadas, li streĉas la okulojn kaj preskaŭ subradikiĝas liaj piedoj pro la miro. Poste li pensas, ke li sonĝas, aŭ li falis inter la manojn de iu magiisto, nur tre malfacile li revenis al si mem. Nu li manprenas la tri vestojn miraklajn, kuras kun ili en la palacon kaj transdonas ilin al la reĝidino, al la plej juna, al la plej bela.

– Kiu kudris tiujn tri vestojn? – demandas la surprizita fraŭlineto.

– Mi vere ne povus esti kapabla fari tiujn – respondas la tajloro, – sed je mia feliĉo hieraŭ iu kuraĝa fraŭlo venis al mi kaj je mateno pretiĝis la miraklo granda.

– Tuj voku tiun fraŭlon – diras la fraŭlineto, – mi ŝatus rigardi lin.

Kuras la tajloro por la fraŭlo. Kiam tiu fermas pordon en la palaco kaj enpaŝas en la ĉambron de la fraŭlineto, ili ĵetas sin al la kolo de unu al la alia. La du unuanimaj gejunuloj ne povas elparoli sian grandan feliĉon. De ili sciiĝis pri ĉio la maljuna reĝo, kiu donis justecon inter siaj filoj. La du pli aĝaj fratoj ne restis en la lando. La aliaj du fraŭlinoj reireblis al siaj gepatroj. El la plej juna fraŭlo nome el la reĝido iĝis reĝo. Ili aranĝis grandan geedziĝan feston, se vi estus tie, ankaŭ vi estus povinta vidi. Kiu kredas, tiu prosperos, kiu ne kredas, tiu sin turnos.

³³ **Ŝorbeto** estas glacia turka deserto. Pri ĝi pli abunde vi povas legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Corbeto>

Trompa fabelo, mensoga fabelo

Stranga estis, sed vera, ke la iama reĝo estis malriĉa. Li vivis malriĉece kaj tiel same li mortis postlasinte herede malabundon. Liaj tri filoj restis solaj sen riĉaĵo. Nur unu ĉevalo, unu ŝelo kaj unu brido estis iliaj heredaĵoj, eĉ ne unu estis en bona stato. La tri fraŭloj lotis, kio kiun koncernu. La plej aĝa filo heredis la bridon, la meza filo ricevis la selon, al la plej juna estiĝis la ĉevalo. La plej aĝa filo portis ĝin en la urbon por vendi, ke li iel ekhavu monon el sia heredaĵo. Sed la bridon neniu volis aĉeti eĉ ne pro malmulta mono. Jam li venis hejmdirekte, kiam survoje salutas lin iu kalvulo, kiu diras al li:

– Reĝido, envenu al mi, eble ni povos interkonsenti. Ili eniras la domon kaj tiun veton proponas la kalvulo, al tiu restu la brido, kies mensoga diraĵo superos ĉiun verecon, ĉiun klaran mensan rakonton, ĉiun sobrecon.

– Se mi estos la gajnanto – mia estos la brido; sed se vi gajnos, tiuokaze via estos mia ĉi tiu domo, per ĝia tuta aĵaĉaro en ĝi.

Ili akordiĝas unu kun la alia, kaj ekiras la multaj eltrovaĵoj, rakontoj spicitaĵoj per klaĉoj kaj onidiroj. Unue la reĝido ekparolas parolante transverse-renverse, sed kiel la spico kaj salo en la saŭco, do la tuto havas nenian specifan trajton por senti ĝin ĝuplena. Li diris la tuton dum unu spiro, kiam venis la fino de tiu unu spiro, li finis sian dirindaĵon.

– Ĉu vi ne havas plu dirindaĵon ceteran? – la kalvulo demandas.

– Ne estas – respondas la reĝido, – ĉion mi diris, kion mi sciis. Nun vi sekvos, komencu vi.

La kalvulo komencas kaj liaj vortoj jene ekiras:

– Havis mi azenon en tempo ne tro malproksima. Ĝi manĝis tiom da kukurbo, ĝi maĉadis el ĝi tiom multe, iutage ĝi ekpufiĝis, poste krevis kaj pereis. Unu kukurbarbo elkreskis el la ventro de la mortinta azeno. Kreskis, kreskadis la kukurbarbo, ĝia pinto atingis la ĉielon. Ĉu vi diotimulo demandas min, kiamaniere mi deprenis la kukurbetojn? Nu mi suriris la kukurbarbon grimpante de tubero al tubero kaj tiel mi ĵetadas malsupren la multajn kukurbetojn. Finante la dirindaĵon la kalvulo demandas la reĝidon, ĉu li povus diri pli mensogan rakonton de ĉi tio?

– Mi ne superas vin, – respondas la reĝido kaj transdonas sian bridon, estu tiu ĝoja per tiu.

Malgaje li revenas en la palacon, de tie li atentis la okazintaĵojn de la mondo. Post ĉi tio, sekvas la meza fraŭlo. Li prenas la selon, kaj ankaŭ li iras en la urbon por vendi ĝin. Li ofertas ĝin al iuj kaj ĉiuj, sed neniu aĉetas ĝin. Li estas revenanta malgaje sur la vojo, kiam la lin embuskante atendanta kalva homo envokas lin en sian domon. Ili same, kiel pli frue kun la pli aĝa frato, interkomprenas unu kun la alia en intereso de la akiro de sia havaĵo, ĉi kaze en intereso de la selo. Ili sammaniere diras al unu al la alia siajn mallongajn mensogajn tekstojn kiel siajn ludojn. Fine la selo restas en la domo de la kalvulo.

– Nun jam nur ankoraŭ la ĉevalo estas akirenda – ĝojagas la ruzulo kaj atendas la okazon, atendas sian feliĉon. Malgaje ekiras la plej juna reĝido portante sian ĉevalon al la foiro, eble li povus liberigi sin de tio. Ĉirkaŭiras la kalvulo sian ĉedoman teron, kaj kiam li ekrigardas la reĝidon, afablavorte li salutadas tiun, kaj trompavorte diras al li:

– Envenu al mia domo reĝideto, lasu min rigardi vian ĉevalon. Ili eniras la domon, kaj ĉies fino estis same la propono de la veto per mensogaj vortoj:

– Kiu scias prezenti grandan mensogon, eĉ pli grandan de la granda?

– Se mi estos la venkanta – proponas la kalva – mia estos via ĉevalo; sed se vi venkos, se vi superos min, tiam mia tuta domo per ĉiuj enaj aĵaĉaĵoj estos viaj.

– Bone, enorde – diras la reĝido, – mi tenas la interkonsenton pri la veto.

– Ej, do, komencu! – la kalvulo kuragigas lin.

– Vi komencu, vi la majstro, – respondas la reĝido.

La kalvulo nevolonte komencas kaj la pli fruan tekston li diras refoje, la eventon de sia azeno, kaj la aferon de la kukurba arbo. – Ĉi tiom estas la tuto? – demandas post ĝia fino la reĝido.

– Ĉi tiom – respondas la kalva. – Komencu vi, se vi scias pli multe.

La reĝido komencas:

– Naskiĝinte, mi estis ĵus cent dek jara, mia patrino estis nur cent jara. Oni instigadis min por baptiĝi, kaj kurigis min por venigi la pastron. Mi preterpasis iun puton, sed kiam mi superkliniĝis por gustumi ties akvon, mia kapo enfalis. Mi ne rimarkis, sed daŭrigis mian vojon. Du ĝendarmoj sidis vojrande en ombron de du folioj de filikoj. Unu ekvidante min diras al la alia:

– Estas ĉi tie homo sen kapo, ĝi rapidiras sen menso.

– Mi rekonsciiĝis kaj vidis, ke mia kapo ne estas sur mi. Mi rerapidas al la puto, kaj kiam mi atingas ĝin, do iu lupro sidas tie kaj maĉas mian kapon.

– Ĉesigu la parolon, – la kalvulo krias, mi redonas prefere vian ĉevalon.

– Atendu vian vicon, – la reĝido diras, – nun sekvas la plej bona parto. Mi eniĝis en la lupon, kaj elskrapis el ĝi mian kapon.

– Ĉesigu, – la kalvulo krias denove, – mi redonas prefere ankaŭ viajn bridon, kaj la selon.

– Atendu vian vicon, – diras la reĝido, – eĉ nun sekvos ĝia plej bona parto. Mi atingis tre malfacile la pastron kaj vokas, venu bapti.

La pastro ne havas oleon, elĉerpiĝis ĝi el ties botelo. Mi kuras tiam al via kukurboarbo, surgrimpas ĝin kaj trovas tie la ĉefanĝelon ...

– Ĉesigu la tuton, – kriaĉas la kalvulo, mi transdonas ankaŭ mian domon per ĉio ene estantaj sak-pakoj.

– Ĉi tio estas jam grava, encerbiginda parolo, – la reĝido diras. Li alprenas sian ĉevalon, la fratajn bridon kaj la selon jam foruzitajn, la tutan domon kun la plena trezorkamero de la kalvulo, kaj li tiel ekiras hejmen. Ili vivis poste senzorge, ja ili havis per kio ŝmiri bridon kaj la selon panon.

– FINO –